





FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

16x2005hef005795aa

EL CORONEL IGNOTUS

*La amo en la jaro dekmil*



J. de Elob

86. = 3

EL CORONEL IGNOTUS

JOSÉ DE ELOLA

*La amo  
en la jaro dek mil*

\*

1932

HEROLDO DE ESPERANTO, KÖLN

5795

Esperanto-traduko el la hispana originalo  
de José Fernando Berenguer

Propraĵo de l' aŭtoro.  
Ĉia reprodukto, inkl. la  
kinematografo, nur kun  
konsento de l' aŭtoro

La originalo aperis sub la titolo „El Amor en el Siglo Cien“  
ĉe Librería Rivadeneyra en Madrid, Hispanujo

Preso: Heroldo de Esperanto, Köln, Germanujo

## ANTAŬPAROLO

En la riĉa trezoro de la tradukita Esperanto-literaturo troviĝas relative malmultaj verkoj el la hispana lingvo. Tamen ĝuste la hispana-iberamerika kulturmondo estas plena de verkoj, klasikaj kaj modernaj, kiuj apartenas al la perloj de la mondliteraturo. Pro tio la tradukinto de la antaŭ vi kuŝanta libro sentas specialan kontentecon, ke li povas prezenti al la tutmonda esperantistaro la tradukon de verko el serio da sciencaj-distraj romanoj, kiuj estas disvastigitaj tra tuta Hispanujo kaj Hispan-Ameriko en pli ol 120 000 ekzempleroj. La aŭtoro de ĉi tiu interesa kaj samtempe instrua serio („Biblioteca Novelesco-Científica“) estas „El Coronel Ignotus“, aŭ, laŭ sia vera nomo, José de Elola. Certe la esperantistaro ŝatos ekscii ion pli detalan pri li, kies unua verko esperantigita estas antaŭ vi.

Don José de Elola Gutierrez naskiĝis la 9-an de aŭgusto 1859 en Alcalá de Henares, Kastilio, Hispanujo (la sama loko, kie ekvidis la lumon de l' mondo la universale granda hispano Don Miguel de Cervantes Saavedra). Li elektis la militistan karieron kaj atingis la rangon de generalo de brigado. Eksterordinare grava estas lia scienca laborado. Li estis profesoro en la Ĝenerala Akademio Militista, Altlernejo de Milito, konsilisto de Publika Instruado, ĝenerala direktoro de la Institutoj Geografia, Statistika, Katastra, prezidanto de la Naciaj Komitatoj de Astronomio, Geodezio kaj Geofiziko, de la Komisiono de Pesiloj kaj Mezuriloj, vicprezidanto de l' Supera Konsilantaro de Geografio kaj same de la Matematika Societo Hispana, krome de la Statistika Komisiono de Ligo de Nacioj ktp. Tro longa fariĝus la listo, se mi volus citi ĉiujn liajn oficojn.

Nuntempe li estas ankoraŭ prezidanto de la Hispana Sekcio de l' Internacia Komitato por la Landkartaro de l' Imperio Romana, honora prezidanto de la Hispana Societo de Meteorologio, prezidanto de la Hispana Sekcio de Aero-naŭtiko en Berlino kaj komitatano de la Direktantaro de l' Unio Iber-Amerika por Inĝenierajoj.

Al tiom granda nombro da oficoj respondas ankaŭ la nombro da ordenoj kaj aliaj honoroj kaj distingoj, per kiu oni rekonis lian multflankan eminentecon.

En la gazetaro de Hispanujo li okupis tre gravan lokon kiel dumtempa direktoro-gvidanto de „ABC“, „Blanco y Negro“, „Alrededor del Mundo“, „Los Contemporaneos“, kaj tiel plu.

Estas ne mirige, ke tia homo de scienco verkis librojn pri matematiko, topografio kaj ĝeneralaj sciencaj temoj. El ili mi citu speciale „Modernas bruĵerfas de la ciencia“ (Modernaj sorĉaĵoj de la scienco). Krome li estas aŭtoro de vico da verkoj moralaj, sociaj, ekonomiaj ktp. La plej grava el ili eble estas „El credo y la razón“ (La kredo kaj la racio).

Ne estas neinterese, ke Elola inventis kelkajn gravajn sciencajn instrumentojn, kiuj troviĝas en praktika uzado.

Kiom ajn ampleksa estas la verkado pure scienca de Elola, nin interesas plej multe lia literatura laboro. Jam komence mi menciis lian „Sciencan Roman-Bibliotekon“, konsistantan el 17 volumoj. Dum ilia legado ni malsupreniĝas sur la fundon de oceanoj teraj kaj aliplanecaj, levigiĝas al la ĉielo, travivas sablo-ventegojn en la dezerto, transmigras polusajn glaciejojn, partoprenas gigantajn flugojn tra nia sunsistemo kaj hejmiĝas sur nia hela najbarplanedo Venuso; en nia nuna romano ni ekscias pri industria ekspluatado de l' plej delikata homa sento: la Amo. Sed per tia citado mi tre malkomplete nomis la temojn pritraktitajn: la fantazio de Elola ŝajnas esti fonto neelĉerpebla. Li vere posedas la „malfacilan facilecon“ (kiel diras la recenzisto Cristobal de Castro en „El Universal“ de Meksiko) „verki



kun flueco, forto kaj allogo, en tiu tono familia kaj altira, kiu malesperigas saĝulojn. Sed, ĉar li ankaŭ estas saĝulo, li bazas ĉiujn siajn librojn sur tiu substancoplena klarigado de la plej komplikitaj sciencaj temoj kaj inventoj, kiuj malesperigas la nesciulojn“.


Sed antaŭ ĉio: Elola estas nia! Li estas konvinkita simpatianto de l' ideo de nia komuna lingvo. Al Esperanto li atribuas en ĉi tiu romano ĝuste tiun lokon, kiun aspiras ni esperantistoj por nia lingvo: la memkompreneblan rolon de lingvo vere internacia. Eble ni ne tute samopiniis kun li rilate la tempon de ĝia disvastigado en la diversaj fakoj de l' vivo; sed tio, finfine, estas ja negrava antaŭ la fakto, ke li ne agas kiel multaj aliaj sciencistoj trofieraj kaj tromemfidaj, kiuj rigardas nian lingvon moke-komplete kaj eĉ malŝate.

Ĉi tiu libro enhavas multajn vortojn kutime ne uzatajn kaj tial verŝajne nekonatajn de granda parto de la esperantista publiko. Sed la scienca spino de la verko (se mi rajtas uzi ĉi tiun esprimon) devigis al uzado de sciencaj terminoj. En sufiĉe detala aldono „Klarigoj kaj rimarkigoj“ mi kolektis laŭeble ĉiujn, kiuj servas al pli bona kompreno de la teksto.

Koran dankon mi ŝuldas al la eminenta aŭtoro, kiu bonvolis permesi la Esperantan tradukon; sincerajn dankesprimojn mi direktas al nia klera samideano Don Vicente Inglada Ors, membro de la Esperantista Akademio, mia altestimata amiko, kiu en dubaj tradukdemandoj ĉiam estis fidinda konsilanto, kaj kies merito estas, ke mi evitis multajn ne nepre necesajn neologismojn; fine, sed ne laste, mi dankas ankaŭ al la eldonejo de Heroldo de Esperanto, kiu tiel bone aranĝis la teknikan parton de la libro.

Ha! mi ne forgesu menci, ke la unuan instigeton por tradukado de ĉi tiu verko de Elola mi ricevis de mia bona amiko Don Francisco Azorín Izquierdo, nuna membro de la respublika parlamento de Hispanujo.

**José Fernando Berenguer.**



## MALLONGA PROLOGO

De kiam Inés Ramírez kaj Juan García estis atakitaj de letargia encefalito aŭ de io, kio, kvankam ne encefalito, ŝajnis tia al la medicinistoj ilin diagnozintaj, la mondo multe turniĝis; ĉar 2921920 turnoj faritaj en tiu tempo ja povas esti nomataj turniĝado.

Se oni scias ke letargio, malsano aŭ dormo droniĝis ilin en senkonscio en la jaro 2000, malmultaj kaj simplaj operacioj per la modestaj kvar kalkulmetodoj sufiĉas por klarigi, ke post la notita nombro da turnoj, po unu dum 24 horoj, alvenis la mondo al la jaro 10 000 de nia erao, kiam ili vek-iĝis aŭ saniĝis; ĉar neniu eksciis, ĉu ili, dum tiu longega interrompo de sia konscia vivado, estis malsanaj aŭ dorm-antaj. Ĉe la alveno de l' nomita jaro Inés kaj Juan aĝis 8027 kaj 8034 jarojn, respektive. El tio estas konkludeble, ke ili, fermante la okulojn kaj dorme perdante siajn vivojn, havis la aĝojn esprimatajn per la lastaj ciferoj de tiuj respektindaj nombroj. Rilate al iliaj veraj aĝoj en la momento, kiam ili reakiris siajn vivojn forestintajn dum 8000 jaroj, estas malfacile decidi, ĉu ili havis 8027 kaj 8034 jarojn, laŭ siaj bapto-dokumentoj, aŭ 27 kaj 34, en kiuj aĝoj ili ekdormis. Pro tio ke en ili estis interrompita ĉia aktiveco de l' vivo, neniel estis maljuniĝintaj iliaj korpoj nek iliaj spiritoj.

Lj estis kemio-direktoro, ŝi elektro-inĝenierino en potenco entrepreno por industria malvarmo, establita en Bilbao; krome ili estis gefianĉoj kaj baldaŭ geedziĝontaj.

Ne estas strange ke nek en la mondo tuj post la unua etapo de l' vivo de nia paro, nek eĉ en la centa jarcento, kolose pli progresinta, oni sukcesis konstati kaj eltrovi la kialon — mi celas kialojn esencajn kaj prakaŭzojn, ne efekt-

ojn konsekvencajn — de la kreskado de l' plantoj, ĝermado de l' semoj, maturado de l' fruktoj, nek kial el unu sama patrino naskiĝas jen knaboj, jen knabinoj, nek kiaj estas la plej intimaj kaŭzoj de la fiziologiaj funkcioj aŭ de la malsanoj; ne estas do strange, mi ripetas, ke en tia mondo restis por ĉiam nekonataj la kaŭzoj de la letargio okmiljara, kiu samtempe falis sur Juan'on García kaj Inés'on Ramírez. Vidadis ilin dormi generacioj da medicinaj korifcoj sekvintaj unu post la alia; plej atentegc ili observadis la dormantojn, cerbumegante pri la problemo de tia dormado; tamen ili ne povis konfirmi post okdek jarcentoj da studado alian aferon ol la realecon de l' eksterordinara fenomeno; sed pri ĝiaj kaŭzoj ili restis tiom nesciaj kiom pri la kaŭzoj de preskaŭ ĉiuj naturaj fenomenoj.

Tial ke la nekutimaj aventuroj de la enamiĝintaj protagonistoj de tiu ĉi historio ne okazis en la jarcento XX, ĉe kies fino ili ekdormis, letargiiĝis aŭ frostiĝis, sed en la centa jarcento, ni transpasos tre rapide ĉion, kio estas konsiderebla en ĉi tiu historio nur apuda, kvankam necesa prologo, vualita per la nokto de la tempoj: signifa esprimo tre taŭga, en 10 000, por okazintaĵoj de l' 20-a jarcento. Ĉi tiuj okazintaĵoj, proporcie al tiuj de l' jarcento C, estas multe pli malantaŭaj ol la jaroj de Abraham, rigardataj el la jaroj de Marconi, de l' granda mondmilito kaj la malfermo de l' kanalo de Panamo, tempdistanco malpli granda ol 44 jarcentoj: t. e. la preskaŭa duono de la jaroj pasintaj de post la ekdormo de la paro, kies travivaĵojn ni estas rakontontaj, en Bilbao kaj la vekigo en Mondopolo.

Oni reenmemorigu al si, kiom kaj kiom da monarkioj, respublikoj, popoloj, socioj kaj civilizacioj leviĝis en la Historio, kreskis kaj pasis de post la patriarkaj tempoj antaŭdiluvaj ĝis la jarcento XX, komenciĝinta kun simptomoj similaj al antaŭsignoj pri la mortiĝo de plia civilizo, kiun pro ĝia kadukeco kaj korupteco subfosas la tempo, kaj lasanta anstataŭe mondon novan, eble pli bonan, eble pli malbonan, sed ĉiakaze diferenca. Se ĝi ne kuracos malbonojn

antikvaj, ĝi almenaŭ vestos ilin per malsama vestaro por trompi la Homaron, variigante tiujn, je kiuj la homoj suferadas, aŭ faligante ilin sur aliajn viktimojn. Oni reenmemorigu tion al si kaj konkludu poste, kiujn ŝanĝojn la mondo estos spertinta dum duobla tempo, de nun al la centa jarcento.

Plue oni rimarku ke Ĥaldeujo, Babilono, Egiptujo, Romo, la Barbaroj, la Feŭdalismo, la Venko super la Islamo, la Renesanco, la granda Hispana Imperio, la Franca Revolucio okazis unu post alia en multe malpli da jarcentoj ol la forpasintaj, de post kiam en Bilbao falis Inés Ramírez kaj Juan García en katalepsiajn statojn, ĝis ili reakiris la konsciencen pri sia propra ekzistado.

Sufiĉas ne forgesi tion por kompreni, ke al la homoj de l' centa jarcento devas soni la grandaj nomoj de niaj aktualaj socioj tiel, kiel al ni la nomoj Noa, Nimrod, Semíramis, kun sono de malproksimega eĥo, pli fora ol tiu, kiun al niaj oreloj alportas la cititaj nomoj.

Eĉ ne unu sola el la nacioj ekzistantaj en la 20-a jarcento daŭris en la 100-a<sup>2</sup>; neniajn postesignojn trovis, renaskiĝinte en ĝi, la du ĉefpersonoj de ĉi tiu historio, pri io nomiĝanta Hispanujo, aŭ Britujo aŭ Francujo aŭ Germanujo. Ĉiuj ĉi ŝtatoj estis pereintaj englutante, ŝajne, unu la alian, sed manĝegite, fakte, de l' tempo nesatigebla, kiu poste enfaŭkigis, ne lasante de ili ian postesignetan, la potencajn Konfederaciojn iberan, Anglosaksan, Niponan, Germanan, kiuj inter la jarcentoj XXII kaj XXIX sangplenigis la Teron per egoistaj, malbonmemoraj luktegoj, senfruktaj por la feliĉeco de homaj estaĵoj.

Sed malgraŭ ke ili vidis nin tiel malproksimaj (mi aludas la popolojn kaj civilizojn nuntempajn), la homoj de l' jaro 10 000 konis nin multe pli bone ol niaj instruituloj pri antikva historio konas la sociojn kaj personojn el foraj epokoj, ĉar ili disponis pri dokumentoj kaj presitaj verkoj pri nia tempo kaj legitaj en ĝi; tiajn ni ne ricevis de Ninivanoj nek de persoj aŭ egiptoj.

La Historio estis fariĝinta tiom, tiom longa, ke neniu pretendis studi ĝin laŭ nia stilo. La nomoj kredataj hodiaŭ naciaj gloraĵoj, estis disflugintaj en forgeson. »Vanitas vanitatum!«. Savis sin el la fumiĝo nur tiuj malmultaj, kiaj ŝanĝis en la mondo ne la direkton de imperioj, sed la celvojojn de l' homaro, igante la homojn progresi en moraleco, scienco aŭ ĝeneralaj bonoj.

Pro tio, en la ordinara edukado, la fako Historio estas mallonga; en ĉiu leciono oni pritraktas jarcentojn, ne haltante ĉe la ekzistado eĉ de tutaj nacioj, se ili ne influis la vivon de ĉiuj. Pri Hispanujo, ekzemple, oni nur konsideras la Rekonkeron, la Eltrovon kaj Koloniigon de Ameriko kaj la Lukton kontraŭ la Reformacio; en Francujo oni saltas de l' Imperio Karlovinga al la Revolucio en 1793 kaj al la Napoleona Imperio kiel kovintaĵo de l' mondmilito en 1914 ĝis 1918, kaj sammaniere en la aliaj landoj, nur atentante pri la efektivigitaj gravaj ŝanĝoj en la mondo, lasante sur la margeno la plimulton de la propraj nomoj.

En la universitatoj oni studas, kiel senperan instruon, la fruktoportan manipulado de la historiaj slipoj, kiuj donas indikojn al libroj kaj paĝoj, kie estas troveblaj amplekseĝaj notoj pri konkretaj faktoj, figuroj kaj eĉ figuraĵoj de la individuaj privathistorioj. La slipoj de Mondopolo okupas kvar salonegojn en la Palaco de la Kronikoj, kaj konsistas el pli ol kvar milionoj da kartoj klasifikitaj en 70 indeksoj.

La kartoj donas simple la nomon de la okazaĵo aŭ persono, volumon kaj paĝon de Ĝenerala Historio de l' Mondo (verkaro de pluraj generacioj historiistaj kaj arkivistaj) kaj de la partaj opaj historioj, krome ankaŭ monografiojn kaj eĉ biografiojn utile konsulteblajn.

Inter la multaj aferoj mortintaj de l' jaro 2000 ĝis 10 000 troviĝas la nunaj lingvoj, studataj de instruitaj filologoj ne pli, ol en la 20-a jarcento oni studis la klasikajn grekan, hebrean kaj sanskritan. Tiuj eŭropaj lingvoj disiĝis en idajn idiomojn, sed kun aplikado nur regiona, treege limigita kaj

nur dialekta. Ĉar tiel, kiel la homaro havis fine nur unu politikan tutmondan ĉefurbon, **Mondopolo**, kapon nediskutitan de la teraj nacioj ĉiuj federaciigintaj, sammaniere oni estis atinginta la intereseigan progreson, havi nur unu solan lingvon de kleruloj por ĉiu oficiala ago, ĉiuj manifestoj sciencaj kaj literaturaj kaj por la necesaj de la socia komunikado inter edukitaj personoj ĉiupopolaj kaj ĉiulatifidaj: **Esperanto**, la sama Esperanto, kiu faris en la komenco de l' 20-a jarcento siajn unuajn kaj penajn paŝojn; ĉar kiam la homoj konvinkiĝis, ke la naciaj fieroj estos ĉiam nesuperbla baro por adopti kiel universalan lingvon iun el la tiam uzitaj de kiu ajn popolo, altrudiĝis tiu lingvo patruj-orfa, kiel scienca lingvo unue, en la jarcento XXII-a, literatura poste en la jarcento XXV-a, diplomatia pli poste en la jarcento XXXII-a, komerca en la XL-a kaj fine universala de la XL-a al la L-a.

Krom la avantaĝo permesi al ĉiuj personoj de meza instruiteco en ĉiuj landoj interkompreniĝi, la strukturo kaj universala aplikado de Esperanto prezentis la econ de nevariemo; ĉar la jarcentoj ĝin riĉigis per la novaj vortoj postulitaj de la progresoj sociaj, sed modifis nek ĝian konstruon nek ortografion: prefero treege estiminda, ĉar kontraŭe al tio, kio okazis al hispano aŭ anglo aŭ franco el la 20-a jarcento, kiuj ne komprenis la verkojn en siaj lingvoj skribitajn ses aŭ sep jarcentojn antaŭe, la homoj de l' jarcento C ne trovis malfacilaĵojn konsultante antikvajn librojn aŭ dokumentojn, tial ke ne ekzistis Esperanto antikva kaj Esperanto moderna, sed nur unu sola kaj unika Esperanto: la primitiva, riĉigita sed ne modifita.

Tiu cirkonstanco estis feliĉega por la protagonistoj de ĉi tiu historio, kiuj dank' al ĝi ne troviĝis tute senkomunikaj kun siaj similuloj, kiam revenis iliaj spiritoj al la mortintaj, sed ne putrintaj korpoj, de kiuj ili forestis dum la daŭro de okdek jarcentoj; ĉar Inés kaj Juan estis en la unua etapo de sia vivo ne nur distingindaj esperantistoj, sed entuziasmaj apostoloj de la propagando poresperanta.

Laŭ tio, kiel sciencoj, artoj, industrioj progresadis en la mondo, egalpaŝe kreskadis ambicioj, interesoj egoistaj kaj avideco al plezuroj; de tago al tago, aŭ pli ĝuste, de jarcento al jarcento, la fortulo fariĝadis pli nesatigebla kaj pli aŭdaca; pli senhelpa, pli senheredigita la malfortulo. La maksimumo, ke la rajto konsistas en la forto, altrudiĝis al la socioj; kiel sola limo al la agoj efikis la ebleco, povi ilin realigi. Kun ĉi ĉio, la moralo samgrade malplifortiĝis, kiomgrade progresis sciencoj, pozitivaj progresoj kaj materialaj kapabloj.

Ne intencante nun pruvi la ĉi-antaŭan observon per detaloj aŭ ekzemploj, kiuj iom post iom prezentigos, ni diru nunmomente, ke la dorminta paro trovis ĉe la vekigo la homaron de l' jarcento C dividita en du kastojn, apartigitajn unu de la alia per profunda abismo: unuflanke, la kasto de la superpensantoj aŭ supergantoj, akaparinta laŭ la diro »nominor leo« politikan potencon, scion, riĉaĵon kaj plezurojn; kasto pleniganta sin per kontentigitaj vantaĵoj, kasto satigita, tedita, naŭzita de materialaj ĝuaĵoj, sed ne trovanta la feliĉon, eĉ ne zorganta pri ĝi pro nescio, kio estas vera feliĉo. Aliaflanke, la sklavigita plebo, kaj estis la plej notinda fakto, ke la mondo venis en tian staton laŭ necesa konsekvenco el la aplikado de la teorioj komunistaj, ĉar la apostoloj mem de l' komunismo aliĝis je la plej grandaj despotoj konataj en la Historio, kiam ili el apostoloj fariĝis triumfantaj posedantoj. Estis ili, kiuj puŝis la mondon ĝis atingo de tia stato.

La homaro en 10000 dividiĝas en sinjorojn, pli ĝuste mastrojn, kaj servistojn, laŭ proporcio de unu el la unuaj por ĉiu trimilo el la duaj. Ĉi-lastaj estis metitaj en sklavecon multege pli teruran ol tiu de la antikvaj sklavoj de Kartago kaj Romo, nekompareble pli premegantan kaj dolorigan ol tiu de la mezepokaj servutuloj; ĉar la plebo, al kiu estas rifuzataj instruado, suno kaj libera aero en la urboj, kiu dormis sur la kamparo en kabanaĉoj malbone tegitaj, malleviĝis ĝis la ŝtupo de ŝarĝbesto, malpli eĉ, de



laborinstrumento, uzata por produkti ĉion, kio kontentigas bezonojn kaj plezurojn de la superĝuantoj. Al tiuj parioj, kaj »parioj« oni nomas ilin efektive, oni koncedas neniom da tio, kio agrabligas la materian vivon, neniom da tio, kio enhavas ĝuon; kaj tamen kelkfoje renkontiĝas inter la bedaŭrindaj parioj homoj, kiuj konas feliĉojn, nekonatajn de iliaj subpremantoj.

En tiuj sociformoj mankas mezaj klasoj kaj homoj kun mezgranda havaĵo. Ekzistas nur riĉuloj vivantaj en plena abundeco, kaj mizeruloj eĉ ne ricevantaj tagsalajron por sia laboro. Oni loĝigas ilin, pro nepra neceso, en subterajoj: puraj, kiam la parioj apartenas al privatuloj, por eviti ke ili mortu tro rapide, kio estus perdo, kiel tiu de bovo aŭ ĉevalo — sed malpuregaj, kiam la sklavojn posedas la Ŝtato aŭ la Komunumoj, kiuj ne atentis tian perdon. Oni nutras ilin per manĝaĵo kiu estos preparolata pli poste, nur por ke ili havu sufiĉan forton por labori; oni vestas, ne, kovras ilin mizere, kaj . . . nenio plu.

Ha! jes, mi forgesis: oni lasas liberecon al viroj kaj virinoj ami unu la alian en iliaj loĝejaĉoj, kvankam en la tempo, kiam komenciĝas nia historio, tia toleremo jam ekmaltrankviligis la superpensantojn antaŭzorgemajn. Alvoke ante la intereson de la homaro oni komencis tendencan propagandon por limigi la solan toleron kaj la unikan konsolon, kiu en mizerego kaj malŝategeco restis al tiuj malfeliĉuloj.

Ĉar la instruiteco, kiel jam dirite, estis rifuzita al la parioj, rezultas el tio kiel deviga konsekvenco, ke en la 100-a jarcento ĉiuj sciencistoj, aŭ almenaŭ ĉiuj konataj sciencistoj estas povantoj, vorto en tiu mondo samsignifa kiel „milionulo“ en la 20-a jarcento. La povantoj inter la superĝuantoj kun plej modesta havaĵo en Mondopolo ne posedas malpli ol dek ses aŭ dudek milionojn, ĉar tie neniu nomas riĉulo iun, kiu ne estas multmilionulo.

## I

### Malsano? . . . Akcidento? . . . Morto?

Iun posttagmezon de l' jaro 2000, la ŝlosilmastro de la Kompanio por Industria Malvarmo en Bilbao, farante sian ĉiutagan rondiron tra la fabriko post la foriro de la laboristoj, estis surprizata de terura malvarmo, kiun li eksentis ĉe malfermo de pordo al unu el la navoj, kie staris baterio da Linde-aparatoj, uzataj por produktado de likva aero<sup>9</sup> kaj konsiderinda nombro da fandcilindregoj, en kiuj la aero estas magazzenata post eliĝo el la aparatoj.

Alarmite kaj sciante ke, se li estus tiel malprudenta eniri tien, kie pro verŝajna akcidento eble regas temperaturo de pli ol 100 gradoj sub nul, li jam ne elirus por ĝin rakonti, li senprokraste fermis la pordon kaj direktis sin al la oficejo de sinjoro Garcia, la direktoro, por informi lin pri la novaĵo. Ne trovante lin en la oficejo, li telefonis al lia domo, sed ankaŭ tie li ne estis; same sensukcesaj, por trafi lin, restis sinsekvaj telefonvokoj al la kazino kaj ĉiuj lokoj, kie li laŭverŝajne povus troviĝi en tiu horo.

Dume, la flu-eliĝo de l' malvarmo ektra-penetris la murojn de l' galerio de la aparatoj, kaj la

malvarmiĝo progresis alarme tra ĉambroj kaj koridoroj de la tuta konstruaĵo: tiom, ke je la kvara aŭ kvina fojo, kiam la ŝlosilmastro iris al la telefonĉelo por aŭdi, ke sinjoro la direktoro ankaŭ ne troviĝas en la Euskalduna Rondo, por ludi sian kutiman kartpartion, li sentis frostiĝon; rigardante al la termometro pendanta ĉe la muro, li legis sep gradojn sub nul; afero treege eksterordinara en Bilbao je la 13-a de julio, dato de l' eliĝo de la likva aero. Efektive, tia okazis en la galerio, kie ĝi daŭris flui, vaporiĝi kaj produkti kun la gasa parto de la atmosfero tiun teruran malvarmon.

La ŝlosilmastro komprenis, ke la plej urĝa afero estas malfermi ĉiujn pordojn kaj fenestrojn de la fabriko, por ebligi komunikon kun la ekstera varma aero kaj tiamaniere kontraŭagi interne la influon de l' aer-eliĝo. Kaj tiel li faris. Poste, li avizis la altrangan personaron de l' entrepreno pri la okazintaĵo kun la informo, ke el nenie oni sciigis ion pri la malaperinta direktoro-kemiisto. Malfacile oni povis pri li sciigi, ĉar dum oni serĉadis lin en la urbo, li kuŝis sur la planko de la frostiĝinta galerio, en distanco de kvar paŝoj de la elektro-inĝenierino, same kuŝanta kaj, laŭŝajne, same frostiĝinta kiel li.

Antaŭ ol eniri tiun ejon por esplori la difekton, estis necese atendi ĝis kompleta malpleniĝo de l' malaranĝita aparato de likva aero kaj lasi pasi la tempon, ĝis kiam, post ekfunkciigo de la vaporhejtilaro, neuzita de post vintro, la malvarmo moderiĝu por ebligi senriskan aliron al la navo de la kondensilegoj. Fine,

inĝenieroj kaj laboristoj penetris tien, kiam la temperaturo leviĝis ĝis 17° sub nul.

\*

Naŭ horoj pasis, de kiam Inés kaj Juan falis senkonsciaj apud fandcilindro, kiu iom post iom lasis eligi la likvan aeron tie magazenitan. Kontraŭ ĉiuj supozoj de tiuj, kiuj trovis ilin tie sternitaj, kredante ilin frostmortintaj, ili ne estis malvivaj.

Ili ne estis mortintaj, malgraŭ ke ili ne spiradis nek batis, kompreneble, iliaj koroj, nek ili donis minimuman signon de vivo. Nur la haŭtkoloro de ili ambaŭ estis la sola simptomo foriganta ĉian ideon pri morto; al ĝi ili devis danki, ke oni ne enterigis ilin vivaj. Anstataŭ dubeflava kadavreca kolornuanco iliaj vizaĝoj havis la rozecan blankon de bonkoloraj personoj en plena saneco.

Laŭ la diagnozo de l' kuracisto de la firmo Industria Malvarmo, ili troviĝas en stato katalepsia, kaŭzita de la fortega malvarmego, kiu, senavize kaŝ-atakinte ilin kun fulma rapideco, ne donis tempon al ili sperti malrapide progresantan malfortiĝadon de la fiziologiaj funkcioj kaj de la visceroj, kio estas la karakteriza formo, sub kiu iom post iom perdiĝas la vivo pro frostiĝo. Sume: la morto volis ilin senvivigi tiom rapide, ke ĝi ne lasis al ili sufiĉan tempon por morti.

La klarigo, kvankam iom riska, ne estas sensenca. Estas ja konate, ke elektraj kurentoj kapablaj mortigi elefanton aŭ balenon, kaj tiom pli homon, estas aplik-

ataj en la terapio sen la plej malgranda malutilo por la paciento, kondiĉe ke oni aplikas ilin nur en formo de alternaj kurentoj sufiĉe rapidaj. Tiam sufiĉas illa momenteco por ŝanĝi ilin el mortigaj en bonfarajn kurentojn.

Laŭ la citita kuracisto, iliaj sango, limfoj, seroj kaj organoj subite estis kristaliĝintaj, antaŭ ol pasis la tempo necesa por produkti aliiĝojn en la korposukoj kaj disiĝojn en la visceroj, kiuj estus kapablaj kaŭzi la morton.

Tial, ili ne estis vivaj, ĉar ili ja ne vivis; sed ankaŭ ne mortintaj, ĉar eble ili revivantiĝus, se ili trapasus tiun kolapson, supoze ke ili entute trapasos ĝin. Ili estis duonkadavroj, kazo komplete nova en la dokumentoj de la medicino kaj tial ne prijuĝebla laŭ malnovaj konceptoj<sup>4</sup>.

Ĉar tiu ĉi kazo estis kazo miriga kaj ĉiutage pli miriga laŭ la mezuro, kiel pasis tagoj, semajnoj kaj jaroj, sen tio ke la gefianĉoj reagis aŭ fine mortis, ili estis sinsekve ekzamenataj de la plej rimarkindaj kuracistoj de Bilbao unue kaj de Hispanujo poste. La unue nomitajn movis scienca scivolo, la aliajn nekredema dubo, kaj kie estas multaj kuracistoj, estas multaj opinioj.

Diris iuj, ke la unua diagnozo estas neatakebla. Aliaj deklaris ĝin kontraŭracia, neante ke la malvarmo estis la kaŭzo de la organa kristaliĝo (kies ekziston neniu neis), kaj kontraŭmetante la hipotezon, ke tiu kristaliĝo venis nur post la kompleta katalapsiĝo de la viktimoj pro subita marasmo

de nekonata speco, sed ke evidente ĝi devas esti klasifikata kiel nova kaj frapa tipo de letargia encefalito<sup>5</sup>, haviganta, laŭ ĉia aspekto, al la encefalituloj specifan imunecon kontraŭ la efikoj de malaltaj temperaturoj.

Por neniiĝi tiun sagacan hipotezon, komenciĝis en diversaj malsanulejoj tujaj provoj, kies unua rezulto estis, ke la tri aŭ kvar dekduoj da pacientoj, submetitaj al tiaj provoj, eliris ne kristaliĝintaj, sed mortintaj el la malvarmigaj ĉeloj, kie oni estis enŝlosintaj ilin por vidi, ĉu ili kristaliĝos: perfekte kaj tutege mortintaj ĝis la medolo de la ostoj.

Kiam la eksperimentantoj studadis variojn en la traktado, la aŭtoritatoj malpermesis la kristaligadon de la encefalituloj, ne sen protesto de la Medicina Akademio kontraŭ tiaj malhelpoj al la scienca esplorado.

Alia lumplena hipotezo klarigis la duoblan fenomenon, (nome ke la malvarmo ne mortigis la ŝajnfrostigitajn nek la varmo degeligis ilin), per la verŝajna ekzisto de kriptono en la aero, kiu eliĝis el la aparatoj. Oni supozis ke ekzistis en tiu aero pli grandaj kvantoj de l' citita gaso ol en la normala atmosfero. La eksterordinaraj kvalitoj de l' kriptono por celoj anesteziataj kaj kontraŭputraj estis eltrovitaj en 1990. Se oni tion supozis, estis logike ke, post kiam unufoje estis saturitaj la ĉelajoj kaj limfoj de la malsanuloj per kriptono, produktiĝis tiuj nekutimaj fenomenoj; ĉar la sama anestezio imuniga de la visceroj kontraŭ la iom-post-ioma agado de l' malvarmo faris ilin imunaj post ilia subita frostiĝo.

La kvara hipotezo . . . Bone; ne necesas revu-

kontroli la dekkvin aŭ dudek ceterajn hipotezojn, inter kiuj pretendis esti escepto nur tiu, kiu supozis komplete mortintaj la direktoron kaj la inĝenierinon. Ties bonajn kolorojn ĝi klarigis per la diro, ke ili estis pentritaj.

Ĉi tiu hipotezo ne estis de medicinistoj sed de ŝerculoj; ĉar baziĝante nur sur malbonvolo, ĝi ne sukcesis venki nek povis malhelpi, ke la duonmortinta paro estu zorge metita en duoblan sarkofagon (ne kun duoblaj vandoj, sed spachavan por du okupantoj) kaj poste transportata al diversaj medicinaj fakultatoj de tuta Hispanujo.

Sed per tio ne estis finitaj iliaj migradoj kiuj, kvankam postmortaj, ne estis tiaj, ĉar la vojaĝantaj gefianĉoj estadis kaŝe vivaj. La migradoj disetendiĝis de Hispanujo al ĉiuj civilizitaj landoj, por kontentigi la scivolan intereson de la eksterlandaj fakultatoj, dezirantaj konvinkiĝi per propra vido pri la legitaj informoj en la gazetoj, medicinaj revuoj kaj en senombraj memuaroj publikigitaj kun la vana intenco klarigi la kazon, kiu formis la ĉefregantan priokupatecon de ĉiuj medicinaj saĝuloj de tiu tempo.

Tiel la gefianĉoj, por kiuj mi ne trovas pli trafan esprimon ol frostviandajo, estis kontrolataj kaj eĉ preskaŭ asistataj kun same negativa rezulto de la plej elstaraj doktoroj de l' mondo; kaj tiel, dum kvardek jaroj, ili ruliĝis tra universitatoj kaj akademioj.

Oni ne miru pri la longa tempospaco, ĉar ili travojaĝis pli ol sepdek klinikojn, kaj nur inter Cam-

bridge, Oxford kaj la Sorbonne pasis pli ol du ekspediciaj jaroj.

Tiel konstanta vojaĝado kostis tre multe . . . La elspezojn de la unua kaj dua sendoj al Madrid kaj Barcelona pagis la Kompanio por Industria Malvarmo; sed kiam Sevilla, Santiago, Valencia kaj aliaj medicinaj fakultatoj petis la alsendon de la anestezi-frostiĝintoj, la entrepreno retiris sian permeson deklarante, ke ĝi ne vidas kaŭzon por pagi vojaĝojn de iuj kemiisto kaj inĝenierino en situacioj tiel pasivaj kiel sinjoro García kaj fraŭlino Ramírez.

En tiu konflikto — oni ja ne povis lasi en la straton duoblan kaj altvaloran ekzempleron klinikan — adoptis ilin la Madrid'a Medicina Akademio, kiel rimedon por ekhavi je sia favoro juran nomigon de zorganto por la du ensarkofaguloj tiom longe, kiom ili troviĝos sen konscio.

Tuj poste ĝi decidis ne atenti petojn de universitatoj, hospitaloj, sciencaj centroj aŭ muzeoj en- kaj eksterlandaj, kiuj deziris aŭ dezirus la alsendon de la svenfalintoj, se tiuj korporacioj ne subskribis antaŭe kontrakton, laŭ kiu ili pagos la vojaĝelspezojn de la paro kaj de ĝia medicinisto-konservisto aŭ privatkuracisto, sola persono rajtigita malfermi la ĉerkon, kaj kies konsento kaj asistado estis devigaj por procedi al rekonj kaj eksperimentoj. La honorarioj, certe ne malgrandaj, de tiu medicinisto, kiu laŭ deleĝo de la Akademio fariĝis zorganto de la frostiĝintoj, ŝarĝis ankaŭ la konton de la petantoj.

La nomigo falis sur faman doktoron 28-jaran, kiu



ĝis siaj bone finitaj 68 jaroj ne revenis Madrid'on kun siaj zorgatoj, skribinte eĉ ne unu recepton dum tiuj 40 jaroj, vizitinte eĉ ne unu malsanulon, palpinte la pulson eĉ ne al unu paciento, t. e. al neniu vivanta, ĉar al siaj du vojaĝkunuloj li palpis ĝin ĉiutage, sed ne trovante ĝin, kompreneble, eĉ nur unu fojon, kiom ajn ofte li metis en tiu longa etapo la pulsregistrilon al manradikoj kaj tempioj, por la kazo ke iutage likviĝus kaj fluus la glaciiginta sango kaj la paralizitaj, ne, la haltigitaj koroj reakirus sian interrompitan batadon.

Por diri pri ĉio la veron estas devige konfesi ke, en la unuaj tempoj, la kuracisto-konservisto kredis en sia interno (tre interna), ke malgraŭ la sana aspekto de la konservitoj ili ambaŭ estas mortintaj; sed ĉar li ne povis tion pruvi kaj ĉar li vidis en la konfirmo de tiu suspekto gravan danĝeron de tuja enterigo, kiu finigus la grasprofitan okupon pri la konservado, li gardis sin tre bone, laŭtigi siajn koncernajn timojn.

Sed kvankam la zorganto-delegito ne asistis malsanulojn nek funkciis kiel aktiva kuracisto, li tamen ne mallaboris. Dum la longa ekspedicio li devis fari pli ol 1500 paroladojn en universitatoj kaj sciencaj centroj, en kiuj li raportis pri la tuta klinika historio de la gesinjoroj de l' sarkofago; li devis kolekti kaj parkeri ĉiom, kiom pri ili oni diris kaj verkis en la lokoj, tra kiuj ili pasis. Sekve de tio, reirante Hispanujon, li alvenis tie provizita de eksterordinara aŭtoritateco pri la mondfama kazo, ĉar li sciis ĝis la plej malgrava detalo la tutan abundegan, eĉ pli, pezan bibliografion, kiu estis skribita kaj publikigita, kun

malŝparo de scienco, pri Juan kaj Inés. En tiuj verkoj oni sciis ĉion krom tio, kio estis okazinta, kio okazas kaj kio okazos al Juan kaj Inés, kiuj post sia promenvojaĝo tra la tuta mondo revenis al la patrujo tiel svenaj, tiel frostiĝintaj aŭ tiel marasmiĝintaj, sed tiel rozkoloraj kaj tiel malmolaj, kiel ili foriris, kun la korpoj rigidaj kiel fero, same kiel ili statis falinte en la galerio de la fabriko.

Estas dirite ke la konservisto ne sciis ion alian pri la konservitoj ol la jam sciitan ĉe sia nomiĝo por la menciita ofico; sed tio ne estas ĝusta, ĉar kontraŭ siaj antaŭsupozoj, li havis, revenante, la konvinkon ke ili vivas. Tio baziĝis sur tri okazoj aŭ akcidentoj.

Unua. Al la doktoro naskiĝis, en ĉiuj mondpartoj, infanoj, kiuj estis petolemuloj vere diablidaj. Kiam iutage ludis tiuj satanetoj, mi ne scias en kiu lando, per pulvo kaj bengalaj fajraĵoj en la ĉambro, kie trankvile dormadis (?) en sia ĉerko la gefianĉoj, al kiuj jam delonge patro kaj filoj estis perdintaj ĉiun respekton, iu ardanta bengalaĵo falis sur la vizaĝon de la bedaŭrinda García. Kiam oni rimarkis tion kaj alkuris por ĝin forpreni, ĝi estis jam kaŭzinta al li brulvundon, nek pli nek malpli ol se li estus viva. Tamen la plej granda strangaĵo ne estis tio, sed multe pli la fakto, ke ĝi post kelkaj tagoj cikatriĝis; poste ĝi perdis la koloron kaj malpliĝis laŭ dimensioj, ĝis restis, post kelkaj jaroj, nur iu malgrava signo, kiel okazas ĉe personoj vivantaj.

Dua. Dum restado en Valparaiso, en skarlatina epidemio, Inés estis atakata de ĝi; ŝia korpa tempera-

turo, normala kaj ribele konstanta de post la komenco de l' frostkolapso je sep gradoj sub nul, altiĝis ĝis proksimume kvar. Tio, kvankam la temperaturo restis ankoraŭ tri gradojn sub nul, egalis ĉe tiu malsanulino al fortega febro; ŝia epidermo ruĝiĝis kun la karakterizaj rozoj de erupcio; sed post paso de kvin tagoj la haŭto denove alprenis sian naturan koloron, la temperaturo malaltiĝis ĝis la normalaj sep gradoj, kaj Inés estis tiel sana kiel antaŭe, t. e. tiel sana aŭ malsana, sed kiel antaŭe.

Tria. Inter Tokio kaj Yokohama elreliĝis la vagonaro, per kiu vojaĝis la dormantoj, la kuracisto kaj lia edzino kun etularo. Rompiĝis la sarkofago, ĝiaj okupantoj elĵetiĝis, kaj kiam oni saviĝis ilin, Inés estis nedifektita, sed Juan havis rompitan kruron<sup>o</sup>.

Se tio okazus antaŭ lia brulvundiĝo kaj ŝia skarlatino, la kuracisto estus metinta Juan'on en la ĉerkon, ne zorgante pri la krurrompiĝo; sed sciante jam ke en tiuj organismoj ekzistas mistera vivipovo, kaŝita sub la evidenta ĉeso de la normalaj, videblaj funkcioj, li konsideris sia devo trakti tiun rompon same zorgeme, kiel li traktis oftajn analogajn akcidentojn de sia malbonkondata idaro.

Tial li intertabuligis la rompitan membron kaj, ne bezonante zorgi pri la senmoveco de la paciento, li ne repensis plu pri la rompiĝo. Nur post kvindek tagoj li forigis la bandaĝon, vidante kun surprizo, ke la vundo tute saniĝis.

Kiaj pli grandaj pruvoj estas necesaj por konvink-

iĝi, ke en tiuj kreaĵoj ekzistas vivo, tiel kaŝa kaj malkompleta kiel ajn, sed nepre vivo?

\*

Je la reveno de la ekspozicia migrado, kaj naciaj kaj internaciaj saĝuloj estis konvinkitaj, ke ili malgraŭ ĉia cerbumado ne eltrovos la solvon de l' problemo. Do, Inés kaj Juan pasis de la kategorio de sensacia kazo klinika al la senmova situacio de scienca kuriozaĵo, gardata en luksa vitrino de l' Antropologia Muzeo de Madrid.

La muzeo malaperis en la jarcentoj. Madrid estis forskrapegata de la tersurfaco, Hispanujo mortis kiel politika ŝtato, la Konfederacio Panhispana abismiĝis en la tempo, kiel antaŭe dronis Babilono kaj Memfiso, kaj kiel samtempe kaj post ĝi malaperis en la tempa senfundaĵo ĉiuj nuntempaj popoloj kaj urboj de l' mondo, kies heredo sinsekve transiris al novaj nacioj, novaj konfederacioj, novaj urboj.

## II

### Sinjoro García kaj fraŭlino Ramírez komencas varmetiĝi

La homoj de morgaŭ heredis de la homoj de hieraŭ<sup>7</sup> artojn, industriojn, sciencojn, kiuj en iliaj manoj mirakle progresis.

Parton de la heredaĵo, kiun ricevis la jarcento C, formis la du letargiuloj de l' dudekunua, kiuj estis alvenintaj, de muzeo al muzeo, de urbo al urbo, de nacio al nacio, en la Universalmuzeo Internacia de Mondopolo, kiel valoraj trezoroj de la medicina scienco, kiu ankoraŭ ilin studis, juĝante ilin klinikaj fosilioj.

La muzeo nomiĝis Universalmuzeo, ĉar ĝi konsistis el sekcioj rilatantaj ĉiujn sciencojn. La atento de la saĝuloj por la fosiliigintoj klariĝas el tio, ke tiuj du korpoj estis la sola aĵo daŭranta en la jaro 10 000 samstate kaj samaspekte, kiel antaŭ 80 jarcentoj. Tio unuavide ŝajnas nekredebla, sed ĝi estas tre facile klarigebla filozofie, fizike kaj mekanike.

Efektive, kiel oni diras en matematiko, homoj kaj bestoj foruziĝas per la vivo pro la laboro, kiun la vivo kaŭzas al la organoj kaj muskoloj, kaj post la morto konsumas ilin la sekvanta putrado; sed, ĉar

nek Inés nek Juan vivis aktivan vivon, ĉar ili ne digestis nek iris nek spiris de 8000 jaroj, ili konservis siajn digesto-tubojn, krurojn kaj korojn tiaj, kiaj ili estis je la tago, kiam atakis ilin la marasmo: ili ne laboris, do ankaŭ ne foruziĝis; kaj ne estante mortaj, ili ne povis putri.

Tre logike, jes, tre logike; sed ĝuste pro tio ne malpli eksterordinare por la scivolaj aŭ kleraj vizitantoj de l' Internacia Universalmuzeo, nek malpli interese por la korifeoj de la scienco, kiuj daŭrigis la analizadon de la hipotezoj eldiritaj en pasintaj epokoj pri la fenomeno kaj konservitaj en la ĉi-koncerna bibliografio, kiu kompreneble ne konsistis el la samaj libroj presitaj antaŭ jarcentoj kaj manĝitaj antaŭ jarcentoj de la tineoj, sed el ripetigintaj eldonoj faritaj antaŭ ol la aliaj disfalis en polvon. Kaj same estis faritaj, ni ne scias kiom, sed almenaŭ multaj eldonoj de sarkofagoj, kiuj unu post alia disfalis kaj putris sub la pezo de la jaroj, kiuj — stranga kontrasto! — estis tiel senpovaj por moligi la korpan malmolaĵon de l' kemiisto kaj de la inĝenierino kiel por paligi iliajn vizaĝojn.

\*

Roberto Mob, el aŭstralia deveno — Mondopolo estas urbeĝo ja tute kosmopolita — estas direktoro de l' Internacia Universalmuzeo; li estas kuracisto laŭprofesie, sed ne havas konsulthorojn, ĉar li estas ĉiam absorbata de altaj esploroj en la laboratorio; li havas 77 jarojn kaj estas tre maldika kaj tre kalva.

Lia helpanto, doktoro de sciencoj de la universi-

tato en Kantabra — urbo proksime al la malaperinta Santander — nomiĝas Marcial Rucandio kaj aĝas 34 jarojn.

En la momento, kiam ni vidas ilin unuafoje, ni trovas ilin scivoleme observantaj la sarkofagon de la Bilbaanoj; unu rigardas lin, alia rigardas ŝin, kaj ĉiu tenas la mandorson al la kolo de unu el la frostiĝintoj.

— Efektive, Rucandio, ŝi ŝajnas esti ne tiel malvarma kiel devus respondi al la sep subnulaĵoj, kiujn montras ŝia monografio.

— Laŭ mi, li ne havas pli ol du aŭ tri sub nul. Se ni povus apliki klinikajn termometrojn . . . Sed kiu povus atingi kontentigan kontakton inter termometro kaj tiu ĉi ŝultrokavo malmola kiel fero?

— Por ĉio ekzistas rimedoj. En la kazoj komunaj, kiam oni mezuras la temperaturon de vivanto, la fleksebleco de la haŭto prezentas kontentigan adaptiĝon al la termometro; ĉe tio vi volu rimarki, ke ĝia vitro estas tiel rigida kaj malmola kiel la karno de ĉi tiuj individuoj . . .

— Ha! vere, se . . .

— Jam vi komprenas, kion mi celas: improvizi flekseblajn termometrojn per kelkaj gumaj pilketoj, kiujn malblovitajn ni enmetos en la akselkavojn, por poste plenblovi ilin, ĝis ni havos nepran kontakton inter la gumo kaj la korpoj, kies varmecon ni deziras scii. Tiam ni povos ekscii la temperaturon de ĉi tiuj fosiliuloj, ne la ekzaktan, kompreneble, sed la proksimuman.

— Kaj, antaŭ ĉio, Don Roberto, la plej interesa

ne estas la ekzakteco de la temperaturo, sed ĝia varieco kiel indikilo pri la vivreveno.

— Ni iru rapide por prepari tion, kion ni bezonas.

\*

Post du horoj, Rucandio kaj Mob revenis al la duobla sarkofago kun du longaj termometroj gradigitaj je dek gradoj sub kaj kvin super nul; la globetoj estis enfermitaj en piroj aŭ poŝetoj el gumo, kies koloj alpremiĝis al la vitraj termometraj tubetoj, kaj je la kontraŭa flanko eliris el la gumsaketoj iuj tuboj, same el gumo, destinataj lasi pasi la malvarman aeron injektotan en la poŝetojn.

Post meto de la malblovitaj piroj en la subŝultrojn de Inés kaj Juan, kaj post kontrolkonfirmo de la aer-temperaturo en la injektpumpilo (sep subnula gradoj, produktitaj per vaporigo de amoniako), la manipulantoj ekfunkciigis la premilon; post kiam ambaŭ ujoj estis ŝveligitaj kaj la komuniko kun la deponejo de la malvarma aero estis interrompita, diris Mob:

— Tiuj ĉi plej novaj klinikaj termometroj estas tre malperfektaj; do, ne estas urĝe konsulti ilin. Ni iru do al niaj okupoj; post du horoj estu tiel afabla reveni ĉi tien kaj poste diru al mi, kiom ili markas. Estus sensacie ke post paso de — mi ne memoras kiom da dekduoj da jarcentoj — tiuj homoj reviviĝus nun en niaj manoj . . .

— Por ni tio estus agrablega.

— Certe mi kredas tion: ni povus demandi ilin por akiri antaŭsciigojn pri la invado de l' eksveno.



— Eble ni eltrovus la kaŭzojn de tiu sekreto de la scienco.

— Kaj eble mi eltrovus manieron por kristaligi personojn laŭvole . . . la tutajn personojn, aŭ nur parton de ili. Tio donus al mia lasta invento miraklajn flugilojn.

— Ĉu vi pensas pri pli grandaj perfektigoj de via glora elpensajo, la industriigita amo?

— Klare. Ĝis nun la plej potencaj koroj utiligitaj produktas nur 19 am-ĉevalpovojn, nome tiuj de viroj, kaj 23 la virinaj: ekspluatrezulto multe sub la tuta vivaktiveco de homaj kreaĵoj.

— Kaj ĉu vi pensas ke estus eble . . . ?

— Se tiuj gesinjoroj reviviĝos, se la estontaj eblecoj sugestitaj al mi de la ideo pri ilia reviviĝo povus esti ŝanĝataj en realaĵojn, scienco kaj industrio gigante paŝus antaŭen! Aŭskultu! Maĉado kaj digestado absorbas almenaŭ 30% de la vivofortoj de l' organismo; la sekrecioj el renoj, hepato, lieno ktp. 15 aŭ 20%; por purigi la sangon, peli ĝin al la arterioj kaj dispartigi ĝin tra la tuta korpo, pulmoj kaj koro, denove almenaŭ 30%; la formoviĝo konsumas 10%, kaj tia maniere restas disponeblaj por la korpaj sensoj kaj la cerbaj kaj animaj funkcioj, el kiuj naskiĝas la sentoj, ne pli ol dekonon ĝis okono de la tuta efektiva energio de la tuta organismo.

— Jes, jes, vere; sed malgraŭ . . .

— Ne ekzistas malgraŭoj; la afero estas klara. Kaj se ne, diru al mi: ĉu vi kredas, ke la vivo, la vivo-spiro, diferenciganta la vivanton de la kadavro, sidas

en la stomako, en la renoj, aŭ eble en la ordinara muskola koro mem?

— Kiel mi povus tion kredi!

— Nature, la vivo devas sidi en cerbo kaj koro; ne en la koro fiziologia, sed en la alia, anima parto de tiu organo, per kies eltrovo mi fariĝis la Magiisto de l' Mondo.

Oni devus vidi la vantecon kaj fierecon, kiujn Mob montris en sinteno kaj voĉo, aplikante al si tiun tromemfidan alnomon.

— Jes, Don Roberto, ĉion ĉi mi scias, same kiel mi scias, ke en viaj manoj la amo de viroj kaj virinoj ŝanĝiĝas je agantaĵo esence krea, produktanto de lumo, varmo, elektro, puŝforto por vagonoj, aŭtomobiloj kaj aeroplanoj; neniu alia estas tiel entuziasmigita pri via genia invento. Sed mi ne vidas rilaton inter ĝi kaj tiuj du kreaĵoj mortintaj aŭ duonmortintaj de 80 jarcentoj.

— Mortintaj; mortintaj por ĉiam, se ili ne reviviĝas. Mortintaj ankaŭ, komplete mortintaj hodiaŭ, eĉ se ili reviviĝus morgaŭ; sed mortintaj nur en ilia kruda materia parto, kaj anime vivaj; se ili ne estus tiaj, ili ne povus reviviĝi.

— Estas vero.

— Ne interrompu min. Evidente, ke ĉiuj organoj de ĉi tiuj du sovaĝuloj de l' 20-a jarcento, ĉiuj, ĉiuj estas mortaj, ĉar ili ne funkcias de jarmiloj. Sed se ili fine reviviĝus, tio pruvus, ke la konserviĝo — eĉ se ĝi estas nur kaŝita kaj enfermita en la profundo de iliaj vivspiritoj — de tiu ombro da vivo sufiĉas por renov-

igi la vivon de la morta karno, dum la formo de la individuoj ne ŝanĝiĝis . . .

Kaj kie — atentu nun bone! — kie do povas esti sin kaŝinta tiu vivoforto, kapabla reaperi en tiuj korpoj? . . . Ekster ili ne, ĉar tiam la korpoj estus putrintaj, eĉ pli: disiĝintaj.

— Jam, jam mi vidas; pli ĝuste, mi ekvidetas . . .

— En la paralizitaj organoj same ne, ĉar tiukaze ili funkcias. Sekve, nepre estadis rifuĝintaj iliaj vivoj en la koro animeca aŭ senteca, nekonita ĝis kiam mi trovis ĝin en la profundo de la fiziologia homa koro, kaj en la spirita cerbo, ankoraŭ ne eltrovita inter la encefalaj volvaĵoj, sed kiun mi certe eltrovos. Mi estas certega, ke ĝi estas tiel pozitive reala kiel la koro, el kiu fontas ne la kruda sango, sed la nemateria amo.

— Laŭ tio, vi pensas . . .

— Ke, dum ne mortas la nemateriaj esencoj de cerbo kaj koro, la estaĵoj vivas tia- aŭ tiamaniere; kvankam ŝajne ili mortis; sed ili vivas. Sekve, jen la problemo de mi solvota: preni viron kaj virinon el tiuj, kiujn mi nun utiligas, por posedpreni ilian amfluidon; sed mi ne volas ilin preni en ilia nuna, normala kaj plena vivostato, sed, antaŭ ol alligi ilin al la transformilo psiko-elektra, mi volas ilin purigi de ĉia malpura balaaĵo, kiu perturbas la funkciojn sekreciajn, nutrajn, spirajn. Tiu purigo povus efektiviĝi helpe de antaŭkristaligo de la organoj por neutila vivo ĉe la am-paroj, neutila, kompreneble, por miaj sciencaj kaj industriaj celoj.

— Sed se vi kristaligos ilin, ili restos mortaj, kiel ĉi tiuj.

— Ne, ĉar mi ne kristaligos al ili la okulojn, nek la cerbojn, nek la korojn; bone komprenu, ke mi ne parolas pri la karna koro, sed pri la jus eltrovita anima koro, kaj pri la spirita cerbo.

Tiamaniere restos morta ĉiu fizika funkcio, krom la vida; la vivofortoj de la organaro jam ne eluziĝos impulsive la kristaligitajn organojn, sed ili iros plenaj al la okuloj, al la koro kaj al la cerbo animaj. Pro tio, miaj amantoj vivos nur por rigardi, por ami unu la alian. La ĉevalpovoj de vaporo, ne, erare, de amo, nun konsumataj por ventro, renoj ktp., utiliĝos nedividitaj por impulsoj de ampasio; kaj ĉiuj amgekunuloj, mortintaj por ĉio krom por sin ami reciproke, produktos minimume ne la 42 ĉevalpovojn de nun, sed 250, ekvivalentajn al 187,5 elektrokupidoj, ĉar ĉiu kupido egalvaloras laŭ mekanika forto al 100 kilogrammetroj<sup>9</sup>.

Sume, mia celo estas agi kun kreaĵoj fizike mortaj, sed morale kaj pasie vivaj.

— Kaj krome, oni evitus la malŝparon de forto, hodiaŭ perdata pro klopodoj de la enamiĝintoj rompi la ĉen-fiksilojn kaj la zonojn, malhelpantajn ke ili alproksimiĝu unu al la alia. La statistiko de tiuj perdoj montras trionon da kormortintoj post ok monatoj; kaj la plej fortaj, kiuj estas kapablaj elteni pli da tempo la kor-procedaron, freneziĝas post maksimume unu jaro.

— Tio estas la plej malgrava; troas al ni geparioj.

La plej grava afero estas certigi la regulecon en la ekspluatado de la amofortoj perturbataj de tiuj nervaj malaranĝoj devenantaj el la polusoj viraj kaj, antaŭ ĉio, el la virinaj. — Sed jam ni babilis sufiĉe, kaj ĉar mi volas, se tiu reviviĝo realiĝos, esti bone preparita per la studo de la tuta aferaro pri tiuj gesinjoroj, bonvolu serĉi en tiu biblioteko iliajn klinikajn historiaĵojn kaj la notojn pri la detaloj kaj procedoj uzitaj en la fabriko, kie okazis la akcidento, kaj alportu al mi poste la trovitaĵojn.

— Ne estas malgranda la tasko donita de vi, majstro.

Rucandio mansignis la dek ŝrankojn plenplenigitajn de libroj, koncernantaj la konservitajn Bilbaanojn, kiuj kovris la murojn de l' salono, kie ili kaj la libraro pri ili estis la solaj garditaĵoj.

— Tute ne, kolego, ne . . . Preskaŭ ĉio ĉi estas nuraj fantaziaj hipotezoj min ne interesantaj; ne zorgu pri ili, sed nur pri faktoj rilataj al la akcidento kaj al la unuaj esploroj de la viktimoj.

— Mi respiras libere; tio ja estas alia . . .

— Ĝis poste, Marcial!

\*

Post unu horo kaj duono Rucandio eniris la studojn de sia mastro. Sekvis lin mekanika aŭtomatulo, aŭtomo, kiel oni nomis ilin en la 100-a jarcento, ŝargita per ses aŭ ok broŝuroj kaj kvar aŭ kvin libroj, kiujn ĝi metis sur la tablon, apud kiu ĝi restis sen-

movi, kiam ĝia mastro ĉesis transigi al ĝi ordonojn per la poŝa telekineo, kaŝita en la aŭtomoto.

Ne trovante tie Mob'on, lia helpanto dediĉis sin meti signojn en la librojn, por faciligi al li la rapidan konsultadon de la plej interesaj indikoj pri la akcidento en la fabriko de Bilbao.

Kiam li estis faranta tion, eniris Mob, demandante ĉe la aliro:

— La temperaturo?

— Nur du gradoj sub nul; kaj se ne temas pri pasanta febro egala al tiu, kiun suferis laŭ ĉi tiu libro la virino en iu prahistoria loko, kies nomon mi ne memoras, ŝajnas al mi ke ni troviĝas en la ekmalkristaliĝo. Sed, je kiu rapideco okazos tiu temperatūra kresko? Tion ni ne povos scii antaŭ morgaŭ, se ĝi ne estas tiom malrapida, ke ĝia konstato necesigos jarojn aŭ jarcentojn. Ĉio ĉi povus esti, laŭ la antaŭaj okazintaĵoj.

— Tio estus terura kontraŭaĵo. Dume, por ne fariĝi tro senpaciencaj ĝis morgaŭ, ni iom explore traŝercetu ĉi tiujn librojn.

Mob, tion dirinte kaj konstatinte, ke li forĝesis la okulvitrojn en la salono, kie li ĵus ricevis viziton, alproksimiĝis al granda surmura tabulo portanta ekranon el substanco duba inter laktovitro kaj celuloïdo, sur kies flankoj viciĝis, numerite laŭ paralelaj linioj, multaj prembutonoj respondaj al diversaj ĉambroj kaj akcesorejoj de la konstruaĵo.

Li premis numeron 17, kaj sur la diafana ekranon aperis la salono. Tiu aparato estis telefoto, vul-

gare nomata televiscinografo aŭ simple vis-  
cino: elektra aparato por malproksimen vidi, same  
kiel la telefono aŭdigas el malproksime. Kaj post  
atenta rigardo li diris, unue al si kaj poste al Marcial:

— Tie ili estas, amiko Rucandio; bonvolu sendi  
vian aŭtomon, por irpreni miajn okulvitrojn, kiujn mi  
lasis sur la centra tablo de l' salono.

— Tre volonte, majstro, — rediris Marcial, kovr-  
ante sin per malpeza kapŝirmilo finiĝanta ĉe la supro  
per metalfadeno volvita kiel elipsa, tre komplika spi-  
ralo, egala al alia konstante muntita sur la kapo de l'  
maŝinhomo. Ambaŭ konsistigis sistemon de agord-  
itaj antenoj je la sama ondo de elektra oscilo. Tuj  
poste li eltiris el la poŝo manipul-kesteton de tele-  
mekanika transsendo, sur kies kovrilo estis la vorto:  
Lokmovo; sub la ŝildeto troviĝis diversaj buton-  
etoj signitaj per A, H, D, MD, R, P kaj T, komenc-  
literoj de la indikoj antaŭen, haltu, dek-  
stren, maldekstren, reiru, puŝu kaj tiru.

Premante la A, Marcial ekmovigis la aŭtomon, kaj  
vidante ĝin alveni antaŭ la pordo de l' oficejo, li tuŝis  
la P, igante ĝin per tio puŝi la pordon, tra kiu ĝi el-  
iris. Kiam Rucandio perdis ĝin el sia vidospaco, li al-  
proksimiĝis al la viscino; sur ĝi li igis aperi unu post  
alia la koridorojn kaj ejojn traŭratajn de la aŭtomo, kaj  
la aŭtomon mem, direktatan de li dum ĝia marŝo tra  
ili; laŭnecese li premis tiun aŭ tiun butonon de l'  
sendilo, kiu per la anteno de l' kapŝirmilo de Marcial  
transigis la nevideblan elektro-magnetan ondon; ĝin  
ricevis la anteno de lia aŭtomo kaj pere de ĝi la

transsenditan signon, kiu metis en aktivecon la koncernajn mekanismojn, por ke la pupo efektivegu la ordonojn.

Kiam Marcial ĝin vidis, en la viscino, antaŭ la tablo, sur kiu troviĝis la okulvitroj, li turnis la sendilon, kiu sur sia kontraŭa kovrilo portis la ŝildetojn brakoj, manoj, kaj sub ili butonojn por regi la movojn de tiuj membroj de l' aŭtomatulo; tiu post ekprenado de la okulvitroj revenis al la oficejo kaj transdonis ilin en la propran manon de Mob.

Tiuj maŝinuloj, multe pli simplaj ol la ŝakludanto prezentita de Torres Quevedo en diversaj ekspozicioj, estas nur variaĵo de l' telekineo de la sama aŭtoro kaj de la boatoj de Tesla, direktataj de sur la bordo.

La vido al personoj, objektoj kaj pejzaĝoj situantaj en distanco ekster la atingo de l' observanto kaj de la lornoj, kiujn li povus uzi, estas problemo, kies solvo per elektraj rimedoj priokupas la fizikistojn, kiuj diris jam de kelka tempo: Se estas fakto la ebleco paroli de Madrid al Barcelona, Paris ktp. per metalfadenoj etenditaj inter tiuj lokoj (kaj sen ili hodiaŭ, per la senfadena telefonio), kial oni ne povus ankaŭ vidi per metalfadenoj? se la telefono estas realaĵo, kial ne estu realaĵo la telefoto?

La mirakloj, efektivitaj de la scienco dum 50 jaroj, tre kuraĝigis tiujn, kiuj ĝin kulturis, kaj por ĝi multaj saĝuloj cerbumadas kaj eksperimentadas nuntempe en la kaŝejoj de siaj laboratorioj, pensfajlante je malhelpaĵoj kaj perfektigante projektojn, kiuj jam fariĝis publikaj inter la homoj. Inter la multaj nevid-



eblaj projektoj estas jam kelkaj, kiuj atingis teorian solvon. Tio esperigas trovi morgaŭ praktikan industrian aplikon, kiu permesos al la telefone interkomunikantoj vidi sin samtempe, kiam ili interparolas. Al arkitekto, al inĝeniero, al konstrudirektanto de palaco, akvodigo, tunelo, ĝi vidigos, sen ke ili moviĝas el siaj domaj oficejoj, kiel la laboristoj laboras kaj plenumas iliajn ordonojn. Al ĉefgeneralato de armeo ĝi metas antaŭ la okulojn la disvolviĝon de la multoblaj, malproksimaj bataleroj, kiuj kune konsistigas la monstrajn modernajn batalojn kaj, ampleksante centojn da kilometroj, foriĝas pro sia disvolviĝo el ĉiu supera direktado. Tiu direktado fariĝus ree ebla per la telefoto, kvankam por tio oni bezonus la senfadenan telefoton.

Fantazio, frenezo, delira iluzio — eble diros kelkaj, kiel estus dirintaj multaj antaŭ 60 jaroj, se oni parolus al ili pri fotografado en la malhelo aŭ momenta buŝa transsendo de sciigoj kaj ordonoj en la cititaj kazoj per la telefono. Kaj la tuta mondo vidis la hieraŭajn utopiaĵojn transformitaj en hodiaŭajn faktojn, same kiel el multaj nunaj fantaziaĵoj ekestos la morgaŭaj realaĵoj<sup>10</sup>.

Post reveno de l' aŭtomo, majstro kaj helpanto ekstudis fervore la librojn alportitajn, kaj jam ektagiĝis, kiam ili enlitiĝis.

\*

La matenon, sekvintan al la meto de la termometroj, Marcial ekstreme ekscitita eniris en la manĝoĉambbron de Mob, kiu estis matenmanĝanta, kaj eĉ ne dezirinte al li bonan matenon, li diris:

— Majstro, majstro, tio iras tre rapide, tre rapide: ok dekonoj sub nul. Ĉe tiu rapideco, en malpli ol dudek-du tagoj tiuj gejunuloj atingos la temperaturon de ĉiu ordinarulo.

— Ĉu vi estas certa, amiko Marcial?

— Certega. 39 gradoj mankis al ili hieraŭ; po unu kaj ok dekonoj ĉiutage . . .

— Jes, vere; ĉiam supoze ke tiu plivarmiĝo daŭros egalritme. Ni iru rapide, por vidi ilin . . . Eble ni trovos rimedon por rapidigi la reagon.

### III

#### La dormanta paro difektas du fortajn amgekunulojn

— Ses gradoj super nul, — diris Mob iun posttagmezon. — Rigardu, Rucandio. Kvankam ili estas ankoraŭ tiel rigidaj kiel iu ajn mortinto, iliaj karnoj jam ne havas la ŝtonan malmolecon kiel antaŭe.

— Jes, tio estas la komenco de la reviviĝo. Sed ĉu vi ne timas ke, jam ne protektate de la frostiga malvarmo, ili povus disiĝi kiel du vulgaraj mortintoj? Mi kredas ke la putro nun estas la plej granda danĝero.

— Ni luktos kontraŭ ĝi, Rucandio. Ni ĉirkaŭos ilin per kontraŭputra atmosfero, kaj unu el ni ĉiam gardostaros apud ili, alternante ĉiun kvaran aŭ sesan horon.

— Krome, Don Roberto, mi kredas, ke por jam antaŭe malhelpi la ekputron, efika estos konstanta aplikado de altfrekventaj kurentoj.

— Samtempe ni faros internvejnajn injektojn de kontraŭputraj gasoj; la elektra traktado, per siaj galvanaj skuoj, anstataŭos la mankon de vere vivaj vibradoj, kies paralizigo en la organismo difinas la malkombiniĝon de la mortintaj korpoj.

— Sed mi kredas, ke pli bonan rezulton ol la ordi-

nara elektro donos psiko-elektraj kurentoj de l' kupidismo, sen ilia transformo en ordinaran kurenton.

— Amiko Marcial, hodiaŭ vi estas plena de feliĉaj ideoj. Ni utiligos la kupidoterapion, plej rekomendindan en ĉi tiu kazo pro ĝia homa origino. Elektu kvar pasiajn am-parojn, kiuj alternu en la plej potenca el ni aj ekstraktoroj de amfluido, kaj anstataŭ sendi tiun fluidon al la motoroj aŭ al la elektra lumigado, ni vibrigos ĝin en la korpoj de ĉi tiuj du frostiĝintoj, kies revivigan procedon ni subtenos ankaŭ per varmo; pro tio ni eltiros ilin el la sarkofago, metos en liton kaj starigos varmigilon sub ĝin. Por havi ilin pli proksime ĉe la mano, mi portigos ilin en mian loĝejaron.

Post la translokigo de Inés kaj Juan, ĉir tage estis aplikata al ili la kontraŭputra traktado. Rilate la kupidismon, oni vidu ĉi-sekvante, kiel fariĝis la kurento, sub kies influo ili de nun daŭre restis.

Unu metafadeno eliris de la virino en la subetaĝo, aŭ pli ĝuste, de l' ameca kampo de ŝi produktata, kaj supre, tiu metafadeno volviĝis ĉirkaŭ unu tibikarno de Juan. Tra ĝi enfluis en lian korpon la kurento kaj eliris tra unu mano kumplektita kun tiu de Inés, tra kiu ĝi eniĝis en ŝin por eligi tra ŝia tibikarno al alia metafadeno, konektita ĉe la vira poluso de l' duseksa paro en la keto.

Pli poste estos detale klarigate, kiel viro kaj virino naskis la alternan kurenton, kiu en unu momento flukuris de li al Inés, de ŝi al Juan kaj al la virino mal-

supre, kaj en la tujposta momento fluis en mala direkto: virino, Juan, Inés kaj viro en la kelo, ĉio dank' al la mirakla aparato de Mob. Ĝi estos priskribata ĝustatempe.

Ĉu elektro? . . . Amo? . . . Unu kaj alia. Kiel? . . . Ni ja vidos.

Aparte de la pozitiva avantaĝo gajnita per tiuj 'kurentoj — eviti la putradon de la korpoj — tiu refortigo de anvibrado estis tio, kion malplej bezonis la Bilbaaj gefianĉoj; ĉar antaŭ ol la kristaliĝo paralizis ilian tiaman spontanegan vibradon, ili vibradis jam kun sufiĉa efiko por fiksi sian geedziĝon je ok tagoj post tiu, en kiu ili falis kiel viktimoj de l' akcidento. Se oni estus simile traktinta ilin, kiam ili estis ankoraŭ tute vivaj kaj viglaj en Bilbao, ne estas eble imagi, ĝis kiuj danĝeraj ekstremoj estus progresinta ilia pasio; en Mondopolo nur ilia inerta stato gardis ilin tiumomente kontraŭ la danĝeroj de supernatura pasiego. Sed se tiu stato daŭrus ĉe la reveno en la vivon, ĉu la pasiego ne povus eksplodi kiel afekcia sangalfluo, kiel ama hiperestezio?

— Marcial, la afero marŝas kronometre, — diris iunokte Mob, starante ĉe la kapoj de la ekskristaliĝantoj. — Jam mi ne pridubas ke, post kelkaj tagoj, vi povos demandi viajn samlandanojn pri tiu amaso da interesindaĵoj . . . Kanario! . . . Mi ne pensis pri tio, ke vi supozeble ne povos interkompreniĝi; multe mi timas ke homoj dormintaj de okmil jaroj parolas hispanan lingvon iom arkaikan.

— Kaj vi timas prave. La tiam en Bilbao ordinare

uzita lingvo ja ne estis tre simila al la hispana; la hodiaŭ en Hispanujo parolata idiomo ne konservas eĉ la plej malgrandan similecon kun la klasika lingvo de Burgos. Tial estas kredeble ke nur kelkaj unuopaj vortoj egalas en la vortprovizo, kiun uzados ili kaj mi. La malfacilaĵo estas granda, kaj sole unu radion de espero mi vidas.

— Kiun?

— Kiam niaj du Viskajanoj ekdormis, finiĝis en Bilbao infan-malsano de vaska naciismo («bizcaitarra»), kiu verŝajne kulminis, kiam ili estis infanoj. Kaj se ili bone parolas vaske . . . mi estas edukita en Viskajo, tre najbara al mia hejmloko, kaj mi parolas vaske kiel homo naskita en Guernica . . .

— Sed kun la vaska supozeble okazis same kiel kun la hispana; inter la 20-a kaj la 100-a jarcentoj . . .

— Tute ne, sinjoro. Kvankam pro aliaj kaŭzoj, la vaska estas tiel neŝanceliĝebla kiel Esperanto, kaj la hodiaŭa egalas ne nur al tiu de dudek jarcentoj post, sed eĉ al tiu de dudek jaroj antaŭ la kristana erao.

— Tio estas ja geologia idiomo! Espereble parolos ĝin tiuj fosiliuloj.

— Baldaŭ ni vidos, ĉar hodiaŭ estas mardo, kaj la prahistoriuloj vekigos proksimume sabaton. Grandan emon mi jam havas por ripozi post la gardostarado.

— Ne necesas atendi ĝis tiam, amiko Marcia! La afero marŝas perfekte kaj normale, kaj jam ne estas bezonata nia konstanta gardostarado. Sufiĉas du—tri vizitoj ĉiutage.

Tiun mardon, kiun Rucandio aludis, alvenis Inés

kaj Juan je 30 gradoj, kun diferenco de ok dekonoj inter ambaŭ; jaŭde ili transiris 33.

Post fino de la ĉiutagaj matenaj manipuloj kontraŭputraj, Don Roberto laŭkutime mezuris la kurenton, kiun la maldormaj amantoj en la kelo sendis al la dormantaj amantoj en la supra etaĝo; li uzis por tio fotometron-kalkulilon de la nombro da lumunuoj<sup>11</sup>, per kiuj brilis elektra ampolo interŝaltita, por mezuraj celoj, en la metalfadena cirkuito de la du paroĵ.

Farinte tion, la du saĝuloj estis surprizitaj, kiam ili vidis lumi la inkandeskan ampolon ne per la intensa brilo ĉiutaga, sed per malabunda, nigreruĝeta lumoj kaj tremvibrado antaŭdiranta baldaŭan estingiĝon.

Atribuante tion al la malbona funkciado de l' du-seksa generatoro malsupre, Rucandio malsupreniris al la kelejoj, kie li trovis viron kaj virinon, kiuj tiam estis produktantaj la kurenton, skuataj de epilepsiaj konvulsioj. Interkomunikinte per radiofonio kun Mob, li igis malligi tiun paron de la taburetoj de l' transformatoro kaj anstataŭigis ilin per alia belega paro, konsistanta el admirinda blonda anglino kaj fiera bruneta sudamerikano, freneze enamiĝintaj al siaj ambaŭaj belaĵoj. Apenaŭ ili estis firmiligitaj unu vid-al-vide de l' alia kaj ekinterŝanĝis siajn ardajn rigardojn, ili subite faris eksalton, t. e. kelkajn eksaltojn, rompis la fiksozonojn kaj falis svenaj, en la sama maniero, kiel okazis al la ĵus anstataŭigita paro ĉe la interrompo de la cirkulanta kurento inter ili kaj la dormantaj de la unua etaĝo.

Samtempe la ampolo, kiun supre observis Mob,

elsendis blindigan radion kaj fandiĝis; tiuokaze ŝajnis al la saĝulo, kvankam li ne povis certigi ĝin (tiel rapide estis ĉio), ke Inés kaj Juan ekstremis.

— Kio okazis, Rucandio? — li demandis radio-telefone.

— La anstataŭigita amkunulaĵo senkonsciigis ĉe la interrompo de l' komuniko, kaj al la anstataŭanta okazis same ĉe la ekfunkciigo. Krome, ĉi tiu rompis la sekurecajn zonojn.

— Oni alligu alian paron, interkomunikigante ĝin ne kun ĉi tiuj gesinjoroj, sed kun motoroj-elevatoroj por akvo aŭ mueliloj. Kaj vi suprenvenu tiuj. Jam mi scias, kio okazis.

Dum Marcial supreniris, Mob malkontaktigis la metalfadenojn alligitajn ĉe la gefianĉoj de supre, lasante ilin ekster la cirkuito; kaj kiam Marcial alvenis, li diris, vidante lin eniri:

— Ni estis pereigontaj ĉion; sed la pasinta okazo pruvas ke, kvankam la reviviĝo de la korpaj organoj de ĉi tiuj hispanoj ankoraŭ ne estas fakto, tamen ĝi jam realiĝis en la animecaj; jen kio okazis: ni, tute ne supozante ĝin, havis ĉi tie en funkciado elektroamecan paron tiel potenca kiel la gekunuloj de malsupre; krome, ni akumulis en ĝi dum kelkaj tagoj amecan energion pli fortan ol produktis la malsupra paro; se ni daŭrigus funkciigi unu kontraŭ alia, ni difektus ĉiujn ajn uzotajn parojn da parioj. Kaj kio estas eĉ pli malbona: ni estus produktintaj difekton multe pli neripareblan en nia fosilia paro pro tio, ke ni ne povas ĝin anstataŭigi kiel la pariojn.



— Vere; ĝi estas la kazo de akumulatoro kiu atingas egalan tension, kian havas la dinamo ĝin provizanta.

— Ĝuste tiel. Nun estas pruvite ke ĉi tiuj du individuoj jam ne estas inertaj je la afekcia vibrado, kio siaflanke pruvas evidente, ke ili estas vivaj tiel animece kiel amece. Tial ne konvenas al ni daŭrigi ilin ŝarĝi; eĉ pli, mi deziras ke de nun ĝis sabato ili perdu kelkan tension, por ke ne okazu komplikaĵoj ĉe la vekigo.

— Espereble en tiuj kvardek-kelkaj horoj ili perdos sufiĉe da elektra fluido per elradiado.

— Je tio mi kalkulas.

## IV

### La vekigo

La Bilbaanoj estis gefianĉoj laŭ Dia volo, kiuj amis unu la alian »kun bona celo«, laŭ la hispana diro, en la unua etapo de sia vivo, aŭ »pour le bon motif«, se oni uzas francan frazon, egalsignifan kaj samtempan al la hispana.

Pruvo por tio estas ke ili, pasiginte kelkajn jarojn en konstanta interkomunikado, liberaj de ies aŭtoritateco kaj observado, sciis gardi sin kontraŭ ĉia malkorekta libereco. La plej granda, kiun Juan iam estis permesinta al si, kvazaŭ kiel antaŭfavoron je la konto de la geedziĝo, estis tri aŭ kvar kisoj sur la manon de lia fianĉino; tio ja estas vere malmulta, precipe se oni memoras, ke neniam li kisis al ŝi la piedojn, kiel ĉiuhore faras la kavaliroj al la sinjorinoj: unu afero estu do kompensata per la alia.

Tio estu dirata antaŭ la komuniko pri la vekigo de ambaŭ, por ke, konsiderante ilian kutiman konduton en konscia animstato, oni ne kulpigu ilin pri la malfeliĉaĵo (tia ili konsideris ĝin), kiu okazis al ili ĉe la reveno en la vivon, malfeliĉaĵo pri kiu ili sentis multajn konscienciproĉojn. Pro la sama kaŭzo estu komunikataj antaŭsciigoj senperaj antaŭ la dirita malfeliĉaĵo.

Oni konstata, ke ĉe sia svenfalo ili jam amegis unu la alian. Al tiu amkvanto akumuligis tiu de la kvar am-paroj, kum kiuj ili estis dum pluraj tagoj en kontakto; do, ilia propra estis kreskinta senbride, tiom ke, kvankam ili perdis ian kvanton per disradiado, kiel Mob esperis, tamen la restinta sufiĉis por satiri ilin. Oni aldonu al tio la abruptan malŝarĝon de kupidismo, ricevitan de la bedaŭrindaj gejunuloj, kiam la lum-ampolo fandiĝis, kaj oni komprenos ke de tiam ili ne ĉesis vibradi, atingante eksplodemajn tensiojn. Mob ja estis forpreninta de ili la metalfadenojn, sed li ne estis sufiĉe singarda disigi iliajn manojn.

Tiu ekstermezura vibrado kaŭzis ke, anstataŭ vekigi sabate laŭ la programo, tiu okazo plifruigis je vendredo la 15-a de junio, je la sesa matene por García kaj je la sesa kaj kvin por lia kunulino.

Sed antaŭ ol komplete reformiĝis en ili la plena vivo, jam estis komencintaj labori iliaj animecaj cerboj, kiel dirus Mob, produktante al ili inkubsonĝojn. Aliflanke oni devas konsideri ke ili, kiam ili falis en la galerio de la aer kondensiloj, kvazaŭ trafita de fulmo, pro la malvarmo de 200 gradoj sub nul kaj estis fulmrapide anesteziitaj de la troo da kriptono en tiu aero, ke ili, mi ripetas, ne sentis pro la unumomenteco la skuegon de l' akcidento; tial ne estas strange, ke tiu prokrastita eksento estis la unue sentata, kiam la vivo komencis renaskiĝi en ili.

Tiel, antaŭ ol komplete revivi, ili sonĝis pri ĝi; Juan memoris ke li vidis fali Inés'on, Inés ke ŝi vidis fali Juan'on. Ĉi tiu memoro plorigis ilin ambaŭ, ĉar

konsciante, pri kio ili pensis, ĉiu el ili kredis sin viva, kaj mortinta la alian.

La doloron kiun ambaŭ sentadis oni povas ja supozi; ne, mi eraras, ne estas eble ĝin supozi, ĉar ĝi ja ne estis tiu maldolĉa, sed eltenebla doloro suferata en la ordinaraj kazoj, kiam oni perdas adoratan fianĉinon ĝuste antaŭ la geedziĝo; sed tiu doloro estis kvaroble pli granda sekve de la kvarobla am-injekto de sammombraj paroj da geamantoj.

Senton similan, kian spertis la gefianĉoj ĉe sia plena vekigiĝo kaj ĉe la konvinkiĝo, ke ili ambaŭ vivas, nek travivis nek verŝajne iam sentos aliaj geamantoj en la tuta universo.

\*

Juan estis la unua kiu malfermis la okulojn. La taglumo eniris tra la fenestro; la sunradioj ludis en la bukloj de Inés kiuj, se ili estus blondaj, povus permesi ĉi-loke beletan retorikan figuron, kiun ni perdas pro nescio, kian koloron ili havis.

Ne tute vekigiĝinte kaj ankoraŭ ne plenkonscia pro la impreso de la ĵusa inkubsonĝo, li kredis sin unue mortinta, kaj esplorante li ĉirkaŭbrakis sin. Sed farante tion kaj rimarkante, ke la adorata estaĵo ne havas mortan rigidecon, li apartiĝis por rigardi sin, vidante ke ŝia koloro ne estas tiu de kadavro. Kaj kiam li denove alproksimiĝis kaj sentis sur sia vizaĝo la mildan bloveton de ŝia spirado, lia doloro ŝanĝiĝis en ĝojegon, limantan al deliro kiam Inés, ankoraŭ en

dormo, sed jam tuj vekigonta, malfermis la buŝon murmurante: „Juan, Juan.“

La karesoj, per kiuj li tiam ŝin superŝutis, fine vekis ŝin; kaj malfermante la okulojn kaj vidante apud si lin, vivantan, kiun ŝi kredis mortinta, ŝi plektis siajn brakojn ĉirkaŭ lia kolo ekkriante:

- Juan mia, mia Juan!
- Inés, vivo mia — respondis li.
- Via.
- Via.

— — — — —

Post unu horo troviĝis la gefianĉoj sidantaj unu kontraŭ alia, sed ambaŭ kun klinitaj kapoj, ne kuraĝante rigardi unu la alian.

- Mi ne scias, ne scias.
- Ankaŭ mi ne.
- Ni ne posedis nian konscion.
- Ni estis senkonsciaj.
- Mi ĵuras al vi, ke mi ne intencis tion.
- Mi kredas al vi, jes, mi kredas. Al ni ambaŭ okazis la sama: nek vi nek mi povis pensi pri io alia . . . ĝis nun, kiam estas jam malfrue.

— Dank' al Dio ke la lasta edziĝavizo jam estas publikigita . . . Se vi volas edziniĝi jam pli frue ol post unu semajno, ni plimallongigos la templimon.

— Jes, Juan, jes: plejeble baldaŭ!

La gejunuloj parolis, kvazaŭ ilia sentforesto daŭris nur kelkajn tagojn, ĉar la sonĝojn, kiuj ĵus memorigis ilin pri la akcidento antaŭ okdek jarcentoj, ili inter-

pretis kiel malklarajn sentaĵojn de ĵus okazinta afero. Subite ŝi diris:

— Sed Juan, kie ni troviĝas? Mi neniam vidis ĉi tiun strangan loĝejon; ĝi ne apartenas al la fabriko.

— Kaj tiuj mebloj kun formoj tiel ekzotikaj, ke . . .

— Kie ni estas, Juan? Venu, ni iru al la fenestro . . . Tio ne estas Bilbao — diris ŝi elkliniĝante kaj ekvidante Mondopolon.

— Certe ne, — respondis li, — estas urbo kiu eĉ ne iomete similas ĵun de mi konatan.

— Kie ni estas, kie ni estas? . . . Kio estas tio? Rigardu, rigardu tiujn preterirantojn. . . . Kiaj strangaj vestoj! Kvankam pli mallongaj, ili igas imagi pri romanaj tunikoj.

— Kaj tiuj homoj ne marŝas: sidante en seĝoj sur la trotuaroj ili estas transportataj de ties moviĝado; la pavimo glitas laŭlonge de la konstruaĵoj.

— Kaj ĉi tiu strato estas ringforma, kaj ĉe la flankoj de sia centra parto, kie ne vidiĝas veturiloj, ĝi havas du kanalojn. Rigardu do! . . . Eble la tuta larĝeco de la strato estas pli ol 300 metroj . . . La konstruaĵoj laŭŝajne mezuras 50 metrojn da alteco, kvankam ili laŭaspekte ne havas pli ol du etaĝojn. Ĉe la tegmentterasoj ili estas pli mallarĝaj ol ĉe la teretaĝo, kaj ĉiuj havas formojn de senpintaj piramidoj . . . Tio impresas kvazaŭ oni rigardus urbon per pligrandiga lenso; ĉiuj domoj ŝajnas kolosaj temploj egiptaj.

— Rigardu, jen, aeroplano eksidas sur tiu konstruaĵo . . . Kaj tie alia, kaj alia tie, maldekstre!

— Certe multaj el tiuj vastegaj terasoj estas platformoj por flughalti; sendube.

— Jes, tiel devas esti. Kaj la ceteraj ŝajnas grand-spacaj ĝardenoj . . . Rigardu, rigardu, tie estas alia granda biplano leviĝanta de sur tiu giganta konstruaĵo . . . Sed ĝi ne suprenflugas oblikve, kiel ĉiuj, sed vertikale, laŭ la maniero de aerostatoj.

— Kaj kiaj grandegaj turoj elstarantaj el la centro de kupoloj similaj al katedralaj kupoloj.

— Kia giganteco! Eble ili atingas la gigantecon de la Eiffel-turo en Paris . . . Unu, du, tri . . . Kaj tiu alia mezuras almenaŭ la duoblön . . . Apud la plej malproksima ŝvebas en la aero du kolosaj masoj, ŝajne alligitaj al ĝi en malsamaj altecoj.

— Devas esti aeroplanoj aŭ aerŝipoj, kvankam la formo ŝajnas esti iom malofta.

— Jes; ili havas en sia formo iom da aeroplano kaj multon da zepelino kaj helikoptero . . . Efektive, ili estas ligitaj al la turo. Nun unu liberiĝas kaj ekflugas: rigardu ĝin, rigardu! . . . Kaj alia alproksimiĝas kaj estas tenata de ĝi.

— Juan, ni ne nur ne troviĝas en Bilbao, sed mi kaptuniĝas pensante, ke ĉi tiu grandega urbo estas neniu el tiuj al mi konataj; eĉ, ĝi ne povas esti, iu pri kiu oni povas havi ian scion.

— Mi estas same konfuzita kiel vi . . . Ĉio, kion mi vidas, estas tiel malkutima, ke mi ne scias kion pensi; eĉ la absurda ideo min atakas, ke ni ne troviĝas sur la Tero, sed sur alia planedo.

— Silentu, silentu! . . . Jam la saman ideon havis

ankaŭ mi, kaj terurite mi forigis ĝin; ĉar kio fariĝus el ni en nekonata mondo?

— Ne, trankviliĝu! Estas neeble ke ni dum nia sveno forigis de la Tero. Ĉar, vidu, la Suno havas la saman grandecon, laŭ kiu ni vidis ĝin ĉiam; se ni troviĝus en alia mondo, nepre ni vidus ĝin pli granda aŭ pli malgranda ol de sur la nia . . . Krome, la atmosfera premo estas la sama, al kiu niaj pulmoj estas alkutimintaj, ĉar ni sentas nenian eksterordinaraĵon ĉe la spirado; la forto de altiro estas nia-monda, ĉar sendepende de sia stranga formo, ĉi tiu seĝo — Juan levis unu por pesi ĝin — pezas tiom, kiom ĝi devas pezi sur la Tero laŭ la proporcio de sia formato: ĉi ĉio pravas ke ni ne estas sur alia planedo, ĉar sur ĉiuj aliaj astroj ĉio havas diferencon pezon kompare kun la nia.

— Jes, jes, vi estas prava . . . Kaj malgraŭ tio mi havas timon; mi ne scias kial, sed multan timon . . . Mi deziras scii, mi volas scii kie ni troviĝas.

— Trankviliĝu, ineto, ni ja ekscios tion . . . Kaj ne timu; kie ajn ni estas, estas evidente ke ni troviĝas inter homoj civilizitaj; kaj antaŭ ĉio, ĉar vi estas kun mi.

— Jes, jes, vi pravas; tio, tio estas la plej interesa. Ni estas kune, mi havas ĉe mi mian Juan'on, mian koramaton.

— Inés, mia vivo!

Dirante la antaŭajn parolojn ili ĉirkaŭprenis sin, obeante al reciprokaj nekontraŭstareblaj impulsoj, kun vivega sent-elverŝo kaj tiom granda feliĉo, ke ĉi tio,



apenaŭ sentita, timigis Inés'on pro la forta intenseco. Ĝi faris ŝin singarda kaj igis, ke ŝi elŝiris sin kun timo el la brakoj de sia amanto, dirante:

— Ne, mia Juan! memoru pri tio de antaŭe! . . . memoru ke ankoraŭ ni ne estas geedzoj, kaj respektu min, respektu min! Havu vi la forton, kiu mankas al mi, por defendi min kontraŭ vi . . . kaj kontraŭ mi mem!

— Inés, Inés, mia vivo! . . . Ne timu min! . . . Terura estas tio, kion vi petas, ĉar rezisti la altiran forton, kiun vi efikas je mi, preskaŭ tuŝas la maleblecon. Sed mi venkos min.

— Juan, tio kio okazas al ni, estas konfuza; ŝajnas al mi ke ni troviĝas en mondo, kie ĉio kreskis en grandegaj proporcioj: la urboj de ni konataj gigantigis ĝis transformiĝo en ĉi tiun kolosan urbegon, kiun ni estas rigardantaj; la sentimentoj kreskas, kreskadas, ŝvelas tiom, ke ili minacas krevigi nin en pasiaj eksplodoj . . . Ĉar mi kredis jam de multa tempo, ke estas neeble ami vin pli ol mi vin amis, kaj nun, animo de mia vivo, mi vidas ke mi vin adoras duoble, trioble, kvaroble pli ol antaŭe; tiom, tiom, ke la koro doloras al mi per doloro, kiun mi povas nomi nur am-doloro.

— Kaj mi, vivo mia, lumo mia, ĉielo mia, vin adoras centoble, miloble pli; kaj min mortigas la turmento, kiun vi kaŭzas al mi forkurante el miaj brakoj. Revenu en ilin, revenu! venu al mi, Inés!

— Jes, mia gloro . . . Ne, ne: vi promesis al mi . . . Nun ni estas vekiĝintaj; nun ni estas jam

respondecaj. Ne rigardu min! . . . Turnu al mi vian dorson, kiel faras mi, por defendi min kontraŭ la sama impulso, kiun ankaŭ mi ne povus rezisti, se mi daŭrigus rigardi vin.

Tiam pruvis Juan ke li estas tiel bona junulo, kiel honesta estas Inés, ĉar anstataŭ profiti, ke ŝi turnis al li la dorson, por ĉirkaŭpreni ŝin kaŝmaniere, al kio ŝi kredeble ne povus daŭrigi sian kontraŭstaron, ŝi obeis, mem turnante al ŝi la dorson.

La du bedaŭrinduloj estis du veraj herooj. Apenaŭ ili ĉesis vidi unu la alian, la doloro ne vidi sin reciproke plorigis ilin, ĉar al ambaŭ ŝajnis, kvazaŭ oni amputas membron de ilia propra korpo.

Kompatindaj gejunuloj! Vere malbone agis Mob per tiu barbare granda akumulo de elektrokupidoj!

Dank' al tio ke tiu suferado kaŭzis grandan foruzon de fortoj kaj ke la plorado helpis la eliminon de fluido, la ekstrema potencego de la pasia tensio en la unuaj momentoj estis malkreskinta, kvankam ĝi konserviĝis ankoraŭ fortega. Por malaltiĝi al la nivelo de la profunda, sed trankvila amo, kiam en sia unua vivado ĝuis la geamantoj, ĝi devus daŭre malsupreniĝi dum almenaŭ dudek-kvar aŭ tridek horoj; dum tiu tempo la geamantoj devus terure lukti por ne refali en tion, kion Inés tiom priplendis.

La plej granda danĝero — bone ili vidis — estis la konstanta interkomunikado inter ili ambaŭ solaj, en kiu ili estis submetataj al turmentoj de Tantalo; estis evidente, ke la rimedo dors-al-dorsa povus daŭri nur

kelkajn momentojn, por reteni impulsojn subitajn, alimaniere nerezisteblajn. Tiu ridinda situacio ja ne estis plilongigebla dum horoj. Tion komprenante, Inés diris post kelka tempo:

— Se ni povus eliri, serĉi iun por demandi lin, paroli kun iu . . .

— Mi vidu — rediris Juan, alproksimiĝante al la sola pordo de la ĉambro; li provis malfermi ĝin, sed ne sukcesis, kaj daŭrigis:

— Neeble. La pordo estas ŝlosita de ekstere.

— Fermita! Tiam, ni ja estas kaptitaj! — ekkriis Inés leviĝante.

Sed turnante sin, vidante Juan'on kaj legante en liaj okuloj la deziron alproksimiĝi al ŝi, ŝi kuris al la kontraŭa flanko de granda tablo staranta inter ambaŭ. Sur ĝi kuŝis kelkaj libroj, la injektiloj kaj la boteletoj de la substancoj por la kontraŭputra traktado en la pasintaj tagoj. Inés diris:

— Ne! vi, tiuflanke! . . . Ne staru! eksidu! tie, tie, pli malproksime!

— Sed Inés . . . Vidi vin de ĉi tie, el tia distanco, estos pli malbone ol troviĝi dors-al-dorse.

— Plejmalbone estas daŭrigi la senĉesan reciprokprokan glutegadon per niaj okuloj kiel nun . . . Rigardu, jen estas libroj; foliumu en kelkaj, dum mi faros la samon en aliaj; tiamaniere ni distros nin . . . Kio estas tio? Aŭskultu, aŭskultu: »Monografio klinika pri la vojaĝo farita kun Doña Inés Ramírez kaj Don Juan García, de D-ro Bernardo Menoyo«. Kaj sube tekstas: »Jaroj 2000—2040. 20-a eldono de la unua traduko«.

— Sed kiajn sensencaĵojn vi diras?

— Tiujn, kiujn mi legas sur la kovrilo de ĉi tiu libro verkita en Esperanto. Rigardu! . . . Ne, ne alproksimiĝu! Jen!

Dirante tion, Inés jetis ĝin trans la tablon, kie ĝin kaptis ŝia fianĉo, kiu post rapida rigardo al ĝi diris:

— Jen estas alia afero eĉ pli nekredebla!

— Kio?

La piednoto de l' presejo, kiu tekstas: »Tipografiejo Arkeologia-Antropologia, Mondopolo, jaro 8993«.

— Jaro 8993. Ne povas esti. Absurde!

— Vi pravas; estas neeble . . . sed malgraŭ tio, ĉi tiu urbo nekonata kaj stranga, tiu ciklopa arkitekturo, tiuj vestoj . . . Mi ne scias, ne scias.

— Mi kapturiniĝas, Juan; estas absurde, absurde . . . Kiu povus kredi ke ni vojaĝadis dum 40 jaroj ne rimarkante tion? Juan, Juan, ĉu eble ni mortis pro la akcidento en la fabriko? eble niaj korpoj, kiujn ni kredas vivaj, ne havas realecon kaj estas nur iluzioj de niaj animoj, en kiuj daŭras vivi la rememoro pri la korpoj?

— Ne, Inés, ne! Mi palpas min: mia korpo ekzistas; ĝi ne estas fantomo.

— Kaj mi fariĝas freneza . . . Se tiu piednoto estas vero, ni do neprege jam mortis antaŭ miloj da jaroj.

— Se tio ne estas inkubsonĝo, kaj fikтиваĵoj la urbo kaj la libro, la kanaloj, la turoj, la terasoj, la vojaĝo, la akcidento de la fabriko kaj la neebla tipografieja noteto . . .

— Jen, jen! Tie troviĝas aliaj libroj: ni rigardu ilin!

— Ho ve!

— Kio okazis al vi?

— Mi piŝis min per tiu plumtranĉileto por vidi, ĉu mi vivas aŭ malvivas: kaj mi estas reale tre vigla kaj tre viva.

— Do tio povas perdi al ni la prudenton . . .

— Silentu, silentu! Saĝne iu venas al la pordo.

Efektive, la pordo malfermiĝis kaj aperis en ĝi Rucandio, kiu ĝuste en tiu momento intencis fari la unuan viziton ĉiutage al la fosiliuloj el la 20-a jarcento.

## V

### Inés kaj Juan klarigas al si sian eksterordinaran amvibradon

Granda estis la ĝojo de l' ĵus-veninto, kiam li vidis jam reala, eĉ multajn horojn antaŭ la konkludita tempo, la sopiritan reviviĝon aŭ vekigiĝon de la kristaliĝintoj; tiom pli, ĉar li ne kredis ĝin afero senduba, sed hazarda aŭ nur verŝajna.

La scivolemega maltrankvileco de la Vizkajanoj ne donis tempon al Marcial ekparoli al ili, ĉar apenaŭ li malfermis, ne, nur duonmalfermis la pordon, jen falis sur lin diluvo da urĝegaj demandoj de Juan kaj Inés kiuj, ambaŭ samtempe, scivolis:

- Kie ni estas?
- Kiu kaj kial oni forigis nin el Bilbao?
- Kiom da tempo ni estis senkonsciaj?
- Kiun daton ni havas?
- Kiu loko estas ĉi tiu?

Tiuj demandoj ne ricevis respondon, ne nur ĉar ilia ŝpruceco kaj multobleco lasis nek tempon nek okazon por respondi, sed ĉar ili estis faritaj en la hispana lingvo de l' 20-a jarcento. Rucandio ne kom-

prenis ilin, kiel li ja antaŭsentis jam. Inter la hispana lingvo de l' 100-a jarcento kaj la hispana lingvo, per kiu parolis la reviviĝintoj, ekzistis multe pli da diferenco ol inter la lingvo de Berceo kaj tiu de Pereda y Alarcón. Tial la filo de la moderna Kantabra komprenis nur tiun kaj tiun vorton, malkune elparolitan de la antikvaj junuloj el la mortinta Bilbao, de kies dispecigitaj ruinoj eĉ polvo ne restis. Ĝin jam vente disblovis la tempo tra ĉiuj jarcentoj.

Sed, feliĉe por ambaŭ, unu el la malmultaj vortoj komprenitaj de la kunlaboranto de Mob estis la nomo de tiu urbo, kiun li jam ripete legis kaj relegis, konsultante en la lastaj tagoj la bibliografion rilatantan al la kazo de la frostiĝintoj. Kaj mi diris „feliĉe“, ĉar aŭdante tiun nomon Marcial rememoris pri la vaska lingvo. Konvinkite jam ke per helpo de la hispana ili ne sukcesos interkompreniĝi, li demandis:

— Zubek Euzkeraz itz egiten dozube? (Ĉu vi parolas la vaskan lingvon?)

— Bai ba. Baña zuk itz egiten dozu? (Certe jes. Sed ĉu vi ĝin parolas?)

— Bai, Gernika ondoko basetxe baten azi naz. (Jes, mi edukiĝis en loko proksime de Gernika.)

— Sed ĉu vi ne parolas hispanan lingvon?

— Jes; sed mi ne komprenas la vian, ĉar ĝi estas tiom arkaika.

— Arkaika!

— Kion vi diras?

— Ĝi estas tre diferenca de tiu hodiaŭ parolata en Iberiolio.

— Iberiolio! Kaj kio estas tio?

— Tio, kio en via tempo nomiĝis Hispanujo.

— Sinjoro, mi ne komprenas eĉ vorteton: pli ĝuste, mi supozas, Juan, ke ankaŭ vi ne komprenas.

— Eĉ ne ereton . . . Hispana arkaika, Hispanujo antikva, niaj tempoj, kaj tiu nomo Iberiolio aŭdata de mi unuafoje, sonas kvazaŭ io el la epoko de **I n d i b i l** kaj **M e n d o n i o**.

— Mi povas klarigi al mi perfekte vian surprizon, ĉar ĝi estas tre natura. Tial ke vi ankoraŭ ne estas preparitaj por la surprizoj kiujn vi, reakirinte la konscion pri vi mem . . .

— Sed ni jam estas, ne, estis ilin supozantaj.

— Kio okazis al ni?

— Kiom da tempo ni estis svenaj?

— Kie ni estas kaj kiu urbo estas ĉi tiu?

— Kia absurda vojaĝo estas tiu priskribita en la libro trovita tie ĉi?

— Rigardu, Juan, se ni daŭrigos demandadi ambaŭ kune, kaj tiom da aferoj samtempe, estos neeble al tiu sinjoro respondi.

— Prava vi estas.

— Plejbone estos silenti kaj ne malhelpi lin, por ke li informu nin pri la plej urĝa, en tia maniero kaj tia vico, kiel li opinias tion plej oportuna.

— Kion diras la sinjorino, ŝajnas al mi la plej prudenta kaj plej mallonga.

— Jes, jes; Inés estas prava. Parolu laŭvole.

— Do, ni sidiĝu. Kvankam unu sola parolado ne sufiĉos por informi vin pri la multo ŝciigota al vi iom



post iom, la plej ĉefaj aferoj, kiujn mi hodiaŭ pri-traktos, jam prezentas temojn por tempeto.

La tri sidigis sin ĉirkaŭ la tablo. Pro scivolemego brilis la okuloj de la paro kiu, kvankam juna kaj freŝa, estis sendube paro fosilia. Marcial ekparolis dirante:

— Vi troviĝas en Mondopolo, ĉefurbo de la mondo.

— Sed ĉu la mondo havas unu solan ĉefurbon?  
— interrompis García.

— Juan, — diris Inés, — ni interkonsentis fari la demandojn poste.

— Vere . . . Pardonu, sinjoro . . .

— Marcial Rucandio, doktoro de sciencoj kaj kun-laboranto de l' direktoro de Universalmuzeo Internacia; tio estas la konstruaĵo en kiu vi troviĝas. Mia direktoro, la klerega Roberto Mob, vera gloriguro de la scienco, ne venis kun mi por saluti aŭ akcepti vin, ĉar ne supozante, ke vi vekigis antaŭ la morgaŭa vesperiĝo, li foriris por urĝa vojaĝo al la Kataraktoj de Stanley; sed morgaŭ li revenos.

— Sed tio estas tre malproksima: en subekvatora Afriko . . . mi pensas en la Kongo-regiono.

— En Afriko, jes; tre malproksime, ne.

— Juan, Juan! Tiuj interrompoj . . .

— Ha jes; prave . . . Ne atentu min, sinjoro, kaj daŭrigu.

— Post dormo tre malmulte diferenca de la morto, en kiu vi ekkuŝis, kiam ĉirkaŭis vin terura malvarmego post eliĝo de fluida aero, okazinta en la fabriko, kie vi laboradis, kaj kiu frostigis kaj kristaligis ĉiujn viajn viscerajn kaj korpajn sukojn, vi kelkajn semajjn-

ojn estis submetataj al traktado, ĉe kiu mi havas la honoron esti kunlaborinta kun mia majstro. Dank' al ĝi vi reakiris la perditan aktivecon de viaj organaj funkcioj.

Post ĉi tiu klariga enkonduko, Rucandio faris resumon pri la plej grava, kio okazis al la gefianĉoj dum ilia svenstato. Kiam li parolis pri ilia senkonscia migrado de universitato al universitato kaj de akademio al akademio, estis Inés kiu, jam ne povante sin regi, ekkriis:

— Do, se tio pri la vojaĝo dum 40 jaroj estas certa, mi ja fariĝis vera maljunulinaĉo, ĉar mi tiukaze havas jam 63 jarojn.

Fraŭlino Ramírez malkonfesis kvar, ĉar ŝia vera aĝo ĉe la frostakcidento estis 27.

Rucandio komprenante, ke tio priokupis multe kaj malagrabla la revivigitinon, diris ĝentile:

— Neniel, sinjorino; nenia aĉulino, — kaj leviĝante kaj premante sur unu el la diversaj leviletoj elstarantaj el la muro, li igis forŝoviĝi kurtenvandon de la ĉambro, per tio malkovrante staturaltan spegulon. Turnante sin al Inés, li daŭrigis:

— Rigardu mem kaj konvinku vin, ke vi estas en la sama stato kaj tiel juna kaj freŝa kiel en la tago de l' akcidento . . .

Inés, post rigardo al la spegulo, trankviliĝinte kaj plezure konstatinte, ke ŝi estas tiel belega kaj gracia kiel kutime en siaj tempoj, respondis:

— Mil dankojn, sinjoro; ne malgrandan pezon vi forigis de mi.

— Kaj vi havas eĉ kelkajn jarojn pli ol 63.

— Pli? . . . Kia teruro! Do, eble post la fino de la vojaĝo ni plu restis svenaj dum kelktempo . . .

— Kelktempo? . . . Jes, kelktempo, sed iom longa.

— Vi teruras min; mi timos ke mi estas centjarulino.

Dum la ĉi-supra dialogo pri la aĝo de sia estonta edzino, Juan prenis kun maltrankvila scivolo, unu post alia, kelkajn al iliaj personoj rilatantajn librojn, kiuj troviĝis sur la tablo, rigardante en ĉiu nur la tempon de l' presado kaj murmurante al si inter la dentoj:

— 8993 . . . . Kia monstreco! Ne povas esti! 9742 . . . Tondrobato! 9984 . . .

Kiam li alvenis tie en sia mira monologo, li aŭdis, kiel lia fianĉino ektimis antaŭ la ebleco esti centjaraĝa. Tiam, ne lasante al Marcial tempon por respondo, li diris:

— Centjaraĝa ne, Inés; se ĉi tiuj libroj ne mensogas, ni estas ne centjaruloj, sed miljaruloj, kelkmiljaruloj, arkimiljaruloj, ĉar ni konjekteble vivas en la jarcento C aŭ CI, kondiĉe ke ĉio ĉi ne estas presita por la sola celo fari al ni pezan ŝercon.

— Ne, sinjoro; neniu pensas ĉi tie fari al vi malbongustajn spritaĵojn. Efektive, ni vivas en la epoko kiun vi, tre proksime al realeco, supozas: estas la 25-a de oktobro 10 000.

— Sed, sed . . . estas absurde.

— Jes, knabinjo mia: absurde, sed certe.

— Nu, eĉ se oni al mi forhakus la kapon, mi ne kredus ĝin.

— Sinjorino, mi certigas vin ke mi estas nekapbla . . . tiom malpli kiam temas pri samlandanoj.

— Ne, ne. Pardonu! Vin mi ne nomas trompisto, sed mi opinias ke aŭ vi aŭ ni estas taŭgaj por enigo en frenezulejon. Ĉar laŭ ĉi tiuj kalkuloj, Juan havas 8034 jarojn kaj mi 8023 (malgraŭ ke estis tiom, Inés forigis, kiel kutime, kvar el ili). Ni bezonas nur rigardi la spegulon, kiun vi afable havigis al ni, por vidi, ke tio ne povas esti. Tio ne estas vanteco, tute ne; sed kiel mi kredu ke tiu virino, kiun mi vidas en la spegulo, estas la plej maljuna de l' mondo?

— Tial, ke vi devas distingi inter via naskiĝdokumento, kiu sendiskute havas tiun antikvan aĝon de 8023 jaroj, kaj via korpo: tiel juna kiel respondas al la solaj dudek-tri de la nombrofinio, kiujn vi reale nur vivis; ĉar tio, kio maljuniĝas, ne estas la jaroj, sed la vivo. Kaj ĉe vi estas eksterdube, ke vi ne vivis, kvankam vi tradaŭris 80 jarcentojn.

— Ave Maria Purísima!

— Ankaŭ ĉi tiu sinjoro ne. Vin ambaŭ perfekte konservis la frostiĝo, al kiu vi estis submetitaj.

— Frostiĝo?

— Precize tia.

— Nenio farebla, Inés, necesa estas rezignado. Bone ni povas konsoli nin pri niaj egaj aĝoj pensante ke, laŭ la stato en kiu ni reviviĝis, ni ĝuis enviindan sanon dum la tuta tempo, kiam ni estis mortaj.

Ĉar Inés per tio ne konvinkigis, estis necese prezenti al ŝi argumentojn nekontesteblajn, t. e. tri—kvar diferencajn gazetojn de l' 25-a de oktobro de l' jaro

10 000, en kiu ili vivis, leteron kun dato, kiun Rucandio portis en sia poŝo kaj, antaŭ ĉio, la malgravan sed videblan brucikatron sur la vango de Juan, kiun li ne havis antaŭ la akcidento, kaj konstantan ŝvelaĵon de l' maldekstra maleolo, sekvon de la krurrompigo suferita ĉe la vagon-elreliĝo en Japanujo: ĉion ĉi kiel pruvojn de l' atesto en la memorskribo de D-ro Menoyo, ilia iama privatkuracisto. Ĉion elmontris kaj klarige prezentis Rucandio, kiu tiukaze eksciis, ke ili jam scivole legetis en la verko de Menoyo kaj ke ili scipovas Esperanton; ĉar Inés prenis el liaj manoj la libron, en kiu li estis signonta la epizodojn al kiuj li rilatis, por legi mem la rilataĵon pri la skarlatino, kiun ŝi trapasis en Valparaiso. Ĉi tiu eltrovo kaŭzis al Marcial grandan kontenton, kaj ne malpli grandan al la ekŝrostiĝintoj, ĉar ĝi faciligos ilian novan vivon en la socio kaj epoko, en kiun ili falis.

Post ŝia konvinkigo kaj rezigno — kion alian ŝi povis fari? — revenis la scivoloj de Inés kaj de ŝia fianĉo, por peti komunikojn pri la mondo, en kiu ili novnaskiĝis. Marcial donis al ili kelkajn, kvankam maldetalajn, tiajn, kiaj estas priskribitaj jam en la prologo; ĉe tio li limigis sin je la plej urĝa. La detalojn ja vidos iom post iom la revivigitoj mem.

— Rigardu, sinjoro Rucandio, kvankam la feliĉa cirkonstanco, ke ni estas esperantistoj, faciligos al ni komunikadon kun la loĝantoj de ĉi tiu urbego, en kiun ni hazarde venis, ni tamen ne povos ne uzi viajn gvidistajn servojn, kiujn vi tiel ĝentile proponas al ni.

— Mi subtenas la opinion de Inés. Mi konsideras

bonŝanco, ke ni renkontis ĉe la vekiĝo hispanon, ĉar ĉiam estas pli agrable ŝuldi al samlandano . . .

— Aŭskultu, Don Marcial, kia estas nun la regformo en Hispanujo, ne, mi volas diri en Iberiolio? Ĉu ne tiel ĝi nomiĝas nun?

— Jes; sed hodiaŭtempe Iberiolio ne estas ŝtato, sed provinco de l' Imperio Mediteranea, konsistanta el la popoloj de l' suda Eŭropo kaj norda Afriko, Sirio, Palestino.

— Kia domaĝo!

— Ĝia ĉefurbo situas sur la insulo Mallorca.

— Palma?

— Mi ne konas la ekzistadon de urbo kun tiu nomo. La ĉefurbo nomiĝas Jafetopolo.

— Vidu, filinjo, pli bone ol demandi nun ĉi tiun sinjoron pri sciigoj el la pasinteco, kiujn ni povos legi en iu ajn historia ekstrakto, mi opinias pli urĝa afero peti de li sciigojn pri ĉi tiu urbo, kie ni troviĝas, se li estas tiel afabla ke . . .

— Kun la plej granda plezuro. Ĉi tiu urbo, metropolo de ĉiuj opaj federacioj de la Tero, kunigitaj siaflanke en iu supera Monda Konfederacio, estas lokita sur la orienta bordo de lago antikvatempe nomita Lago Alberto.

— Do, ni estas apud unu el la fontoj de l' Nilo.

— Precize apud la plej okcidenta<sup>12</sup>. De post la tempo, kiam vi . . . vi . . . nu, ni diru . . . ekdormis, la hegemonio politika kaj scienca de la mondo pasis de la kaduka Eŭropo al Ameriko, poste al Azio, kaj hodiaŭtempe la lumo de la scienco kaj de la leĝoj estr-

antaŭ la mondon eliras de tiu kontinento, kiu antaŭe nomiĝis la netrapenetrebla Afriko. Tial situas ĉi tie la ĉefurbo de la supera Tutmonda Konfederacio.

Poste Rucandio informis siajn novajn geamikojn, al kiuj li sentis multe da simpatio, pri la karakterizaĵoj plej elstaraj de la civilizo, el kies mezo ili elkreskis, kaj proponis prunti al ili du aŭ tri librojn de sinteza karaktero pri tiu materio, por ke ili povu prepari sin kaj ne tro surpriziĝu pri la aferoj vidotaj; la leganto informiĝos pri ili, kiam ambaŭ ilin vidos.

Sed plejmulte li haltis ĉe la persono, por li plej grandglora, de Roberto Mob, al kies scio kaj genio oni ŝuldas la plej miraklan inventaĵon, iam ajn en la jarcentoj de homa menso tiritan al la lumo. Li ne donis precizajn sciigojn pri ĝi, ĉar li ne sentis sin rajtigita anticipi tiujn, kiujn donos al ili la fama saĝulo, al kies interveno ili ŝuldis, ke ilia reviviga procedo ne malbeliĝis per la putrado, kiu minacis ilin ataki, kiam komencis varmiĝi iliaj korpoj. Mob estis scikapabla, ĝin kontraŭbatali heroe kun okulvidebla sukceso.

Inés ne povis malhelpi timtremegon, sciiĝante pri la terura kaj naŭza danĝero, kaj esprimis plenkore sian dankon al tiuj, kiuj ilin savis el ĝi. Ŝi sentis grandan deziron esprimi persone sian dankemon al sinjoro Mob, kiel ŝi esprimis ĝin al lia kunlaboranto.

Dume García, kiun kiel kemiiston altiris la botelotoj por la kontraŭputra traktado, starantaj sur la tablo, scivole legis la diversajn etiketojn, malŝtopis kaj flaris je aliaj. Aŭdante paroli pri putrado li diris:

— Do, ĉi tiuj substancoj kaj ĉi tiuj injektiloj estis

la rimedoj uzitaj por protekti nin kontraŭ la disfalo . . .

— Tiuĵ kaj aliaj, kiujn vi neeble povos antaŭsupozi . . . Kun la rezervo, kiel mi diris, lasi al mia majstro la klarigon de lia mirakla invento, mi povas jam antaŭe diri al vi, ke la rimedo konsistis en la aplikado al vi de antaŭkonserva rimedo ne kemia, sed fizika; ne, ankaŭ ne fizika, sed psika, senkompare pli energia ol antisepsaĵoj kaj kontraŭputraĵoj: la amo.

— La amo!

— Kion vi jen diras?

— Dum en vi ne rekunodiĝis spontanee la vibrado de l' vivo, kiu konservadas la vivajn korpojn de la malkuniĝo okazanta al ili, kiam la ĉeso de l' vibrado okazigas la morton, ni anstataŭigis la nomitan naturan vibradon per potencega artefarita vibrado.

— Sed tiu vibrado . . .? Ĝia natureco?

— Tial ke al vi mankas antaŭscioj pri la maniero estigi ĝin, estos al vi neeble ĝin kompreni, kaj estos eĉ malfacile al vi min kredi; sed ĝis venos oportuna okazo doni al vi pruvojn konvinkantajn, sufiĉu mia parolo, ke ni ekscitis en vi amecajn vibradojn . . .

— Amecajn vibradojn? — demandis mirigite Inés.

— Jes; ni akumulis en vi amon je tiel altaj tensioj, ke personoj vivaj ne estus povintaj ilin elteni.

— Jam mi klarigas al mi ĉion, Juan, — kontraŭvole laŭtiĝis penso de Inés.

— Kion, sinjorino?

— Ne, nenio, nenio, — respondis ŝi, ne opiniante necese komuniki al Rucandio la antaŭokazojn de io,



kio tute ne koncernis lin. — Mi volas diri, certa aktiv-eco interna kaj eksterordinara, kiun ni sentadis, eks-citeco kaj nervozeco kiu ankoraŭ . . .

— Klare, ankoraŭ ne pasis sufiĉe da tempo, ke vi komplete ĝin eliminis. . . . Sed kian kapon mi havas! . . . Kun la plezuro de via konversacio mi forgesis la plej gravan.

Vi sciu: ni kalkulis ke via eldormiĝo prokrastiĝos ankoraŭ je 40 kaj kelke da horoj, dum kiuj la perdo de fluido, per spontanea disradiado, estus ĉesiginta la supertensiojn; sed ĉar la vekiĝo okazis multe pli frue . . . Post unu momento mi ree estos ĉe vi. Mi serĉos la rimedon por senkupidigi vin . . . Mi revenos tuj.

## VI

### Ĉapitro tiel mallonga kiel stranga

Apenaŭ vidis Inés ke Marcial estis trapasinta kaj ferminta la pordon, kiam ŝi diris:

— Kia pezo falis de mia koro! Ja mi diris ke ni ne povas esti respondecaj pri tio; almenaŭ mi . . . Sed tiu Mob! Kion li faris kun ni, tio estas malinda kaj netolerebla misuzo. Tiu vibradoj . . . saturi nin per . . . tio, ne demandinte nian interkonsenton!

— Rimarku, virino, ke li ne povis nin konsulti,

— Do, tiam, li ne devus igi nin vibri en tiu maniero nekonvena, nedeca, neinda al virino tia, kia Dio ŝin volas . . . Kvazaŭ ni estus kunikloj aŭ ranoj!

— Sed, ĉu vi ne aŭdis, ke alie ni putrus?

— Tio estas vero . . . Sed eĉ tiel tiu Mob, jam antaŭ ol mi lin konas, estas al mi terure malsimpatia.

— Rigardu, ni lasu Mob'on kaj okupu nin nur pri ni: pri la senlima feliĉo esti kune kaj denove solaj . . . Mi jam tiom sopiris ke tiu sinjoro foriru!

— Por kio? . . . Por ripeti la antaŭajn farojn? Neniel!

— Kiel malbona vi estas kontraŭ mi! . . . Se vi vidus kiel mi tremvibras . . .

— Nu, mi ne dankas vin pro tio, ĉar ne mi, sed Mob vin vibrigas. Kaj kio eĉ plejmulte kolerigas min: ankaŭ mi vibras terure.

— Do, tiam, virinjo . . .

— Kio?

— Almenaŭ unu kison!

— Unu kison!

— Nur sur la manon, virino, nur sur la manon!

— Ba, ne kalkulu pri ĝi; nun, kiam mi scias, ke ĉio estas faro de tiu malbeninda saĝulo, ne ekzistas perspektivo ke mi cedu . . . Ŝajnus al mi ke estas li, kiu min kisas.

— Kia sensencaĵo!

— Vi viroj estas ĉiam la samaj; vi ne havas sentan delikatecon; ĉio estas por vi egala.

— Inés!

— Ne, vi ne havas kaŭzon ofendiĝi, ĉar evidente estas ke por vi, se ni nur vibras, estas egale, ĉu tion kaŭzas nia korinklino aŭ tiu maldeca amo artefarita, kiun oni injektis al ni perfide kaj kiu nun vibrigas nin.

— Kion vi diras! Pro Dio, virino! Sed ĉu vi ne vidas?

— Ne ekzistas sed'oj validaj nek mi vidas pli ol tion, ke mi eltenos tiujn tensiojn, ĝis pastro aranĝos ĉion. Kaj nur tiam mi povos havi trankvilan konsciencen; sed mia digno ne permesos al mi vibri ĝis mi estos konvinkita ke estas mi, kaj ne tiu diabla elektrokupidismo de l' malbeninda Mob, la kaŭzo de viaj vibradoj; kaj ĝis la disradiado, pri kiu parolis sinjoro Rucandio, nin estos komplete puriginta, ne rememoru pri

mi, ĉar ĉio, kion vi diros kaj faros por persvadi min, estos senutila.

— Nu, se ni bezonos por puriĝi la saman tempon kiel por vekigi, ni ja povos nin amuzi. Tio estas stultega!

En tiu momento revenis Rucandio, akompanate de du aŭtomoj, kiuj portis ambaŭ kune grandan elektran arklampon „Jupitro“ el la speco de tiuj uzataj en la fotogravurejoj, kaj kies forto laŭdire superis 15 000 kandelojn. Li portis du bobenojn da dika metal-fadeno-kondukanto, bone izolita per silko, ŝajne egala al tiu de la ĉeflinioj de elektraĵ metalfadenaĵoj instalataj.

La maŝinistoj metis la lampon en angulon, kaj dum Rucandio aranĝis ĝin por tuja funkcio, li diris al la gefianĉoj:

— Mi pensis ke, se ni atendas ĝis kiam malaltiĝos la tensioj per aŭtomata disradiado, vi estos ĝenataj ankoraŭ multajn horojn; tiam venis al mi la ideo malŝarĝi vin, por ke vi en unu momento akiru normalan staton.

— Dio pagu ĝin al vi, — diris García, tre timigita de la ĵus antaŭa minaco de Inés.

— Sed kiel? . . . Tio estas elektra arklampo.

— Jes, sinjorino.

— Do, mi ne komprenas.

— Vi komprenos en la momento kiam vi vidos . . . t. e. vi komprenos la fakton kaj sentos vin senpezigita de via nervozeco. Rilate la sciencan klarigon: ĝi prezentas la esencon de l' invento de mia majstro; doni

klarigojn pri ĝi mi ne kredas min rajtigita dum lia neĉeesto. Dume, mi povas nur diri al vi, ke ĉi tiuj metafadenoj ne estas la kutimaj kondukiloj el vulgara kupro, kiel tiuj de la ordinaraj linioj, sed kondukiloj psiko-elektraj, kies genian fabrikadon klarigos al vi Don Roberto.

— Sinjorino, bonvolu volvi la ekstremaĵojn de tiu ĉi metafadeno, senigita de izola silko, kvar aŭ kvin fojojn ĉirkaŭ la man-artikon! Tiel! Nun, Don Juan, faru la samon per la alia metafadeno . . . Ĝuste! Tuj mi kontaktigos la liberajn ekstremaĵojn kun la dukurentkondukiloj de l' arklampo. Kaj ne tro timu pro tio, kio okazos.

— Sed, sinjoro Rucandio, ĉu ni estos sekuraj? Ĉu ne ekzistas danĝero?

— Mi garantias ke ne.

— Mi konfesas ke pro tiom da novaĵoj al ni okazantaj mi estas tute alarmita; ne mirigos vin, ke mi deziras scii kion mi estas sentonta.

— Komence, sinjorino, malgrandan skuon; tuj poste vi sentos vin libera de la trotensio, kaj post du aŭ tri minutoj — por tiu celo mi alportis arklumon de grandega potenco — malaperos la kaŭzo de tiuj ne-normalaj vibradoj kiuj . . .

— Kaj Juan same ĉesos vibri, ĉu ne? Ĉar se ne, ni estos atingintaj nenion.

— Nature.

— Ni plu ne parolu, sinjoro Rucandio. Al la ago!

Laŭ sia diro, Marcial kontaktigis la metafadenojn al la fadenfinaĵoj de la lampo, kaj sammomente, kiam

li faris tion, ekflamis la potencega arka lumo, devigante la ĉeestantojn, eĉ en plena tago fermi la okulojn kaj tuj deturni ilin de la arkbrilo.

— Ĉu vi sentis ion?

— En la unua momento fortan, sed tolereblan skuon, — respondis Juan.

— Ankaŭ mi, — diris Inés; — sed nun mi jam nenion sentas. Tio devas esti la efiko de la ekstrakurento ĉe la fermo de la cirkuito, kiam la kurento ekfluis.

— Efektive, sinjorino; vi klare vidis . . . Nature: mi ne rememoris ke vi estas elektro-inĝenierino. Mi esperas ke baldaŭ vi rimarkos la malplipremiĝon produktitan de la kurento vin malŝarĝanta.

— Sed ĉio ĉi estas por mi nekomprenebla.

— Kaj por mi . . . Ĉar laŭvide, tiun elektron lumantan en la arkklampo produktis Inés kaj mi.

— Ne tute; ĉar kio efektive estas elektro en la arklumo, estas io alia, kiam ĝi eliĝas el vi; io alia kio transformiĝas en elektron dank' al psiĉo-elektra metalfadeno; ĉar tiun fluidon vi produktus nur en la kazo, se vi laborus mem en la Mob-aparato, kiun mi ne alportis; tiu fluido eliĝas el viaj korpoj, en kiujn ĝin injektis mia majstro en la pasintaj tagoj.

— Nu, jen beleta afero, — diris Inés malbonhumore, nekomprenite de Rucandio; la spontaneeco de la protesto igis ŝin paroli hispane.

— Jam mi komencas rimarki la efekton, kium vi anoncis al mi. Kaj vi?

— Kaj mi sentas min malpli nervoza, malpli eks-citata.

— Mi ja diris al vi; la samo okazas al vi kiel al akumulato, kiam ĝi nutras arklumon; laŭ tio, kiel funkcias la lasta, la unua perdas tension . . . Vi perdas ĝin tre rapide. Rigardu, rigardu, en kia rapideco paliĝas la lumo de la karboj; tio estas la plej bona pruvo, ke ĉiujfoje restas en vi malpli da troa elek-tro-kupidiismo.

— Jam ĝi estingiĝas.

— Ni gratulu nin. Sed diru: ĉu ni restis jam komplete puraj de tio?

— Absolute, Doña Inés.

Kiam ŝi aŭdis tion, ŝi ekspiris, trankviligite esti pasinta la riskon, ke okazos novaj am-akcidentoj; tiel ŝi nomis la okazaĵon ĉe ilia vekigo, kiu estis tiom afliktinta ŝin. Kiam ŝi rememoris pri ĝi, revigliĝis ŝia deziro ripari ĝin plejeble baldaŭ per la sola formo al ŝi konata, kaj tial ŝi diris:

— Sinjoro Rucandio! Mi deziras peti de vi tre specialan favoron.

— Kalkulu pri ĝi, se ĝi estas laŭ mia povo.

— Do . . . vi . . . bonvolu havi la afablecon konduki nin tuj en preĝejon.

— Sinjorino, en la urboj de nia moderna mondo ne ekzistas temploj.

— Kiel!

— Ni superĝuantoj ne uzas ilin.

— Ne? . . . Sed kiel? . . . Neniu?

— Ne, sinjorino.

— Tiam, vi ne povos venigi al ni pastron. Ni bezonas iun kun grandega urĝeco.

— Mi kredas ke ne . . . Sed eble tamen mi povus . . . Ŝajnas al mi, ke mi aŭdis, ke inter la parioj estas iuj mense-perturbitoj nomiĝantaj pastroj. Laŭdire ili konsolas la popolaĉon en ĝia mizero per promesoj pri alia pli bona vivo ol tiu kiun ili ĉi tie suferadas. Ili malpermesas ekposedi fremdajon, malutili al la similuloj kaj aliajn tiuspecajn stultaĵojn; sed ĉar, fine, tiuj predikadoj favoras nin, la regantan klason, kaj ĉar nenial ni devas obei ilin, oni ne baras al tiuj elektilibrigintoj la disvastigon de tiel strangaj maksimumoj, nek en iliaj kavoj la ekzercadon de kulto, kiun mi ne konas.

— Sinjoro Rucandio, sinjoro Rucandio, aŭskultante vin mi sentas grandan malĝojon, venas al mi pensoj pri tre malĝojaj aferoj; sed, mi ne scias kial, vi ŝajnas al mi bona, malgraŭ ĉio, kaj mi kredas ke vi konsentos irigi nin tien, kie ni povos renkonti iun el tiuj pastroj.

— Ne, tio estas neebla; la eniro de fremduloj en la subterejojn estas malpermesita. Dum ne revenos sinjoro Mob por rajtigi min . . .

— Sinjoro, mi dankos vin, se vi faros laŭ via eblo por komplezi Inés'on; mi certigas vin, ke la afero ne estas kaprico.

— Kion mi povos fari, dezirante ne nei al la sinjorino la unuan aferon, pri kiu ŝi petas min, tio estas vidi, ĉu mi renkontos iun el tiuj viroj por venigi lin ĉi tien.

— Dankon, dankon, Don Marcial!



— Sed ĉu vi ne volas unue matenmanĝi? Vi nenion prenis de post via vekiĝo.

— Ne ne, sinjoro Rucandio; la alia afero estas la ĉefa.

— Laŭ via deziro, sinjorino; mi iros tuj kaj klopodos komplezi vin laŭeble senprokraste.

## VII

### Sekreta geedziĝo kaj nova persono

Ne nur ne estis malfacile al Rucandio trovi en la kavoj parian pastron, sed eĉ hispanan li trovis, kio, laŭ lia supozo, estos agrabla al Inés; kontraŭe al tio, kion opiniis en sia nesciado la superpensantoj, estis multe da pastroj inter la parioj.

Tial, tuj kiam li, post eliro el la lifto, per kiu li mal-supreniĝis en la subterejojn, sciigis al la unue renkontita pario, kion li serĉas, tiu kondukis lin al iu mizera ejaĉo loĝata de maljunulo, speco de episkopo aŭ patriarko, kies ruina loĝejo ne estis malhelpo al la respekto, kiun manifestis ĉiuj ĉi malfeliĉuloj al lia aŭtoritateco.

Sciigite de Rucandio, ke la ĵus-reviviĝintoj ĉe sia vekigo petis pastron, la patriarko rapidis voki *i b e r i o l o n*, kiu sur sia modestega vesto portis nur ruĝan krucon sur la brusto, kiel distingilon de sia pastreco.

Granda estis la surprizo de Marcial, kiam li ekkonis, ke tiu estis Ramón Cartoya, superpensanto eksterordinare riĉa, kies kunlernanto en la edukejo de Guernica li estis en sia junaĝo kaj kiun li poste perdis el siaj okuloj, ĝis li faris en lia akompano la vojaĝon

de Iberiolo al Mondopolo, por ekokupi la postenon de vicedirektoro de l' Universal-muzeo.

Cartoya — tio estis la nomo de l' eks-superpensanto, kiun li nun trovis kiel parian pastron — en la epoko de l' citita vojaĝo, antaŭ sep aŭ ok jaroj, estis vera homo de l' mondo kaj krome distinginda arkitekto. En Mondopolo li tiam transprenis la konstruadon de l' Granda Palaco de la Tutmonda Konsilantaro; lia projekto estis rekompencita per la unua premio en la konkurso aranĝita por anstataŭigi la malnovan palacon. Kvankam al iu ajn arkitekto de la jarcento XX ĝi ŝajnus belega, ĝin konsideris jam malvastega kaj mizera la Plejmoŝtaj (ilia oficiala titolo) Konsilantoj-Reprezentantoj de la federacioj konfederaciigintaj. En ĝi ili unu fojon ĉiujare okazigas kunsidojn dum unu monato, por decidi pri la aktualaj demandoj internaciaj.

La du amikoj unue firmigis dum la vojaĝo sian amikecon; poste dum sia vivado en Mondopolo ili religis kaj plifirmigis tiun amikecon el la junaĝo per ofta kaj kora interrilatado. Abrupte ĝi estis interrompata per la mistera malapero de Cartoya, kiu okazis antaŭ kvar jaroj, ĝuste kiam oni inaŭguris kun ĉia soleneco la nomitan palacon.

Tiutempe oni multe skribis pri la malapero de la genia arkitekto, kiu ne ĉeestis la feston nek profitis la triumfon atingitan per la starigo de la monumenta konstruaĵo, unua kaj unika en la mondo pro sia beleco, imponeco kaj eleganta arkitektura koncepto; sed Cartoya ne plu donis sciigon pri sia persono, kvazaŭ la tero englutis lin.

Oni supozis ke li dronis en la lago; oni celebris sciencan rekviemon je lia honoro: la solan rekviemon uzatan inter la superpensantoj; lia nomo estis enskribata per oraj literoj super la portalo de l' palaco, kaj post mallonga tempo neniu jam parolis pri li. Antaŭsciante tion, oni povas imagi, kiom granda estis la surprizo de Rucandio renkonti tute neatendite la bonan amikon, kies perdon li bedaŭris eksterordinare.

— Vi . . . vi, ĉi tie . . . kaj ni ĉiuj kredis vin mortinta . . . De kiam?

— De post la inaŭgura tago de l' Palaco de la Plejmoŝta Konsilantaro.

— Sed, kiel estas ebla tio?

— Mi jam klarigos ĝin al vi, kvankam ne sciante, ĉu vi komprenos min.

— Sed ne estas eble, ke vi fariĝis pario!

— Nu, tamen mi estas tia; ne laŭ naskiĝo, sed ja laŭ deziro.

— Sed, Ramón, vi ne povis ĉesi esti superpensanto por fali en tian malŝategindan staton.

— Efektive; ne nur mi ne ĉesis esti, sed nun mi estas pli superpensanta ol antaŭe; kio, mi jam ne estas, tio estas superĝuanto laŭ via stilo, laŭ mia antaŭa maniero.

— Kiom, kiom mi ĝojas vin renkonti! . . . Ĉar estas necese, ke vi reakiru vian rangon, ke vi revenu inter nin al la loko, kiu laŭrajte apartenas al vi, al la mondo tie supre.

— Amiko mia, estas superflue pensi pri tio; en tiu

mondo, kie vi trovas min kaj kiun vi nomas mondo malŝateginda, mi serĉas la vojon al alia, kiu estas pli alta, pli supera, multe pli supera ol la via.

— Mi ne komprenas . . .

— Tio ne mirigas min.

— Cartoya, — diris la patriarko, interrompante la dialogon de la du malnovaj amikoj, — du strangaj estaĵoj, kiuj laŭŝajne estis viktimoj de nekredebla akcidento, sed kiujn, ili estu kiuj ajn, oni devas atenti, bezonegas pastron. Ĉar ili estas iberioloj, mi memoris pri vi.

— Sed do . . . Ĉu ĉi tiu sinjoro estas la pastro? . . . Vi, vi paria pastro!? Neeble! . . . Homo kun via inteligenteco, via klereco, via pozicio ne povas esti falinta tiel profunden.

— Jes, Marcial, mi falis . . . Sed nun, kiel mia patro diris, la plej urĝa afero estas obei la alvokon de tiuj estaĵoj.

— Iru, filo mia, iru kun sinjoro Rucandio!

— Ha! Sed ĉu estas vi, kiu venis min serĉi?

— Vin? Ne: pastron, iberiolon laŭeble.

— Estas bona ago, kiun vi faras, eble eĉ nesciante.

— Iru, iru, fratoj.

— Frato! — ekkriis Marcial, ĝenate ke tiel lin alnomis malŝatata pario kaj rimarkigante per la tono de l' ekkrio kaj per la rigardo ĵetita al la patriarko la ĝenatecon de sia ofendita fiero.

— Rucandio, ne estu ofendita, — diris Cartoya; — la ĝeno kaŭzata al vi de tiu nomo „frato“, kiun donis al vi mia patro kaj kiun doni al la plej mal-

noblega el la parioj ni opinias honoro, tuj malaperos ĉe la ekscio, ke tiu, kiu donis ĝin al vi, en via mondo supre nomiĝis Kraig Hobbson.

— Kraig Hobbson! La eminenta fizikisto, la saĝa radiologo! . . . Pardonu, pardonu mian impertinentecon, s-ro Hobbson. Kredu . . . Sed kiu povus supozi?

— Ke volonte iu forlasus pro ĉi tiu mallumejo tiujn elstarajn lokojn, kiujn via bonvolemo aljuĝis al mi?

— Ne mia bonvolemo; viaj laŭleĝaj titoloj.

— Ni lasu tion. Mi sole aspiras fariĝi ĉi tie elstara per homamo . . . Sed iru, iru. Tiuj bedaŭrindaj gejunuloj atendas la patron Cartoya; tio estas nun urĝa.

Post kelkaj minutoj, kiam Rucandio kaj la pastro supreniris per la lifto, Cartoya aŭdis sian akompananton, kiu diris kun surpriza miro:

— Cartoya! Hobbson!

— Kaj Mansfeld kaj Souvigni kaj Alvar . . . kaj aliaj diversaj korifeoj de la scienco, eble jam forgesitaj en la supra mondo, certe tre malscia pri tio, ke preskaŭ la duono de la pariaj pastroj estas antaŭaj superĝuantoj, kiuj preferas nian nunan vivon tie malsupre al nia vivo antaŭa.

— Sed por kia celo?

— Por helpi tiujn malfeliĉulojn portadi la ŝarĝon de ilia vivo.

— Tio estas absurda, absurda.

— Tiel ŝajnis antaŭe al ni.

Rucandio ne respondis, ĉar li nur ripetis konstante, kvazaŭ parolante al si mem:

— Mansfeld, Hobbson, Alvar, Cartoya . . . Kia surprizo, kia surprizo!

\*

Tuj kiam Rucandio kaj la pastro venis en la ĉambron de la Bilbaanoj, Inés deklaris, ke Juan kaj ŝi bezonas resti solaj kun la pastro; post tiu indiko diskrete sin retiris Rucandio dirante ke li atendas en la apuda ĉambro, ĉar post ilia interparolo kun Cartoya li devos lin akompani al la kelejoj; la komunumaj ordonoj de Mondopolo ne permesas, ke sen rajtigo iu pario restas ekstere, se ne garantias por li superpensanto kiu akompanas kaj gardas lin. La libera irado en la urbo estis malpermesita al homoj de tiu kasto.

Aŭdante tion, Juan kaj Inés montris sur siaj vizaĝoj tre videblan surprizon, kaj kiam Rucandio estis elironta, Cartoya retenis lin dirante:

— Marcial, mi devas fari al vi tre varman peton.

— Diru!

— Se antaŭ la fino de mia kunesto kun ĉi tiuj gesinjoroj kaj antaŭ via reveno por konduki min mal-supren vi vidus iun aŭ parolos kun iu, ne diru vorton pri mi nek pri nia renkontiĝo nek pri tio, ke mi vivas.

— Sed . . .

— Estas peto kiun mi faras al vi en la nomo de nia malnova amikeco.

— Sufiĉas, Ramón; mi nenion diros — respondis Marcial, samtempe elirante.

\*

Kun surprizego Cartoya aŭskultis la rakonton, nekredeblan se la protagonistoj mem ne farus ĝin al li, pri tiu kolapso de okdek jarcentoj. Kortuŝite li aŭskultis iliajn lamentojn pri la nekonscia peko, kiun ili faris ĉe la vekigo, kaj ilian vivan deziron reĝustigi ĝin per tuja geedziĝo, kiu krome lasus ilin trankvilaj pri eventuala risko de novaj akcidentoj, se denove, inside kiel antaŭe, oni metus ilin en staton de supertensio. Tio priokupis multe Inés'on kaj ne tiom Juan'on, kiu estis malpli timema. Tamen li ankaŭ deziris, same kiel lia fianĉino, baldaŭ ĉion reguligi, anticipante la geedziĝon prokrastitan je ok tagoj; ne, ne estas ĝuste tie: ne prokrasti plu la jam dum okdek jarcentoj prokrastitan, jen kion ili volis diri.

Cartoya, konvinkita pri la urĝeco de la geedzigo kaj kontraŭ ĵuro de ambaŭ, ke ĉe la eksvenado jam estis publikigita ilia lasta geedziĝa anonco, sen tio ke iu kontraŭprezentis malhelpan kaŭzon, decidis geedzigi ilin tiom pli rajte, ĉar la ĵuro mem estis nenecesa, tial ke, eĉ supoze ke iu el ili estis edziĝinta jam en la jarcento XX, ne pre li aŭ ŝi estas vidva nun en la centa. Do, duonhoron post la komenco de la interparolo Cartoya laŭte citis al ili la epistolon de Sankta Paŭlo, kiun li sciis parkere, donis al ili la benon kaj geedzigis ilin tute kaj komplete. Post tio Inés respiris trankvile, jam ne timante sian karan Juan'on.

\*



De multaj jarcentoj estis nekonataj en la mondo de la superpensantoj ne nur la geedziĝoj kanonikaj, sed eĉ la civilaj. Por unuigi sin, kiam kaj je kiu ajn tempo plaĉis al ili, la gesuperĝuantoj ne opiniis necesaj aliajn formalajojn ol reciprokan interkonsenton. Rezultis kiel logika konsekvenco de tia pens- kaj vivmaniero, ke en la supera mondo ne ekzistas geedziĝoj. Nekutima estis la plidaŭrigo de la patrineco post la nasko, kaj tiom malpli tiu de la patreco. Al neniu estis grave scii, kies filo li estas nek kio fariĝis el liaj samfamilianoj. Sed pri tio oni ankoraŭ parolos. Ke oni nun aludis tion, okazis nur por klarigi, kial Cartoya, antaŭ ol voki Marcial'on por esti rekondukata de li en la kavojn, diris al la ĵus-geedziĝintoj, ĉirkaŭbrakinte ilin:

— Gefiloj miaj, atendas vin grandaj kaj malĝojigaj surprizoj en ĉi tiu jarcento malfeliĉa, en kiun vi eniras. Mi amas vin, ne nur ĉar vi estas miaj gefratoj, sed ankaŭ ĉar mi vidas ke vi estas bonaj; tial mi deziras laŭeble liberigi vin de la doloroj, kiujn vi suferus, se la supervivantoj konus vian moralan similecon kun ni parioj.

— Sed tiuj malfeliĉuloj pri kiuj vi parolas . . . Kiaj estas iliaj suferoj?

— Hodiaŭ ne. Hodiaŭ mi ne deziras tion diri al vi, filino mia. Hodiaŭ mi ne volas ĝeni la merititan ĝojon kiun devas havigi al vi via geedziĝo, kaj restas sufiĉa tempo por sciigi vin pri la terura tragedio, pri kiu hodiaŭ mi deziras silenti kaj kiu torturas la pli grandan kaj la pli bonan parton de la homaro.

— Sed tio, kion vi diras al ni, interesas nin; ni dezirus ekscii . . .

— Jes, patro, jes. Juan estas prava, mi deziregas . . .

— Atendu, atendu . . . Ja vi scios, sed ne hodiaŭ. Hodiaŭ amu vin: amu unu la alian, sen tio ke iu doloro malheligas vian feliĉon. Pli poste — ĉiam estos ankoraŭ frue — vi scios ĉion. Sed mi deflankiĝis de la temo, pri kiu mi volis paroli al vi komence.

Por via feliĉo, pri kiu mi dume devas zorgi, mi opinias necese konsili al vi: evitu, ke tiuj homoj — tiuj superpensantoj, kiel ili sin nomas, kvankam ilia pensado ĉiam rampas tra la ŝlimo — vidu ĉe vi ion, kion oni povus interpreti kiel cenzuron pri la profunda mizero de ilia komfortega vivmaniero, pri ilia korupteco, malvarma perverseco kaj morala marĉo, en kiuj ili vivas.

— Sed en kia mondo ni vekigiĝis?

— En mondo multe pli malbona ol vi povas imagi. En malpura marĉo de bestecaj ĝuoj, kie vi trovos nek la bonon nek la devon. Sed pensu ke vi venis ĉi tien laŭ la volo de la Providenco. Se estas puno, akceptu ĝin; se estas alia afero, estu pretaj servi por ĝia celo.

— Jes, jes.

— Nu do: la unua kion vi devas fari, eĉ se tio vin ĝenegos, estas silenti pri tio kio inter ni okazis; kaŝi ke vi estas geedzoj, unuigitaj per vera edzeco . . .

— Sed tiam ni ne povos vivi kiel geedzoj; ni devos nin separi.

— Ne, sinjoro García; unue vi povos vivi kiel geedzoj, ĉar vi estas, kaj vi devas vivi kiel tiaj; due . . .

— Sed mi mortos pro honto, — diris Inés, interrompante Cartoya'n, — pro honto vivi tiamaniere antaŭ tiuj kiuj ne scias, ke Juan estas mia edzo.

— La juĝo de la homoj? . . . De tiuj homoj! Ne pensu pri ĝi!

— Sed . . .

— Vi juĝos, kion por vi kaj por mi povas valori tia prijuĝo, kiam mi diras al vi, ke nenium surprizos vidi vin kiel geedzojn, sen alia titolo ol via reciproka deziro; sed se ili ekscios ke vi kredis necese por tio, kunigi vin per la benita ligilo de la edzeco, ili malŝatos vin kiel malriĉajn en spirito, neindajn vivadi inter homoj klerigitaj per supera kulturo, liberaj de konscienciproĉoj, de antaŭjuĝoj rancaj kaj infanaj, propraj nur al parioj. KREDU MIN, KREDU MIN, kaj sekvu mian konsilon. Kiam prezentiĝos la okazo, ne diru: Ni estas geedzigitaj, sed: ni estas amikumitaj. Ne opiniu tion skandala; tio estas la esprimo adoptita de la superĝuantoj, kiuj kuniĝas kaj disiĝas nur dum iom pli da tempo, sed same tiel, kiel la bestoj; ĝi estas frazo kiun, ne ruĝiĝante, elparolas la plej fieraj sinjorinoj de la plej distinginda socia klaso.

— Kia honto!

— La sola baro por la kaŝplano, kiun mi desegnas al vi, estas ke Rucandio scias pri nia intervidiĝo; estas verŝajne ke, se viaj rilatoj kun malŝatinda pario kia mi fariĝus publikaj, tio vin malutilus. Sed mi intencas utiligi mian bonan amikecon kun li el pasintaj tempoj por atingi, ke li silentu pri ĉi tiu interparolo . . . Kiu scias! Ŝajnas al mi ke inter la malbonularo de tiu ĉi

socio li ne estas la plej malbona. Mi iros voki lin. Ha! Antaŭ li atentu bone, ne montri al mi eĉ la plej malgrandan respektosignon!

— Tamen lasu nin fari ĝin antaŭe, — dirante tion Juan ekgenuis antaŭ Cartoya, kaj sekvante lian ekzemplon parolis Inés:

— Jes, jes! Permesu al ni, ke ni kisu vian manon.

— Amu vin reciproke, infanoj miaj; amu vin multe . . . De centoj da jaroj viroj kaj virinoj povas ami unu la alian per amo de l' animo nur transe, en la profundaĵoj de niaj katakomboj. Vi estas la unua paro, kiu de jarcentoj povas ami unu la alian per la nobla amo de kristanaj kreitoj, ne per amo de bestoj, en la lumo de la suno. Ĝuu tian grandan feliĉon, baratan al viaj gefratoj. Amu vin, amu vin: amu vin reciproke hodiaŭ, pensante nur pri via amo, ĝis kiam venos la tago en kiu, krom la dia ordono „Amu unu la alian!“, kies plenumon mi hodiaŭ ordonas al vi, vi memoru ke ekzistas alia: „Amu unuj la aliajn!“ Adiaŭ! Jam ni ne povas daŭrigi la interparolon pri ĉi tiuj aferoj, ĉar altirus la atenton, se mi tro longe ne avisus Rucandio'n.

— Adiaŭ, adiaŭ!

— Dankon, dankon . . .

\*

Marcial, kiu dum la tempo de l' atendo ne ĉesis pensi pri la absurdeco, ke homo de la pozicio kaj de l' merito de Cartoya vivas subtere kaj for de la siaj (la potenculoj kaj saĝuloj), havis subitan ideon ĉe la eniro

en la ĉambron kaj opiniis ĝin tutsukcesa, por eligi lin el lia priplorinda ekzilo.

Altrudiĝis al li tiu ideo, kiam li, traitante la flankan pordon al grandega fenestraro, vidis tra ĝi en la malproksimeco la grandiozan kupolon diafanan de l' Palaco de la Tutmonda Konsilantaro, sur kiu levigas la plej gracia kaj aŭdaca turo, okcent metrojn alta, kiu ekzistas en la mondo. Tiu turo estas utiligata kiel kolono por alligi aviadilojn kaj aerŝipojn, kiuj el la plej malproksimaj landoj de la Tero transportas al Mondopolo la reprezentantojn de la federacioj en la kunven-tempoj de la Plejmoŝta Konsilantaro. Tiel neatendite kaj rapide kreiĝis la plano en la menso de Marcial antaŭ la belega konstruaĵo, ke li, ne parolante unu vorton, iris rekte al la fenestrego kaj malfermis ĝiajn du partojn, por ke la palaco pli bone videbliĝu. Returnante sin al Cartoya kaj etendante la brakon por montri tien, li diris per voĉo vibranta pro entuziasmo:

— Ramón, rigardu ĉi tiun mirindaĵon, kiu estas via verko, kaj poste diru al mi, ĉu la homo, naskinta ĝin el sia inteligenteco, havas la rajton vivi enfermita en loko, kie neniam li vidas ĝin, ĉu li rajtas forteni sin de sia gloraĵo.

— Ekzistas pli puraj gloraĵoj ol ĉi tiu.

— Neeble . . . Sed krome, se en vi la sento pri via rajta fiereco kaj la amo al via scienco kaj via arto estas tiel sekiĝintaj, respondu al mi: Ĉu vi kredas esti prava, rifuzante al la mondo aliajn mirindaĵojn kia estas ĉi tiu, kaj, kiu scias, eĉ pli belajn, kiujn kapablas krei via inteligenteco?

— Mi pensas pri aliaj pli malpereemaj; ne el fero, ŝtono kaj vitro kiel ĉi-jena kiu, se ne post dek, mortos post dudek jarcentoj.

— Pli malpereemaj? Kiaj?

— Vi ne komprenos min . . . Ne estu ofendita. Parolante pri la malkapableco min kompreni, mi ne aludas vian inteligentecon, sed viajn kutimojn kaj vian koron, — respondis la pastro komprenante, ke estus senefike paroli al la saĝulo pri la liberiĝo de la parioj, kiu estis la kolosa, racie neeblea entrepreno, pri kiu li pensis.

— Estas neeble, Ramón, ke vi daŭrigu resti en tiuj subterejoj. Estas necese ke vi revenu al ni, al la viaj, ke vi forskuu tiun frenezecon kiu irigis vin al ili.

— Imagu, — daŭrigis Marcia! turnante sin al Inés kaj Juan, — ke ĉi tiu sinjoro estas la plej fama arkitekto de l' mondo, la glorplena aŭtoro de tiu mirinda kaj monumenta palaco, de tiu turo fortika kvazaŭ forĝita de ciklopoj, delikata kvazaŭ puntaĵo teksita de feinoj . . . Kaj kiu tion faris kaj kiu povus, se li volus, plenigi la mondon per aliaj mirindaĵoj, forkuris el ĝi por entombigi sin en . . .

— Kiel? Vi estas la aŭtoro? . . .

— Vi faris tion?

Tiel ekkriis Inés kaj Juan, kune kaj tuj valortaksante la heroan ecaron de tiu homo, la kuraĝon de lia abnegacio. Tiel klare ili lasis videbliĝi sian admiran respekton, ke Cartoya, legante ĝin en la okuloj de ambaŭ, direktis al ili intensan rigardon kun la celo rememorigi ilin pri siaj antaŭaj avertoj, kaj li klopodis

fari la rigardon pli esprimova per la sekvantaj vortoj:

— Ĉar la ideoj de la mondo, en kiu vi ĉiuj vivas, ne povas respekti miajn ag-motivojn, mi klarigas bone al mi la miron, kiun al vi tri kaŭzas mia konduto.

Komprenante la kaŝ-aludon, la ĵus-geedziĝintoj, intersanĝante komprenemajn rigardojn kun la pastro, respondis:

— Sinjoro Rucandio estas milfoje prava.

— Kiu faris tiun mirindaĵon, ne havas rajton . . .

— Gesinjoroj, mi rekonas la intencon, kiu direktas viajn vortojn; sed mi kredas superflue daŭrigi diskuton kiu, mi certigas vin pri tio, ne povos konduki al la celo, kiun vi proponas al vi. Kiam vi volos, Marcial . . . Cetere, Marcial! mi forgesis atentigi vin pri tio, ke ĉi tiuj gesinjoroj estas amikumitaĵ.

— Tre bone.

Inés, tute ruĝiĝante kiam ŝi aŭdis Cartoya'n, en sia animo dankis al li, ke li ŝparis al ili deklaron, kiun fari estus al ŝi tre penige, malgraŭ la diroj de Cartoya pri la larĝa konscienco de la superĝuantoj.

Foriris Rucandio kaj Cartoya, kaj adiaŭante en la subterejoj kaj manpremante la alian, diris Rucandio:

— KREDU MIN: mi iras kun la sama doloro, kvazaŭ mi vidus vin memmortigita.

— Vive mi dankas vian intereson, eĉ se pro kaŭzoj facile klarigeblaj ĝi estas erara, — kaj vidante brili la okulojn de Marcial, kvazaŭ la emocio de l' adiaŭo ilin malsekigus, li pensis ke eble en la animfundo de lia

malnova amiko kaŝiĝas io, malofte trovebla en la koroj de la superĝuantoj, kaj li diris:

— Ĉu vi sentas scivolon, kial mi venis ĉi tien kaj kial mi restas?

— Scivolon? Ne: vivegan intereson!

— Se ĝi ne foriĝos aŭ vi forgesos ĝin, venu malsupren iunokte je la 10-a, la horo kiam mi finas miajn devojn, kaj se vi deziras aŭskulti mian historion, mi rakontos ĝin.

— Mi venos malsupren, mi venos. Estu certa!

— Adiaŭ, kaj dankon pro via intereso.

— Kia terura dramo devas esti tiu historio, — diris Marcial, vidante kiel Cartoya malproksimiĝis tra la koridoro de la subterejo.

— Kiu scias, kiu scias! — murmuris la lasta.



## VIII

### D-ro Mob nomas du subhelpantojn por Rucandio

La ĵus-geedziĝintoj vivis ankoraŭ malmulte da tempo en la 100-a jarcento; tial ili pensis kaj sentis kiel estaĵoj el la 20-a; iliaj organismoj, nedaŭre aliigitaj de l' troo da M o b - k u p i d i s m o, revenis en siajn normalajn statojn tuj kiam lia kunhelpanto ilin malŝargis, anstataŭigante iliajn troajn kupidajn afekciojn per amperoj kaj voltoj transformitaj en la lumon de l' arklampo. Same li estus povinta transformi ilin en forton por funkciigi la lifton inter la Universalmuzeo kaj la katakomboj. El tio rezultas ke, post la elimino de l' kaŭzoj de la pasia nenormaleco, neniel diferenciĝis la „miela monato“ de Juan kaj Inés de iu alia mielmonato en la 20-a jarcento. Pro tio ĝi ne meritas la penon halti ĉe ĝi. Same ne gravas ĉio alia antaŭ la prezentado de la reviviĝintoj al D-ro Mob. Eble estas menciinda nur tre supraĵe kaj nur kiel epizodo la unua manĝo, kiun ili faris en societo de Rucandio.

Estas neeble doni imagon pri sibaritismo tiel eksterordinare subtiligita kiel tiu, kiun atingis dum la jarcentoj la kuirarta, kreinta multecon da manĝospecoj kaj nutraĵoj: sukplenaĵoj, subtilige delikataj aliaj. La

progreso en la bredado de la manĝeblaj bestoj estis aromiginta la viandojn per ĉia speco de eksterordinaraj spicaĵoj, la ĝarden- kaj fiŝkulturoj ŝanĝiĝis en profundajn sciencojn, la sukeraĵista arto supreniĝis ĝis la altaj regionoj de la transcenda kemio. Ĉio ĉi rezultigis ke la ĵusaj geedzoj nenion konis, kion ili manĝis; ili nur konstatis ke kompare kun tio estis aĉaĵoj la menuoj por 300 kaj pli da pesetoj po persono, faritaj de la plej famaj kuirmajstroj en la jarcento XX.

Se tiuj, kiuj ĝin manĝis, ne konis la manĝaĵon, estus vana la intenco komprenigi ĝin al la „gourmands“ kiuj legas ĉi tiun libron. Ili devos kontentiĝi je tio, ke estas lasata plena libereco al iliaj palatoj elpensi gustojn, kiajn la plej supersaŭmanta fantazio gastronomia nur estas kapabla imagi. Tamen estas certe, ke ĝi tute ne atingus la realecon. Por la superĝuantoj de l' 100-a jarcento la ĉefprincipoj de la vivo estas lukso, volupto kaj manĝado. La lastan ili kontentigas laŭ kvalito kaj kvanto, manĝante „nur“ dek aŭ dekdu pladaĵojn dum ĉiu manĝo. Por esti kapablaj fari tion, ili englutas kun ĉiu manĝaĵo kapsulon preparitan el la kemiaj reagaĵoj necesaj por rapidigi la digestadon de la substancoj konsistigantaj la koncernan manĝaĵon. La kapsulo efikas, ke la manĝaĵo ne restas pli ol dek minutojn en la stomako. Tiamaniere klariĝas la kapableco de tiuj homoj, internigi dum unu manĝo Pentagruelajn kvantojn da nutraĵoj, kiujn la plej glutemaj manĝeguloj de l' 20-a jarcento ne kapablas manĝi en tri aŭ kvar.

Jam oni vidas ke tio estas progreso rilate al la romanaj metodoj el la tempo de Lukulo. Inter la naŭzaj

„vomitória“ (vomejoj) de tiu epoko, kiuj permesis sin plenŝtopi kelkajn sinsekvajn fojojn, kaj ĉi tiu scienca rimedo ĝui la plensatecon sen la tropleneco kaj antaŭ ĉio sen la elvomado, ekzistas abismo.

Sed se oni ne adoptus antaŭgardajn rimedojn, tia multkvanta nutrado krome estus malutila al la sano, ĉar ĝi kaŭzus dikiĝon kaj misdigestadon; tial oni enigis ĉe la kombino de la nomitaj kapsuloj substancojn, kiuj absorbas la plimulton de la nutraj enhavaĵoj en la manĝaĵoj; ili permesas ke nur kvarono aŭ kvinono de tiuj nutraj substancoj estu asimilataj de la organismo.

El tio rezultas la neceso de du kuirestroj en ĉiu domo, unu propra kuirestro, kaj alia kemia ĉefo, al kiu la unua, kun sufiĉa anticipo, transdonas liston de la manĝaĵoj, el kiuj konsistas ĉiu manĝo, por ke la alia, dum la kuireja ĉefo preparas la manĝaĵojn, preparu la taŭgajn kapsulojn por la digestado de ĉiu el ili.

Laste — tio estas eksterordinare interesa — la intermanĝoj kaj la desertoj, veraj mirindaĵoj de la kemiaj sukeraĵista kaj frukta kulturoj, evoluis ĝis ili ŝanĝiĝis en manĝaĵojn eminente taŭgajn por la cerbo, dank' al superrego en ili de grandaj kvantoj da fosforo. Ĉi tiu, laŭscie, esence estas la plej bona nutraĵo de l' inteligento. Dank' al tio ĉiu superĝuanto englutas ĉiutage en tiuj superfosforaj manĝaĵoj la fosforon enhavatan en tri aŭ kvar dekduoj da ovo.

Pri la sukcesoj de ĉi tiu reĝimo gastro-cerba Marcial donis detalojn interesege al siaj invititoj, komprenigante al ili, kiel ĝi determinis la nivelon de la inteligentoj: tiugrade, ke la plej mallerta el la superpens-

antoj de 1' jaro 10 000 estus kredata tre talentplena homo, se li estus vivinta en pasintaj jarcentoj.

— Ĉi tiu eltrovo, — li diris, servprezente al Inés pecon da torto konsistanta el treege delikata biskvito, — estis tio, kio plejmulte antaŭenigis la mondon, ĉar al ĝi ni ŝuldas la plej grandan parton de niaj inventoj. Ekzemple, la biskvito, kiun vi nun estas manĝanta, mirige plifortigas la memoron. Tiuj vinberoj notinde ekscitas la inventkapablojn kaj estas tre uzataj de tiuj, kiuj sin dediĉas al la inĝeniera arto. La marmelado, kiun nun prenas sinjoro García, eŝikas rekte je la diskutkapabloj de niaj filozofoj, sugestante al ili la plej profundajn silogismojn; tiuj, kiuj enabismigas en la subtilaĵojn de la alta matematiko, preferas ĉi tiujn konfititajn fruktosukojn.

Ni ŝuldas al tiuj inteligentproduktaj manĝaĵoj ne nur niajn progresojn en la scienco, sed same la politikan hegemonion, la absolutan kaj nediskuteblan superregon, kiun malgraŭ sia malmultnombro ekzercas nia kasto de elektitoj super la sennombraj aroj da parioj, kiuj formas homaron malsuperan al la nia, specon de *pseudokreaĵoj subraciaj*.

— En kio konsistas tiu malsupereco? — demandis Juan kun viveca esprimo alarma por Inés, ĉar ŝia kono de 1' karaktero de ŝia edzo rimarkigis al ŝi, ke la demando sonis pli laŭ protesto ol laŭ demando.

— Nu, tre simple: En la inteligenteco . . . Tial ke neniam ni permesas al ili provi ĉi tiujn manĝaĵojn kaj ne konsentas ilian instruadon, ili estas evidente malsupera homaro.

— Sed tio estas . . . — Juan estis dironta „tio estas malinda misuzo de l' forto“, sed piedpremo kaj eksterordinare esprimplena rigardo de lia edzino igis lin silenta kaj embarasita, kiel li turnu la frazon komencitan por eviti, ke ĝi malbonimpresu ilian gastiganton. Sed tiu nenion rimarkis, ĉar Inés rapidis ekparoli, dirante kun viveco:

— Estas ege genia ideo . . . La utopiistoj de niaj tempoj montris sian nescion pri la arto de l' regado super la amasoj, dekretante la devigan ĝeneralan instruadon, sekve de kiu la homoj ekstreme fierbloviĝis, tiel ke fariĝis neeble teni ilin en obeado. Sendube, vi estas multe pli klarvidaj.

— Jes. Ni anstataŭigis, kion vi nomis kun tre bona juĝo „utopio de viaj samtempuloj“, per leĝo multe pli praktika, kiu fiksas la Ĝeneralan Devigan Malinstruadon por ĉiuj, kiuj devas obeadi.

García, jam rimarkinte, ke la paroloj de Inés respondis al la konsiloj de Cartoya, kiujn li preskaŭ forgesis, subtenis ilin dirante:

— Estas eksterdube, estas evidente: tiamaniere vi neniam bezonos timi ribelojn; tiel vi certe starigis Oktavianan pacon inter la homoj, farante neeblaj la klasbatalojn.

— Nature. Kiam unu ne povas, du ne interbatas; la afero estas klara. Kaj malgraŭ tio, mi estas surprizita ke personoj kiel vi, edukitaj en ideoj diferencaj, vidis tion tiel rapide. Tio pruvas al mi ke vi, kvankam naskitaj en tempoj malproksimaj kaj eĉ sen neceso akriĝi viajn inteligentojn per ĉi tiuj

fruktoj kaj konfitaĵoj, jam estas indaj, laŭ propra rajto, eniri en nian kaston de superpensantoj.

Post ĉi tiu ĝentilaĵo de Marcial jam restas plu nenio menciinda dum la manĝo. Ĉe la fino la gastiganto akompanis la geedzojn al la ĉambro, kie matene efektiviĝis la reviviĝo. Li petis pardonon, ke li ne povas doni al ili pli konvenan ejon. La kaŭzo estas, ke tiu okazaĵo antaŭfariĝis kaj ne estis preparita alia pli komforta kaj pli granda ĉambro. Sed la sekvontan tagon, kiam la majstro revenos, oni tian destino al ili. Montrinte al ili la uzon de kelko da leveletoj, por elirigi el la muro lavilaron kaj diversajn tualetaĵojn kaj komfortaĵojn, li lasis ilin solaj.

\*

La venintan posttagmezon Inés rekomendis al Juan pli grandan atenton kaŝi siajn esprimojn kaj subpremi siajn spontaneaĵojn ĉe la interparolo kun superpensantoj, por ne forlasi la prudentan konduton konsilitan de Cartoya: silenti pri ĉio, ĝi ŝajnu kiom ajn malsaĝa kaj malŝatinda, kion ili vidos kaj aŭdos. En tiu momento alvenis Marcial por vizitkonduki ilin al Mob, kiu atendis en sia studĉambro. Laŭŝajne la direktoro havas la vantecon de kronitaj kapoj, — tiun ekpenson havis Inés, — ĉar li opinias nebezone iomete klopodi, ke li estu la unua kiu vizitas sinjorinon ĵus venintan de vojaĝo daŭrinta „nur“ okdek jarcentojn.

Antaŭ ol Inés konis lin, Don Roberto estis jam principe malsimpatia al ŝi pro la trouzo de la konfido kon-

cerne la konatajn vibradojn. Sed kiam ŝi vidis lin, li fariĝis eĉ pli malsimpatia laŭ la realeco kaj sia persono pro tio, ke li estis maljuna kaj malbela, fieraĉa kaj vantema viro. Ĉar malgraŭ la ŝajna afableco ĉe la akcepto diafanis tra ĉiuj liaj afektemaj kondutmanieroj konvinko pri nediskutebla supereco super ĉiuj kiuj ĉirkaŭis lin. Efektive, inter la superpensantoj Mob kredis sin supergeniulo.

Post la devigaj, sed malvarmaj gratuloj pri ilia feliĉa vekigo, tre diferencaj laŭtone de la kora maniero de Marcial, post la diro ke tiu jam informis lin, ke la ĵus-venintoj el la 20-a jarcento ne estas tiel barbaraj kiel estis supozeble laŭ la epoko, el kiu ili venis, li pike alparolis tiujn, kiujn li konsideris kvazaŭ siaj subuloj, jenmaniere:

— Plaĉas al mi, plaĉas al mi renkonti cin ambaŭ (kiel oni vidas, li rifuzis al ili la »vi«-titolon jam dekomence) kiel personojn kun almenaŭ duonkulturitaj cerboj, ĉar tiel ci povos laŭmerite kompreni, kiom granda estas cia bonŝanco jam ĉe la vekigo, ĉar mi ĵus faris la inventon plej mirigan, kiun la jarcentoj vidis.

— Li ne havas avinon, ĉar li mem sin laŭdas, — diris al si Juan.

— Kia malsimpatia ulo! — pensis Inés.

— En mia servo ci vidos grandiozaĵojn, ĉar ci alvenas, kiam mia genio estas ekflugonta por flugoj eĉ pli altaj . . .

Mob ekpaŭzis, kvazaŭ ion atendente. Inés kiu komprenis, kiel grave estas akiri la simpatian de tiu vantulo kaj ke la paŭzo en lia frazaĉa parolado estis farita

kun la intenco ebligi al la aŭskultantoj la aplikon de incenso, diris:

— Jes, sinjoro, jes; ni estas ravitaj. De kiam sinjoro Rucandio permesis al ni vidi la malmulton, kion niaj malriĉaj inteligentoj povis eldiveni el via mirinda invento, ni estas senpaciencaj; sed ĉar ni estas, kvankam malindaj, kulturantoj de la sciencoj, ni sentas veran emegon koni, kion el la verko de via genio la bonvolo de via plejmoŝteco montros al ni. Kvankam timante la malfacilaĵojn, kiujn ni renkontos por sekvi vin en la flugoj kiujn . . .

— Tre bone, tre bone, filino mia. La talento, pri kiu jam Rucandio diris al mi ke ĝi ornamas cin kaj kiun cia parolo ĵus evidentigis, ne malhelpas, kiel mi vidas, modestecon kiu ĝin valorigas eĉ pli.

— Parolu vi ion! — ŝi diris mallaŭte al sia edzo.

— Kiel ĝi povas ĝin malhelpi, plejmoŝta direktoro, — diris Juan, kiu laŭvide estis iom sarkasma. — Kiel estas eble ke du modestaj formikoj de prahistoria scienco ne sentu sian sensignifecon antaŭ iu, kiu flugas kiel aglo super la saĝuloj de la moderna scienco?

— Vi estis prava, Rucandio: ili estas tre simpatiaj, ĉi tiuj du gejunuloj, tre simpatiaj.

— Gejunuloj . . . Mi dankas pro la alnomo, sinjoro direktoro, tiom pli ĝentila, kiom vi povus esti nia nepo; naskita en la generacio numero tricent kaj iom . . .

— Ha, ha, ha . . . Sprita ŝi estas, sprita, ĉi tiu sinjorino. Kaj estas vere, ŝi estas prava . . . Sed jam



estas tempo por paroli pri aferoj seriozaj . . . Konvenas atentigi cin ke laŭ la maniero, per kiu ci venis en miajn manojn, mi povus utiligi cin en miaj sciencaj esploradoj, konsiderante cin kiel simplajn pariojn.

Aŭdante tiujn parolojn kaj pensante, ke ili estas transdonitaj al tiu homo ĉiopova kaj senkonsciencia, la geedzoj ektremis pro teruro kaj interŝanĝis signifoplenajn rigardojn, en kiuj ambaŭ legis siajn komunajn pensojn.

— Sed ĉar mia kunlaboranto diris al mi, ke ci estas saĝetaj, kaj post kiam mi mem aŭdis cin, ci ne ŝajnas al mi tute stultaj. Tial venas al mi la ideo, ke ci eble kun la helpo de Rucandio povos kompreni, se ne mian tutan inventon, almenaŭ parton sufiĉan por kunlabori ĉe iaj malgrandaj perfektigaĵoj, kiujn mi projektas. Sekve mi decidis meti cin sub liajn ordonojn en mian laboratorion por esplorado. Tio estas cia destino.

— Mi ne kaŝas al ci, ke ĝeneralaĵo mi estus malkonfidinta transdoni tiajn funkciojn al homoj malkleraj, naskitaj en la barbara jarcento XX. Sed la cirkonstanco ke unu el ci estas elektristino kaj la alia kemiisto, igas min riski la provon. Ni ja vidos, kion valoros ciaj scioj pri elektro kaj kemio.

— Ci komprenu ke homo de mia altrangeco ne povas perdi la tempon por malgrandaĵoj nek ĝeni sin per klarigo pri detaloj de sia invento al du ĵus-venintoj. Kaj krome estas verŝajne, ke ci ne komprenos ilin, ĉar ne estas facile al mi malsupreniri al la nivelo de vulgara inteligenteco. Tial mi decidis ke tiuj malĉefaĵoj estu klarigataj al ci de cia senpera superulo,

sinjoro Rucandio, antaŭ la aparatoj de la generaj amkunulaĵoj.

— Kio estos tio pri la amkunulaĵoj? — demandis Inés mallaŭte sian edzon.

— Kiel mi sciu? Sed min, kiel vin, impresis tio.

— Li vidos, pri kio konvenos cin instrui laŭ tio, kion atingos la lumo de cia spirito, kaj li poste diros, kiom da salajro ci meritos, supoze ke cial faroj servos por io. Intertempe mi donos al ci loĝejon kaj manĝon. Dependas de ci, ricevi pli malpli frue la monan rekompencan. Mi volas precipe insisti pri tio, ke mia grandanimeco faras al ci la favoron, ne nepre enklasigi cin inter la pariojn, sed en kategorion mezan kaj provizoran inter ili kaj la superpensantoj. Laŭ cial agoj ci restos inter ni, konsiderate kiel superpensantoj, aŭ mi sendos cin tien malsupren. . . . Rucandio!

Dum Don Roberto flustris kun Marcial pri io, kion sendube ne rajtis aŭdi la barbaroj de 1' jarcento XX, Juan diris al Inés:

— Se per tio mi perdis lin el miaj okuloj, mi volonte dirus al li, ke li sendu nin malsupren kaj gardu por si siajn oficojn de subhelpantoj, per kiuj li ne bankrotos.

— Ne estu freneza! Memoru pri tio, kion Cartoya rimarkigis al ni pri la terura vivo de la parioj.

— Sed tio, kion li prezentas al ni, tiu manĝo, kiun li ĵetas al ni, similas multe al sklaveco aŭ almenaŭ al hontinda serveco, neindaj je studentaj personoj.

— Trankviliĝu, Juan, trankviliĝu! Al malbona

tempo bonan mienon! Krome, li lasis malklare antaŭ-konjekti la eblan rangaltiĝon al superpensantoj; kaj kiel ŝajnas, ni feliĉe havos malmulte da intertuŝo kun li . . .

— Se estus multe, mi imagas ke mi ne povus reteni min.

— Nu vidu, knabo, necese estas, ke vi multe aŭ malmulte vin retenu, ĉar ni ne troviĝas en situacio piedbati kontraŭ la pikilo, kaj ĉar la dignon ne malhelpas, kiel diras tiu ulo, la prudento.

Dume finiĝis la aparta interparoladeto kun Marcial, kaj Mob turnis sin denove al siaj elektitaj subhelpantoj, por diri al ili la jenajn parolojn:

— Tial mi informas cin nur sinteze . . . ĉu ci scias kion signifas „sinteze“?

— Jes, plejmoŝta sinjoro.

— Bone, filino mia, bone; plaĉas al mi vidi, ke ci scias trakti la personojn . . . Mi diris ke mi konigos al ci la esencan celon de mia invento, kiel bazon, sur kiun falu pli fruktoporte la instruoj detale teknikaj de cia senpera ĉefo. Atentu tre bone ke, se ci ion ne komprenos, ci atendu dume kaj demandu poste sinjoron Rucandio, ĉar min ĝenas, se oni min interrompas kiam mi parolas, kaj ciaj mallertaĵoj min ekscitus. Mi ne toleras homojn mallertajn. Mi permesas al ci sidi, kaj jam ci scias: neniom da interrompoj, escepte por aplaŭdi min.

Post tiuj vortoj la saĝulo ekprenis la sintenon de iu, kiu estas komenconta paroladon en akademio, kraĉotusetis kaj diris:

— Atentu kaj ne perdu cĉ unu vorton, ĉar ĉiuj estos supergravaj.

Inĉs penis dume reteni Juan'on, kiu ne povis elteni la fieran malhumilaĉon de Mob kaj preskaŭtege ĉion pereigis.

## IX

### La Mob-Amo

Ekparolante la maljunulo diris:

— En la malkonata kaj malproksima jarcento, el kiu ci alvenis, ci produktis la *termikismon*, mi volas diri la varmon kaj la forton, bruligante krudan kaj malpuran substancon, kiun ni hodiaŭ malkonas sur la Tero, nomitan de ci *karbuno*.

— Karbuno? . . . Vi eble celas diri pri karbo; *karbo* ni nomis ĝin.

— Ci imagas ke mi bezonas, ke ci diru al mi, kiel ci nomis ĝin; ĝi ne nomiĝis karbo, sed karbuno, kaj mi diris ke oni ne interrompu min.

— Malproksimega estas la tempo en kiu, post la akcidento cin ambaŭ sveniginta kaj foriginta de ci la memoron pri la vera nomo de l' karbuno, la homoj konsumis la lastan tunon de tiu primitiva fortofonto, kiu poste estis anstataŭigata en la industrio per la *petroleumo* kaj la alkoholo. La lastaj tavolaroj de l' unue nomita, ekzistantaj sur la planedo, estis poste tro rapide misuzataj de tiuj sovaĝuloj, kiuj ĉe la aliĝo de l' varmo en forton aŭ lumon nur scipovis profiti minimuman kaj ridige etan parton el la produktita varmo. Multajn jarcentojn poste malfaciliĝis la ricevo de al-

koholo pro la malvarmiĝo de la Tero kaj pro la sekvanta el tio malabundo de sukero en la plantoj. Ci supozeble ne scias, ke la alkoholo estas ricevata el sukero.

— Iom mi aŭdis pri tio de la kemiistoj de l' jarcento XX; sed ĝis certeco mi venis nur en ĉi tiu horo, — respondis Juan kun traŭdebla ironio, kio havigis al li kubutopuŝon de lia edzino. Bone ke en la fiereco de Mob ne estis loko por la ideo, ke iu povus paroli al li ironie.

— Por ke ci povu konkludi, ĝis kiu punkto malvarmiĝis la Tero, mi diras al ci, ke la temperaturo de 60 gradoj, kiu estis la meza en la mezvarmaj zonoj de l' jarcento XX . . .

— Ne diru al li ke ne, ne diru al li ke ne! — diris Inés al Juan, timirigite aŭskultante tian sensencaĵon.

— . . . malsupreniĝis ĝis 40 gradoj, registritaj en la kvindeka; pro neevitebla leĝo de la neceso, kiu puŝis tiujn homojn primitivajn, ekokazis en la mondo la plenplena transiro de la kruda epoko, konata sub la nomo *Epoko de l' fumo*, al la tempoj civilizitaj, en kiuj mi revivigis cin.

Ci konis, ĉar ci vivis en ĝi, la Epokon de l' fumo; sed ci ne scias, ke la komenco de l' sekvinta evolua periodo ekfariĝis en la *Epoko hidraŭla*, bedaŭrinda periodo, en kiu kontraŭ ĉiaj malhelpaĵoj la homaj estaĵoj komencis fari siajn unuajn kaj ŝanceliĝantajn paŝojn sur la vojo de l' progreso.

Tiu transiro ampleksas ne malmultajn jarcentojn, kaj tiu epoko karakteriziĝas per apliko de la natur-

fortoj de l' riveraj fluoj, kaptitaj per tio, kion ili nomis akvobaraĵoj. La unua estis konstruita kaj inaŭgurita en la riverego Gangeso de belga inĝeniero nomita Franklin en 3613.

— Tondrego! — ekkriis García, feliĉe en hispana lingvo, dum Mob trinkis gluton da akvo.

— Silentu, malfeliĉulo, silentu! — diris al li lia edzino en ilia propra idiomo.

— Kiom etaj ŝajnas al ni superpensantoj de hodiaŭ la inteligenteco kaj la aspiradoj, kiuj postulis de l' Amazono, Nigero, Induso kelke da mizeraj milionoj da vaporelefantoj<sup>14</sup>. Mi ne scias, ĉu cin atingis tiu alia antikvaĵo nomita vapore.

Mi distriĝis. Ha jes, mi diris ke tiuj vaporelefantoj estis utiligitaj nur tie, kien ilin transportis en reduktita amplekso la primitivaj kaj materiaj kanalizaĵoj elektraj kun sia ridinda aĵaro da kabloj, fostoj, kolonoj, izoliloj, maldelikataj artefaritaĵoj forĵetitaj de la moderna menseco; lambastonoj per kiuj apogis sin lamanta kaj laca scienco por pene trakuri malglatajn vojojn.

Kia kontrasto kun la tempoj estantaj!

— Brave, brave! — kriis Inés, aplaŭdante furioze.  
— Aplauĉu, homo, aplauĉu!

— Brave! — kunkriis Juan. — Pardonu, pardonu nin, sinjoro, ke ni interrompis vin. Sed via potenco kaj ekzakta posedo de la historio de l' elektro kaj de la akvobaraĵoj, prezentita de via nehaltigebla elokventeco, forlogis nin.

— Ne grave, ne grave . . . Jam mi diris al ci, ke por aplauĉi ci povos interrompi min, kiam ajn al ci

estas neeble cin reteni, ĉar mi ne povas ignori cian entuziasmon . . . Bone, mi diris: Kia kontrasto kun la tempoj estantaj! Kaj mi nur volas paroli pri tiuj, kiuj antaŭiris al la etapo, kiun la mondo nomos Etapo de l' Mob-A mo, ĉar kiam oni pensas pri ĉi tiu lasta, la kontrasto fariĝas eĉ pli granda.

Hodiaŭ, la geo-termo-atraktorero forŝiras pomile la kilo-kaloriojn<sup>15</sup> el la diversaj internaj maroj de fandita metalo, bolantaj en siaj kavernoj sub la planeda epidermo; sufiĉas por tio, meti la nomitan aparaton proksime al la elstaraj kamenoj de la plutonaj fajrujoj, kiuj estas aliigitaj jam el ekzekutistoj de la homoj en iliajn humilajn sklavojn.

Hodiaŭ, la see-catching-power aŭ tajdvatio kolektas miliontonelmetrojn<sup>16</sup>, eltir-itajn el la fluo kaj refluo de la maroj.

Hodiaŭ, la helio-transformatoro absorbas el la sunradioj la troon da varmo en la tropikoj, transportante ĝin al la polusaj regionoj, por mildigi la tieajn glaciajn temperaturojn<sup>17</sup>. Ŝajnos al ci troigita, sed tamen post la ekrego super tiuj potencaj energiofontoj la homo ankoraŭ luktis kontraŭ malperfektaĵoj por elprofiti tiun potencon, ĝis kiam mi sukcesis liberigi lin de la taskoj, transporti energiojn plutonajn, neptunajn kaj sunajn de la vulkanoj, oceanoj aŭ dezertoj al la laborejoj, kie efiku la aktiveco de tiuj agantoj; ankoraŭ ni devis metamorfozi ilin aŭ inter si aŭ en vibraĵojn elektrajn, lumajn, kemiajn aŭ mekanikajn. Kvankam estis pasintaj jam multaj jarcentoj, de kiam la homaro sciis malhavi la infanajn artaĵaĉojn-kon-



dukilojn uzitajn en la malhelaj tempoj de la akvo-  
baraĵoj, kaj kvankam ni donis al la energio flugilojn  
de elektra ondado, per kiu ĝi tranĉas la spacojn simile  
al la ideo aŭ vorto en la telegrafio kaj en la telefono  
senfadena, ankoraŭ oni uzas hodiaŭ en la mondo kom-  
plikitan maŝinaron por realigi tiujn transformojn; an-  
koraŭ estas bezonataj potencaj genioj por doni al la  
fortoj la impulsojn, kiuj portas ilin de la naskiĝloko  
al la ejoj, kie ili laboras. Ĉi ĉio estas potenco mal-  
ŝparata, laboro ne produktodona.

Meditante iun tagon pri ĉiuj ĉi baroj, mi vidis  
klare, ke estas necese ekskui ilin; ke la homaro havas  
la rajton postuli ion de la moderna scienco, kiam la  
scienco havas saĝulon, kiu nomiĝas Roberto Mob. Li  
metu al ĝia dispono generatorojn de energio kun sen-  
fina aktiveco, kiuj el si mem reproduktu, kion la homoj  
prenas el ili . . . Kaj Mob diris al si, ke li scios trovi  
agantaĵon, kapablan transformiĝi en ĉian forton kaj  
riceveblan ĉie por esti kaptita ie ajn, tiel ke jam ne  
estu necese iri por serĉi ĝin en la krateroj, en la  
maroj, en la senfruktejoj de la dezertoj elsekigitaj de  
la suno: fonto troviĝanta ĉie kaj neelmezurebla laŭ  
energia potenco Protea.

Kia? —

Mob faris novan paŭzon, kvazaŭ donante tempon,  
por ke la diritaĵo engravuriĝu en la memoro de liaj  
aŭskultantoj.

Kaj li estis sukcesinta tion, ĉar kiam Mob ekpri-  
traktis la temon kaj finis la antaŭdiraĵojn, li ĉesis  
amasigi fiere elektitajn vortojn kaj historiajn sen-

sencaĵojn — kiuj cetere estas tre pardoneblaj pro la distanco de multaj jarcentoj; Dio scias kion dirus medoj kaj egiptoj, se ili legus la historiojn, kiujn pri ili ni studas en la 20-a jarcento —; lia saĝeco kaj lia elokventeco samgrandaj kiel lia vanteco suprenlevis lin al altaĵo, kian tute meritis la grandiozeco de la temo starigita. Tial kaj malgraŭ la malsimpatio, kiun li inspiris al la revekiĝintoj, iliaj rigardoj pendis je liaj lipoj, kaj ili estis subjugigitaj de vivega intereso. Tiom, ke ĉe la fino de la antaŭa parolada periodo en la paŭzo, kiun la saĝulo estis farinta intence, ili ne aplaudis, kiel li esperis; sed tamen li vidis en iliaj rigardoj tiel emegan deziron, ke li daŭrigu, tian intereson pri la solvo de la grava problemo starigita antaŭ ili, ke la rigardoj flatis lin kaj plaĉis al li la malparolo, kvazaŭ ĝi estus aplaŭdo.

— Ŝajne tio interesas vin, ĉu?

— Jes, jes, multe, multege, — respondis kun vera sincereco la demanditoj.

— Mi opinias, amiko Marcial, ke kvankam tiuj homoj havas malmulte da kulturo, ni povos okupi ilin profite.

— Jam mi diris al vi, majstro.

— Jes, jes, kaj plaĉas al mi vidi ilin kapablaj por kompreni kaj interesiĝi pri mia invento . . . Ci ne scias ke la universa gravitado, ĉefmino neestingebla de energioj, estas la unusola potenco, la esenca forto; nur unu el ĝiaj tiom multaj aktivecoj estas la variegaj altiroj kaj impulsoj tenantaj kaj puŝantaj la atomojn de la stela universo, vulgare nomitajn

sunoj, steloj, mondoj; same ci ne scias ke estas nur unu el ĝiaj aliĝoj la kohero kiu, kuntenante la molekulojn, estas patrino de la korpoformo; la altirforto, kiu firmtenas ĉion sur la tero, kio sur ĝi kuŝas aŭ moviĝas: rokoj kaj riveroj, montoj kaj maroj, ŝtonoj kaj nuboj. Metamorfozo, nenio alia, de la sama gravitado suverena estas la altirforto kaj la repuŝo elektraj aŭ magnetaj; estas kemiaj parencecoj: lumo, elektro, magnetismo, kohero, varmo, pezforto, ekspansio de la gasoj; ĉio ĉi estas unu sola afero: gravitado ondanta aŭ vibranta diversmaniere. Kaj klare estas ke, se ĉi ĉion ci ne scias, tiom malpli ci scias ke la gravitado estas nur . . .

Ankoraŭ ne estas tempo ĝin diri al ci.

Ĝis nun la homo ne lernis superregi ĉi tiun agantaĵon plej elstaran. Li uzadis fajregojn estingiĝantajn kaj impulsojn maldaŭrantajn. Liaj senfruktaj klopodoj prezentas al ni lian bildon kiel tiun de l' forĵetito en la infero de Dante, kiu estis kondamnita monten puŝi rokojn, kiuj, alveninte sur la supro, ruliĝis malsupren. Kaj ĉu ni imitu lin eterne? . . . Ne, tio ne estas la vojo; kiel novaj Prometeoj ni devas ŝteli el la ĉielo la gravitadon, fari ke en niaj manoj estu industria forto la astraj fortoj . . .

Sed kiel? Jam mi divenas ke ci konjektas, ke mi pretendas haltigi la kuron de astro, kapti la senmezuran varmon tiel liberiĝintan kaj amasigi la kolosan forton, kiu restus libera ĉe la ĉeso de la movado.

Kiun? Marson, Jupiteron, Venuson?

Ne, neniun; tia farebla entrepreno prezentus ne-

moralan misuzon de povo, nekunigeblan kun la bona amikeco nin ligantaj al venusanoj, marsanoj kaj ceteraj najbaroj de ĉi tiu planeda distrikto, kie ni ĉiuj vivas; nekorektan agadon kiu, perturbante la diplomatan ekvilibron de nia sunsistemo, ofendegus la traktaĵojn deciditajn en la Kongreso de la Paco Planedara, okazigita en 8033 sur la tria satelito de Jupitero; ĝi altirus sur nin la kondamnon de l' Arbitracia Tribunalo, daŭre konstituciita en la neŭtrala zono de l' Ringo de Saturno, kaj ekscitus militan interligon de la ceteraj planedoj kontraŭ ni<sup>18</sup>.

Iu povus kredi ke ni povos utiligi la Lunon por atingi nian celon, ĉar ĝi estas ja nia plena propraĵo kaj loĝantoj ne ekzistas sur ĝi, tial ke jam de multa tempo ĉiuj lunatikuloj vivas sur la Tero . . .

— ? . . . ?

— Dio nin detenu! krom tio ke ni havas, kiel ci vidos poste, ion pli bonan kaj pli simplan, min retiris de tiu entrepreno la timo pro la protestoj, kiujn la Akademio de Belaj Artoj formulus en la nomo de la poetoj kaj kiel defendon de la belegaj noktoj emajlitaj per lumo kiu ne blindigas, kie pli ol la radioj de l' melankolia astro brilas la fantazio de poetoj kaj pentristoj.

Ne ekzistas dubo ke, ne kunpuŝante kun la menciitaj malhelpoj, ni povus malpliigi la rapidecon de l' formoviĝo de nia propra globo, kaj ekestri la energion, kiu truas<sup>19</sup>. Tio signifus elspezi el la propraj rimedoj, kaj ne enmiksi sin en aferojn kaj mondojn fremdajn; sed la societoj por la protekto de la agrikulturo estus

kontraŭintaj min. Ili ne konformiĝus kun provaĵoj kiuj, perturbante la sezonojn, transformante la kamp-laborojn kaj malfruigante la ĝermadon de la plantoj, estus profunde modifintaj la riĉecon de la rikoltoj kaj aliigintaj la nutran valoron de la fruktoj, el kiuj ni el-tiras la eliksirojn kaj ekstraktojn, per kiuj ni nutras niajn korpojn, inteligentojn kaj memorojn.

Tial, malŝatante tiajn vulgarajn rimedojn, mi demandis min:

Kio superfluas en nia mondo malriĉa, maljuna kaj malvarma? . . . Klare estas: viroj, virinoj; antaŭ ĉio virinoj. Estas senefike, ke intelektuloj, magnatoj kaj plutokratoj, ke ni superpensantoj kaj superĝuantoj ĝeneras nur en eksterordinara okazo; senefike ke, por nia feliĉo, ni preskaŭ perdis tute la reproduktan kapablecon, kiel iu Tolstoj diris jam antaŭ jarcentoj, se la arego da malgrandkreaĵoj en la ejaĉoj kaj laborejoj de l' subtero de niaj urboj kaj en la kavoj de niaj vilaĝoj daŭrigas pleniĝi la mondon per siaj aĉaj idaroj.

„Kiel ataki la malbonon?“ ni demandis nin, vidante senĉese kreskadi kaj kreskadi tiun homan formikaron (alkatenitan al niaj maŝinoj kaj laboriloj), kaj samproporcie rimarkante, kiel malpliigis la nutra kapablo de l' planedo . . .

Se pasus cent jaroj sen trovo de rimedo, ni fatale devus fali en kanibalismon kaj nutri nin per la naŭza karno de tiuj bestaj amasoj, kiuj, senkonscie kaj atentante nur malracian egoismon, ne bridas brutajn pasiojn kaj amas, amas sen takso kaj mezuro, marŝante al vera memmortigo de l' homa raso. —

De kiam Mob komencis tuŝi la punkton rilatantan al la reprodukto de la homa raso, la admiro de la Bilbaanoj suferis krudan frapon, ĉar ili ĝuste taksis la karatojn de lia moralo. Sed aŭdante, kiel li esprimis sin kun malhumana malsatego pri la malfeliĉaj viktimoj de l' kruela despotismo superpensula, ili sentis repuŝon eĉ pli fortan ol antaŭe. Ili antaŭsentis ion teruran en tio, kion ili ankoraŭ devos aŭdi.

La saĝulo, absorbite de la kulto al si mem, tributita de lia fiera memadoraĉo, ne rimarkis la teruregon, kiun Marcial tamen konstatis sur la vizaĝoj de la du aŭskultantoj, nek frapis lin la interfluŝado de Inés kaj Juan; ŝi, timigite vidante la indignon brilantan sur lia vizaĝo, provis trankviligi lin, dum Don Roberto daŭrigis per jenaj esprimoj:

— Tiam mi vidis, ke la homaro havas antaŭ si ne unu, sed du urĝajn problemojn; pli alarma ol la manko de generaj agantaĵoj por industria forto estas la senlima kreskado de la homa raso, kies plej malbona malamiko estas la senbrida amo, kaj tiam naskiĝis en mia menso la genia plano solvi samtempe per unu solvo la du problemojn.

Mi diros ĝin fine: la energio, kiu forĵetos de la industrio ĉiun alian forton, estas LA AMO. (Grandega impresio ĉe la aŭdantaro kaj akcentanta paŭzo de l' lekcianto.)

---

— Mi atendis cian surprizon, — daŭrigis la oratoro. — Baldaŭ ĉesigos ĝin miaj klarigoj, ĉar la amo estas nek pli nek malpli ol manifestaĵo de la gravitado universa, ĝis hodiaŭ ne rimarkita: la gravitado en sia psika formo, por uzi vorton de jarcentoj jam forigitan el la lingvo. Eĉ plie: tiu eco de la gravitado superas ĉiujn aliajn de ni konatajn formojn. Dum ili prezentigas sub unu sama aspekto, la amo resumas en si ĉiujn manifestiĝojn de la ununura energio, kaj tial lumo, varmo, elektro, mekanikaj fortoj en ĉiu momento estas nur vibraĵoj lumaj, plutonaj kaj Hertz'aj aŭ dinamikaj; diversaj sinsekvaj rezultoj de modifaĵoj kun la menciitaj nomoj; la amo, male, montriĝas kaj utiliĝas sub ĉiuj formoj, ĉar ĝi estas samtempe ĉiom.

Tuj vi vidos ĝin tre klare.

Ĉirkaŭ la sunoj turniĝas la planedoj, suĉante vivon el ili; turniĝas la amanto ĉirkaŭ la amato, metante sian vivesperon sur lin. Centripeta forto, altira forto estas du nomoj malsamaj por ligilo, kiu katenas la mondojn al iliaj lum-astroj; kaj la amo estas magneto kuniganta korojn: en pureco, la forto centripeta. Malkonfido, ĵaluzo estas impulsoj ekstercentraj, kontraŭaj al la amema komunikado; subpremu ilin, kaj la amo reunuigos la geamantojn; same tiel per la ĉeso de la centrifuga forto, kiu pelas la terojn trakuri siajn orbitojn, la teroj brulegas, falegante en la sunojn. Kaj male, se ci fortiras de iu astro ĝian centripetan forton, aŭ la amon de l' koro de unu el la geamantoj, tiu mondo, malproksimiĝante blinda de la fajrujo el kiu ĝi prenas vivon, abismiĝus en la solejojn de l' spaco frostiĝinta

pro la stelara malvarmo, kaj tiu kreaĵo kun soleca vivo dronus en la glacioj de indiferenteco kaj forgeso . . .

Ĉu ci volas pluajn pruvojn? Nu, vidu la ĵaluzon, am-eklipson, kaŭzatan de intermetita astro saviĝinta inter la geamantojn. Kio estas eklipso? Ombroj. Kio estas ĵaluzo? Ombroj.

Kaj kio alia estas la pasiaj konfliktoj ol interkruciĝo de orbitoj, de estaĵoj, kiuj per kunpuŝiĝo produktas katastrofon? Kaj kio alia la „papilioj de l' amo“, koketulinaj kaj Don-Juan'oj ol astroj vagaj, ŝanceliĝemaj, turniĝemaj kometoj, kiuj, flugante de unu planeda sistemo al alia, ĉiutage aliras diferencon mondon, ne haltante sur iu ajn?

---

La neatendita turno de la parolado forigis la malbonan impreson de la geedzoj kiuj, allogite de la senduba originaleco de la komparoj de Mob, jam ne sentis timon, eĉ ekridis ĉe kelkaj el ili, kun videbla plaĉo de Mob, kiu daŭrigis:

— Jam ci vidas, ke gravitado kaj amo estas la sama. Sed ci vidos ankaŭ, ke amo estas lumo. En senĉesa sekvo turniĝas la Tero ĉirkaŭ sia propra akso. Ĉu ci scias kial? Tial ke, dum restas enigita en nokto la eroj de l' polvo de ĝia supraĵo kaj la akvogutoj de ĝiaj maroj, ĉiu el ili kaj ĉiuj kune puŝas ĝin kun senpacienca, ke per rapida turniĝo ĝi portu ilin tien, kie



ili povu satigi siajn deziregojn, vidi la ekkoloriĝon de la nova aŭroro, bani sin en lumo, varmigi kaj ebrigi sin per fajro kaj brilo de sunaj elradiadoj.

Ĉu tio ne estas amo? Ĉu tio ne estas nesatigebla emego sentita de teroj kaj maroj pro la kisoj de l' suno?

Kaj tiu forto senĉesa, per kiu montoj kaj maroj, herbejoj kaj arbaroj, enprofundigitaj en la ombro, puŝas la arbarojn kaj montojn, herbejojn kaj marojn ĝuplenajn pro la lumo de l' tago — kio alia ĝi estas ol envio, ĵaluzo, nostalgio je la kareso de l' taglumo?

Kio plu? Forigu la lumon de la mondo, kaj ĉio estos nigra, malbela; en malhelaĵoj dronos la formoj, kaj la beleco mortos kun ĝi. Ĝi revekiĝu — kaj ĉio brilos en harmonio, nuancoj kaj koloroj; kaj kiel el la ŝtonoj ŝtalo eligas fajron, kaj kiel, kiam la suno tuŝas la objektojn, la malbelaj ombroj disiĝas inter briloj de la lumo triumfanta, tiel la amo, pompe ornamante la amatan estaĵon, beligas ĝin per ĉia perfekteco.

Varmo? — Ne, multe pli: fajro, kiu ardas en la koro, varmigas la animojn, disfluigas volojn; fajra fonto kiu faras eĉ pli, ĉar same kiel la materia fajro likvigas kupron kaj stanon, por formi el ili korpon novan: la bronzon, tiel ankaŭ la amo, unuiganta patron kaj patrinon, naskigas infanon el la varmo de ĉirkaŭpreno. Kaj por ke la identeco de varmo kaj amo montriĝu al ci eĉ pli klare, rimarku ke ankaŭ la amo havas sian termometran skalon. Ci ridas? . . . Nu, rigardu: La malamo estas la malvarmo absoluta, la terura malvarmo de la interstelaj spacoj; la malsim-

patio — la punkto de glaciigo de l' alkoholo, kaj la indifereceto — la komunuza nulò, la fandiigo de l' glacio en la ordinaraj termometroj; la simpatio reprezentas, laŭ pli malpli alta grado, la temperaturon de la banoj de plezuro; la flirtado suprenigas la hidrargan kolonon al la punkto signita por la bonfarto de silkvermoj, kaj la pasio bolas per vezikoj de bolplaŭdanta akvo.

Elektro? — Rigardu: La amo, mistera kaj simpatieca fluo, kuranta inter la poluso pozitiva: la virino, kaj la negativa: la viro, estas ekscito elektra aŭ sugestio morala (funde la sama), kiu per siaj skuoj elektrigas aŭ impresas la estaĵon antaŭe indiferecanta per afekciaĵoj vibrantaj en alia animo: influo nedirebla, nemateria komuniko, kiu unuigas karakterojn, mildigas malkonsentojn: ekzakte la samo, kiel la elektra fluo inter korpoj kun diferencaj voltaĵaj potencoj egaligas la tensiojn de l' fluo en unu aŭ alia.

La am-impreso rapida kaj nekonsciata, kiun ni nomas »amsaga trafo«, estas, klare kaj koncize, la elektra fajrero de modera intenseco kiu, ekscitante malgravan tikladon, ne sufiĉas por produkti grandajn malutilojn; la fajrerego perforta, kiu detruas la motoron en kazo de difekto, la fulmo neniiganta, kiu saltas el la nubo, ili estas idente egalaj al la efiko de amo kontraŭata aŭ mokata je ekstremaj kaj danĝeraj tensioj; ĝiaj efektoj estas murdoj kaj memmortigoj; kaj la esenca kaŭzo, la sama, kiu provokas la akcidentojn en la maŝino aŭ la fulmbaton, estas manko de regula interkomunikado, kapabla ekvilibrigi la elektrajn nivelojn de viro kaj virino. Ĉar kiam ili alvenis

ĉe la supro de l' amdeliro, aŭ eksploda tensio, estas fatala leĝo ke okazos katastrofo.

Fine, ci povas juĝi pri la grandega potenco efektiva de l' amo, rigardante tra la historio ĝiajn kolosajn efektojn mekanikajn, kiuj skuis la korojn de la amasoj. La amo al Kristo estis la mur-rompilo, kiu faligis la templojn de l' idolanismo, lavango, kiu enterigis socion, forto, kiu per amasigado de ŝtonoj starigis katedralojn kaj levis miriadojn da gemartiroj el la polvo de la tero al la superaj altoj de l' ĉielo. Sur la fundamento de nmoveblaj voloj la patrujamo levstarigis nerezisteblajn murojn, kontraŭ kiuj rompiĝis la atakoj de Kserkso, Pirho, Hanibalo, Napoleono. Utopio pri la jam forgesitaj rajtoj de l' homo movis amasojn, ŝanĝante iliajn kamparanojn en militestrojn, forĝante armilojn, ĵetante armeojn de unu limfino de Eŭropo al la alia.

— Brave, brave! — ekkriis kune la tri aŭskultantoj, kaj en la homoj de la 20-a jarcento ĉitiofoje la entuziasmo ne estis ŝajnigita.

— Lasu min fini! . . . Ĉar mi vidas klare, ke ci akceptas senhezite la premisojn de tio, kion ĵus antaŭe ci priridetis, jam estas tempo, ke mi lasu ĝeneralulojn kaj sciigu, ke mi sukcesis mastri la amon; ke mi kaptis tiun subtilan potencon fleksiĝeman kaj inteligentan ĉe la punkto kie ĝi ŝanĝiĝas per si mem — kaj sen transformatoro, aŭskultu bone! — en ĉiajn specojn de energio, evitante la multekostajn transformiĝojn industriajn; ke mi malŝparas senzorge la kurentojn liveratajn de tiu neelĉerpebla agantaĵo, ĉar

kvazaŭ nova fenikso la amo renaskiĝas el siaj cindroj; kaj mi akcentas, ke tio ne estas propono de projekto, sed raporto pri fakto. Per generaj paroj kaj la simpla instrumento nomata psiko-interrompilo mi realigas ĉion ĉi, kion ĝis nun en la mondo faris la karbuno, la alkoholo, la hidraŭlaj fortoj, la varmego de la vulkanoj kaj la forto de la tajdoj. La detaloj pri la funkciado de am-kunulaĵoj kaj psiko-interrompilo estos montrataj al ci de sinjoro Rucandio. Mi ne okupas min per tiaj malgravaĵoj.

Eksilentis Mob kaj surprizite, ke li ne aŭdis la ovacion, kiun li esperis kaj certege supozis, li murmuris per minaca voĉo kaj kun kurbigitaj brovoj:

— Kaj tio estas ĉio, kion ci havas por diri post la peno, kiun mi uzis pro ci?

La lasta parolada parto, rilatinta al la raciaj kunulaĵoj kaj al aparato ŝtelanta ion tiel sanktan kiel estas la osciloj de homa amo, denove vekis la malsimpatian de Juan kaj Inés kontraŭ Mob. Tiu malklino estis jam ŝanĝiĝinta en teruron, kiu silentigis ilin ĉe la fino de la parolado. Sed kiam ili rimarkis la esprimon de liaj rigardoj, la tonon de lia voĉo kaj vidis sin jam en la kelejoj transformitaj en kunulaĵojn, ili rapidis forigi la ĉagrenon de l' moŝta direktoro. Kaj ĉar la virinoj en tiaj cirkonstancoj kutimas esti pli viglaj ol la viroj, ŝi estis la unua por forturni la danĝeron, dirante:

— Plejmoŝta sinjoro! Al tiu kiu restas neniigita antaŭ subprema grandeco, al la nesciulo blindigita de la plej granda genio, kiun kreis la jarcentoj, estas ne-

eble ke li havu ekpenson aŭ diru ion ajn, kio ne povus ŝajni malrespekta post la paroloj, kiujn aŭskulti ni havis la feliĉon.

— Kiel saĝa ŝi estas! — pensis Juan; kaj kiam ŝi finis, li aldonis siaflanke, kvankam ege sin devigante al tio:

— Kaj kion diri povus arogi tiuj ĉi malindaj kreaĵoj, idoj de barbara jarcento?

— Ci estas pravaj; kaj mi vidas plezure, ke ci ne estas tiel barbaraj kiel cia jarcento. Bone, Rucandio, okupu vin pri ili; instruu ilin, kaj kiam ili estos en la stato por kompreni la demandojn, kiujn mi devos fari al ili, kiel vi ja scias, avizu min. Ĝis tiam mi ne bezonas ilin vidi.

— Kio multe plaĉas al ni, — ili ekpensis, retirante sin kun Marcial, kiu ilin kondukis al la nova loĝejo jam preparita por ili.

## X

### Mondopolo el la birda perspektivo

La loĝejo, destinita al la geedzoj, konsistis el tri ĉambroj; kiam ili eniris, ili surpriziĝis pro ilia kompleta malpleneco. Glataj tukoj sur muroj, pordoj kaj balkonoj estis la tuta meblaro. Sed Marcial tuj ĉesigis ilian miron montrante, kiel oni per funkciigo de diversaj leviletoj kaj prembutonoj povas ŝanĝi du ĉambrojn unu post alia kaj laŭvole en alkovon, vestejon, banĉambron, necesejon, babilejon aŭ laborkabineton, ĉar el la muroj eliĝas la mebloj taŭgaj por la servo, al kiu en diversaj horoj de l' tago oni deziras dediĉi ilin. Se oni tion konsideras, la loĝejo kun siaj nur tri ĉambroj estis same utila, kvazaŭ ĝi havus dekon aŭ dekduon da ili.

La salono povis esti, krom akceptejo, ankaŭ manĝoĉambro kaj bilardejo aŭ ejo por aliaj ludoj.

Inter la ilaroj, kaj enniĉigitaj en la muro, estis du aŭtomoj destinitaj sendistinge por la uzo de edzino aŭ edzo, ĉar aŭtomoj ne havas sekson. En la niĉoj troviĝis krome la kap-aparatoj, kiujn viro aŭ virino devis surmeti, por doni ordonojn al siaj puphomoj, la poŝaj transsendiloj necesaj por tiu celo, egalaj al tiuj, kiujn oni jam vidis funkciaj en la mano de Rucandio, kaj

libroj kun uzadklarigoj por tiuj aparatuloj, al kiuj mankis nur la parolo; sed certe ekzistas homoj pensantaj ke ilia muteco estas tipa eco de ideala servisto.

Klare estas ke en la loĝejo ekzistis aparatoj radiotelegrafaj kaj radiotelefonaj por longaj distancoj — tial ili ja nomiĝas ‚tele‘ — radiofoniiloj por interna komunikado kun pordistejo, manĝejo, konfitejo, kaj ceteraj aksesorejoj de l' muzeo; kaj fine la geedzoj havis tie je sia dispono viston, mi volas diri telefonon; tia aparato mankas en neniu domo de l' centa jarcento.

En rakonto de alia karaktero ol la jena estus necesa la priskribo de la komforta kaj genia manipulado, kiu ĉi tie en malmultaj linioj estas skizita; sed en ĉi tiu rakonto — destinita ne al kruda mekanismo de leviloj, risortoj kaj radoj maldelicate materiaj, sed al la miriga psikomekaniko de l' elektro-amob de Mob — ne estas eble perdi tempon pro vulgaraj mekanikaĵoj.

Post la unuaj klarigoj koncernantaj la diversajn uzojn de la ĉambraro, Marcial donis detalajn instrukciojn al la revivigitoj pri la maniero, interkomuniki kun la kuirejo kaj la konfitejo, por ke oni servu al ili la manĝaĵojn en la loĝejo per turnaparato, de kiu prenas ilin la aŭtomoj, kiuj metas ilin sur la tablon kaj faras la servadon, ĉiu al sia mastro.

Inés demandis Rucandio'n, ĉu la manĝordo permesas elekti la manĝospecojn, kiuj plej multe gustas al la konsumantoj, kondiĉe ke oni preterlasu aliajn. Ŝi estis informata, ke ŝi povas postuli kaj elekti senrezerv-

ve inter la manĝaĵoj, ankaŭ ne bezonante konsideri la kvanton; post tiu diro, li adiaŭis ĝis la venonta tago, en kiu li enkondukos ilin en la laboratorion, kie ili tri devos kune labori.

Tuj poste Inés kaj Juan sidigis sin ĉe la tablo; sed la unua parto de la manĝado estis tre malgaja, ĉar sur ili pezis la malkonsola impresio de la konferenco kun Mob, kies grandegan talenton kaj vastegan sciencan ilin ne povis ne rekonii; sed ĉiufoje li estis al ili ne nur pli malsimpatia, sed eĉ pli terure malaminda. Laŭ la aŭditaĵo ili suspektis ke, kiam oni informos ilin pri la detaloj de l' ricevo kaj la aplikado de la Mob-amo, ilia admiro por la genio de l' inventinto fariĝos eĉ multe pli malgranda ol la teruro pro lia nigra konscienco. La animstato de Inés rilate al la „plejmoŝtulo“ restis plastike resumita en jena ŝia frazo: „Jes, Juan, jes, li havas multan talenton; sed ankaŭ Lucifero certe havas tre multan.“

Sed laŭmezure, kiel la vespermanĝado progresis, tiu korpremiteco, pensiganta ambaŭ geedzojn pri la malhela estonteco, iom post iom malfortiĝis, ĝis fine ĝi estis forgesita, almenaŭ dumtempe, kaj sentoj multe pli dolĉaj kaj nepre naturaj ĉe du ĵus-geedzigitoj anstataŭis ilin. Ni do lasos ilin solaj — la aŭtomoj estas tiel surdaj kiel mutaj kaj blindaj — ne donante pri la manĝado pluan komunikon ol tiun, kiu estas konkludebla el la sekvanta dialogo, kiu antaŭis aliajn pli sentimentajn ĉi tie prisilentotajn.

— Sed kian strangan manĝon vi mendis! Eĉ ne unu pladaĵon mi vidas, kiu povus nomiĝi normala, kaj



anstataŭe ĉi tie estas nekredeblaj kvantoj da fruktoj, marmeladoj, konfitaĵoj, tortoj, bombonoj . . . Mi ne opiniis vin tiom frandema . . .

— Mi ja ne mendis ĉion ĉi kiel frandemulino, sed tial ke la desertoj estas la nutraĵo speciale destinita al la cerbo kaj tial ke estas urĝe trakti kun la superpensantoj, kaj eble — kiu scias? — por defendi nin kontraŭ tiu satana maljunulo, ni devas akriĝi la inteligentecon; pro tio mi kredis bonefike ke en la unua tempo de nia dua vivo ni submetu nin al ekskluziva dieto de desertoj kaj intermanĝetoj.

— Vere, la ideo ne estas malbona; sed . . .

— Maltrompiĝu, Juan, nia unua armilo devas esti la inteligenteco, kaj ĉar ni havas la rimedon superinteligentigi nin rapide, estus malsaĝeco malprofiti tiun avantaĝon . . . Krome, eĉ se estus nur pro memamo, mi volas fari kiom mi povos, por ke la superpensantoj ne kredu nin stultaj.

\*

Ĉe la leviĝo, post la unua nokto pasigita en sia nova restejo, la geedza paro dediĉis iom da tempo por detale informiĝi, pli bone ol la antaŭvesperon, pri la manovroj de mebloŝanĝo kaj por ekzerci sin en la manipulado de prebutonoj kaj leviletoj, necesaj por la ŝanĝado.

Ili komencis malaperigi la liton en la muron. Tio efektiviĝis tiamaniere, ke ĝi turnis sin supren ĉirkaŭ

la kapa parto. La aperturo en la muro, kie la lito kaŝiĝis post mirinde bela korp-alta spegulego, lokigita sub la metalmatraco, restis tiamaniere fermita. Kiam la lito estas utiligata por sia natura uzo, la spegulo turniĝas planken.

Samtempe eliĝis el la planko bankuvo, sur kies randoj rozporcelanaj grupoj da statuetoj reprezentis alabastrajn nimfojn kurantajn, persekutatajn de bronzaĵaj satirusoj. Malsupre, rokokristala friso ĉirkaŭis la bankuvon, lasante diafani la akvon, kaj orname portis multkolorajn reliefaĵojn de ondulinaj kaj drakoj inter rokoj kaj plantoj. Produktiĝis la imago, kvazaŭ la ondulinaj ŝercetas kun la persono troviĝanta en la akvo. Interne la fundon formis grandega perlamota konko, kaj la tuta banujo apogiĝis sur la lumboj de kolosa krokodilo, kies piedegoj estis la piedoj de l' bankuvo.

Samtempe kaj bonege konformiĝante kun la pomp-eco de l' bano elstaris el la muroj de la ĉambro diversaj lavujoj, mebletoj kun senpolvigiloj, kosmetikaĵoj, tualetiloj por diversaj uzoj; kelkaj iloj estis konataj, sed la plejparto estis nekonata al Inés; krome ekzistis duŝoj mezvarmaj, malvarmaj, vaporaj kaj parfumaj; elektre-aŭtomata masaĝo kaj kolorigiloj de l' haroj kun koloroj de la ora ĝis la marverda kaj de la viola ĝis la diantruĝa, ĉar neniu virino de l' jaro dekmil, kiu iom estimas sin mem, prezentas sin dum du sinsekvaj tagoj kun sama harkoloro.

La farboj troviĝas en la supro de kapkorbetoj, kiuj, metite sur la kapojn de la elegantulinoj, etendas ilin

per multaj brosetoj sur la kapharoj, kiujn ili samtempe ondformigas.

Al tio oni aldonu amason da tualetaj sekretoj, kiuj restis malklaraj al Inés, ĉar neniu povis gvidi ŝin tra la komplikita korpa flegado de elegantulino el Mondo-polo, kaj oni havos almenaŭ ioman ideon pri la komplikeco de ordinara vestejo en la centa jarcento, komplikeco tre klarigebla, ĉar la progreso de l' kulto al la homa korpo estis atinginta eksterordinaraĵojn kaj fantaziajn kombinaĵojn per kapharoj, ungoj, haŭto kaj okuloj de la sinjorinoj en formoj prijuĝotaj pli poste, kiam ni priskribos iun tualeton.

La forto de la kutimo devigis nin rilati ĝis nun al la sinjorinoj; sed por ne esti malveraj estas necese diri, ke superĝantoj de ambaŭ seksoj iras kun ekstravaganca ambicio.

Pri la lukso, kiu estas unua neceso de tiuj homoj, donos ideon la sekvanta noto: Nek la plej modesta banejo-vestejo, laŭ la stilo de la revivigitoj, povas esti instalata per malpli ol sepcent aŭ okcent mil pesetoj, nek la kosto de la ĉiutagaj bano kaj tualet-ornamo de sinjorino estas sub tri cent mil. Dank' al tio, ke la nombro de la superĝantoj en la tuta mondo ne atingas du milionojn; dank' al tio, ke ili estas la solaj posedantoj de la tero kaj de la laborfruktoj de trimil milionoj da parioj — la tuta loĝantaro de l' terglobo —, ili ĉiuj estas multmilionuloj; tiuj kun la plej modesta havaĵo plendas ke ili ne povas vivi per ok aŭ dek milionoj da rento aŭ salajro.

Post kiam la paro unufoje estis informita pri la

ĉarmaĵoj de l' vestejo, ili malaperigis ĝin, anstataŭigante ĝin sinsekve per studejo, kabineto ktp. Ili restis mirigitaj, ĉar la lukso, la komforto kaj la artisma gusto superis ĉion, kion ilia fantazio povus imagi; kaj nur temis pri simpla haltejo, ĉar pli ne estis ilia loĝejo, por pasantoj tra la muzeo.

Post tiu tempopasigado alvenis tajloro kiu, ordone de Rucandio, portis al la geedzoj duonan dekduon da vestoj por ĉiu el ili. La antaŭvesperon, post preno de la mezuro en aŭtomataj mezuraparatoj, ili estis faritaj por anstataŭi la litotukojn, per kiuj Inés post la vekiĝo rapide estis improvizinta iujn tunikojn. Oni certe supozas, ke la vestoj el Bilbao ne estis al ili restintaj.

Vidante, ke tiuj vestoj kovris al ŝi apenaŭ tion, kion ŝi kutime kaŝis al la publiko, kaj ke al Juan ne plaĉis, ke ŝi elmetu tion al la rigardoj de la superpensantoj, ŝi verdire ne havis alian rimedon ol surmeti tri vestaĵojn, unu sur alian, por tegi per unuj la malkovritaĵojn de la aliaj.

La unua sinjorino, kiu ŝin renkontus en la ŝtrato, sendube dirus ekvidante ŝin: „Bravaĉa eksteraĵo!“, sed Inés revenĝus sin dirante: „Bravaĉa senhontulino!“

Vestiĝinte, la du geedzoj matenmanĝis. Kiam ili post la manĝo estis pensantaj, ke volonte ili farus promenon tra la belega urbo, videbla tra la malfermita balkonfenestro, alvenis Marcial, kiu ĝuste havis la ideon realigi al ili la deziron, ĉar ŝajnis al li iom tirane senpere meti en la laboratorion siajn „geamikojn el la jarcento XX“ — tiel li nomis ilin —, ne donante al ili

tempon ĵeti almenaŭ unu rigardon al la mondo tiel novega al ili. Tiun tagon ili volis ĵeti nur unu rigardon al la urbo, kun la rezervo, ke kompleta kaj detala montrado fariĝos en la sekvontaj tagoj. Oni dediĉos al tio la posttagmezojn, laborinte dum la antaŭtagmezoj en la laboratorio.

Kun tre bona pripenso opiniis Rucandio ke, prefere ol montri al ili detalojn kaŝitajn en la interno de la stratoj, li vidigu al ili la tutmondan ĉefurbon kiel tutaĵon, same tiel, kiel ĝin vidas tiu, kiu alvenas laŭ aera vojo: la plej uzata vojo de preskaŭ ĉiuj ĝiaj vizitantoj. La fervojo en la centa jarcento estas malrapida kaj antikva transportilo nur uzata por komercaĵoj aŭ por translokigi trupojn da parioj sendataj al terkulturaj aŭ minejaj laboroj.

Tial li petis de l' muzea hangaro (aviadilejo) aerohelikopteron, aparaton, kiu kompare kun la aeroplanoj de l' jaro 19 . . . havas la avantaĝon, ke ĝi povas teniĝi senmove en la alto, kiam tio estas necesa, kaj povas supreniĝi kaj malsupreniĝi vertikale; ĝia ununura manko estas ne atingi rapidecon pli grandan ol 50-kilometran pohore. Tial oni uzas ilin nur por turismo; por longaj vojaĝoj oni preferas zepelinojn aŭ aeroplanojn, kiuj atingas 180 aŭ superas 300 kilometrojn, respektive. Laŭsence ili estas egalaj al la dudek-jarcentaj, kvankam multe pli grandaj, absolute sekuraj kaj kun detalaj perfektaĵoj.

Kvin minutojn post la telefona mendo de l' helikoptero, la promenontoj eniris ĝin de sur la tegmentteraso de l' muzeo; de tie, laŭ ordono de Rucandio, ĝi di-

rektis sian flugon malalten al la Granda Mondpalaco, staranta en la centro de la Placo de l' Mondo, siavice centro de la monumenteca kaj aristokrata Mondopolo.

Kiam la aerŝipo, tie alveninte, leviĝis por lokiĝi super la turo de la nomita konstruaĵo, diris Marcial:

— Ĉi tiu konstruaĵo estas la Konsistoriejo de la Nacioj, kie dum la monato januaro reĝoj kaj prezidantoj de la konfederitaj landoj de l' tuta terĝlobo okazigas siajn kunsidojn sub la prezido de la Plejalta Afergvidanto de l' Banksindikato, kiu loĝadas en ĉi tiu palaco kaj plenumas la plej altan povon tutmondan; ĉar la bankistoj, kies prezidanto li estas, kredas lin supera al reĝoj kaj popoloj, tial ke li atingis la celon de l' progreso, centriginte la inteligentan ekspluatadon de l' mondo en unu sola financa kompanio kaj tiel ĉesiginte antikvajn rivalecojn de entreprenoj.

Kiel vi vidas, la admirinda monumento, verko de l' malfeliĉa Cartoya, kiun vi jam konas, havas regulan fundamentfiguron, ses fasadojn de po 325 metroj, kaj de po 45 metroj da alto. La gracilega turo ĝin kronanta, kies fulmforigilojn ni havas proksime de niaj piedoj, mezuras 800 metrojn.

Juan kaj Inés estis mirigitaj. Rucandio silentis, por ne ĝeni la fremdulojn, por ke ili mem ĝuste taksu la imponan grandiozecon de l' panoramo antaŭ ili troviĝanta.

Sur la bordo de la lago, emajlita de tropikaj plantoj, etendiĝas la urbo internacia, malfermita al la

akva flanko per cirklaĵoj, kiuj ĉirkaŭ la Placo de l' Mondo kaj je kreskantaj distancoj de ĝi formas sep koncentrajn zonojn, kie brilas la lumo reflektiĝanta en iliaj akvoj. Detaloj estos poste specialigataj, sed provizore: tiuj ĉi kanaloj formas belegajn cirklaĵojn kun larĝo de po 250 metroj, nomatajn Envolvanta I, Envolvanta II . . . Envolvanta VII.

La unua, senpera al la fasadoj malantaŭaj de la dekdu domblokoj, kiuj ĉirkaŭas la Placon de l' Mondo, havas cirkonferencon de ses kilometroj laŭ sia komplota arko; la sepa, en distanco de 3500 metroj de l' Palaco, mezuras laŭronde 20 kilometrojn.

La placo, regula multangulo dudekkvar-latera, impresas kiel cirklo kaj mezuras unu kilometron kaj duonon en ĉiu direkto. La Konsistoriejon, metitan ĝuste en la centron, ĉirkaŭas ĝardenoj kaj promenejoj, internaj kaj eksteraj de hipodroma kursurfaco de 3800-metra amplekso.

Kuriozaĵo: Kiu en tago de kurkonkurso deziras ĝin vidi de seĝoj tincele lokigitaj sur la teraso de l' Konsistoriejo, devas pagi, se la nombro da petantoj ne necesigas prezaltigon, 10 000 pesetojn por ĉiu seĝo.

Kaj malgraŭ tio diradas la Plejalta Afergvidanto, ke tio estas kvazaŭ senkosta. Li nur tial ne altigis la prezojn, ke preskaŭ ĉiam estas necese ilin aŭkci. Tio estas unu el la kaŭzoj, kial la konstruaĵo estas farita granda.

El la 24 flankoj de la placo 12 estas fasadoj de sammultaj aliaj domterenoj, kaj la ceteraj 12 estas alir-

stratoj, kiuj inter la domoj lasas lokon por grandaj radiaj avenuoj kun la direktoj perpendiklaj al la sep kanaloj envolvantaj. Tiuj 12 avenuoj estas numeritaj per la ciferoj neparaj 1, 3, 5 ĝis 23, kaj inter po du el ili troviĝas subavenuo ne atinganta la placon, kiu kondukas de la cirkla envolvanto numero 3 al 7. La subavenuoj portas la numerojn parajn de 2 ĝis 24. Tio estas do la tuta nombro de la radiaj vojoj. La longaj mezuras 2750 metrojn, la mallongaj 1750. Ĉies larĝeco estas 200 metroj.

Kiu de la alteco de helikoptero rigardas la envolvantojn, vidas ilin forte desegnitaj per la rebrilo de l' akvo en la kanaloj, dum oni nek sur la Placo de l' Mondo, tute sur firma tereno, nek en la radiaj avenuoj konstatas signojn de la akvo.

Finrimarkigo pri ĉi tiu ĝenerala impresio de la urbo: La konstruitaj domblokoj mezuras, ĉiu por si mem, 100 metrojn en la direkto de la avenuoj, sed en la direkto perpendikla la longoj de la fasadoj kreskas de 180 metroj ĉe la Placo ĝis 700 ĉe la envolvanto VII.

Unu observo, kiu certe estus okazinta al kiu ajn loĝanto de niaj urboj de l' 20-a jarcento, se li per unu rigardo estus ĉirkaŭpreninta la planon de Mondopolo, estis farata de García, kiu diris:

— Sinjoro Rucandio, min surprizas en ĉi tiu nekomparebla urbo, ke preskaŭ ĝia tuta areo estas okupita de tiuj plenlarĝaj interkomunikaj vojoj: tiom ke eble la spaco dediĉita al konstruaĵoj eĉ ne okupas kvinonon de la tuta areo.



— Eĉ ne tiom, Juan, — aldiris lia edzino, — ĉar la konstruaĵoj apenaŭ okupas trionon de l' areo de domtereno, preskaŭ tute dediĉita al ĝardenoj.

— Efektive, la loĝejoj tegitaj eĉ ne okupas dekduonon de l' areo destinita por vojoj kaj ĝardenoj: tio estas la karakterizaĵo de la moderna urbo agrabla kaj higiena.

— Sed tiam mi ne povas klarigi al mi, kien oni metas la du milionojn da loĝantoj, kiujn havas Mondopolo laŭ tio, kion vi hieraŭ al ni diris; la urbo estas ja tre granda, sed la loĝejoj estas malmultaj.

— Sed ĉu vi kredis ke ĉi tie loĝas ĉiuj tiuj homoj?

— Mi ja . . .

— Ne, amiko: tio estas por ni, kiuj bezonas spiradon de freŝa kaj pura aero de l' kamparo en la domoj.

— Kion vi volas diri — kaj ne miru ke ni ne scias — per tiu „ni“?

— Mi signis per tio nin superpensantojn; nia nombro estas inter 16 000 kaj 18 000, kaj ni ne superas ĉi tiun nombron en la tuta ĉefurbo . . . la aliaj estas sube.

— La aliaj estas la parioj, ĉu ne?

— Jes, sinjorino.

Malgraŭ siaj intencoj kaŝi siajn pensojn Inés ne povis reteni riproĉon, kvankam poste ŝi pentis, ke ŝi lasis ĝin elbuŝiĝi, vidante la varmecon per kiu ŝia edzo ŝin subtenis.

— Ĉu ili ne bezonas, kiel vi, sanigan aeron?

— Estas diference, — rediris Marcial, iom kun miro

aŭdante kompari kaston kun kasto, kaj surprizite de la esprimo de malĝojo, kiun Inés metis en la demandon, — tute diference; ilia sano ne valoras por la socio tiom, kiom la sano de homo klera. Da ili ekzistas amasego, kaj ili povas anstataŭiĝi kiel la bestoj.

— Sed ili ne estas . . . Ĉu eble ekzistas ia diferenco inter ili kaj ni, kaj vi?

— Ekstere ne, sinjoro García, sed inter la inteligentoj kuŝas abismo.

— Nature, ĉar vi rifuzas al ili la instruadon.

— Bone oni rimarkas, ke vi estas el aliaj tempoj, plenaj de antaŭjuĝoj.

— Jes, Don Marcial, nek mia edzo nek mi estas jam kapablaj juĝi pri socio pli alta ol tiu de niaj tempoj.

— Ĝuste vi diris, Inés. Estas sendube ke, ĉar ĉi tiu urbo bezonas doni loĝejojn nur al tiu nomita nombro da loĝantoj, ĝi meritas nur laŭdon kaj admiron.

— Nun ni malsupreniru, por ke vi vidu de proksime unu ringstraton kaj unu avenuon.

## XI

### La urbaj stratoj kaj la modoj mondopolanaj

Post la haltigo de l' helikoptero sur la supraĵo de unu el la platformoj, kiuj leviĝas super la ringbulvardoj, Marcial kaj liaj akompanantoj estis malsupren portataj per lifto al la centro de unu el la cirklaĵoj. Ĝi konsistas el promenejo de centmetra larĝo, borderita de riverdigoj, kiujn lekas la akvoj de du flankaj kanaloj. Anstataŭ ke tiuj centraj vojoj estas destinitaj, kiel en la urboj de la 20-a jarcento, al la veturtrafiko kaj al la piedirantoj rapidantaj pro okupoj kaj negocoj, tie pasadas nur tiuj homoj, kiuj promenas por distrado aŭ por aĉetado, ĉar en ilia centro troviĝas ĉiuj komercejoj de Mondopolo, sub artismaj markezoj el malbrila vitro.

La varspecoj kaj vendobjektoj, ĉiuj libere videblaj kaj prezentataj kun la plej granda lukso, surhavas markitajn prezojn. La aĉetanto nur bezonas ĵeti en keston la signitan sumon por tio, kion li deziras akiri; tuj el sub la kesto elfalas ŝlosileto, kies ŝlosdentoj, respondantaj al tiu prezo, malfermas la pendseruron, kiu firmtenas la varon aĉetotan sur ĝia breto. Post tio, la aĉetinto nur bezonas ĝin meti kun la adreso de sia hejmloko sur la ekspedotablon, de kiu ĝi estas sendata en lian domon. La ŝlosileto restas kaptita en la seruro.

Sub la arkaĵoj de la kvarobla vico da arboj de l' centra promenejo same troviĝas la plej elegantaj hoteloj kaj kafejoj; je ĉiu dua kilometro estas baseno 60 metrojn larĝa kaj 90 longa, kun fluanta akvo, alkondukata el la flankaj kanaloj, en kiu viglege baraktas la gepasantoj, kiam ajn al ili plaĉas; ĉar la vestoj ĝenas ilin malmulte, kaj rapide ili estas demetataj. La banvesto estas tre simpla kaj konsistas nur, tiel por sinjoroj kiel por sinjorinoj, el surhaŭta trikoto, kiun uzadas ambaŭseksanoj. La modo de tiu banvesto estas tre antikva, ĉar jam en la dudeka jarcento oni komencis ĝin sur kelkaj banstrandoj.

La du eksteraj riverdigoj estas borderitaj de balustradoj, por eviti nevolan enakviĝon pro malatenteco en la kanalojn, kiuj flankumas la centran promenvojon laŭ la tuta ĉirkaŭurba cirklo de la rondbulvardo, al kiu ĝi apartenas. La du rivervojoj havas larĝon de 50 metroj, kaj tra ili okazas, laŭ kontraŭaj direktoj, la rapida trafiko de la aŭtoŝalupoj, t. e. komfortaj veturiloj amfibiaj, kiuj pasas de la firma tero al la akvo kun ĉia facileco sen alia interrompo ol ke ili lasas sin gliti en la kanalon kun la tuta rapideco akirita sur la tero, malkontaktante en la akvo la radojn de l' motoro, kiun kaptoturnilo kunigas kun helico. La manovro estas inversa, kiam la aŭto-boato alvenas remante kaj ekapogas siajn radojn sur la elpasejo de l' kanalo; tiam, la radoj rulmovas ĝin sur la menciitaj elirejoj.

Do, estas duoblaj la kanaloj respondantaj al ĉiu el la sep rondbulvardoj.

Ekstere de la kanaloj kaj inter ili kaj la fasadoj de la konstruaĵoj etendiĝas la trotuaroj, kiujn uzas tiuj, kiuj, sen bezono de urĝeco, ne necesas veturi per aŭto-ŝalupoj. Tiujn homojn oni apenaŭ rajtas nomi piedirantoj, ĉar neniu moviĝas per siaj piedoj, sed en komfortaj brakseĝoj, dank' al la genia mekanismo de la trotuaroj memcirkulantaj.

La tuta larĝo de ĉiu el ili estas 35 metroj. Ili ne konsistas el nur unu peco, sed estas formataj de kvar ringaj koncentraj platformoj, endentigitaj inter si kaj tiel proksimegaj unu al alia, ke la okulo ne konstatus la fendojn inter po du intertuŝigantaj, se al ili la atenton ne altirus la ŝanĝo de l' planka koloro.

La unua platformo, senpera al la fasadoj, konsistas el firma ŝtono, mezuras sep metrojn da larĝo kaj havas blankan plankon; la dua, tria kaj kvara, el ligno, mezuras po sep metroj; iliaj pavimoj estas malhele griza, ruĝa kaj verda, respektive. Ĉiuj havas en interspacoj grupojn de dek brakseĝoj en du vicoj frontantaj al la kanalo kaj al la centra promenejo de la ringstrato. Samtempe la tri troviĝas en konstanta movado, kiu forportas ilin en cirkla-rondo, sed je diferencaj rapidoj: la griza, malrapide, je kvar kilometroj ĉiuhore; la ruĝa je ok kaj la verda je dekdu. La gradiĝo estas adaptita, por ke la malgranda pliigo de l' rapideco ĉe unu al alia kaj ĉe la unua senmova al la dua ne malfaciligu al la transirantoj la pasadon inter ili.

Tial ke la brakseĝoj estas ĉiam moviĝantaj, kaj sufiĉe multnombraj estas la grupoj da ili lokigitaj sur la motor-trotuaroj, oni neniam bezonas atendi

pli longe ol unu minuton ilian alvenon; ĉiu veturonto elektas tiun, kies rapideco plejmulte al li plaĉas. Ekzemple: Kiu eksidas sur la motor-trotuaro griza, de la sepa, plej longa ringbulvardo (20 kilometroj da cirkonferenco), bezonas kvin horojn por la tuta ĉirkaŭveturo, dum kiu li vidas la tutan rondstraton; kiu uzas seĝegon de la platformo (preskaŭ ni povus diri: karuselo) ruĝa, du kaj duonon, kaj unu horon tiu, kiu preferas la verdan.

La plej eksterordinara kaj admirinda afero estas la malmulta forto necesa por movi tiujn grandegajn artfaritaĵojn; la kaŭzo estas, ke ili apenaŭ iom pezas, ĉar ili naĝas sur la kanaloj; tiuj platformoj estas fabrikitaj kun pezo malmultege pli granda ol tiu de l' akvo forŝovita. Tial ke, aliaflanke, ili estas kontinuaj, rondmoviĝante ĉiam sur la sama loko, ili ne bezonas lukti, kiel la ŝipoj, kontraŭ la rezistemo de l' akvo ĉe la antaŭenveturo, nek ili bezonas forton por fendi ĝin.

Je ĉiuj tri kilometroj motoro funkciigas ŝovelilan radon, kiu eligas la supran mezon super la platformon kaj metas la malsupran en la kanalon, aplikante kontraŭ ĝia akvo forton konforman al la rapideco, kiun ĝi devas transigi al la platformo helpe de la radŝoveliloj.

En la brakseĝojn sidigas sin kiu volas, sen ia ajn abono aŭ elspezo, ĉar la komunumaj estraroj de l' centa jarcento konsideras sia deviga tasko transporti senpage la personojn interne de la urboj: ne por ŝparigi al iliaj potencaj loĝantoj iajn kostojn, absolute indiferentajn al la estraroj, sed por eviti al ili intertuŝiĝon kun konduktoroj, kiuj ja devus aparteni al la

paria kasto, kaj kun ĉi tiu estas al ili eksterordinare ĝene kontaktiĝi.

En tri verdaj seĝoj de la tria ringbulvardo ĉirkaŭveturis ĝin la reviviĝintoj kaj ilia gvidanto, kaj la unuaj ambaŭ estis plenaj de admirego pri la belegeco de la urbo, kie la plej modestaj konstruaĵoj estas luksaj palacoj, kaj inter ili multaj brilriĉegaj, produktantaj la impreson pri urbo, kies ĉiuj domoj estas paganaj temploj de faraona imponeco; kie la monumenteco kaj ciklopeco ne forŝovas la subtilan delikatecon de arto fortika kaj elasta, kiu aplikas la arkitekturan formon kaj la skulptan kaj multkoloran ornamajaron kun vasta senco en la koncepto kaj kun miriga fili-graneco en la detaloj.

La konstruaĵoj en Mondopolo ne estas pli altaj ol du etaĝoj, sed ili havas altegajn tegmentojn. La mal-supraj etaĝoj estas destinitaj al staloj, remizoj, kuirejoj ktp., do al lokoj por servoj, kiujn oni konfidas al mutaj parioj nur ĝis tiu grado, ĝis kiu aŭtomatoj ne povas fari ilin. Ne surdmutuloj, ĉar ili bezonas la aŭdkapablon, sed nur mutaj per *k o m p a t a t r a k t a d o*; ĝi nomiĝas „kompata“, ĉar anstataŭ eltranĉi ilian langon, oni atrofiigas iliajn voĉbendojn per radio-elektraj procedoj, ne kaŭzante al ili ian ajn doloron.

Sur la tegmentteraso — veraj edenoj — alternas gigantaj kaktosoj kun delikategaj filikoj en centoj da variaĵoj. Gracilaj palmoj balancas siajn foliojn super la branĉaroj de ampleksaj „flamboyanes“, koralruĝe vestitaj, kaj la poeziplenaj „húcares“ pendigas de siaj branĉoj melankoliajn standardojn kaj girlandojn de

velkfolia koloro, malpezajn kiel fea brodaĵo teksita de araneoj-magiistoj.

Post kiam ili vidis unu ringbulvardon, Marcial kondukis siajn gastojn al avenuo, uzante tiucele aŭto-ŝalupon; ili malsupreniris al ĝi sur unu el la peronoj, kiuj en la strat-anguloj kondukas al la viadukto, kie en ĉiu kruciĝo de ringbulvaroj kaj radiaj avenuoj tiuj ĉi lastaj pasas super la bulvaroj.

Ĉiuj tiuj radiusaj stratoj havas kontraŭ la interno de la urbo kiel fonon la Palacon de l' Mondo, kaj kontraŭ la ekstero la gigantan amason da verdaĵo de la fierbela afrika arbarego, en la lokoj kie Mondopolo ne estas ĉirkaŭita de la lago; aŭ ili havas kiel fonon la lagon en unua vico kaj transe la gigantan montan kompaktaĵon de l' afrika grandegulo, la kolosan Ruvenzoron<sup>20</sup>, kun ĝia kapo kovrita de ĉiama neĝo.

La radiaj stratoj konsistas el centra avenuo por piedirantoj, du flankaj ŝosepartoj por aŭtomobiloj, kaj senmovaj trotuaroj. De la ŝosepartoj malsupreniĝas kurbaj peronoj al la kanaloj de la ringbulvaroj, kaj sur ili malsuprenveturas per siaj radoj la aŭto-ŝalupoj por daŭrigi remante, kiam ili eniris la akvon.

Cent dudek metrojn da larĝo kaj ses vicojn da arboj havas la centra promenejo, kie, samkiel en la ringbulvaroj, troviĝas vendejoj, kafejoj, kinematografejoj, bilardejoj ktp.; kvardek metrojn larĝa estas ĉiu flankŝoseo por la veturtrafiko.

\*



Epizodeto ne prisilentinda dum tiu unua promeno de la eksfrostiĝintoj tra la urbo estis la renkonto, en la tria ringbulvardo, kun sinjorino, kiu en Mondopolo estas arbitraciulino de l' eleganteco.

Inés, kiun supozeble jam kuracis de skandalaj ekteruroj la freŝegaj vestoj — ni nomu ilin tiel —, kiujn portis ĉiuj sinjorinoj jam renkontitaj sur la promenejo, ne fidis al siaj okuloj, kiam ŝi fiksitis ilin sur la modreĝinon, kiu proksimiĝis al ili, igante ekkrii dum preterpaso la promenantojn per jenaj diroj:

„Hodiaŭ ŝi estas frakase impresa. Kiom kuraĝa, kiom artisma kaj kiom eleganta! Ne ekzistas alia, kiu vestiĝas kiel ŝi!“

— Estas la edzino, mi volas diri: la nuna amikulino de l' Plejalta Afergvidanto, — diris Marcial. — La modoj, kiujn ŝi debutigas, produktas ĉiam eksterordinaran sensacion; sendube ŝi portas hodiaŭ iun alian novan kreaĵon.

La ulino, kiu estis la celo de la ĝenerala kaj admira scivolo, antaŭenvenis sur la centra promenejo, vestita kiel universo aŭ firmamento: vestaro konsistanta el ĉapelo, sandaloj, braceletoj, kolĉeno kaj zono. Kaj neniom pli.

La kolĉeno valoris imperion: ĝiaj ses volvaĵoj el blankaj perloj reliefiĝis eksterordinare sur la brustplato, tinkturita, kiel la ŝultroj, je malhela bronzkoloro, kiu en la pli malaltaj partoj de l' trunko malintensiĝis, ĝis ĝi fariĝis brila orkoloro ĉe la talio kaj la koksoj, kaj de tie ĝi plu delikatiĝis, ĝis ĝi, kiel subtila pajlkoloro, malsupreniris al la piedoj, kies ungojn kolorigis

tre viva karmino. De la zonaĵo pendis dudek perlŝnuroj nigraj, facetitaj kiel detranĉitaj piramidoj, ĉiu pli malalta ol la antaŭa, kaj la lasta kaj plej malalta atingis ĝis la mezo de l' femuro. Sur tiu maldensa kaj diafana antaŭtuko, kiu imitprezentis la nokton, pendis vertikale, kiel ondumantaj franĝoj, nenombreblaj unuopaj fadenoj da brilantoj, rubenoj kaj smeraldoj, ŝajnigantaj stelojn diverskolorajn, kiuj fajretadis sur la nokto de la perloj kaj blindigis — feliĉe, laŭ la opinio de Inés — la observantojn de la malpezega vesto.

Sed la plej pompa kaj originala je la vesto estis, ke inter la blankaj perloj sur la kolo kaj la nigraj de l' gracia drapo de la zonaĵo brilis dekstre sur la brusto suno el oro kaj maldekstre arĝenta luno kreskanta. Tio sugestis al García la rimarkigon ke, ĉe daŭra kreskado, tiu luno fariĝus troa luno, kiam ĝi estiĝus plena.

La venusaj formoj de la belulino akiris notindan skulptecan reliefon per la bronzkoloro, kiun ili havis. Krome, pro rafinita koketismo, kolo, vizaĝo kaj brakoj montriĝis ne kun la neĝa blankeco de l' propra haŭto de la sinjorino, sed kun la brilaj reflektajoj de la perlamoto, dank' al emajligo de la haŭto, produktita per pulvoroj el disfrotitajoj de tiuj multekostaj konkoj; brovoj kaj okulharoj montris violkoloron; la lipoj ŝajnigis esti petaloj de ruĝaj diantoj.

Fine, la kapo reprezentis la planedon Saturno: la verda hararo estis aŭreolata per la konataj ringoj de l' tipa astro, formitaj el splitetoj de juvelŝtonoj inkrust-

itaj en subtilaj ringoj el platino, kiuj tremetadis dum la marŝado.

Nek la famkonataj frizaĵoj de Kleopatro, pri kiuj parolas la historio, nek la aŭdacaĵoj de la plej notindaj korteganinoj dezirus konkuri kun la originaleco kaj kosteco, nek eĉ laŭ kuraĝa senĉasteco kun la diafanega vesto de la plej fiera inter la Mondopolaninoj. Unu el tiuj, kiuj ekstaze ŝin rigardadis, ekkriis:

— Ŝi portas sur si valoron de kvindek milionoj!

— Kaj malgraŭ tio ŝi ne sukcesas ion kovri, — diris Inés hispane al ŝia edzo. — Kia senhontulino!

— Ba, — rediris tiu. — Pli malpli kiel ĉiuj, kiujn ni jam vidis.

Kaj tio estis vero. La ĉasteco de la virino, kiu jam, en la dudeka jarcento, fariĝis antikvaĵo el pasintaj epokoj, estis en la centa kompleta forgesitaĵo ĉe la elegantaj sinjorinoj, kiuj estis alvenintaj jam ĉe la fino de l' vojo komencita, en kiu la sinjorinoj penadis ĉiutage montri ion pli ol je la antaŭtago.

Kaj notinde estas, ke la bedaŭrinda Inés, misformulino laŭ la opinio de ĉiuj elegantulinoj, ridantaj pri ŝiaj tri vestoj metitaj unu sur la alia, en tiu posttagmezo estis multe pli rigardata de la kavaliroj ol la reĝino de la modo mem. Ĉar tial ke ŝi estis la sola, kiu kovris ion, ŝi inspiris la scivolan intereson, kiun nek tiu ĉi nek tiuj aliaj povis vekti.

## XII

### Edukado »fin de siècle« . . . de l' jarcentoj.

Niaj tri promenantoj staris en la XII-a radia avenuo. Jam vidinte unu el tiuj avenuoj kaj unu ringbulvardon, ili estis preterpasantaj belegan konstruaĵon, super kies monumenteca portalo estis legebla surskribo el grandaj oraj literoj preskaŭ unu metron altaj: Edukejo Internacia.

Ĉar mankis ankoraŭ du horoj kaj duono ĝis la tagmanĝo — ili estis matenmanĝintaj sub libera ĉielo kaj cetere tre bone en la III-a ringbulvardo — Rucandio, vidante la edukejon, ekpensis, ke li povos utiligi tiun tempon por montri al siaj geamikoj la instituton. Vere intereseĝa instituto, ĉar tiaj edukejoj (kie el infanoj la superpensantoj fariĝas plenkreskuloj) estas en ĉiuj landoj la fundamento de la sociaj klasoj kaj de la civilizo de l' centa jarcento.

Oni imagu, kion bezonadas korpo kaj cerbo de individuo de la naskiĝo ĝis la aĝo de dudek jaroj: de la artefaritaj mamoj kun fosforhava lakto, por komenci la fortigadon de la inteligenteco jam en suĉula aĝo, ĝis la plej perfektaj laborkabinetoj kaj sciencaj laboratorioj necesaj por ĉiuj karieroj kaj profesioj; oni kun-

igu ĉiujn konatajn rimedojn higienajn, mekanikajn, gimnastikajn kaj sportajn, por fortikigi kaj evoluigi la muskolojn; oni dismetu ilin ĉiujn en dormejoj, manĝoĉambroj, aŭloj, banejoj, ĝardenoj ktp. ktp., aranĝitaj kun la plej granda rafineco de higieno kaj pedagogio — tuta dombloko kun surfaco de 700 000 kvadrataj metroj en la VII-a ringbulvardo estas okupita por tiu celo —; oni administrigu ĉi ĉion de la plej eminentaj doktoroj kaj profesoroj — kaj jen oni havas la elementojn, kiuj faras la Edukejon de Mondopolo modelo ĝiaspeca, pri kiu ne estas eble raporti detale, ĉar tio plenigus libron.

La sola afero, pri kiu oni tie malzorgas, estas la koroj de la edukatoj; sed ne, mi maltrafe esprimis min: oni ne malzorgas ilin, oni ilin atrofiigas. Tial ke estas la celo de l' edukistemo instrui la manieron, per kiu oni povas eltiri el la vivo la plejeble grandan kvanton da materiaj plezuroj, laŭ egoisma koncepto pri ĝi, sentemaj koroj kaj puraj konsciencoj estas malhelpoj por tiu celo.

Nia paro el la 20-a jarcento estis ravita; ambaŭ ne laciĝis eldiri al la grandioza instituto abundajn laŭdojn, kiuj krom flati Marcial'on rimarkigis al li, ke homoj formulantaj tiajn juĝojn posedas inteligentecon kaj eĉ kulturon multe pli altan ol supozeble estis ĉe la barbaroj de l' preskaŭ prahistoria jarcento XX, kaj eĉ pli grandan ol li jam estis konstatinta ĉe ili.

En tiujn edukinstitutojn venas ĉiuj infanoj de la superĝuantoj kaj, escepte, kiam alarme maloftas la naskoj, ankaŭ kelkaj el pli malalta deveno. Ĉar inter

la supercivilizitaj mastroj de l' mondo ekzistas nek edzeco nek familio, sed nur rapidpasema amikumado provizora; ĉar vartado kaj edukado de infanoj estas ĝenaj malhelpoj, kaj la infanoj estis ĉiam fonto de mal-konkordo inter eksamikumiĝintaj patroj kaj patrinoj, la registaroj en la 97-a jarcento vidis sin devigataj edikti leĝojn kaj instalati institutojn, kie la idaro de ĉiuj (kompreneble nur de ĉiuj supraklasanoj) estu prizorgata per la lukso nemalhavebla de tiuj, kiuj post forlaso de l' kolegio devos esti potencaj personaĵoj. Tien estas transdonataj ĉiuj tuj post la naskiĝo helpe de la tokologoj — en la centa jarcento neniu diras „akuŝisto“ —, kiuj, sub sia respondeco, havas la devon zorgadi por ili jam de la unua momento postnaskiĝa.

Sed je tio ne kontentiĝis la antaŭvidemo de la leĝistoj. Konsiderante la konatan fakton, ke iu kun posedo de malpli ol dekkvin milionoj estas netolerebla ŝarĝo por la socio, oni publikigis en la origina leĝo, ke ĉe la eniro de ĉiu novnaskito en iun edukejon la gepatroj devas enmeti en ĝian konton sumon, kies rentumoj ne nur sufiĉos por kovri la kostojn, kiujn faros la edukoto al la instituto ĝis sia dudeka jaro, sed kiuj, kunigate kun la kapitalo, formu gepatran doton por la infano — „gepatran“ sen gepatroj — en la kvanto de dekseks milionoj, kiujn oni transdonas kiel plenan proprajon al la edukitoj ĉe ilia foriro el la kolegio. Kaj ĉar tia doto sufiĉas nur por la nepra vivnecesaĵo, al ĉiuj oni instruas ankaŭ karieron.

La nekapabluloj por la studado kaj la malmultaj, kiuj montras, ke ili havas nekorekteble bonan koron,

netaŭgan por hardeco, estas konsiderataj kiel malnormalaj, ŝtoniĝinte sentimentalaj; ili estas degradataj de la kategorio de superĝuantoj, elpelataj el la kolegio kaj ĵetataj malsupren, por vivi kun parioj kiel iu ajn el ili. La sumoj por ili deponitaj en la instituto estas uzataj por formi la dotojn de la adoptitoj, speciala klaso, pri kiu ni ankoraŭ parolos, kaj por la naskitoj en la edukejoj.

— Kiel, Don Marcial? — demandis Inés, tion aŭdante. — Ĉu ĉi tie okazas naskiĝoj?

— Multaj. Tial ke edukatoj kaj edukatinoj restas ĝis la aĝo de dudek jaroj en la edukinstitutoj . . .

— Sed ĉu ili vivas intermiksita? Ĉu ekzistas la ebleco ke okazas tiaj aferoj?

— Nature . . . Kial disigi ilin? . . . Estas bazo de nia eduksistemo ne meti neutilajn ĝenaĵojn sur la gekolegianojn. Kaj ĉar estus tre granda ĝeno starigi barojn al la altirforto de la seksoj ĝuste en la aĝo, kiam tiu altiremo manifestiĝas per la plej ĝranda forto, estas klare, ke la infanoj de l' edukejo estas multnombraj. Estas malofta la fraŭlino, kiu foriras de tie, ne naskinte unu fojon; kaj la plej maturaj, plurajn fojojn.

La geedzoj interŝanĝis elokventajn rigardojn; kaj forte devigante sin por ne eldiri tion, kion ili pensis pri la maturaj kolegianinoj, ili silentis.

Rucandio daŭrigis:

— Ĉi tiu sistemo de vartado kaj edukado estas multekosta, multekostega, sed ekstreme oportuna por la gegenerantoj, kiuj kompanse de ĝenaĵoj kaj penoj

trovas ĝin tre malmultekosta, ĉar tial ke ili ne ekonas siajn gefilojn, ne ekzistas timo pri tiaj ĝenaĵoj. Pro tio la plimulto de la gepatroj, kiuj jam antaŭ la leĝedikto zorgadis kiel eble plej malmulte pri la idaro, opiniis bone elspezita la monon, kiun kostis al ili la reformo.

Sed baldaŭ oni kunpuŝiĝis kun malfacilaĵoj. Patro kaj patrino poduone devis pagi la deponotan sumon. Nu, ĉi-lasta ĉiam troviĝis, sed la patro ofte provis forigi de si la ŝarĝon, refutante la ateston de la patrino; kaj aliafoje konsciencaj skrupuloj malhelpis ŝin klare eldiri, ĉu la patro estis tiu aŭ tiu. El tio rezultis malfacilaĵoj ĉe la havigo de la gepatraj pagoj kaj perdoj ĉe la rentumado.

Aliaflanke la naskoj, ĉiam alarme maloftaj inter la superĝuantoj, minacataj jam per estingiĝo de ilia privilegiita klaso, pli kaj pli malkreskis, kaŭze de la deziro forigi de si la malamatan pagon de la patreca doto. Kaj fine tamen estis necese radikale forigi kaj anstataŭigi ĝin per „ĝenerala porgenera kontribuo“, kiu evitis la nediskretajn kaj delikatajn esplorojn pri patreco, kaj al la sinjorinoj deklarojn de intima kaj malfacila speco pri la personeco de ŝiaj kunagintoj.

Konsekvence ĉiu, viro kaj virino, estas submetata post la elkolegiĝo al pago de ĉiujara porgenera kotizo. Ĉu li aŭ ŝi ĝeneras aŭ ne, pri tio neniu faras esplorojn.

La reformo estis bonege akceptata kaj donis la antaŭviditajn rezultojn, nome ke pliiĝis la nombro de l'



naskoj kaj kvietiĝis la ĝistiamaj alarmtimoj de iliaj kaŭzantoj.

— Aŭskultu, sinjoro Rucandio; ĉu la geedukatoj en la edukdomoj ankaŭ pagas la kotizon?

— Ne, sinjoro; tial ke ili ne posedas sian havaĵon, ili pagas neniom.

— Do, laŭ tio, nur en la edukejoj ne ekzistas baroj por . . . tio?

— Kia porkeco! — interrompis ĉi tie Inés, ne povante plu sin regi. — Tio ne estas kolegio, sed . . . Plibone estas ne diri ĝin.

— Sinjorino, vi ne devas juĝi facilanime, laŭ viaj ideoj el jarcento de malkleruloj, niajn plejmulte pripensitajn institutojn, nek la klarvidan liberecon, en kiu la leĝistoj lasas la gepensionulojn, por obei al la saĝa natureco. Tiel ili savis de estingiĝo la privilegiitan kaston de la superpensantoj (ĉar 45% de ĉiuj naskoj okazas en la edukinstitutoj), kaj atingis krom tio, ke la geedukatoj ne malŝatas la kolegion, kiel en tempoj pasintaj.

— Volonte mi kredas . . . Ĉar ja ne malkontentaj ili estas, supozeble, pri tia reĝimo . . .

— Sinjoro Rucandio estas milfoje prava, Inés; vi ne atentis tiujn intereseĝajn aspektojn de la demando. Kiel povus konsenti la leĝistoj evidentan memmortigon de sia raso? Kiel ili povus esti tiel kruelaj por limigi naturajn ekspansiojn de la junularo, kies utileco manifestiĝas en tiuj 45%, pri kiuj parolis al ni Don Marcial?

— Certe, certe, sinjoro García; mi vidas ke vi

havas la cerbon de superpensanto, juĝkapablon mirindan kaj spiriton superan al' via jarcento.

Inés, kiu estis nervema, indignita kaj eĉ naŭzita, forgesis la prudentajn decidojn kaŝi sian juĝon pri socio kaj homoj de l' jaro dekmil; kaj kvankam ŝi estis bone rimarkinta la ironion en la parolo de Juan, ne kompreneblan por Rucandio, ne sufiĉis al ŝi tiu hipokrita maniero kondamni la malmoralecon de la eduk-ejoj, kaj arde ŝi ekkriis:

— Jes, per tiaj teorioj ĉio estas pravigebla . . . Eĉ la fundamenta ideo de tiu ĉi sistemo, monstra bazo de ĉiuj ceteraj monstraĵoj.

— Monstraĵoj! . . . Kiaj, Doña Inés?

Ĉi-foje la roloj estis interŝanĝitaj. Anstataŭ, kiel ĝis nun kutime, Juan estis la impulsema kaj Inés la singarda, estis li, kiu ĵetis rigardojn kaj faris signojn, sed kiujn ŝi ne atentis kun la obeemo, por kiu kutime estadis ekzemplo la edzo en similaj kazoj. Ĉar tial ke Inés ne povis kontentiĝi pri tio, ke interne de ŝi putru tio, kio jam superŝaŭmis, ŝi tute ne atentis pri palpebrumoj, piedpremoj aŭ kubutpuŝoj; ŝi rompis komplete ĉiajn barojn, forlasis ĉian retenemon kaj respondis al Rucandio:

— Kia monstraĵo? Tiu de ĉi tiu infan-azilo! Ĉar finfine, malgraŭ la ĉi-tiea lukso, malgraŭ ĉi tiuj profesoroj ja plensangaj de scienco, sed senaj de patraj sentimentoj, tio ne estas io alia: unue azilo de suĉ-infanoj kaj poste azilo de gebuboj, en kiun falas ĉiuj kreitaĵoj, kiuj havas la malfeliĉon naskiĝi en ĉi tiu jarcento; azilo, kiel tiuj en mia tempo, kiuj ne estis

pravigaĵoj, sed almenaŭ rimedoj kontraŭ mizero aŭ krimoj de l' gepatroj; sed ĉi tiuj estas inversitaj, ĉar al ili ne venas la infanoj de la malriĉuloj, sed de la bonhavuloj: la solaj gepatroj kiuj en ĉi tiu epoko forlasas la siajn.

— Forlasi! . . . Ŝajnas al mi neĵuste kruda ĉi tiu vorto, por apliki ĝin al tiuj, kiuj ekzaktege scias, ke iliaj gefiloj estos ĉi tie vartataj per la prizorgego, kiun vi ĵus vidis.

— Sen gepatra amo, kiu gvidas iliajn konsciencojn kaj korojn: jen, jen la plej malĝojiga el ĉiuj forlasitecoj, kies viktimoj estas ĉi tiuj malfeliĉaj infanoj.

— Juĝante laŭ la ideoj de malprogresaj socioj . . .

— Ne, sinjoro, ne: juĝante laŭ tiuj de la plej glora civilizo, laŭ viaj propraj.

— Tion mi jam ne vidas tiel klare, Doña Inés.

— Nu, ĝi estas klarega, kaj vi tuj vidus ĝin.

— Vi vekas mian scivolemon, estimata amikino, kaj mi kredas ke vi promesdevigas vin al multo, — respondis Rucandio. Li estis interesita ne nur por vidi, kiel Inés pruvos tion, kio al li ŝajnis absurda paradokso, sed eĉ iomete trafita de la viveco kaj la fajreco, per kiu ŝi parolis, kaj de la entuziasmo kaj la inteligenteco, kiuj brilis en ŝiaj okuloj.

— Kredu min, ke mi multe interesiĝas vidi, kiel vi uzos vian spriton por venke eliri el ĉi tiu dilemo.

— Je vi mem vi konvinkiĝos.

— Tio ne ŝajnas facila al mi.

— Ni vidu. Ĉu ne ŝajnus al vi dolora, absurda, kriminala, se la kreinto de la fundamentideo de iu

verko donus ĝin nekompleta, ankoraŭ en la ŝelo, al alia persono, por ke tiu ĝin pluevoluigu en libro?

— Kia sensencaĵo!

— . . . se la inventinto forlasus en la laborejo la fundamentan principon de sia aparato aŭ maŝino, por ke dum lia foresto la laboristoj, sen lia direktado kaj viglado, pluevoluigu liajn pensojn kaj finu la inventon aŭ tion, kio ajn rezultus, sen tio ke li eĉ nur minimume zorgu pri verko aŭ maŝino, eĉ ne pro scivolemo vidu la libron aŭ la aparaton jam pretigitan?

— Estimata amikino, tio estus monstra; kiu tiel agus, montrus ke li estas neinda krei ion ajn.

— Kaj ĉu vi kredas ke homa kreitaĵo, nura embrio de personaĵo ĉe la naskiĝo, sed kun animo, kiu estas elfluo de ĝia patro, kaj kun korpo, kiu ofte estas lia evidenta bildo, valoras malpli ol la embrieca projekto de maŝino?

— Tio ne estas la sama afero, Doña Inés.

— Ne, certe ne, kiel do? Vi kaj mi estas kaj valoras multe pli. Ĉu ni konsentas aŭ ne pri tio, ke la animo kaj la cerbo de Don Marcial Rucandío estas io pli grava ol la mekanismo de linotipo aŭ la izoligo de l' metalfadeno en elektromagneto?

— Nature . . . sed . . .

— Kaj malgraŭ tio, vi kiu opinias neinde krei ion, pri kio vi ne zorgas . . .

— Ha, jam mi vidas, kion vi celas; sed tio ne estas la sama, ne estas la sama.

— Logikon, Don Marcial! Se vi diskutos per ĝia helpo, vi ne havos alian rimedon ol same kondamni

tiun, kiu transdonas sian infanon al tiuj edukejoj, por ke ĝi estu muldata aŭ disformata aŭ perdigata de indiferentuloj kompareblaj al taglaboristoj.

— Amiko García, tio ja estas vera polemikulino! Spritaj, geniaj estas ŝiaj komparoj.

— Ne, sinjoro, ne; genie estas eviti la respondon al miaj demandoj per laŭdo, kiun mi ne meritigas. Tiel oni akiras la famon de ĝentilulo, oni devigas min je danko, sed ne montras ilian pravecon.

— Vi estas nepacigebla kontraŭulino.

— Neniel, kaj por pruvi ke mi ne deziras repeli vin en viajn plej lastajn kaŝejojn, mi estas tiel grandanima ne insisti pri la respondo al miaj antaŭaj demandoj, nek al ĉi tiu alia, kiun vi respondu al vi — mi permesas tion — mallaŭte en via konscienco: Ĉu vi ne vidas klare kiel vidas mi, ke ĉiu kreitaĵo, eniranta en ĉi tiujn edukejojn, estas viktimo de vera krimo de siaj gepatroj?

La demando ŝajnis fari tiel profundan impreson al Marcial, ke li hezitis momenton, kaj fine respondis per voĉo ne tre firma:

— Malmolajn frazojn vi uzas!

— Kaj lerta estas vi malentrepreni ilian respondadon.

— Inés, mi kredas ke ni jam tro uzis la afablecon, per kiu Marcial dediĉis al ni preskaŭ la tutan tagon.

— Pro kio mi estas tiel dankema kiel vi; kaj mi esperas ke li pardonos la aŭdacon, per kiu sovaĝulino el la prahistoria Hispanujo eldiras juĝojn pri la mondo civilizita.

— Mi nek subskribas la nomon kiun vi aplikas al vi nek bezonas ion pardoni, sed, male, danki vin pro via societo, en kiu mi pasigis tagon tiel agrablan, kian mi jam de multa tempo ne plu pasigis.

— Efekto, — respondis García, — de nia ekzotikismo, kiu por vi estas novaĵo.

### XIII

#### Marcial malsupreniras al la mondo de la parioj

Post la alveno en la muzeo kaj la adiaŭo de Juan kaj Inés apud la pordo de iliaj ĉambroj, Marcial iris enpense al la sia. La argumentoj de Inés pri la supercivilizita edukado moderna estis farintaj en li eĉ pli da efiko ol ŝi supozis; kaj nepre nekompareble pli ol estis lasintaj diveni la ŝercoj, per kiuj li penis ilin kaŝi.

Dum li sola vespermanĝis, li ne ĉesis pripensi ĉion laŭ ĉiuj flankoj. Kaj kvankam ĉio ĉi batalis kontraŭ liaj ĉiamaj konvinkoj, li diris al si, ke al multaj argumentoj de Inés, eĉ senigitaj de ĉiaj ornamaĵoj kaj sentimentalaĵoj — kio sendube estis la plej interesa en ili — li ne povis nei racian fortecon.

— Ne, — li diris al si, alveninte je ĉi tiu punkto de sia spirita dialogo, — en ĉi ĉio ne estas racio eĉ por duona speso, sed nur ridinda emocio: reekscitiĝo de malnovaj sentimentalaĵoj, de kiuj mi kredis esti jam tute kuracita; aŭdante ilin de Inés, mi sentis reveni ilin por maltrankviligi min per la rememoro pri . . . Ridindaĵoj, hontigaj malfortaĵoj! Ĉar ĉu ne estis eĉ momento, en kiu ŝajnis al mi, ke mi sentis tion, kion iaj antikvegaj libroj iam falintaj en mian manon nomis „konscienciproĉoj“? Kia sensencaĵo!

Tiel pasis la manĝo, dum kiu li ne konsciis kion li manĝis, kaj post ĝia fino li iris al la laborĉambro, por daŭrigi la komencitan redaktadon de scienca traktaĵo pri interesa demando de biologio.

Kelkajn minutojn poste, kiam li estis ekpreninta la plumon, li devis kontroli citaĵon el iu libro, kaj konsultante ĝin li trafis la sekvantan alineon: „El la esploradoj kaj eksperimentoj faritaj en cerboj de infanoj“ — la traktaĵo de Rucandio rilatis al la disvolvigo de la inteligenteco en la unuaj jaroj de la infaneco — „de la eminenta Mansfeld rezultas . . .“

Legante ĉi tion Marcial rememoris ke tiu eminenta Mansfeld, laŭ la diro de Cartoya, estas nuntempe pario: paria pastro, stato, en kiun li, laŭ propra volo, estis falinta.

Dum la du tagoj, kiuj finiĝis en tiu nokto, la kuriozaĵoj, kiujn inspiris Juan kaj Inés, estis forigintaj la sciavidon, kiun la renkontiĝo kun lia malnova amiko estis vekinta; sed nun denove ĝin vigligis la rememoro estigita de la legado de tiu alineo, kiu ekscitis per maltrankvila senpacienco lian deziron ekkoni la motivojn de la nekomprenebla absurdaĵo, ke Cartoya estis rezigninta sian gloran kaj sibiritan vivadon inter la instruituloj, potenculoj kaj feliĉuloj de l' mondo, por dronigi sin en la malŝatinda ekzistado de la sensciaj, mizeraj kaj malfeliĉaj parioj. Pensante ke li ne efektivigos ion profitan, dum li ne kontentigis tiun deziron kiu subite fariĝis prema, li kunmetis la paperojn, rigardis al la horloĝo — estis la dudekdua kaj duono — kaj eliris el siaĵ ĉambroj. Li direktis sin al la lifto, kiu



devis lin porti al la subterejoj, kien logis lin la intereso aŭdi la promesitan historion pri la sinmortigo de Cartoya kiel superĝuanto.

Alveninte malsupre, li demandis sinsekve tri aŭ kvar preterpasantojn, kie loĝas tiu kiun li serĉas, kaj vidinte, ke ili ne sciis respondi al li, li decidis laŭ la konsilo de unu el la demanditoj turni sin al la restadejo de l' patriarko Hobbson, kiun li petis vojdirekti lin; tiu faris tion, komisiante al pario, ke li konduku Marcial'on al la loĝejo de Cartoya. Fiksante je Rucandio bonecan sed trapenetran rigardon, kiam kun saluto li adiaŭis de li, li diris:

— Dio vidu vin veni kaj vin gvidu, filo mia.

— Dio! . . . dankon pro la bonintenco, sinjoro Hobbson, — respondis Rucandio, ĉe kiu la granda respekto al la saĝa radiologiisto universalfama estis pli forta ol la stranga miro aŭdi el lia buŝo tiun infanecan alvokon al iu Dio, pri kiu jam de jarcentoj ne plu pensis la superpensantoj: de kiam iliaj inteligentoj kaj iliaj voloj ne sekvis en la vivo alian celon ol amasigi plezurojn.

Multfoje Marcial estis malsuprenirinta al la subterejoj; sed neniam li estis pasinta transen de la belaj, helaj kaj altaj haloj dediĉitaj por laborejoj, kie laboradas la parioj, nek de la grandiozaj magazenoj, kie kolektiĝas la produktoj de tiu laboro kun la celo kontentigi bezonojn de iliaj subpremantoj.

Do en tiu nokto li vidis je la unua fojo la mallarĝajn koridorojn, kiuj servas kiel stratoj en la malĝojiga loĝejo, kien la civilizacio de l' centa jarcento ekzilas

la pariajn amasojn de Mondopolo, enmasonante ilin en la ter-internaĵojn. En la grado kiel li antaŭeniris tra la labirinto da galerioj, kies plafonoj estas atingebraj, se oni nur levas la brakon, kaj en la grado kiel li krucis la vojon kun mizeraj preterpasantoj, ĉi tiuj faris al li la efektan de talpoj aŭ lacertoj, kiuj palpe moviĝas en giganta terkaverno: palpe, ĉar la kontrasto inter la blindiga lumo de la laborejoj kaj la malsufiĉa heleco avare ŝparita en la malĝojigaj stratetoj produktis al li ĉe la eniro la impreson, ke ĉiuj tiuj malfeliĉuloj formikumas inter mallumaĵoj.

Kiam liaj okuloj estis alĉutimiĝintaj al tiel melanĉolia duonlumo, ŝajnis al li, ke tiu malsufiĉa lumo estas nur la nepre necesa por ekkoni, kiom malĝojiga devas esti la vivo de la konsumiĝantaj kaj malbonnutrataj kreitaĵoj kondamnitaj por ĉiam vegetadi kiel fungoj en keloj.

Sed kial tiu surprizo? Kial la deprema impresoj, kiun li sentis, ĉar li ja sciis bonege, de longa tempo, kiel vivas la parioj? . . . Jes, li sciis; sed li nek estis vidinta nek estis sentinta ĝis tiam la fizikan premon de tiu pesteca aero nek la animstaton produktatan per la malbele nigra plafono de la senfinaj koridoroj, kiu ŝajnis pezi sur lia kapo, nek la timigan impreson de ilia mallarĝeco inter muro kaj muro, tiel proksimaj unu al alia, ke ili, pro la kombinita efekto de la perspektivo kaj de la malheleco, ŝajnis kuniĝi en distanco de nura centoj da metroj, malhelpante la pasadon kaj kunpremanante inter si la trairantojn vidatajn el distanco.

Ne, ne estis la sama afero pensi „pri tio malsupra“, dum en libera aero kaj en sunlumo oni promenis tra la belegaj avenuoj de Mondopolo, — ne estis la samo kiel vidi ĝin en nesufiĉa, preskaŭ ombrovenkita lumo, sentante fali sur sin tiam kaj tiam la gutojn da akvo, kiuj formiĝis el la malsekaĵo de la muroj kaj volbaĵoj; ne estis la samo diri: „la parioj loĝas tie malsupre“ kiel vidi ilin amasigitaj en iliaj ombraj fi-loĝejoj kaj vagadi tra la malbonodoraj stratetoj. La ĉionpova scienco de la centa jarcento ne sciis solvi la problemon de efika aerumado de la subtterejoj; ĝi estis sciinta solvi ĝin nur en la belegaj deponejoj, kie estis necese konservi en bona stato la produktojn de la paria industrio; sed ĝi ne estis kapabla solvi ĝin en la kavaĵoj de iliaj loĝejoj.

Marcial konsideris sin — kiel ĉiu de supre — el alia kasto, nekompareble supera al tiu de malsupre. Li rigardadis ilin pli malpli kiel bestojn, pri kiuj neniu miras, ke ili vivas kiel bestoj, kaj li sentis por ili ne nur la notitajn impresojn, sed krome ĝenitecon vidi sin inter tiu aro, intermiksita kun homoj degraditaj: sume, naŭzon.

Kion dirus lia majstro, se li sciis, kie li iras, ĉirkaŭate de ĉiuj tiuj forĵetitoj? — li diris al si, jam preskaŭ pentante aŭ hontante pro sia malsupreniro en la katakombojn. Kion estus respondinta Don Roberto, se li, kiel Hobbson rilate lin, estus havinta la impertinentecon supozi, ke homo de la scienco, superpensanto, povus esti gvidata ne per la forteco de sia in-

teligento kaj de sia suverena volo, sed de fantaziaj povoj supernaturaj?

Tute certe Mob estus rejetinta la aserton, ke en liaj agoj povus influi iu Dio, ekzistanta nur en la superstiĉo de la malbonŝanceluloj; tiom certe, ke Rucandio sentis ne malgrandan honton ĉe la penso pri tio, kion dirus Don Roberto, se li konus la malfortecon de sia kunlaboranto, kaj li ekhaltis meze de l' vojo, dirante al si, ke eble estus plejbone reiri, ne vizitinte Cartoya'n. Sed, ĉu estis sciivolo ekkoni la promesitan historion, ĉu inklino al lia malnova amiko, tiam revigligita, ĉar li vidis ke la ofero de l' saĝa arkitekto, se li obeis al iu libervola impulso, estis eĉ pli herosa aŭ frenezata, ol li povis imagi antaŭ la malsupreniro en la subterejojn; estu kiel ajn, triumfis tiu intereso super liaj ŝanceliĝoj, kiuj estis komplete venkintaj, kiam al li diris la konscienco, ke estas devo, pro lia malnova amikeco fari ĉion eblan por elŝiri Cartoya'n el la malŝateginda stato, en kiu li troviĝas.

---

Kiam li eniris en la domon de Cartoya, — se tia nomo taŭgas por ejaĉo loĝata de la pastro —, ĉi tiu skribis sur tabulo subtenata de du grandaj ne prilaboritaj ŝtonoj, kiuj servis kiel tablo piedoj.

Tiu kruda tablo; ligna stumpo devenanta de la forsegita trunko de arbo, uzata kiel seĝego; du grandaj ŝtonoj neregulformaj, kiuj servis kiel sidiloj por vizitantoj; murŝranko por libroj, malbone kunmetita

el kelkaj malnovaj tabuloj; kesto destinita por tenadi la tolaĵojn, kiu enhavis nur unu provizon da interna tolaĵo kaj vastan kaftanon, kompletigis kun pajlmatraco tere sternita kaj akvokruĉo la tutan meblaron de la kavaĵo loĝata de la saĝa aŭtoro kaj genia konstruinto de l' Granda Palaco Tutmonda.

— Ĉi tiu sinjoro demandas pri vi, — diris enirinte la junulo, kiu gvidis Marcial'on.

Cartoya levis la kapon, formetis la plumon kaj, irante renkonte al Marcial, lin ĉirkaŭprenis dirante:

— Kia ĝojo! Kian ĝojon mi havas vidante, ke via veno ne restis nura projekto! . . . Kia ĝojo vidi vin en mia domo!

— Kaj mi, kian grandegan malĝojon! . . . Via domo! Tio ne estas domo, sed iu kavaĉo, iu bestotruo.

— Nu tamen, ĝi estas mia domo. Mi komprenas, ke vin surprizas la kontrasto inter ĝi kaj mia palaco tie supre.

— Tio, . . . via domo! Kaj ĉu vi povas vivi ĉi tie?

— Estas tro frue por klarigi tion al vi . . . Se entute vi povos klariĝi pri ĝi, kiel mi petas de Dio.

— Refoje Dio! Jam estas la dua fojo dum dek minutoj.

— Ne miru; se vi ofte malsuprenvenus ĉi tien, vi renkontus Dion ĉe ĉiu paŝo: Dio estas ĉiam inter la malfeliĉuloj. Sed ĉar mi supozas, ke vi ne malsuprenvenis por vidi mian domon, sed por vidi min kaj, antaŭ ĉio, por aŭdi mian . . .

— Jes, jes; sed la deprema sento kiu min okupas, nome ke ne estas tia, kia mi ĝin kredis, sed tia kia mi

ĝin vidas, ĉi tiu mistera mondo kaj ĝiaj malrespektindaj loĝantoj, enterigitaj en ĝi dumvive . . .

— Pardonu, ke mi interrompas vin, ĉar por mi estas tre grave kompreni bone, kion vi volas diri.

— Kompreni min? Mi opinias ke mi parolas klare.

— Jes, la vortoj estas klaraj: „deprema sento“, „malrespektindaj loĝantoj“; sed ili kaj la tono, per kiu vi ilin diris, kreas en mi dubon, ĉu la impresoj, kiuj vi sentas ĉe la tuŝado kun miaj malfeliĉaj fratoj en ĉi tiu malhela mondo, estas malŝato aŭ kompatoj.

— Kompatoj! Kio estas tio? Mi ne komprenas ĉi tiun vorton.

— Helpu min Dio, kiajn aferojn vi ne scias, vi saĝuloj de l' centa jarcento! Pardonu, kaj mia surprizo ne ofendu vin, ĉar ne estas vi, sed via jarcento, kiu forgesis, ĉar ĝi ne sentas ĝin, ke kompatoj estas doloro sentata pro malbono, kiu ne malutilas nin, sed aliajn. Diru al mi, ĉu estas tio aŭ nur naŭziĝo, kiun inspiras al vi ĉi tiuj paroloj, kiujn vi renkontis survoje al mia domo?

— Se mi estu sincera, mi ne povas respondi vin. Mi mem ne scias, ĉu la korszento nedifinebla, kiu ĉe proksima vido al ĉi tiu raso malsupera kuniĝas kun ĉi tiu ĉiama malŝato al ĝi, estas aŭ ne estas tio, kion vi nomas kompatoj; nova estas la sento, nekoniata la vorto: do ne surprizos vin, ke mi ne povas respondi al vi.

— Nek mi al vi pri miaj duboj, kiuj laŭ la mezuro, en kiu ili malklariĝas al vi, pli klariĝas al mi. Diru al mi — mi volas helpi vin enrigardi en ilin —, se vi

en ĉi tiu momento devus apliki adjektivon por la parioj, kiel vi nomus ilin: malŝatindaj aŭ malfeliĉaj?

— Bedaŭrinduloj. Estas tre malĝojige . . .

— Ne daŭrigu! Via klara inteligento ankoraŭ ne komprenas, kio estas kompato, sed via koro ĝin sentas. Miaj duboj ĉesis. Mi povas rakonti al vi mian historion. Sed kiam ajn ĝi komprenigos al vi, kio estas kompato, preparu vin, por ke vi ne surpriziĝu ekscii, ke, kiom ajn granda estas via kunsento antaŭ la mizera vivo de ĉi tiuj parioj, multege pli granda estas la kompato, kiu ili sentas por la superĝuantoj.

— Kia sensencaĵo!

— Vi estas prava, mi iras tro rapide; arkitekto kiel mi ne devas komenci la konstruaĵon ĉe la tegmento-teraso, sed ĉe la fundamentoj. Ni flankeniguiton kaj turnu nin al mia historio.

## XIV

### La historio de Cartoya

— Proksimume du jarojn antaŭ la finiĝo de l' Palaco de l' Mondo mi malsuprenvenis ĉi tien je la unua fojo, ĉar estis mortanta unu el miaj ĉeflaboristoj, de kiu mi volis preni la planojn de unu el tiuj volbajoj, je kiuj lia labortaĉmento laboris, kaj kiuj estis en lia posedo. Mi devas diri al vi, ke la intertuŝiĝo kun miaj laboristoj estis iom aliiginta miajn ideojn pri la parioj; kaj en mian malŝaton de superpensanto jam faris breĉon la ideo, ke inter iliaj cerboj kaj la niaj ne ekzistas alia diferenco ol tiu inter tero kulturita kaj nekulturita.

— La sama stranga ideo kiel ĉe García kaj Inés. Kia sensencaĵo! Ideoj de l' jarcento dudeka!

— Ni ne diskutu nun pri tio. La ĉeflaboristo, pri kiu mi parolas, filo de longa generacio da parioj, sen instruo, neniam provinta miajn cerbajn nutraĵojn, havis inteligentecon naturan, komprenon rapidan kaj bonan juĝon.

Ni troviĝas en la sama loĝejo kie, sur pajlmatraco kiel ĉi tiu kaj en la sama loko, kuŝis la malsana laboristo. Apud lia kaploko staris maljunulino: lia virino, mi volas diri lia edzino; por ke vi komprenu min



bone: virino amikumita kun li de 25 jaroj, dum kiuj ŝi estis lia ĉiama kunulino ĉiutaga, ĝoja, kiam li estis ĝoja, ploranta, kiam ŝi vidis lin malgaja.

— Kia strangaĵo! Viro kaj virino amikumitaj dum 25 jaroj, ĉiutage kune!

— Eĉ pli strange ŝajnos al vi, ke la kvar gefiloj, kiuj ĉirkaŭis la litaĉon de l' malsanulo, estis ĉiuj naskitaj de tiu sama virino kaj, eĉ pli, ili de post sia naskiĝo ne foriris de li nek de ŝi.

— Jen la ĉefkaŭzo de la malsupereco de ĉi tiu raso; ĉar kiu homo estas kapabla fari ion profitan, havante virinon kaj kvar kreitaĵojn alkroĉitajn al sia vivo kvazaŭ pezan ĉenon? Kion li povas fari?

— Ami ilin, esti amata de ili, nenion pli. Dum ni, vi kaj mi, superpensantoj distingindaj, estas infanoj de homoj, kiuj nenion alian faris ol preni nin kaj forlasi nin en luksaj edukejoj.

— Forlasi nin! Ankaŭ ĉe vi ĉi tiu ideo! — diris Marcial, rememorante pri la vortoj de Inés, kiam li en tiu sama posttagmezo montris al ŝi la edukejon. — Ŝajnas efektive ke hodiaŭ la tuta mondo interkonsentas.

— Interkonsentas? Kiuj? Pri kio?

— Nenio, nenio; daŭrigu.

— Nu, la gefiloj de la mizeraj parioj havas ĉiuj tion, kion nek vi nek mi havis: gepatrojn; amon en sia infaneco.

— Bone, kaj kio plu?

— Nek vi scias, kion tio signifas, nek mi sciis ĝin, ĝis mi vidis unue kaj sentis ĝin poste ĉi tie, kaj re-

memoris tiam, kun malĝojo kaj pentoj, ke tie supre mi estis patro, ne sciante kiuj estas miaj infanoj nek kie ili troviĝas.

La vizaĝo de Marcial malkaŝis, ke la afero pri-traktata de Cartoya kaj liaj vortoj produktis en li profundan efikon. Ili plifortigis tiun efekton, kiun jam estis produktinta Inés, nominte krimo la forlason de l' infanoj en la edukejoj. La pastro daŭrigis:

— Vidante min, la ĉeflaboristo konis la celon de mia veno, kaj montrante al tiu librobretaro, kiu estas malantaŭ vi, li invitis min preni el ĝi miajn planojn. Li ja ne povis ilin plu utiligi en mia servo, ĉar estis certe ke li mortos.

Lia miriga trankvileco, kiam li parolis pri la morto, kontrastis kun la teruro de la superpensantoj al ĝi, kaj kun la doloro de lia edzino kaj de liaj kvar gefiloj. La unue-naskitino estis 24-jara kaj havis okulojn grandajn, tre grandajn, kaj eĉ pli dolĉajn ol grandajn.

Dirante tion, Cartoya pasigis unu manon trans la siajn, por sekigi la larmojn, kaj per voĉo emociita li daŭrigis:

— Juana, gefiloj miaj, — diris la malsanulo — danku al ĉi tiu sinjoro, kiu estis bona al mi. Ne ĉiuj de supre estas kiel li . . .

Kun la humileco karakteriza al ĉi tiuj kompatindaj homoj kisis mian manon virino kaj infanoj; la filino estis la lasta kiu faris tion.

— Dankon, sinjoro, — ŝi diris, direktante sur min la serenajn rigardon de siaj belaj okuloj, montrante al mi per tio la fundon de sia anĝela animo kaj metante

poste siajn lipojn sur mian manon. La kisojn de la aliaj konservas mia memorpovo; ŝia, post sep jaroj, estas ankoraŭ en ĉi tiu momento dolĉa ĝuo de mia koro.

— Ĝuo, kaj memorante ĝin vi ploras?

— Aferoj de l' koro.

— Ja: ŝi forgesis vin poste, — diris Marcial kun esprimo tro amara por elveni nur el la kompatato kun fremda suferado, — mi komprenas; mi kompatas vin.

— Ne, ne estas tiel. Atendu, atendu. La sekvintan tagon mi revenis por vidi la malsanulon, dirante al mi mem, ke min tiris intereso, kiun mi ja ne estus turninta al li, se mi ne memoradus de la antaŭvespero la okulojn kaj la mankison de Maria.

— Maria? Kiel stranga nomo! Sed beleta ĝi estas.

— Ĉar la naivulino kredis, ke la inklino al ŝia patro min venigis, ŝi dankis kaj rekompencis min, montrante sian dankemon per rigardo. Kaj mi revenis la sekvintan tagon, kaj renkontis ĉi tie Hobbson'on. Li, doninte subtenojn al la mortanto, pri kiuj paroli estas superflue, ĉar vi nenion komprenus, prezentis al li, por la postmorto! feliĉojn por mi nekompreneblajn en la mondo supera.

Tio konfuzis min, precipe pro la akcento de konvinko kontraŭstarebla, vibranta en la promesoj de Hobbson. Sed tio, kio en mia animo lasis nedetruoblan postsignon, estis la solena paco de tiu morto, la serena konfido, kun kiu tiu homo diris, kiam li ŝajnis pli endormiĝi ol enfundiĝi en la teruran transon: „Juana, infanoj miaj, ĝis revido tie supre!“

Neniam mi estis vidinta morti tiamaniere iun el niaj superintelektuloj nek priplori la morton de iu, kiel ploris la edzino kaj la gefiloj de la laboristo; kaj mi estis ja vidinta morti jam saĝulojn, magnatojn, princojn, kiujn priploris neniu. Ĉar la mondo, en kiu ili vivis, subpremis ĉiujn dolorojn de l' animo, kun escepto de tiuj produktitaj per vundoj en la egoismo . . . Sed pardonu, mi opinias ke mi misuzas vian . . .

— Ne, ne; min interesas viaj diroj. Daŭrigu, daŭrigu!

— Mi eliris el tiu ĉi loĝejo samtempe kun Hobbson, kiun mi ankoraŭ ne konis. Avida kontentigi mian scivolon, mi demandis lin kun la malmulta ceremonio kutima ĉe la supera raso kun tiuj ĉi parioj: „Kia vivo kaj feliĉeco estas tiuj, pri kiuj vi parolis ĉi tie interne? Ĉu vi superstiĉe kredas, ke mortinte vi reenkarniĝos en niaj korpoj, por ĝui la feliĉon, kiun ni superpensantoj ĝuas tie supre?“

— Ne; vian vivon, kiu estas ĝuo sed ne feliĉo, ni parioj ne deziras.

— Kia sensencaĵo! — mi respondis. — Kion alian vi dezirus!

— Ne. Via vivo nin hontigus. Ni ne envias vin; ni vin kompatas.

— Impertinentulo! Danku ke mi ne konsideras viajn vortojn, ĉar mi komprenas, ke via nescio vin faras neresponeca.

— Ho, ne neresponeca. Ne rigardu fanfaronajon, ke mi diras al vi, ke mi nomiĝas Kraig Hobbson; sed mi deziras ke por vi estu iom gravsignifaj la vor-

toj: „La feliĉeco, kiun mi promesis al tiu mortonto, estas pli pura kaj pli vera ol la via; la mondo, en kiu oni ĝuas, ne estas la via, ĝi estas multe pli alte.“

El la efekto, kiun kaŭzis al vi la vido, ke konvertiĝis en parion la eminenta saĝulo, vi komprenos mian impreson, kiam mi aŭdis la nomon de la respektata maljunulo. Mi supreniris kun amaso da ideoj sin kontraŭdirantaj, kun mondo da neklaraj sentoj kaj kun spirito superfluanta de perpleksaĵoj. Sed ĉiuj tiuj nuboj de mia spirito ne sufiĉis vuali ion, kion senĉese mi vidis klare: la pensobildon de la belega orfino.

Tri tagojn mi pasigis, defendante min kontraŭ la deziro malsupreniri, ĝis fine, post ili, mi ree alvenis ĉi tie, sub la mensoga preteksto ke mankas al mi ankoraŭ kelkaj paperoj, kiuj certe restis en la murŝranko. Komprenoble ni ne trovis ilin. Sed mi vidis Maria'n, mi rigardis ŝin, mi rigardadis ŝin, mi parolis kun ŝi. Forirante mi komisiis al tiuj bonaj homoj, ke ili serĉu, ĉar mi revenos pro la planoj. Kiam la postan tagon ili diris al mi, ke vane ili serĉis en ĉiuj anguloj, mi demandis min, kiajn novajn pretekstojn mi elpensu, por daŭrigi vidpovi tiun knabinon.

Pretekstante la plej infanecajn kaj nekredeblajn kialojn, mi malsupreniris pluajn kvar aŭ kvin fojojn, sed en la lastaj du mi ne trovis Maria'n en la domo; kio doloris min eĉ pli, ĉar ŝiaj senkulpaj okuloj jam malkaŝis al mi la plezuron, per kiu ili min ekvidis.

— Nature. Por senŝanca pariino via deziro estis tre flata. Sed mi ne komprenas, kial vi hezitis tiom.

Ju pli rapide vi estus ĝin kontentiginta, des pli rapide vi estus forgesinta.

— Ne; la posedo estus ĝin pliiginta.

— Kia sensencaĵo! Ĉio estus estinta demando se ne de tagoj, de semajnoj . . . do de monato.

La ŝanceliĝanta tono, per kiu Marcial diris tion, kontrastis kun la aplombo de l' juĝo. Cartoya respondis:

— Vi eraras. Laŭ mia spertado de superĝuanto mi kredis tiel, ĝis mi eksciis, je mia granda surprizo, ke mia deziro estis: pasigi la tutan vivon kune kun tiu virino; kvankam tio ŝajnis al mi tiam tiel absurda kiel al vi ĝi povus ŝajni nun ĉe la aŭskultado.

— Jes, jes, tio ŝajnas absurda, tre absurda, — respondis Marcial, sed pli kvazaŭ li volus konvinki sin mem ol paroli al sia amiko.

— Jen kiel mi eksciis tion. Konvinkite ke ŝia familio ŝin kaŝis al mi, mi esploris, spionis, klopodis, ĝis iu vespero. Ŝi eliris tiam el la laborejo de brodado, kie ŝi laboradis; kiam mi vidis la ĝojegon, per kiu ŝiaj okuloj min rigardis, mi kredis por momento esti jam veninta al la punkto por atingi miajn dezirojn. Sed kiam mi diris, ke mi estas enamiĝinta al ŝi, ŝi respondis al mi kun naiva konfido: „Ankaŭ mi multe amas vin, sinjoro, kaj mi tre bedaŭras ke tio ne povas esti.“

— Ne povas esti? Kio ne povas esti? — mi demandis.

— Ke ni amu unu la alian . . . mi volas diri: ami nin reciproke, jes; sed ĉiam de malproksime.

— De malproksime? Kial?

— Ĉar vi estas de supre kaj mi de malsupre.

Mi protestis ke tio povas esti malhelpaĵo. Amante nin, ni nur amikumiĝu, kiel iuj ajn en nia kazo; sekve, mi invitis ŝin al mia domo.

— Mi ne sentas min ofendita, sinjoro, ĉar mi scias ja, ke vi „mastroj“ ne estas informitaj pri tio, ke Dio ne volas ke viroj kaj virinoj kuniĝu kaj disiĝu kiel bestoj. Sed tio ne povas esti. Iru, lasu min, ne kirlu en mia doloro. Tie supre vi baldaŭ forgesos la mal-feliĉan pariinon.

— Vi, vi volas min forgesi.

— Neniam, sinjoro. Mi amas vin multe, multe. Por ĉiam, por ĉiam, — ŝi respondis al mi ekplorante. — Ne kiel vi amas min, per inklino de kelkaj tagoj . . . kio ne kapablas kompensi la mian. Ja mi scias ke la amoj de tie supre ne povas doni al vi pli; sed ĝuste pro tio, neniam, neniam.

Dirinte tion, ŝi ekforkuris, lasante min tiel certa pri tio, ke per sia tuta animo ŝi min amas, kiel certa pri la neefikeco sekvi kaj pretendi ŝin, kiel iun ajn el niaj sinjorinoj superĝuantaj.

— Sed kion ŝi volis? Kion pli ŝi povis postuli ol tion, kion vi proponis al ŝi?

— La animon por la tuta vivo: tion kion ŝi estis jam doninta al mi, antaŭ ol mi petis ĝin de ŝi.

— Kia sensencaĵo! En kia kapo povas havi lokon la penso, ke amo daŭru tutan vivon?

— Vi estas prava; la amo porviva ne havas lokon en la kapo, ĝi nur havas lokon en la koro.

— Ramón, de unu horo vi diras nur sensencaĵojn.

Kaj pli malbone estas ke, ĉe la aŭskultado, miaj ideoj ne estas malpli konfuzaj ol la viaj.

— Ne, Marcial, ne; tio, kion vi nomas konfuzitaj ideoj viaj, ne estas ankoraŭ ideoj; estas nur sentoj.

— Povas esti. Mi vidas vin tiel emociita, ke vi infektas min — rediris Rucandio, defendante sin kontraŭ la atako de amaraj propraj rememoroj, en kiuj pli radikis la kaŭzo de lia emocio ol en la infekto, kiun li aludis.

— Laŭ via mirego vi juĝos pri la mia, kiam mi aŭskultis la kompatindan pariinon kiu, malgraŭ sia rifuzo kaj malgraŭ sia humila pozicio kaj vestaro, ŝajnis al mi pli bela, pli bona kaj pli inda ol la plej delogantaj belulinoj de nia mondo.

Mi revenis, decidinte forgesi tion, kio laŭ mia opinio ne transpasus misimpreson de nebligita kaprico; sed baldaŭ mi ekkonis, ke la absurda troigo de tiu amo al mi, pri kiu diris Maria, ke ŝi estas kapabla plenumi ŝian ekzistadon, jam ne ŝajnis al mi tiel absurda, de kiam per sia neo ŝi estis foriginta de mi la esperon, kvietigi la impulsojn de mia amo per ŝia kontentigo en la kutima kaj preterpasa formo, kiun kiel solan konas la superĝuantoj. Laŭ tio ili estas identaj, kiel ŝi ĝuste diris, al la senraciaj kreaĵoj.

— Ramón!

— Mi elvokas vin, por ke vi indiku al mi iun diferencon inter la via kaj la ilia.

— Nu, pri tio mi ankoraŭ parolos. Nun daŭrigu vian historion!

— Laŭ tio kiel pasadis la tagoj, sen tio ke mi vidis



ŝin, mi konvinkigis, ke ankoraŭ mi sentis tiun fortegan kaj senfinan senton, pri kiu ŝi estis parolinta.

Ne klopodu klarigi ĝin al vi: vi ne komprenos, ĉar tia amo estas unu el la noblaj kaj belegaj ĝojoj, kiujn en la ĝuado lasis perdiĝi la civilizo-generacioj, nur okupitaj pri materiaj plezuroj; kaj ĉar potenculoj kaj ĝuantoj lasis ĝin tiel malproksima kaj forgesita kiel la proksimul-amon, abnegacion kaj patriotismon, ne estas strange ke tiaj sentoj kaj virtoj falis en la manojn de la barbaroj kaj ke nur tiuj komprenis ilin.

Mia vivo ŝanĝiĝis en turmenton pro la vaneco de miaj ĉiutagaj penadoj vidi Maria'n. Jen iumatene oni diris al mi, ke en mia laborĉambro atendas min pario kun ruĝa kruco surbruste je la vesto.

Estis Hobbson, kiu serĉis trovi iun noblan aspiron en la animo de iu, kiu havas ĉion por agrabligi la vivon; li fine petegis min, ke mi ĉesu pliakrigi la dolorojn de malfeliĉulino kiu, en sia vivo devante paŝi nur sur dornoj, pli kruele sentus iliajn pikojn, se daŭrigus persekuti ŝin la viro, kiun ŝi amas sen espero.

Mi rezignas detaligi al vi la longan interparolon plenan de protestoj kaj petoj miaflanke kaj alternaj riproĉoj kaj konsoloj flanke de Hobbson kiu, aŭdante ke ankaŭ mi havas la deziron unuiĝi kun Maria por la tuta vivo, respondis ke, se tiu deziro ne estas trompa sentopuŝo de unu momento, li montros al mi la solan vojon, per kiu estos atingebla la daŭra kuniĝo dezirigata.

Poste Cartoya klarigis al Marcial, kiel lin instruis Hobbson pri la devoj de geedzoj kaj gepatroj en la

nedisigebla geedzeco kristana; ĉi tiu klarigo estas forlasita ĉi tie, ĉar ĝi ne estas necesa al la legantoj; tamen ĝi estis necesa al Marcial. Hobbson komunikis al li, ke li postulas kiel garantiaĵon pri la firmeco de lia decido edziĝi en tiaj kondiĉoj, ke antaŭe li ne vidu Maria'n dum unu monato.

— Post paso de ĉi tiu templimo — daŭrigis la rakontanto — la sama Hobbson benis nian geedziĝon, ne postulante de mi antaŭan konvertiĝon al la kristanismo, sed solenan promeson akcepti la nedisigeblecon de la geedzeco kaj la devojn rezultantajn por mia edzino kaj niaj venontaj infanoj.

Maria supreniris de la katakombo al mia domo. Ni vivis komence nur unu por la alia, kaj poste tiu virino, al kiu mi jam ŝuldis la ĝojegon de ŝia purega amo, donis al mi novan gloron per la amo de nia filo.

— Ha! vi havis filon!

— Kaj kiam mi, kiu ĉiam vidis kreskigi infanojn per kemiaj procedoj, vidis mian edzinon nutri per sango de ŝiaj vejnoj la filon de mia sango; kiam mi vidis unuafoje, kio estas vera patrino, mi sentis kion mi ne klarigas, ĉar mi estas certa, ke neniu komprenas tion, kiu ne sentis ĝin . . . Venu, rigardu la belan anĝelon, kiun donis al mi mia edzino.

Cartoya leviĝis, kaj formetinte la kovraĵon, kiu tegis la pajlosakon, li montris etulon blankan kaj blondan, kiu dormis en la bela paco de la infaneco, kaj diris:

— Rigardu lin! Tiel bela kiel la amo, el kiu li naskiĝis. Vi, kiuj perdas la gefilojn antaŭ ol koni ilin,

neniam ĝuos la feliĉon, kiun mi nun ĝuas kisante lin kaj dirante: mia, mia!

Marcial eksentis tiel nekutiman kormoliĝon, kiel neordinara estis por li la sceno, kiu ĝin produktis, kaj videble emociite li konsentis, respondante al Cartoya:

— Jes, devas esti tre dolĉe kisi etulon, kia ĉi tiu. Ĉi tiuj kisoj devas esti io alia ol tiuj de la pasio, devas . . .

— Dank' al Dio, ke vi jam komencas vidi klare en miaj vortoj.

— Ne en ĉiuj, kiujn mi aŭdis. Ĝis nun mi vidis klare nur en tio ĉi; kaj mi kredas ke ne estas vi, sed ĉi tiu dormanta infano, kiu min konvinkas. Kaj por si mem li pensis: Ĉi tiu aŭ alia.

— Pli bone, pli bone . . .

— Pli bone! Kial?

Pensis Cartoya: „Ĉar Dio ne manifestiĝas per teoremoj, sed oni vidas lin en la evidenteco de liaj faroj“, sed li nur diris:

— Ĉar tio pravas, ke via koro valoras pli ol tiuj de la homoj, kun kiuj vi rilatas . . . Sed mi daŭrigas mian historion.

Mia feliĉo estis tro granda por esti ĉitiumonda. Ni estis geedzoj de unu jaro kaj duono, mi fariĝis la lastajn laborojn ĉe la konstruado de la Monda Palaco, kiam iun posttagmezon suprenvenis la patrino de Maria kaj diris al ŝi, kun plej granda simpleco, ke „alvenis la semajno de ŝia asistado“.

Tiam mi eksciis ke, por flegi pariojn malsanajn sen familio, ĉiuj pariaj gefratoj laŭvice deĵoradas. Nun re-

venis la vicó al mia edzino, kiu estis plenuminta ĝin antaŭ du jaroj. La malsano, kiu tiam furiozis inter la parioj, estis la ĥolero.

Terurite mi kontraŭstaris al tio, ke ŝi malsupreniru; sed ŝi kontraŭdiris, ke tio estas unu el la devoj de ŝia religio, kiujn respekti mi estis promesinta; ke ŝia Dio diris al la homoj: Amu unuj la aliajn per amo difinita en la ordono ami la proksimulon kiel sin mem; kaj ke tia estas la maniero, kiel amas sin la parioj.

La trankvila heroeco de Maria, la simpleco, per kiu ŝia patrino trovis tion natura kaj la konstato, vidi ŝiajn religio-gekamaradojn pretaj ĉiam kaj al ĉiu ofero por reciproke helpi sin, inspiris al mi profundan respekton kaj retenis min de la intenco, apartigi mian edzinon de la obeo al la suverena potenco morala, kiu tiel triumfas super egoismo kaj pasioj de la homaro, en kiu vi, superpensantoj, nur areto, estas la malobeantoj: negrava malplimulto, de tago al tago malpli granda, kies malobeo ne baros la triumfon. Se vi estas la mastroj de la mondo materiala, ni, kiuj ne vidas en ĝi nian regnon, estas reĝoj de la animoj.

— Sed se ĉi tio estas vera, kial ni, la mastroj, ne konas vian forton kaj eĉ ne la ekziston de tiu alia mondo via?

— Ĉar vi pensas ĉiam nur pri la korpo.

— Pri kio alia ni pensu? Tiel, pensante pri ĝi, ni ne faras, kiel ĉi tiuj nesciuloj, la higienan krimon kaŝi al la aŭtoritatuloj la ekzistadon de fokusoĵ infektaj per tio, ke oni malhelpas ilin fortranĉi la epide-

miojn, mortigante la nekuraceblajn malsanulojn, kiel faras la homoj civilizitaj, por eviti infektiĝon al sanuloj. Sed ni lasu tion: Mi estas sciŝvola, ĉu Maria fine malsupreniris por asistadi al la ĥoleruloj.

— Ŝi malsupreniris. Kaj post tri tagoj ŝi mortis dirante al mi: „Tie supre, tie supre, Ramón; serĉu min supre, supre!“

— Refoje. Kia absurda mondo estas tiu, al kiu iras la mortintoj?

— Mondo de animoj ĉiam vivantaj.

— Sed vi, ĉu vi kredas al ĝi?

— Kiam ŝi mortis, ankoraŭ ne; sed tiam mi sentis ĝin. Aŭdinte ŝin dum tiu unu jaro kaj duono paroli al mi dolĉe kaj bonece pri aferoj por mi tiel nekompreneblaj kiel belaj, mi estis komencinta subdividi nesupozitajn senlimecojn, antaŭsenti povon, kiu faras ĉion, kio okazas en la universo, kaj kion ni ne scias fari; supozi bonecon kapablan igi bati la korojn de la viktimoj, profundigintaj per vi en forĵetitecon kaj malfeliĉon, pro ĝuoj kiujn vi ne konas, pro puraj ĝojoj kiujn vi eĉ ne supozas: la amo de mia edzino estis pligrandiginta mian koron, por ke en ĝi havu lokon alia amo pli abnegacia: la amo al la homoj. Vidinte kiel ŝi oferis al ĝi vivon kaj feliĉon, mia koro ekvibris unue en amo al miaj gefratoj, kaj post ĉi tiu, en alia amo eĉ pli granda, origino de la unua: amo al la Patro de ĉio kreita. Kaj kiam mi aŭdis ŝin diri ke supre mi serĉu ŝin, mi kredis, jes, mi kredis, ke la homo estas io pli ol paŝto por vermoj, mi kredis ke tie mi renkontos ŝin.

— Jes; emocio, sentimentalismo.

— Tiam, jes. Poste konvinko, profunda kredo, sed pripensema. Ni ne diskutu, ĉar la aksiomoj, kiujn starigas la evidenteco, neniam estis pruveblaj. Viaj sciencoj kaj la miaj estas plenaj de aksiomoj, kiujn la saĝuloj kredas necesaj; sen ili ne ekzistus sciencoj, kiel sen Dio ne estus mondoj . . .

La unua patrino, kiu troviĝis proksime al mia mal-sana edzino, mamnutris mian filon kvazaŭ la sian. La tagon post la morto de Maria, Hobbson min demandis, kion mi pensas fari koncerne mian filon. „Li fariĝu frato de la gefratoj de sia patrino“, mi respondis, kaj tuj mi postulis de li, ke li elfunde klarigu al mi, kion pri sia religio Maria estis antaŭsentiginta al mi.

Unu monaton poste mi petis esti oleumita kiel pastro. Li fiksas al miaj deziroj duonan ĵaron da atendado; sed je tiu sama tago li donis al mi la bapton de kristano.

— Kio estas tio? Kion signifas tio?

Post la klarigo responde al tiuj demandoj, ĉi tie necesas, Cartoya aldonis:

— De tiam mi estas pario; kaj kvankam mi suferis ĉi tie, kaj ankoraŭ suferas multe, mi ĝojas tamen tiom, kiom neniam en mia mondo; kaj mi sentas min feliĉa. Kaj mi valoras pli ol tie supre.

Post kiam, antaŭ tri jaroj, la ses monatoj estis pasintaj, mi estis enoficigata kiel pastro.

— Kaj ĉu vi kredas? Ĉu vi vere kredas ĉiujn tiujn eksterordinarajn aferojn de tiel stranga religio?

— Ĉiujn, ĉiujn. Kun fido tiel profunda ke, pli klare

ol vi vidas la lumon de l' suno, mi vidas la lumon de Dio, kiun mi petas ke li igu vin vidi ĝin, vin ĉiujn kiuj estas tiel blindaj kiel estis mi . . . Sed jam estas la unua, kaj mi misuzas vian amikan intereson.

— Ne, ne — kvankam, efektive, estas malfrue, kaj estos necese lasi por alia tago tion, kion mi volis diri al vi . . .

— Marcial, por tio estos ĉiam malfrue: mi restos ĉi tie por ĉiam.

— Sed . . .

— Estas senefike. Ĉirkaŭprenu min, kaj se vi foje rememoros pri tio ke ĉi tie . . .

— Jes, jes, mi rememoros.

Ĉirkaŭprenis sin reciproke ambaŭ amikoj. Kiam Cartoya sin direktis al la pordo kun la intenco akompani Rucandio'n ĝis la eniro en la lifton, ĉi tiu lin haltigis, dirante iom konfuze:

— Ramón, ĉu mi povus vidi ankoraŭfoje vian filon antaŭ ol foriri?

— Kial vi ne povus! Plej volonte, — respondis Cartoya, kaj la ĝojo elpremiĝis en lia voĉo kaj liaj okuloj. — Venu, venu, kaj dankon, dankon!

Marcial alproksimiĝis al la pajlosako kaj fiksitis sur la infano rigardon intensan kaj longan, longan.

— Kiel bela li estas! — li pensis. — Jen la embrio de animo por muldi ĝin, pri kio parolis Inés; embrio kiun ĉi tiu patro ne volas forlasi kiel ni . . . Kaj subite, kvazaŭ respondante al aliaj ideoj, li demandis: — Ramón, kiun aĝon havas ĉi tiu infano?

— Kvar jarojn, — respondis Cartoya, kiu ne for-

turnis de sia amiko la dube-deziregantajn okulojn, komprenante ke okazas io por li nekomprenebla, sed granda kaj bona en lia koro.

— Kvar jarojn, kvar jarojn . . . ! Kia hazardo, kia malĝojiga hazardo! — mallaŭte murmuris Marcial impresgite, sen tio ke Cartoya komprenis liajn vortojn. Kaj turnante sin al li, li daŭrigis laŭtvoĉe: — Ĉu vi permesas doni al li kison?

— Donu, donu — kaj ne miru pri ĉi tiuj larmoj el ŝteliĝantaj, kiam mi permesas al vi tion, kion vi petas, ĉar ili estas dolĉaj, tre dolĉaj. Sed kio estas, ĉu ankaŭ vi ploranta?

— Ne, ne, mi ne, — vive rediris Marcial, pasigante la manojn super la palpebrojn, kiam li leviĝis ksisinte la anĝeleton.

— Marcial, ne forgesu kion mi diros al vi: kiel vi kaj mi ĵus rigardis mian filon, tiel neniam estas rigardita kaj neniam estos rigardata iu ajn infano en la eduk-ejoj.

— Vi estas prava: neniu . . . neniu.

Dirinte tion kaj kvazaŭ fugante malbonan ideon, kiun li volus tie lasi, Rucandio foriris abrupte el la kavaĉo, ne donante tempon al Cartoya lin akompani kaj kriante, jam de ĉe la pordo:

— Adiaŭ, ĝis alia tago.

La ideo kium volis fugi Marcial iris kun li; ĉar enirante en sian domon li ankoraŭ ripetadis: Neniu, neniu.



## XV

### Koroj mortintaj kaj koro vivanta

Je la deka de la sekvinta mateno Inés kaj Juan estis kondukataj de Rucandio al la laboratorio, kie sub lia ordono ili estu laborontaj aŭ, pli ĝuste dirite, al la laboratorioj, ĉar en unu sama galerio de l' muzeo ili komuniĝis inter si, kaj oni vidis unu kemian, alian elektran, alian biologian, krom tiuj dediĉitaj al diversaj sciencoj rilatantaj al la invento de Mob.

— Amikoj miaj, — diris Marcial, — ĉi tie ni laboros kune en la tasko, kiun nia saĝa majstro atribuis al ni; tasko tiel alloga kaj eble eĉ glorprena, kiel granda kaj malfacila; tiom malfacila, ke antaŭ ol via kemio, kara García, kaj via elektro, mia bona amikino, povos moderniĝi en la mezuro necesa por helpi min, pasos iom da tempo, en kiu vi, pli ol miaj helpantoj, estos miaj lernantoj.

— Jen kion mi ne povas klarigi al mi: kial D-ro Mob ekhavis la ideon doni al vi helpantojn tiel antikvecajn kiel mian edz . . . mian amikulinon kaj min.

— Ankaŭ mi ne, Don Marcial. Ĉar vi havas certe multajn aliajn personojn pli je la nivelo de la scienca progreso de ĉi tiu jarcento. Tial mi ne komprenas.

— Mi supozas, sed ne certigas, ĉar Mob ne lasas tralumi la motivojn de siaj agoj, mi do supozas ke, kvankam lia invento estas finita, ĝi tamen ankoraŭ dependas de kelkaj disvolviĝoj, pri kiuj ni laboros, kaj ne estos agrable al li malkovri siajn sekretojn al aliaj homoj de scienco, kun la sola escepto de mia persono, pri kies lojaleco li estas konvinkita.

— Vere . . . Vidu kiamaniere fariĝas utilaj al la granda saĝulo ĉi tiu elektristino kaj ĉi tiu kemiisto konservitaj.

— Krom tio, ĉar ni solvos problemojn de du sciencoj komplete novaj: elektro-kupidismo kaj psiko-histologio, kreitaj de la glora biologo, iu ajn superpensanto, eĉ instruita, renkontus la samajn malfacilaĵojn, pli-malpli, kiel vi. Sed ni ekokupu nin jam pri la materio, komencante je la psiko-histologio, kies origino estas la malkovro, farita de Mob, de io en la homa muskola koro, kio ne troviĝas en la koro de la senraciuloj.

Ĉi tiu io estas la anima koro, kapabla plenumi ne fizikajn funkciojn, sed sentojn nemateriajn.

— Ĉu tion malkovris tiu viro?

— Jes, amikino. Venu ambaŭ kaj vidu! Rigardante tra iu ajn el ĉi tiuj dek-du binoklaj mikroskopoj, vi vidos per la dekstra okulo pecetojn de homa koro en ĉiu el ili, kaj per la maldekstra erojn de bestaj koroj diversaj, diferencajn de unu al alia mikroskopo. Rigardu kaj notu bone la diferencojn, kiujn mia klarigo rimarkigos.

Kiel komunan trajton al ĉiu vi konstatos multecon

da ĉeletej konsistigantaj la muskolan teksaĵon de l' anatomia koro, destinita por la funkcioj pure fizikaj.

— Jes, jes, — diris Inés. — Nombrego da vazoj kun strukturo simila al tiu de mielĉelaro.

— Ekzakte tiel. Tio troviĝas en ĉiu koro pure animala, sen plia funkcio ol pasigi la sangon: jen ĉio, ne pli. Sed en la homa koro, kiun ni rajtas nomi hejmo de l' amo, ekzistas io plia. Rigardu, rigardu nun dekstren. Ĉu vi ne vidas ion, kio maldekstre mankis?

— Jes, estas vere. Ŝajnas al mi vidi, kvazaŭ en la interspacoj de la vaza teksaĵo ekzistas ia likvaĵo, — diris Inés. — Kaj vi, Juan, ĉu vi vidas ĝin?

— Jes. Kaj krome kvazaŭ kelkajn punktetojn dube-grizajn, de kiuj eliĝas diversaj fadenoj en konstanta moviĝo. Rigardu, Inés.

— Jes, jes. Ankaŭ mi vidas ilin.

— Nu, ĉar vi ne bezonas vidi pli, vi povas lasi la mikroskopojn. Se plaĉas al vi, vi povas antaŭe konvinkiĝi ke, kiom ajn vi rigardas en la korojn de la maldekstra flanko, kiuj estas bestaj, vi nenion similan vidos kiel en tiuj de la homa speco.

— Kaj kio estas tio, Don Marcial?

— Tio estas la elementoj-deponejoj de la psikaj kapabloj, kie naskiĝas la sentoj: amo, malamo ktp.

— Sed kiel?

— Mi nek scias nek interesas min scii. Ni ja ankaŭ ne scias, kiel naskiĝas elektro, kaj tamen ni utiligas ĝin, ne povante disŝiri la sekreton de ĝia esenca kaŭzo. Same kiel mia majstro sukcesis ekspluatj la fortojn de la amo, ne enirante en la fundon de ĝia

origino. Tial mi restas ĉe tio, kion mi scias kaj konas, kaj mi diras al vi, ke ĉi tiu likvaĵo estas la amaplasmoo, en kiu naĝas tiuj punktetoj aŭ ĉelkernoj nevideblaj per malnovaj mikroskopoj. La fadenoj viditaj de García estas antenoj aŭ fibretoj, kiuj eliĝas el la ĉelkernoj, laŭnature eksterordinare elastaj kaj kuntiriĝemaj, aŭ sensemaj; efektive, ili ondumas senĉese en la plasmoo.

— Kaj tio estas . . . ?

— La anima ĉelo, kie la amo estiĝas. Ĝi estos la unua objekto de niaj eksperimentoj, ĉar la ĉelkernoj estas kvazaŭ la elementoj kupraj kaj zinkaj de elektra pila, kaj la plasmoo kvazaŭ la likvaĵo kondukanta, kie ili estas submergitaj.

— Kiel?

— Ekzakte tiel, krom la diferenco iom vualeca inter elektro kaj amo. Kemio kaj elektro — jen vi vidas jam la taskojn, kiuj atendas ĉiun el vi. Ni devos analizi la plasmon, la ĉelkernojn kaj la fibretojn.

— Bone, Don Marcial. Sed tio estas tiel eksterordinara ke, malkaŝe, al mi estas tre malfacile kompreni, kiel tie naskiĝas sento nemateria. Tial, se vi bonvolus komenci viajn klarigojn . . .

— Amikino mia, tre volonte mi farus ĝin tuj, se urĝega afero ne devigus min eliri senprokraste; krome, se tio ne estus, tio, kion vi deziras scii, troviĝas multe pli bone klarigita ol mi povus tion fari, en ĉi tiuj paraĝrafoj de ĉi tiu broŝuro ankoraŭ neeldonita de sinjoro Mob.

— Marcial, kiu dum la tuta antaŭa konversacio estis

distrita, kvazaŭ io alia ol la klarigoj lin okupis, donis al Inés kajeron dirante:

— La tutan verketon vi devas konsciencie studadi; sed provizore, sur ĉi tiu paĝo vi havas tion, kion vi demandis kaj kio nunmomente plej interesas vin.

\*

Dum la geedzoj legis la verkon de Mob, kie troviĝis materialo por profunda kaj longa studo, ĉar la industriaj aplikoj de la amo estas tiel komplikaj, ke ili ne povas esti klarigataj dum okulmovo, Marcial iris al sia vestejo kaj vestis sin kiel iu, kiu estas faronta viziton de ĝentileco, kiu devis esti por li tre interesa kaj eĉ gravega, se oni juĝis laŭ la meditema kaj palpebronkuntira trajto de lia vizaĝo. Ĉe la pensado pri tiu vizito li estis pasiginta la tutan nokton post sia malsupreniro en la subterejojn, kaj li ne sukcesis fermi la okulojn.

Fine vestite, li malsupreniris al la aŭtomobilo, kiu lin atendis ĉe la pordo de l' muzeo. Post dek minutoj li alvenis ĉe la palaco de la bela Clara Snow, supreniris al pompa salono, kie li devis atendi pli ol kvin minutojn ĝis kiam a ŭ t o m o, direktata de ŝi el ŝia tualetĉambro, prezentiĝis por konduki lin al tiu intima sanktejo kie, donante al li pruvon de kora konfido kaj interrompante la interesan faradon de sia tualetto, ŝi akceptis lin, salutante per evidenta kaj eĉ flatema afekto.

Sed antaŭ ol raporti la konversacion tuj komenc-

itan, estas necese sciigi certajn antaŭfaktojn pri tiuj personoj, kiuj interkonversaciis.

Sinjorino Snow estis unu el tiom da multmilionuloj (kaj „tiom“ samvaloras ĉi tie kiel „ĉiuj“), kiuj en la centa jarcento vagadis tra la mondo kiel servistoj sen mastroj: ne nur liberaj, liberegaj, pli eĉ, senbridaj, farante agojn, kiuj estus ruĝigintaj la plej senhontajn amulinojn de la dudeka jarcento; kaj en Mondopolo tiaj agoj estis ne nur ordinaraj, sed eĉ laŭ plej bona tono.

Senmoraleco? Ne. Por esti senmoralaj estas necese rompi iajn etikajn leĝojn, kaj ĉar de jarcentoj la superĝuantoj jam estis formetintaj ĉian moralon, en la centa tiuj sinjorinoj ne estas senmoralaj, sed ekstermoralaj. Kun la plej granda trankvileco, sen la plej eta honto, kun plena senkonscio ili elmetas la malvirtojn de sia vivo kun la sama malĉasteco kaj eble eĉ kun sama fiereco, kiel ili publike montras siajn belajojn.

Antaŭ jaroj, kiam Clara havis proksimume 27 jarojn kaj Marcial ĉirkaŭ 30, ili renkontis kaj amis unu la alian, dum preskaŭ unu jaro!, kiel amas la superĝuantoj. Estis agrabla epizodo por ŝi; por li pli ol agrabla, ĉar se li estus havinta ideon pri tio, kio en niaj tempoj signifas esti enamiĝinta, li estus ekkoninta ke, krom esencaj diferencoj naskitaj de lia epoko kaj ĝiaj moroj, li estis enamiĝinta.

Kiam ŝi rimarkis ke, kvankam agrabla kaj ĉio cetera, estis jam longa kaj fariĝis serioza kaj ekpemis kiel ligilo tio, kio laŭ ŝi sole estu ludo, ŝi metis fin-

punkton al la amikumo, tre kore, jes, sed kun energio, kontraŭ kiu ne volis lukti Marcial, ne pro manko de deziro, sed pro la scikono, ke ĉia lukto estus neutila kaj ridindigus lin.

Li ne havis la amaran doloron de trompito en niaj tagoj; li ne diris nek eĉ pensis, ke li ne povos vivi sen Clara; sed li havis tre fortan kaj daŭran malplezuron, iel similan al doloro aŭ almenaŭ al melankolio, tiom, kiom estis eble ĉe homo de mondo, bone trapenetrita de tio, al kio lin devigas lia superpensuleco.

Ŝi konis lian ĉagrenon, ĝi plaĉis al ŝi, ĉar ĝi flatis ŝin, kaj pli eĉ plaĉis al ŝi la diskreteco, per kiu Marcial ĝin kaŝis, ne ĝenante ŝin per petegoj plilongigi tion, kio jam laŭracie devis finiĝi. Ĉar ĝi daŭris preskaŭ unu jaron, kaj eĉ ne unu sola el ŝiaj aliaj amikumoj povis kontentigi ŝin pli longe ol kvin monatojn, neniu el ŝiaj 13 amikumoj seriozaj, ne konsiderante opajn flugpasantajn.

Poste ili vidis unu la alian tiam kaj tiam, en societo, kaj faris al si reciprokajn vizitojn de ĝentileco, de tago al tago malpli oftajn.

— Feliĉaj la okuloj, kiuj vidas vin, — diris Clara, renkontirante al Marcial, kiam tiu enpaŝis en la tualetokambon. — Post kiam vi forgesis min tiom longe, vi ne meritus ĉi tiun ĉirkaŭprenon tiel streĉan kaj malpli eĉ ĉi tiun kison.

— Se vi tiel pensas, al mi plaĉas tiom pli. Sed vi eraras. Ne forgeso estis la kaŭzo . . .

— Ne mensogu . . . kaj eĉ se tiel estus, estus plia kaŭzo vivigi vian memoron, kiu estas kvazaŭ kapric-

ulino nekomprenebla. Bona pruvo por tio kio okazas al mi post . . . post . . . mi ne plu memoras certe, post kiom da jaroj. Sed estas egale, valoras same ĉu hieraŭ aŭ ne. Kio nun gravas estas la hodiaŭo. Sidigu vin. Mi havis frenezan emon vidi vin kaj babili kun vi . . . Ne, tien ne! Tre proksime vi ja ne sidas! Ĉu mi timigas vin?

— Bone vi scias ke ne.

— Ĉar mi vidas vin tiel serioza . . .

— Mi venis por paroli pri aferoj seriozaj.

— Mi ĝojas, ĉar vi divenis mian penson.

— Kiel?

— Jes, Marcial. Ekzistas strangeĝaj hazardoj. Se vi ne estus veninta hodiaŭ, en unu el tiuj ĉi tagoj mi estus irinta al via domo . . . kaj ankaŭ pro aferoj seriozaj.

— Al mia domo, post tiom da tempo? Por kio?

— Por amindumi vin. Ĉu tio ŝajnas al vi malmulte serioza?

— Clara, ne ŝercu. Vi multe ĉagrenus min.

— Mi vidas ke ne estis vanta mia imago, ke vi ne forpuŝus min.

— Sed, ĉu estas vero, Clara?

— Tiom, ke hieraŭ mi ordonis aranĝi viajn ĉambrojn. Mi preferas ke vi venas ĉi tien ol mem iri al via domo. Mia vizito estus havinta la celon demandi vin, ĉu ne ankaŭ vi, kiel mi, sentas la mankon de tiuj agrablaj tagoj de nia amikumeco, kaj ĉu vi ne deziras ilin revivigi?

— Certe mi deziras, ho jes. Sed . . .



— Via veno ŝparas al mi la iron kaj la rabon, ĉar mi atentigas vin ke, se necese, mi estus veniginta vin eĉ perforte. Sed ĉar vi estas jam ĉi tie, vi restu!

— Bone, Clara, jes. Sufiĉe vi devas scii . . . Sed diru al mi . . . Mi faros al vi demandon tre strangan, sed tre interesan por mi.

— Do diru!

— Ĉu ĉi tiu nova amikumo finiĝos, kiel la alia, per laceco viaflanke?

— Nu, kiu scias tion? Eble vi unue laciĝos. En la estonteco neniu legas.

— Mi legas ke neniam mi laciĝos je vi.

— Neniam! Kia esprimego! . . . Mil dankojn, mil dankojn! Sed kvankam mi ŝatas vian ĝentilecon, vi povas esti trankvila, ke mi ne faros la misagon igi vin plenumi vian vorton nek rememorigi vin pri ĝi. Ĉar mi nek kredas je neblaĵoj nek postulas tiajn de iu ajn. Kiom vi troigas! He, kvazaŭ vi ne estus farita el la sama ŝtofo kiel ĉiuj ceteraj viroj!

— Kaj vi estas el la sama ŝtofo kiel ĉiuj niaj . . . virinoj, ĉu ne?

— Mi ne kredas min fenomeno.

— Do, klare estas ke tio finiĝos por vi same kiel la alia.

— Viro, eĉ se estus kredeble ke vi neniam laciĝus je mi, tiom vi povus atendi . . .

— Do, Clara, mi elkore dankas vin pro via distingo, kiun mi neniam forgesos; sed estas neeble religian amikumon.

— Kiel! Ĉu mi ne plu plaĉas al vi?

— Pli ol iam! Guste pro tio ke vi altiras min per forto, pri kiu vi ne havas ideon, mi ne deziras renovigi dolorojn, kiuj tiam estus eĉ pli kruelaj, se mi de-nove vidus min forlasita.

— Kia sensencaĵo! Kial vi devas suferi? Ne estu infano! Vi diras aferojn, kiuj al neniu venas en la kapon.

— Plej malbone estas, Clara, ke mi ilin sentas. Tial mi ne volas luli min en dolĉan dormon, el kiu vekus min la elreviĝo.

— Kiaj strangaj vortoj!

— Ne, ne! Mi preferas ne sonĝi.

— Nu, mi vere bedaŭras, kreu al mi. Min multege doloras rezigni la iluzion pasigi novan epoketon kun vi. Ĝi estus estinta tiom plezura! Sed, kion fari? Vi postulas tiel strangajn aferojn . . .

— Ne, mi ne postulas, ĉar mi scias ke ili estas ne-blaj.

— Malsaĝuleto! Fine, ĉar ni ne povas esti amik-umitoj, ni kontentiĝos esti amikoj tre sinceraj. Mi certigas vin, ke kruelege ĉagrenas min nun serĉi alian, kaj vi povas kredi ke, kiu ajn estos li, vi ĉiam multe mankos al mi.

— Mil dankojn, Clara, — respondis Marcial duon-amare, duon-ironie, penante kaŝi sentojn ridindajn en la mondo de la superĝuantoj. — Sed, malgraŭ ĉio ĉi, mi ankoraŭ ne diris al vi la celon de mia vizito.

— Vere, vi ja ne venis pro tio, kion mi pensis . . . Kaj ne fariĝu tro memfida pro la ĝemo, kiu eliĝas el mi, kiam mi rememoras . . . Nu, diru!

— Mi kredas ke nia amikumo havis naturajn sekvojn.

— Sekvojn?

— Kiam ni disiris, vi estis graveda.

— Ha, jes! Unu monaton poste mi naskis. Kaj kio pli?

— Mi deziras scii la ekzaktan daton kaj ĉu estis knabo aŭ knabino.

— Do, kara mia, devis esti . . . jes, proksimume en januaro aŭ februaro, antaŭ tri aŭ kvar jaroj, mi kredas ke devas esti kvar, sed pri la ekzakta dato mi ne plu memoras. La sekson mi neniam eksciis; mi ne ekpensis demandi. Sed kiom gravas tio por vi kaj kun kiu celo vi esploras ĉi tion?

Sur la pinto de la lango Marcial havis la respondon: „Ĉar mi volas koni kaj ĉirkaŭpreni mian infanon“; sed la sama timo pri ridindeco, kiu antaŭe lin retenis, igis lin respondi tre diference de tio, kion li preparis jam post la antaŭvespero, kiam li, rigardinte la filon de Cartoya, decidis demandi de Clara la datojn, kiujn ŝi ne povis doni. Tial li respondis:

— Mi estas faranta studojn pri la transmeto al la posteularo de proprecoj fizikaj kaj moralaj de la gepatroj, kaj mi pensis ke, ĉar mi konas min mem pli bone ol iun alian, je filo mia miaj observoj rezultus pli fruktodonaj.

— Ha! temas pri scienca intereso . . .

— Klare! Kaj ĉu ne ekzistas rimedo . . .

— Se la tokologo kiu okupis sin pri la naskito ne retenis noton . . . Mi kredas ke la leĝo faras ilin res-

pondecaj pri la infanoj kaj devigas ilin zorgi pri en-registrigo.

— Ha, estas vere! Tiamaniere mi eble povos. . . .  
Kiu estis, kiu estis?

Konstatinte la nomon de tiu, kiu estis portinta sian filon en la edukejon, la du eks-amikumitoj adiaŭis korege, kvazaŭ nenio okazis inter ili, kaj sen tio ke la malsukcesinta provo, reflorigi tiun amikumon, ĵetis la plej malgrandan ombron sur la sinceran amikecon de Clara; tial ŝi pensis, kiam Marcial foriris: „Estas domaĝe; jam li estis konsentinta . . . Sed pli bone estas tiel, ĉar ĉi tiu knabego ĉiam estis strangeta, sed nun li estas komplete freneza; pro malpli granda kaŭzo kelkaj estas en frenezulejoj.“

Li, siaflanke, diris al si, elirante al la strato: „Prave diras Ramón kaj Inés: ne ekzistas diferenco kun ĉevalino nek kun kokino. Tamen, ekzistas: la unu mamnutras kaj la alia vartas siajn idojn.“

## XVI

### Orfa je filo

La doktoro, al kies domo iris Rucandio jam la saman posttagmezon en la tago de sia vizito al Clara, havis sian arkivon en bona ordo, kiel montris lia deĵorlibro de infantransdonoj rilatanta al la jaro 9996, kie oni povis legi: „19-a de januaro. Knabo naskita de sinjorino Clara Snow. Normala. 4713 gramoj.“ Mal-supre, la subskribo de l' kuracisto, iu noto de malsama manskribo, konfirmanta la akcepton en la Internacia Edukejo, iu subskribo nelegebla kaj la stampo de l' instituto.

Sed ĉi tie finiĝis la postsigno. En la edukejo, kien tuj iris Marcial, oni informis lin, post kiam oni turmente atendigis lin du—tri longajn horojn, ke la 19-an de januaro eniris tri knabinoj kaj kvin knaboj kaj ke, nundate, jam tri el la lastaj estas mortintaj.

Ekscii, kiu estis la alportita de D-ro N., kiu estis veninta kun lia propra filo, estis neeble; la statutoj de l' edukejo malpermesas tiajn esplorojn ĉar, pro saĝa ordono de la leĝo, ĉi tiu ne rekonas por la edukotoj aliajn gepatrojn ol Socion kaj Edukejon.

Reveninte hejmen, en anima stato de iu, kiu ĵus perdis iun esperon, li komencis repensi pri la impresoj de tiu tago.

Unue: la releviĝo de lia malnova amo ĉe la ekvido al Clara kaj ĉe la aŭskultado al ŝia tenta propono. Sed nun, post kiam antaŭvespere li aŭdis de Cartoya aferojn por lia intelekto tute novajn, li vidis klare ke tiu amo, kvankam influita de l' medio, kie ĝi naskiĝis kaj makulita de l' pure fizika maniero, kiel ĝin komprenis ŝi, kiu ĝin inspiris, tiu amo estas por li malsama al tiu, konata inter la superĝuantoj, kaj havas ian similecon kun tiu de Cartoya al lia edzino. Poste: lia timo ke la feliĉo de nova amikumo farus pli dolora la certan disiĝon. Poste: la impreso kiam faris al li ŝia malvarma indiferenteco antaŭ lia neo. Kaj, antaŭ ĉio, la absoluta forgeso pri tiu filo kiun, laŭ diro de Inés kaj Ramón, Marcial jam rigardis kiel daŭrigon de si kaj Clara: karno de iliaj karnoj kaj sango de iliaj sangoj kaj animo naskita de iliaj animoj, eĉ se ĝin neus la plejsaĝulo Mob, tial ke li ne kredis al animo.

Tio kuracis lian amon al Clara; subite, tiel, kiel kuracas brulrimedo, aŭ kvazaŭ oni estus elŝirinta brute, per unu ektiro, la malnovan dornon, kiu tiutage ree pikis lin, kiam renaskiĝis liaj mortintaj esperoj nur por morti definitive. Jam ĝi ne pikus lin plu, ĉar ĝi ja estis radike elŝirita. Sed anstataŭ ĝi restis alia, neeble elŝirebla: la dorno de l' vana emego kisi sian filon, vekiginta, kiam li kisis la fileton de Cartoya, la emego ĉirkaŭpreni tiun filon *f o r l a s i t a n*, laŭ frazo de Inés. Kaj, kió estis eĉ pli grava, laŭ akuzo jam formulita de lia propra konscienco.

Rigardante ĉirkaŭen, pensante pri tio, kion en tiu ĉi mondo faras ĉiuj liaj samtempanoj, li serĉis prav-

igon por sia agado en la ĝenerala kondutaro, ĉar li volis kontraŭbatali la vekigon de sia konscienco per argumentoj, kiujn lia juĝpovo trovis abunde en kutimoj, leĝoj kaj eĉ en la senkompatema filozofio de l' egoismo mem; sed kiam li vidis jam certa la triumfon de siaj prudentaj pripensoj raciaj, ĉi tiuj estis silentigataj de doloro multe pli forta ol ĉiuj argumentoj: de la doloro ke, per propra kulpo, al li estas neeble kontentigi tiun deziron; de la torturanta nepovo kisi sian filon; de la senfrukta lamentado de l' sentimento de lia patreco malfrue vekiginta.

— Sed ĉu estas eble ke la parioj pravas? — li ekkriis levigante kun eksciteco. — Kia sensencaĵo! Tio estas frenezaĵoj! La tuta mondo, tiu kiu valoras, tiu kiu pensas kaj pesas, la mondo de l' inteligentuloj kaj saĝuloj ne povas erari; devige ĝi devas esti prava. La degraditaj parioj, la elekvilbrigita Cartoya, tiuj da barbaroj venintaj el jarcentoj malkleraj, ne povas pli-valori ol la inteligenteco kaj saĝeco de la miaj, ol mia propra juĝo kaj sentado . . . Mia sentado? Kiom gravas mia sentado, kiam ĝuste ĝi estas respondeca pri la sorĉo, kiun kaŭzis en mi la sensencaĵoj de tiuj homoj. Ne malmulte Mob mokus, se li eksciis, ke mi lasas mian koron supreniĝi al la kapo por diskuti kun la cerbo.

Tiel mi malprosperis: Unue, la stulteco rifuzi Clara'n, postulante amon neeblan por homoj prudentaj, kaj poste, la idioteco turmenti min per io alia, kio turmentas neniun patron, kiu ne komplete perdis sian prudenton.

Estas necese forigi el si la impresojn kaj elpaŝi el ĉi tiu hontiga krizo de sentimentalismo kaŭzita per la vido de tiu virino. Tio pasos, kiel pasis ankaŭ la antaŭa; kaj la infanon mi forgesos . . . , aŭ, almenaŭ, mi al kutimiĝos al la perdo, kiel mi al kutimiĝis al la perdo de ĝia patrino. Certe, ne kun pli granda facileco, ĉar mi neniam ĝuis ĝian societon, kiel mi ĝuis la ŝian.

Al la laboro, al la laboro! Laboro min distros, fiksante miajn pensojn al seriozaj aferoj. — Kaj li ek-laboris.

Sed post unu horo da senefikaj klopodoj koncentri en ŝia tasko la ribelan imagon foriĝantan ĉiumomente, jen rememorigante la okazintaĵojn de l' tago, jen intencante analizi la perturbitan staton de sia animo, li ekkomprenis ke tiun nokton li faros nenion profitan, kaj li decidis enlitiĝi; sed kiam li, okupita per la ideo pri tiu filo nerehaveble perdita, eniris la alkovon, subite li faris duonturnon, fermis la pordon de l' dormoĉambro kaj post duonhoro malfermis tiun de la kaverna de Cartoya kiu, neatendite lin ekvidante, ek-kriis:

— Vi! Refoje hodiaŭ!

— Pardonu, Ramón! Estas tre malfrue, preskaŭ noktmezo, kaj verŝajne vi estas jam enlitiĝonta.

— Tio ne ĝenu vin. Mi atendis vin, jes, sed ne tiel baldaŭ. Tiom pli bone, tiom pli bone.

— Aŭskultu, Ramón! La unuan fojon, kiam vi mal-supreniris ĉi tien, la okuloj de Maria estis por vi magneto, kiu ree venigis vin sekvintatage. Al mi okazis same.



— Mi ne komprenas vin, Marcial.

— Hieraŭ nokte mi ne fermis la okulojn, kaj ĉar ankaŭ hodiaŭ mi ne fermus ilin, se mi ne antaŭe kontentigus mian deziron rigardi vian filon, mi venas por vidi lin.

— Mian filon! . . . Sed kiel estas eble, ke ĝis tia ekstremo vin perturbas infano, kiun vi vidis nur momenton, kaj krome, dormantan?

— Ĉar ĝis hieraŭ mi ne pensis pri tio, ke antaŭ kvar jaroj mi perdis la mian; ĉar subite mia koro absurde ŝvelis per amo al io neebila; ĉar hieraŭ nokte mi vidis, ke tiu ĉi etulo estas por vi tio, kio neniam povos esti por mi mia filo forlasita; ĉar mi envias vin pro la feliĉo, kiun vi ĝuas rigardante kaj karesante la vian; ĉar . . . mi malamas min mem.

— Trankviliĝu, Marcial, trankviliĝu!

— Mi malamas aŭ malrespektas min . . . Mi mem hieraŭ diris al Inés, kondamnante min per miaj propraj vortoj, kiujn mi bone memoras: „Kiu forlasas siajn verkojn, estas neinda krei ion.“ Kaj mi forlasis la plej grandan, la plej noblan el miaj verkoj.

— Ne, Marcial, ne. Vi ne estas neinda. Hieraŭ vi estis; sed sentante ĉi tiun doloron pro la malbono kiun vi faris, vi hodiaŭ jam ne estas.

— Estas tortura konscienc-riproĉo.

— Ne estas nur tio; estas io pli kaj havas nomon multe malpli teruran: ĝi estas pento kiu ĉe la doloro, per kiu ĝi boras en vi, forgratas vian pasintan neindecon.

— Neeble, neeble.

— Ne ekzistas neeblaĵoj por la Ĉiopovo. Mia Dio diras al vi per mia voĉo, ke ĉi tiu doloro jam komencis lavi la makulon, kiu tiom turmentas vin. Suferu, Marcial, suferu: suferado kiu liberigas kaj nobligas estas bona.

— Ne parolu al mi pri aferoj nekompreneblaj. Ĉu via Dio vere diras tion? Ĉu efektive vi kredas ĝin? Ne povas esti, ne povas esti . . . Ne parolu al mi pri aferoj, kiujn mi ne komprenas.

— Mi ne parolos. Lia estas la tempo; Li parolos al vi elektante la horon. Nun mi nur volas diri al vi ke, se ne ŝajnas al vi maldiskreteco la simpatio de amika koro kaj se vi trovas konsolon malfermante al ĝi la vian, vi povas paroli; sed silentu, se io vin repuŝas paroli. Rigardu mian filon, ĉar por tio vi ja venis kaj en tio vi kredas trovi konsolon. Restu, kiom longe vi volos, kaj foriru, kiam ajn tio plaĉos al vi.

Marcial alproksimiĝis al la malpompa lito, kie dormis la infano kun la blonda kaphararo sternita sur la kuseno kaj kun la nudaj brakoj sur la kovraĵo. Li rigardis lin longe kaj murmuris:

— Ĉu ankaŭ la alia estas tiel bela? Nun li same dormas kiel ĉi tiu! Kiel feliĉa estas Cartoya! Kaj kiel feliĉa ankaŭ ĉi tiu infano! Ĝi ricevis ĉe la naskiĝo la am-inklinon de siaj gepatroj. La mia ne! Ĝin gvidos ĝia patro tra la vivo, li konsolos ĝin, kiam ĝi ploros. La mia iros sola tra la mondo kaj sola ĝi ploros, ĉar ĝi ne havas patron.

— La via havas patron, kiu gardas ĝin kaj povas pli ol vi kaj mi: la Patron de ĉio ekzistanta, kiu ne

mankos al ĝi; la sama Patro ankaŭ de vi; kiam malpleje vi povis esperi, Li vidis vian afliktecon kaj venigis vin ĉi tien por havigi al vi la konsolon aŭdi de mi, ke via filo ne troviĝas forlasita en la mondo, ĉar gardas super li Povo multe pli granda ol la via, multe pli granda ol la mia; por sciigi vin, ke unu sama amrigardo en ĉi tiu momento falas el la alto sur ĉi tiujn du infanojn, ĉar ambaŭ estas Liaj filoj.

— Kiajn nekredeblajn aferojn vi diras! Sed ili estas dolĉaj, tre dolĉaj; ŝajnas ke ili mildigas la krudecon de l' doloro, kiun mi sentas. Kaj meze en mia aflikto min konsolas rigardi vian filon, pensi ke unu sama senkulpeco donas al ĉi tiu kaj al la mia la saman pacon de ĉi tiu kvieta dormo; min konsolas pensi ke, almenaŭ hodiaŭ, ne tuŝas lin ĉi tiu doloro, kiun mi sentas. Antaŭ ol foriri mi deziras saturi min per la pureco kaj dolĉeco de ĉi tiu dormo, por ke ili povu defendi min kontraŭ miaj nigraj pensoj, kiam mi sola realvenos supre.

— Sed kial vi devas foriri? Ni havas la bonŝancon ke, pro mistero tiel nekomprenebla kiel ĉiuj de l' homa koro, la proksimeco de mia filo vin konsolas; eksidu do apud li kaj restu kiom longe vi volos.

— Sed vi . . . Estas jam tre malfrue . . . Mi ne povas, mi ne rajtas . . .

— Per kio oni povus pli bone kaj pli agrable pasigi la nokton ol malpezigante malfeliĉon?

— Dankon, Ramón, dankon, vi estas bona. Mi eksidos apud li tempeton, momenton . . .

— Kiam Cartoya vidis, ke lia amiko eksidas, li ridis

bonanime kaj imitis lin, ne perdante lin el siaj okuloj, kvazaŭ dezirante penetri tra lia vizaĝo kaj la volvaĝo de novaj sentimentoj, kiuj en lia animo kunbatalis.

Tiel pasis longa tempo, tre longa. La esprimema vizaĝo de Marcial reflektis la lukton, okazantan en lia interno, de kontraŭigantaj intencoj, ĝis li fine diris al si mem kiel iu, kiu el longaj hezitoj ekdecidis ion:

— Jes, estas plej bone. Por ĉiu konfido, kiun mi faris al li, li redonis al mi konsolon.

Kaj turnante sin al Cartoya, li daŭrigis laŭtvoĉe:

— Ramón, mi devas rakonti al vi ĉion.

— Se tio malpezigas vin, mi estas je via dispono.

— Sed ĝi estos longdaŭra, ĉar mi devos montri al vi eĉ la profundon de mia koro. Tial ke estas tre malfrue kaj vi devas ripozi, estos pli bone prokrasti ĝin ĝis morgaŭ.

— Se ni prokrastos ĝin, mi ne ripozus pensante, ke vi ne ripozas.

Ĉirkaŭ la tria nokte Rucandio komencis la historion de sia amo al Clara kaj de sia aspiro trovi en ĝi tion, kion ŝi estis nekapabla doni. Poste li rakontis la novajn impresojn vekitajn en li per la interkomunikado kun Inés, Juan kaj Cartoya mem; sian decidon de antaŭhieraŭ serĉi sian filon; la viziton al Clara, la senefikajn esplorojn por trovi la infanon; kaj kiel blindulo, palpanta en mondo nekonata, por kies trajto Cartoya jam servis al li kiel gvidanto, li poste klarigis siajn nekutimajn impresojn de tiuj tagoj, kiuj determinis la moralan krizon, tra kiu pasis lia spirito.

Longa, tre longa estis la interparolo, tre simila al

konfeso; ambaŭ forgesis ĉion krom la tragedio de tiu animo, kaj ĉar ili malhavis en la subterejoj la lumon de l' mateniĝo, ili ne rimarkis ke la nokto estis pasinta. Kiam ili daŭrigis paroli ankoraŭ je la sepa matene, la etulo vekigis.

Li malfermis la okulojn, frotis la palpebrojn per siaj diketaj kaj rozkoloraj manetoj, eksidis en la lito kaj tuj, kun la rapideco karakteriza ĉe infanoj, akiri plenkonscion kiam ili vekigas subite, li diris:

— Paĉo, paĉo! Venu min vesti! . . . Kiu estas tiu ĉi sinjolo?

Rapide Marcial turnis la kapon, kvazaŭ li aŭdis ion eksterordinaran. Kaj efektive ĝi estis por li io tia. Pro tio ke en la centa jarcento nur la oficistoj de la edukejoj sin movas inter infanoj, tio estis la unua fojo, ke lia aŭdo estis karesata per la freŝa voĉo de kreituleto, kiu produktis en lia koro tiel novan impreson kiel en lia aŭdo.

Cartoya kuris al la lito, ekprenis sian filon en la brakojn, revenis kun li al Marcial, kaj sidiginte sur siajn genuojn la infanon en ĉemizeto, nudpiedan kaj nudkruran, li diris al ĝi:

— Ĉi tiu estas malfeliĉa sinjoro, kiu havis infanon kiel vi, sed perdis ĝin.

— Kompatinda sinjolo! Veŝajne li plois multe. Vidu, sinjolo, ankaŭ mi havis bideton kaj ĝi foiĝis, kaj mi plois multe. Ĉu fokuis via ifano kiel la bideto? Bideto, malbona; ifano, malbona . . . Mi ne fokuas, mi ne lasas sola paĉon.

Marcial kiu, vidante la delikatan korpeton, havis

nek sufiĉe da okuloj nek sufiĉe da admiro por plengui tiun por li nekonatan mirindaĵon de la naturo, sentis profundegan emocion, aŭskultante la naivetan babilon de l' etulo.

Sed aŭdante „mi ne lasas sola paĉon“ kaj rememorante, ke li estis lasinta sola sian filon, li amare ekploregis.

— Ne plou, sinjolo. Paĉo alpotis al mi alian bideton; via paĉo alpotos al vi alian ifanon.

Marcial daŭrigis plori, kun la vizaĝo en la manoj, kaj ĉiufoje kun pli granda malkonsolo, ĉar la vido de ĉi tiu anĝelo en la brakoj de lia patro igis lin kompreni kun amara evidenteco, kion li perdis, forlasinte sian filon.

Larĝe malfermante siajn belajn grandajn okulojn, la etulo, tre mirigita, rigardis tiun doloron. Cartoya diris al li duonvoĉe kelkajn vortojn en la orelon kaj alproksimigis lin al Marcial, ĝis li per sia maneto povis ekkapti ties fingrojn kaj tiri je ili, por forigi de la vizaĝo la manojn, per kiuj li kovris ĝin; samtempe li diris:

— Ne plou plu, sinjolo; mi ne volas ke vi plou. Paĉo dias ke vi amas min multe; mi ankaŭ amos vin kaj ludos kun vi . . . Sed se vi ploas, mi ne amos vin.

Neeble priskribi, tiel ke pri ĝi estu donata ĝusta imago, kiom granda estis la surprizo de Marcial, kiam li sentis la tirojn de tiuj manetoj, kaj kiom granda estis la dolĉeco de l' konsolo, kiun havigis al li la karesmaj kaj senkulpaj vortoj, kiuj ilin akompanis; sed pli gran-

da estis eĉ la varma dolĉeco, kiu malpezigis lian animon, kiam Cartoya, dirante al sia filo „kisu lin, kisu lin!“ ŝovis sian filon sur la genuojn de sia amiko kaj kiam tiu ĉi sentis, ke la brakoj de la etulo plektis sin ĉirkaŭ lian kolon kun la ripetita:

— Mi ludos kun vi, sed ne plou.



FEDERACIÓN  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANIA ESPERANTO-FEDERACIO

## XVII

### La reviviĝintoj vidas feliĉon kaj doloron en la fundo de la koroj

— Hodiaŭ malfruas Rucandio.

— Jes, kaj mi bedaŭras tion; mi deziras fari al li kelkajn demandojn. Koncerne la Mob-amon okazas al mi kiel, en infana aĝo, koncerne timigajn rakontojn: malgraŭ la timego, kiun ili inspiris al mi, ili interesis min plejmulte.

— Tio ne mirigas min. Tiuj eltrovoj rilate al la koro havas la aspekton de afero satana; sed sendube ili estas sorĉe-allogaj.

— Mi ne povas ĉion kompreni, kion ni jam legis en la memorskribo, nek povas fine konvinkiĝi pri la ebleco de ĉio ĉi tio. Krome, ĉar la kajero, kiun donis al ni Don Marcial, klarigas nur parton de la eltrovo, mi havas antaŭsenton tre similan al teruro, ke en la restanta parto ni trovos ion supermezure teruran: ion diablan, kiel vi ĵus diris. Kaj mi havas timon, Juan, multan timon.

Tiel parolis en la laboratorio la hispanoj el la du-deka jarcento, dum ili atendis Marcial'on, kiu ne estis veninta tiumatene, ĉar la fizika laceco pro du sendormaj noktoj kune kun la elĉerpiĝo okazigita de la



morala krizo trapasita estis konsuminta lian korpan rezistopovon. La neceso de ripozo efikis, ke la spiritan streĉon superregis la agrabla oazo, kiun en la spiritaj doloroj estis malferminta la sceno kun la filo de Cartoya. Tial, kiam Rucandio jam post la oka matene supreniris al sia loĝejo, li sternis sin sur la liton kaj preskaŭ tuj ekdormis kiel ligno, ne donante vivsignon ĝis post la tria posttagmeze.

Ĉirkaŭ la dekdua, kiam la geedzoj, pensante jam ke ilia senpera ĉefo tiumatene ne plu venos al la laboratorio, sin preparis por foriri al sia loĝejo, malfermiĝis la pordo kaj prezentiĝis en ĝi la plejmoŝta Mob, kiu estis ĉirkaŭiranta tie kun la intenco, koni la impreson de Marcial pri la frukto atingita de liaj unuaj lecionoj al la barbaroj kaj pri la ebleco, ĉu ili povos fine taŭgi por io.

Informiĝinte ke Rucandio ne venis li ekhavis ideon, ekzameneti ilin. Farinte al ili kelkajn demandojn, li kontentiĝis vidante ilin jam instruitaj pri la fibretoj kaj la am-plasmo, kaj al li plaĉis ilia scivolemo pri la maniero, kiel kreiĝas en ili am-inklino kaj malamo.

Tio kaj la vanteco de Mob, kiu ĉiam piezure parolis pri sia eltrovo, decidigis lin rigardi la matenon perdita kaj en tiu tago, kiel escepton, mem fari prelegon al la barbaroj, uzante en ĝi aparaton tre strangan, ekstere similan al kinematografo kaj elpensitan de li por konvinki la homojn pri la realeco de liaj eltrovoj, ne montrante iliajn detalojn: ĉu por teni ilin sekretaj, ĉu (kaj ĉio povas esti) tial ke li mem ne konis ion alian ol iliajn efektojn.

Tial, kiam Inés lin demandis, kiel ŝi antaŭtage estis demandinta Marcial'on pri la maniero, laŭ kiu naskiĝas la amo en la fibretoj kaj en la plasmato, li rediris:

— Moviĝado montriĝas ĉe irado kaj pro tio, pli bone ol doni al ci klarigojn, eble nekompreneblajn por ci, mi preferas vidigi al ci la korojn mem en funkciado, naskigi antaŭ ciaj okuloj amon en ili.

— Jam hieraŭ Don Marcial montris al ni en la mikroskopoj . . .

— Ne estas tio; hieraŭ ci vidis nur pecetojn de koroj tranĉitaj per mikrotomoj, dum hodiaŭ ci vidas tutajn korojn vivantajn, batantajn en la interno de kreaĵoj; hodiaŭ ci vidas la amon, la feliĉon kaj la doloron en movo<sup>21</sup>.

Kiam ŝi aŭdis tion, ŝi ekteremis pro teruro, kaj tento kaptis ŝin diri ke ŝi volas vidi nenion; sed ŝia scivol-emo venkis la timon, kaj ŝi demandis:

— Sed koroj vivantaj? Interne de kreaĵoj ankaŭ vivantaj? Ĉu eble?

— Jes, malgrandulino, jes.

— Do, tiuj kreaĵoj havas la brustojn disŝiritaj?

— De la doloro, jes, kelkaj; sed sendifektaj, sen iu tranĉo de bisturio. Antaŭ la eltrovo de la radioj o - m i k r o n, tiu procedo nepre devus esti uzata. Kiel en tempoj antikvaj oni traboris la stomakojn de hundoj vivantaj por studi la digestadon, tiel ni malfermas la pariojn, ankaŭ tenante ilin vivaj, por studi la diversajn organojn. Ĉar estas multe pli utile eksperimenti en homoj ol en hundoj, katoj aŭ kunikloj. Sed kiel la radioj X, jam konitaj en via epoko, permesas

certajn esplorojn internajn pro la diversa travidebleco de karno kaj ostoj per tiuj radioj, tiel la radioj o-mikron, nekonataj de vi, havigis plej diversan skalon da radiaĵoj, dank' al kiuj la ostoj estas travideblaj, kaj same tiu aŭ tiu klaso de organaj teksaĵoj. Laŭ gradigo de sia intenseco dum la aplikado ili pli malpli penetras en la homan korpon, farante nevideblaj partojn, kiujn oni ne volas observi, kaj videblaj tiujn, kiujn estas grave ekzameni.

Tiamaniere, kvazaŭ estus vulgaraj fotograf-plakoj, mi sukcesis fari la o-mikrongrafaĵojn de koroj vivantaj, kiujn mi estas montronta al ci, projekciante ilin per kinematografo, kiu pligrandigas eksterordinare la formatojn de tiuj, kiujn ni ekzamenos en la hodiaŭa leciono.

Venu, la aparato staras en alia ejo.

---

Post kiam la geedzoj estis eksidintaj kontraŭe de du kinematografaj ekranoj apudigitaj, ili vidis aperi sur la maldekstra viron kaj virinon en natura grandeco, kaj sur la dekstra du grandegajn korojn; ambaŭ estis pli altaj ol tri metrojn kaj tiom travideblaj, kvazaŭ ili estus el vitro. Samtempe fonografo komencis reciti deklaron de pasia amo faratan de la kavaliro al la sinjorino, dum la kinematografo reproduktis lian vizaĝon animitan de entuziasma afekto, kiu ĝin movis, kaj ŝian vizaĝon glaciigintan pro absoluta indiferenteco, per kiu ŝi aŭskultis la am-esprimon, kiun ŝi in-

spiris. Fine tiu indiferenteco estis plej kategorie manifestata en la negativa respondo esprimita en vortoj kiujn la fonografo reproduktis<sup>22</sup>.

— Rigardu bone, — diris Mob, komencante la projekciadon de la koroj sur la alia ekrano. — La virina estas dekstre; la likva am-plasmo enhavata en ĝiaj ĉeloj estas perfekte travidebla, kaj la amfibretoj naĝantaj en ĝi komplete trankvilaj: ĉi tiu trankvil-eco estas indiferenteco. En la alia koro, tiu de l' enamiĝinto, tiuj samaj fibretoj moviĝas en senĉesa movo, treme osciladas, vibrante per impulsoj de l' amo. Ĉu ci rimarkas la diferencojn kiujn mi indikas al ci?

— Jes, jes, sinjoro.

— Ili estas perfekte konstateblaj.

— Nu, nun ni ne okupu nin pri la repuŝito; mi volas montri al ci la koron de la sama nefavorulino, kiun mi, kiel vi vidas, retenas sur la ekrano, kiam ŝin impresas la vido al tiu alia kavaliro nun aperanta en la loko, kie la alia staris antaŭe.

Kinematografo kaj fonografo prezentis scenon de amo respondita: dolĉaj rigardoj, ekstaza okulumado, amemaj frazoj, reciprokaj karesoj . . .

— Rigardu, rigardu la korojn, kiuj estas la intereso, kaj ci vidos, kiel la agrablaj impresoj de tiuj du feliĉaj gefianĉoj ampleksigas ĉelkernojn kaj fibrojn, pliiĝante iliajn volumenojn, ĝis kiam ili plenigas la tutan spacon en situacio de indiferenteco rezervitan al la plasmo. Rigardu ilin, kiel ili jam okupas ĉiujn kavaĵojn de l' fizika koro kaj produktas en ĝi la impreson

de ŝveliĝo kaj pleneco, la superfluecon de vivo, kiun konstatas la kreitaĵoj, kiam ili sentas sin feliĉaj.

— Jes, jes, estas vere — diris Inés. — Tion, tion oni sentas, kiam oni estas feliĉa.

— Rigardu en la vizaĝoj de la geamantoj sur unu ekrano la efekton de tio, kion vi vidas en iliaj koroj sur la alia. Tio estas la feliĉo, kiu plirapidigas la batadon de ilia sango, kolorigas iliajn vizaĝojn, brilas en iliaj rigardoj. Rigardu ĝin, rigardu!

— Jes, jes, estas vero, sinjoro Mob, en tiuj vizaĝoj rebrilas la feliĉo. Vi estas prava: la ŝveliĝo, kiun vi ĝis nin vidi, estas la amo, kiu inundas la animojn de tiuj du kreitoj.

— Animoj? Kion ci diras, homo! Kia esprimaĉo! Tio estas antikvaĵoj. La amo estas nur tio, kion ci ĵus vidis: disetendiĝo fizika, nek pli nek malpli, kiel tiu de l' hidrargo en la termometro, kiam altiĝas la temperaturo: ŝvelaĵo aŭ hipertrofiio; ekzistas konvinkaj pruvoj.

— Tamen, sinjoro Mob . . .

— Aŭskultu, malgrandulino, ne perdu la tempon; al mi oni ne faras rimarkigojn.

— Ne, ne, sinjoro, neniel. Tio ne estis mia intenco; mi nur volis scii kio okazas . . .

— En tio kion ci nomas animo? Tion mi ne povas diri. Mia scienco vidis nur fenomenojn tuŝeblajn, kaj pri aliaj ĝi ne zorgas. Nek analizo nek mikroskopo nek skalpelo penetras trans la karnon. Por scii estus necese demandi la nesciajn kreaĵojn, kiuj ankoraŭ amas, kiel en epokoj malprogresemaĵ oni komprenis la

amon; la malsuperajn estulojn, kiuj en niaj manoj estas instrumentoj de laboro; taglaboristojn, ideologojn kaj poetojn. Sed ne, ni ne demandu. Ili respondus en lingvaĵo arkaika kaj nekomprenebla, per vortoj kaj ideoj, kiujn nia scienco malkonas; ili parolus pri sentimentoj, dum ni konas nur sentojn; pri oferoj, abnegacio kaj pri multeco da platonismoj, kiuj en niaj oreloj sonus malplene.

Sed ni lasu nun tiujn ĉi naivaĵojn kaj revenu al la praktiko kaj pozitivo. Tiucele mi nun estas montronta al vi, kio okazas en la koroj pikitaj de la doloro. Sed en tio ni povas progresi jam pli rapide. Rigardu: tiuj kiujn mi, unu post la alia, igas preteriĝi sur la maldekstra ekrano, estas homoj afliktitaj de amo kontraŭita, malestimata, ĵaluzo aŭ perdo de amata persono. Ĉi tiu lasta doloro estas sentata ankoraŭ nur en la mondo de la stultaj parioj, obstinantaj vivi alkroĉitaj al antikvaĉa institucio nomata familio. La grimacoj de la vizaĝoj, kiujn ci vidas, malkaŝos la turmentojn, kiujn la doloro igas suferi al tiuj kreaĵoj.

Sur la ekrano aperis, por pasi kaj malaperi laŭ la parolado de l' saĝulo, sinsekvaj vizaĝoj kuntiritaj de doloro, timo, kolero: funebra procesio da okuloj plor-emaj kaj vizaĝoj dolorplenaj, profunde malĝojigantaj la emociitajn rigardantojn de tiu eksterordinara kinematografata spektaklo. Ilia malĝojo eĉ pliiĝis, kiam ili vidis preteriĝi sur la alia ekrano vicon da torturitaj koroj, korespondantaj al tiuj malfeliĉuloj, kaj kiam ili aŭdis Mob'on klarigi tiamaniere la fenomenojn aperantajn bonvideble sur la ekrano.

— Male al tio, kion ci antaŭe vidis ĉe tiuj du feliĉaj geamantoj, rigardu kiel en ĉi tiuj malfeliĉuloj la amĉelo kuntiriĝas laŭ tia mezuro, ke ĝi fariĝas nerimark- ebla al la plej potencaj mikroskopoj de l' psiko- histologo. Retiriĝas la fibretoj, kvazaŭ ili estus absorbitaj de la ĉelkernoj, malŝvelante — vidu, vidu! — kun dolora kaj konvulsia tremo. La plasmo perdas sian kutiman travideblecon kaj fluidecon; dikiĝante ĝi malklariĝas, kaj kiel sekvo de ĉi tiuj volumen-malpli- iĝoj la karnaj partoj de l' materia koro suferas mal- plenecon, igantan malpliigi la ritmon, per kiu markiĝas la fluado de l' vivo. La sango perdas varmon, dolore kuras en la vejnoj, kaj la malfeliĉo malheligas la vi- zaĝon per paleco kadavra.

— Kio okazas al ci, malgrandulino?

— Mi estas plej emociita. Malfeliĉaj homoj . . . malfeliĉaj homoj! Kiom vi devas esti suferinta pro tio, ke vi devis vidi kaj movigi tiom da doloroj!

— Ci estas freneza, ulino! — Suferi! Kia sensenc- aĵo! Ĉu ci ne komprenas ke estis triumfo de mia genio ĉiu el ĉi tiuj batoj de doloro, kiun mia scienco malkovris, ĝin analizante, elspionante ĝian disvol- viĝon, serĉante ĝian kaŭzon, utiligante ĝin poste en utilaj aferoj? Kiajn strangaĵojn ekpensas ĉi tiuj revek- itaj fosiliuloj!

— Jes; certe vi jam komprenas, ke homoj tiel mal- progresintaj kiel ni devas miri pri ĉio ĉi, — diris Gar- cía, kiam li vidis Inés'on tiel konsternegitan pro la ne- homa respondo de l' saĝulo, aŭ tiel indignitan pro ĝi ke, se ŝi estus respondinta, estis timeble, ke tio estos

tre malagrabla al Mob. Kaj poste li daŭrigis: — Kaj ĉu vi ne faris studojn por imunigi la korojn kontraŭ la doloro, aŭ almenaŭ mildigi iliajn suferojn? Tio estus allogega problemo, kiun nursole geniulo kiel vi estus kapabla solvi.

— Ĝuste ci diris: en la tuta mondo nur mi estas kapabla solvi ĝin. Sed mi ne solvos ĝin, ĉar mi neniam faras stultaĵojn, kaj estus malsaĝegeco prirabi la industriojn, per kiuj ni superpensantoj profitas la potencajn fortojn, produktatajn per la suferoj de l' parioj. Ĉu ci ne komprenas, ke la ideo malpliigi la dolorojn al ĉi tiu gentaĉo, estus tiel absurda kiel anesteziigo al bovoj ĉe aljungado al ĉaro, por ke ili ne sentu la pikojn de l' pikilo, kiu ilin igas marŝi?

— Juan, mi ekmalsaniĝas.

— Silentu, silentu, virino. Jes, jes, sinjoro, vi estas milfoje prava, — respondis Juan per voĉo sufokita de l' teruro, kiun inspiris al li la malvarma frivol-eco de l' homo, en kies potenco estis Inés kaj li. — Jes, jes, sinjoro; mia demando estis maltrafega. Jam mi komprenas la logikan intereson de la superpensantoj pliigi dolorojn, kiuj bonfaras al la progreso.

Inés ne havis fortojn por paroli; nur en ŝiaj okuloj, fiksitaj kun teruro firme al Mob, oni povis ekkoni ŝiajn impresojn. Feliĉe, li ne rigardis ŝin, kaj eble li atribuis tiun mutecon al ŝia mirego pri lia talento kaj lia scienco. Tial li daŭrigis:

— Pro tio ke ci komprenis, kiel malsaĝege estus por la superpensantoj perdi la avantaĝojn ricevatajn el doloroj, kiuj nin ne doloras, mi kompletigos la dirit-



ajon per du vortoj, kiuj preparu cin facile kompreni en sinsekvaj klarigoj, kiel mi transformas la amon en industrian energion, pli ĝuste: amon kaj doloron, ĉar speciale la doloroj de l' amo entenas multege pli da forto ol la feliĉoj naskitaj el ĝi.

Tial ke al cia komprenpovo ne estos eble tion kompreni, mi diras al ci, ke pro sia subtilega sentebleco, pro nedetenebleco de siaj kuntiriĝoj kaj pro nekonata konsisteco, ĉeletoj kaj fibretoj foriĝas el la industria utiligado; por la praktika vivo ili estas absolute neutilaj; sed tio ne okazas same rilate al la plasmio kiu, kvankam malfirma laŭ sia konsisteco kaj ekstera funkcioj, havas malpli varian ekzistadon kaj pli percepteblan realecon. El metodaj studoj kaj ripetitaj eksperimentoj rezultas, ke tiu likvaĵo estas nura perilo aŭ, por paroli laŭ pli faka propreco, transformilo de animaj fenomenoj en fiziologiajn aperaĵojn, kiuj instigas la materialan laboron efektivan de l' koro, sango ktp.

De ĉi tio al la aplikado mekanika estas nur unu paŝo, facile farebla tuj kiam oni pripensas la evidentan similecon de l' am-plasmio kun la acidumita akvo de elektra pilo. Ĉar kvankam la kemia konsisteco de tiu ĉi mistera fluidaĵo estas sekreto ankoraŭ rezistanta al analizo, tamen miaj eksperimentoj permesas al mi aserti, ke fizike ĝi estas nur kondukilo de l' psiko-elektra fluido, nek pli nek malpli, kondukilo analoga al la metalfadenoj ĉe dinamoj kaj motoroj: al ozo-voltio, aŭ al eteridio<sup>23</sup>. Same kiel tiuj lasas pasi ondojn elektro-magnetajn, ĉi

tiu lasas pasi elektro-amecajn reagaĵojn inter si kaj la ĉelkernoj kaj fibretoj. Kaj per tio mi finas ĉi tiun prelegon, kiun aŭskulti ci havis la bonŝancon, kaj mi esperas ke ĝi helpis cin multe antaŭeniĝi en ĉia instruigo.

— Jes, jes, sinjoro, tre multe. Mil dankojn, mil dankojn — rapidis respondi García, kubutpuŝetante sian edzinon, al kiu li diris mallaŭte en hispana lingvo: „Diru ion, diru ion!“

— Multan dankon, multan dankon, — ŝi murmuris per voĉo senfortiĝinta.

— Kiam venos Rucandio, informu lin pri tio, kion mi klarigis al ci, por ke li ne perdu tempon ripetante ĝin. Kaj adiaŭ, malgranduloj.

Kiam la geedzoj estis solaj, ekkriis Juan:

— Vere, grandan timon vi faris al mi; ĉiun momente mi opiniis, ke vi faros iun komenton indignitan, aŭ ke Mob rekonos viajn pensojn en la vizaĝo. Num rezultas ke vi perdas la prudenton, kiun vi en la lastaj tagoj predikis al mi.

— Mi sentas min malsana; tiu viro min malsanigis. Se estus daŭrinta pli longe la terura spektaklo de la torturo al tiuj du kompategindaj koroj, mi ne estus povinta rezisti kaj estus forkurinta kaj ekkriinta kaj dirinta . . . mi ne scias kion, sed certe ion, kio ne estus laŭdoj, ĉar jam nur la vido al tiu fiulo min malsanigas pro teruriĝo . . . Perversulo, perversulo!

— Fiulo, jes, kaj perversulo. Vi estas prava. Kaj tiom pli timinda kaj pli perversa, ĉar li tenas nin en

sia potenco. Sed malgraŭ tio, kia fortulo de sciencoj kaj talentoj!

— Jes, kolosaj, sed malbenindaj. Li estas pruvo por tio, al kio povas konduki la bonfara scienco, kiam ĝi marŝas sola, orfa de ĉia ideo pri moraleco.

## XVIII

### Infanaĵoj

Malfacile estas diri ĉu Mōb, se li sciis la amon naskiĝantan en la koro de sia helpanto, konsiderus ĝin sufiĉe valora por ekspluati ĝin industrie; sed certe estas, ke por Marcial ĝi estis tre bonefika.

Bonega okazo estus ĉi tie iom filozofii. Sed pro tio ke la realaĵoj estas pli konvinkaj ol ĉiuj filozofioj kaj ĉiuj meditadoj, ni lasas al la leganto la filozofiadon, se tio plaĉas al li, por lia konto, limigante nin konstati la fakton, ke Marcial sentis malpeziĝon de la moralaj doloroj naskiĝintaj el la luktoj de lia spirito, luktoj inter ideoj kaj kutimoj enradikiĝintaj, gvidiloj sendiskutaj de lia vivo ĝistiam, kaj la sentoj vekitaj en li de Cartoya kaj la novaj amikoj el malnovaj jarcentoj: sentoj absurdaj por lia intelekto, sed simpatiaj al lia koro.

Plej eksterordinare estis, ke la konsoliĝo venis, — kaj ne alportis ĝin konsiloj de saĝulo nek konsoloj de amata virino —, de naivega babilado de infano, de karesoj, senkulpaj koleretoj kaj kapricaj despotaĵetoj de etulo kvarjara: Pinín, la filo de Cartoya, al kiu ĉiutage malsupreniris Marcial por vizito, kvazaŭ li estus lia fianĉino. Por tiuj vizitoj li uzis la tempon, kium li antaŭe dediĉis al posttagmeza promenado.

Eble iu diros, ke tio estas neverŝajnajoj kaj infanaĵoj. Mi ne neas; sed en la homa koro, kies plej profundajn misterojn ne estis ŝirmalferminta Mob, kvankam li kredis tion, povas okazi ĉia neverŝajnaĵo, kaj unu el ili estis, ke la etulaj infanaĵoj de Pinín helpis al Marcial porti la afliktojn kaj konscienciproĉojn. Tial ke estis neeble al li elverŝi siajn am-inklinojn super propran filon, li konsolis sin verŝante ilin sur tiun de Cartoya, kaj la kisoj de Pinín gustis al li laŭ pardono sendita de la forlasito en la edukejo. Jen la kialo de la intima amikeco inter la knabo kaj la saĝulo.

Okazis ofte ke Rucandio, malsuprenirinte por vidi sian amiketon, ne trovis Ramón'on en la domo, ĉar vespere tiu eliris ofte, vokite de prizorgoj de sia ofico.

En tiaj okazoj Marcial frapis ĉe la tuj-apuda kaverna, kie, dum la foresto de l' patro, la infano restadis sub la prizorgo de maljuna vidvino.

Pinín vidis kun ĝojo alveni sian novan amikon, kiu kutime alportis la poŝojn plenaj de frandaĵoj. Li saltis sur liajn genuojn kaj parolis kaj demandis amason da infanaĵoj, ne reproduktitaj ĉi tie por eviti akuzojn pri insisto je infanaĵoj, kiuj eble jam nun estas kritikataj; sed tiuj, kiuj scias, kiel parolas infano kvarjara kun vigla imago, plena de scivolado, povas ja sen tio imagi; afero tamen neebli por Marcial, ĉar Pinín estis la unua infano, kun kiu li interrilatis kaj kiu tial havis por li eksterordinaran novecon kaj ĉarmon.

Sed kvankam ne pleniĝu paĝoj per la konversacioj,

en kiuj la saĝeco de Marcial malkovris la mondon, por li nekonatan, de la infaneco, ne estos troo peri ideon pri iu certa konversacio pro la influo, kiun la naivaĵoj de l' infano havis al la saĝulo.

Iun tagon ĉi tiu parolis pri la suno, kaj ĉar la etulo ne lasis pasi iun ajn nekonatan vorton sen tuj-sekvanta demando, li volis scii, kio estas la suno. La dolora ideo, ke en la aĝo de kvar jaroj travivataj tiu anĝeleto ankoraŭ ne vidis la sunon, igis Marcial'on muta kaj pripensema, ĝis kiam, venkinte la malĝojigan surprizon kaj puŝite de la nepacienco de l' etulo, li faris laŭeble taŭgan klarigon pri la demando.

— Kiel beleta ĝi devas esti . . . . Kial paĉo ne kondukas min al la suno? — demandis Pinin.

— Tial ke li ne povas, — respondis Rucandio tre emociite, pensante pri tio, ke tiu infano estis kondamnita, kiel pario ne vidi la sunon: neniam, se lin, plenkreskintan, oni destinis por laboro subtera, aŭ en mala kazo, ke li vidos ĝin nur dum la horoj plenplenaj en libera aero, por reiri en la momento de la laborfino en sian enteran ekzilejon<sup>24</sup>.

— Kaj po ke ne povas? Mi volus ii al la suno.

— Ĉar ili ne lasas lin.

— Kiu ne lasas lin?

„Ni“, estis la respondo trudiĝanta al la lipoj de Rucandio; sed post momenta hezitado, serĉante alian, li diris:

— Tiuj de supre.

— Kiel malbonaj! Mi ne amas ilin, mi ne amas

ilin. Vi ne estas de suple. Ne vele, vi estas bona, Marcial.

— Ne, filo mia, ne; mi ne estas de supre, — respondis la kompatinda saĝulo, timigite ke Pinín ne amos lin, se li scios, ke li (Marcial) estas malbona.

\*

Tiun tagon pasigis Marcial pensante pri la civilizo, kiu rifuzas la sunon al la filo de Cartoya, ĉar li havis patron, kaj kiu ĝin cedis al la lia nur je kosto lasi lin sen patro.

Alian fojon li malsupreniris kun infanvestoj por sia amiketo, ĉar lin doloris vidi, kiel mizeraj estis ties vestoj. Sed ĉar tiutage estis al li neeble iri malsupren posttagmeze, li faris ĝin nokte, kiam la infano jam dormis; tial li devis kontentiĝi doni la vesteton al la patro, kaj li estis mirigita pri tio ke li, abunde espriminte sian dankemon, senkulpigis sin ne povi akcepti la donacon, kaj petis, ke li ree forportu ĝin. Se la malakcepto lin mirigis, la miro atingis surprizegon, kiam li aŭdis kiel kaŭzon de la neakcepto „ke la aliaj pariaj infanoj, amiketoj de lia filo, kaj eble eĉ ties gepatroj, povus senti envion, vidante lin pli bone vestita ol ili, kaj Pinín povus senti fieron“.

— Kaj kio? Kiel estas eble, ke al vi estas indiferente vidi lin bone aŭ malbone vestita? Li estus tiel bela en tiu ĉi vesto . . .

— Pli ol la vesto de l' korpo min okupas la ornamo de l' animo.

— Animo, animo. Ĉiam la animo. Vi ĉiuj oferas ĉiam al tio la korpon.

— Male kiel vi.

— Estas krueleco.

— Ni vidos, ĉu vi pensos same, kiam via korpo mortos kaj via animo plu vivos . . . Ni estas pli logikaj, pli antaŭvidaj ol vi, oferante la pereeman al la eterna.

La sekvantan diskutadon ne estas necese transkribi, tiom malpli ĉar Cartoya klopodis ne daŭrigi la diskutojn tiaspecajn. Por vidigi al Marcial la lumon de la vero, li fidis pli ĝian rebrilon ol la efikon de interdiskutoj.

Sed kiam li vidis la ĉagrenon de Rucandio ĉe la preno de l' paketo, li diris al li por pruvi sian nekontraŭstaron, se Marcial deziras donaci ion al lia filo, ke li povos porti al li ludilojn, kondiĉe ke ĉiam estos pli ol unu.

Kun kvar belegaj ludiloj malsupreniris Rucandio la sekvantan posttagmezon, jam dumvoje antaŭĝojante pro la perspektivo (ne trompita ĉe la alveno) pri la granda kaj bruema gajeco de sia amiketo, kiam li vidis la donajon.

La feliĉeco de l' knabeto estis tro granda por kontentiĝi, kiel solulo, pri la ĝuado je tiu neesperita trezoro, kies grandeco estis troa por li sola; tial, kiam li fine konsciiĝis pri la kolosa kvanto de siaj riĉaĵoj kaj rekompencis per ĉirkaŭprenoj kaj kisoj la malavarecon de sia amiko, li subite elŝiris sin el ties brakoj,



foriĝis kurante, ne donante tempon al Marcial por reteni lin kaj kriante kiel frenezuleto:

— Tuj mi venos, tuj mi venos . . . Mi ios po voki Pakiton kaj . . .

\*

Post malmultaj minutoj revenis Pinín, akompanate de Paquito kaj Mauricio, du knaboj pli malpli samaĝaj kiel li, por serĉi kiujn li estis foririnta al la najbara kabano, kie ili loĝis; li volis inviti ilin ludi kun li, tiel partoprenigante ilin en la feliĉo, kiu estis por li enirinta tra la pordo.

— Bovo, bovo, ĝin alpotis Masial po mi . . . Estas bona ĉi tiu sinjolo, ĉa li ne estas de suple, — tio estis la frazo, per kiu la feliĉa etulo prezentis al siaj amiketoj la ludilojn kaj ties donacinton.

Kiam fine pasis la admiro de la ĵus-alvenintoj antaŭ tiuj belegaĵoj (ili timis ke la ludiloj povus malaperi), ili unue ne kuraĝis ilin tuŝi; sed fine ili perdis la respekton, kiam diris Pinín:

— Ni iu ludi. Masial, venu ludi kun ni.

— Kiel oni ludas pe tio?

— Kaj tio, kio estas, sinjo'? — demandis Paquito, ekfidante lin.

La saĝulo, kunlaboranto de l' plejmoŝta Mob, ne malŝatis servi kiel gvidisto al tiuj etuloj en la bela kaj al ili nekonata paradizo, en kiun ili penetris; li streĉis la risorton de aŭtomobilo, kiu rapidkure foriĝis el inter la kruroj de la knabetoj, kaj igis fari turnojn

pajacon de cirko, li igis moviĝi kapon, okulojn kaj voston de miniatura leono muĝanta. Sur tablon li metis domojn, arbojn kaj dornbararojn de la korto de bestbredejo. Kaj li metis la brutojn en la kortojn. Ĉion li faris ĉe la kriado kaj bruado de permana aplaŭdado, vokoj kaj ridoj de la tri knaboj, frenezaj pro ĝojo, kiuj lin sagumis per demandoj kaj lin tiris, jen unu ĉe unu brako, jen alia ĉe dua, ne donante al li tempon por respondi nek eĉ atenti pri tio.

Tiu feliĉeco, kiun li kreis, estis tre bonfara por li, manifestiĝante en la dolĉa emocio, kiu karesis lian animon, kaj en la gajaj ridoj, kiujn eksplodigis la diraroj, fararoj kaj demandoj de tiuj sentaŭguletoj.

Per tio ili estis okupataj kiam, eble pro ne antaŭvidita afero, Cartoya revenis pli frue ol kutime. Kvantkam oni ne povas ĝin aserti, estas supozeble, ke li faris tion intence, pensante estigi la scenon okazintan je la fino de la ludo de l' infanoj, kiu ankoraŭ daŭris post lia alveno kaj kiam li dankis al Rucandio; poste li konversaciis kun li, dum ludis la malgrandulojn.

En ĉi tiu momento prezentis sin en la pordo junulino, pli aĝa fratino de Paquito kaj Mauricio, kiujn ŝi serĉis, ĉar jam estis tempo por vespermanĝi kaj enlitiĝi; sed tio ne estis laŭ la opinio de Mauricio kaj Paquito, kiuj respondis unuvoĉe: „to fue, ni ne volas, ni ne ios, fo-iu, fo-iu!“, ĉar vere ŝajnis al ili neeble, ke tiel rapide pasis la tri horoj, dum kiuj ili ludis.

Estis necesa la interveno de Cartoya, por restarigi la ofenditan aŭtoritatecon de la pli aĝa fratino kaj rekonduki al oboe la ribelantojn; sed fine ili rezignaciis,

vole-nevole, kaj foriris; sed ili faris tre malgajajn mi-enojn, formetante la ludilojn, kiujn ili tenis en la manoj: tiel malgajajn, ke en iliaj okuloj ekaperis larmoj.

Vidante tion, Cartoya diris:

— Pinín, Mauricio kaj Paquito estas plorontaj. Ĉu vi scias kial?

— Ne, paĉo.

— Mi deziis la lionon.

— Mi, la kaplojn, — Mauricio nomis „kaproj“ la virbovojn.

— Jen vi aŭdas, Pinín.

Nun estis la vico de Pinín, ankoraŭ ne por ploro, sed por ombriĝo de lia vizaĝo, kio igis ekkrii Marcial'on:

— Sed kion vi volas fari, Ramón?

— Lasu min, Marcial.

— Filo mia, ĉu vi ne aŭdis, kion diris Mauricio kaj Paquito? La kompatinduloj ne havas ludilojn kiel vi.

— Vidu, Maŭiso, mogaŭ evenu, kaj mi puntos al vi la kaplojn.

— Mi volas la lionon, mi volas la lionon, — ŝlek-  
etis Paquito, ekplorante per fluantaj larmoj.

— Mi puntos ĝin al vi mogaŭ ankaŭ.

— Atendu, Petra; ankoraŭ ne forkonduku la infanojn, — diris Cartoya al la knabino; alproksimiĝinte al sia filo, li parolis kun li mallaŭtvoĉe, karesante lin, sed per energia tono.

— Sed mi ja puntos al li mogaŭ, — respondis la infano, defendante sin kontraŭ la argumentado de sia patro. — Mogaŭ ili evenu, mogaŭ!

— Kaj ĝis morgaŭ ili ploras, ĉar ili ne havas ludilojn kiel vi . . . Kaj mi ne volas ke vi pruntedonu, sed ke vi donacu ilin. Ĉu vi volas plorigi la kompatinduletojn? Ĉu vi volas esti infano malbona?

— Ne, ne. Jen, Maŭiso, jen Pakito.

Marcial, la superpensanto, edukita en la kulto al la egoismo, vidis kun miro ke Pinín, kun la okuloj plenaj de larmoj pro la terura aflikto, disiĝi de la leono kaj de la kaproj, donis la unu kaj la aliajn al siaj amikoj. Turnante sin al Cartoya li diris:

— Estas kruela tio, Ramón, estas kruela, kion vi faras kun la kompatinda infano.

— Mi denove pensas pri lia animo . . . Kaj diru al mi: ĉu ne estus krueleco vidi indiferente flui la larmojn de la aliaj? Rigardu ilin tri: nun jam ploras neniu. Vi volis feliĉigi unu. Ĉu vi bedaŭras ke tri estas feliĉaj?

— Sed li estas via filo.

— Supre vi bazas la edukadon sur egoismo; ni fundaméntas ĝin sur la amo.

Marcial silentis kaj restis meditema.

La najbaretoj foriris ekster si pro ĝojo. Kiam ili estis for, Ramón vokis sian filon kaj demandis lin, ĉu li bedaŭras, kion li faris. La infano respondis ke ne, ĉar „se Pinín ne donas ludilojn al la maliĉuloj kiuj ne avas, la malbonan Pinín'on ne amas Dio“.

Lia patro preskaŭ manĝis lin kisante, kaj ploris pro ĝojo. Marcial penis ne imiti lin; li sentis multegon da sentoj tute novaj, ripetis por si „egoismo, amo“ kaj, antaŭ ĉio, lin mirigis la ĝojo de l' infano post la ofero

ĵus farita; surprizis lin aŭdi sur ĝiaj lipoj la nomon de Dio. Sed tio ne repuŝis lin kiel ĉe Hobbson kaj Cartoya.

Ramón donis al sia filo la malabundan vespermanĝon, senvestigis lin, kaj post tio vidis Marcial ke la infano, en noktĉemizeto, ekgenuis en la lito por fari sian ĉiutagan preĝon. Sed en la momento, kiam patro kaj filo faris la krucosignon, la lasta diris:

— Masial, kial vi ne kucosignas vin?

— Mi? . . . Ĉar . . . mi ne scias.

— Ĉu vi ne scias kucosigni vin? Ĉu ne instuis ĝin al vi via paĉo?

— Ĉu al vi ne instuis ĝin via paĉo? — ripetis Pinín.

Marcial ne sciis respondon, sed anstataŭ li donis ĝin Ramón, ekhelpante lin kaj dirante:

— Filo mia, Marcial ne havis patron kiel vi.

— Kompatinda Masial! Paĉo, montu vi al li la kucosignon.

— Ne, mi ne . . . Vi, instru lin vi!

Cartoya, kiu eble estis preparinta la scenon de la ĵudiloj, sed ne estis pensinta pri tiu ĉi, kiu estis okazanta, timis ke Marcial povus vidi en ĝi iun kaptilon, kaj, turnante sin al li, li diris:

— Tio estas, mi ne scias ĉu mi devas . . . Se vi volas foriri, foriru, Marcial.

Ĉi tiu ne havis tempon por respondi al sia amiko, ĉar la senpacienco de l' senkulpa despoto, kiun li ne kuraĝis malobei, kriis en ordona tono:

— Venu, Masial, venu; mi instuos vin.

Kaj Marcial alproksimiĝis.

— Genuu ĉi tie . . . Donu la maneton . . . Vidu,  
tiel . . . Fau la signon . . .

Cartoya flankenigis sin, kaj emociite ĝis la plej-  
profundo de sia koro, li murmuris tre mallaŭte:

— Dio komencis elekti sian horon.

## XIX

### La subhelpantoj kaj ilia senpera ĉefo

Post longa monato, kiun Juan kaj Inés, reviviĝinte, jam pasigis en Mondopolo, kaj malgraŭ sia admiro pri la mirigaj progresoj de l' centa jarcento, ili vive bedaŭregis ke ili ne reviviĝis malmultajn tagojn aŭ almenaŭ monatojn post la akcidento, por daŭrigi la vivon en sia lando kaj en sia tempo.

La ĉefkaŭzo de ĉi tiu malplaĉo estis la malbenita invento de Mob kaj la suspekto pri persona kunlabordevo, kiun ili devus fari al liaj manipuladoj. Ilia instruado estis jam sufiĉe progresinta, kaj kvankam ili ankoraŭ ne estis kondukitaj al la katakomboj por vidi en funkciado la aparaton, kiu r a b i s l a a m o n (laŭ frazo de Inés) de la amkunigitaj paroj, ili supozis jam proksima la momenton, en kiu oni postulos de ili tian kunlaboradon. Sed eĉ sen la neceso de l' citita spektaklo ĝi malplaĉegis al ili. El certaj indikoj de la studitaĵo ili timis, ke doni sian kunlaboradon estos neakordigeble kun la dikto de siaj konsciencoj.

Ekzemple, la psiko-elektraj metalfadenoj uzataj en la aparato de Mob devus esti samtempe kondukiloj de l' elektro kaj de l' amo (kio klarigas ilian

nomon kunmetitan). Tion oni atingis aldonante al la kupro de la ordinaraj fadenoj, ĉe la fandado, cindrojn de homaj nervoj. Tio, kvankam ĝi naŭzis Inés'on kaj eĉ Juan'on, ne estis la plej malbona, ĉar ja ne estis nervoj de vivantoj, sed de mortintoj, dum en la psiko-elektra interrompilo (la fama aparato) estas uzataj pecetoj de la novaj metalfadenoj, kies pintoj estis trempitaj en gutojn de am-plasmo, por pligrandigi ilian psikan kondukeblecon.

Pri ĉi tio lasta diris la memorskribo de Mob: „Konvenas ke ĉi tiu plasmo estu en stato diafana de am-plaĉo, laŭeble virina, ĉar ĝi estas pli sentebla; oni ekstraktu ĝin en momentoj de granda kor-afekcio, ekzemple kiam patrino suĉigas sian infanon.“

Kvankam tia ekstrakto, jam sakrilegia por la Vizkajanoj, estis gravega, pli eĉ alarmis ilin iuj ekranoj de l' aparato, sur kiu etendiĝis alia guto de l' sama plasmo, sed „malklarigita per trompoj, perdo de personoj amataj, ktp. ktp.“. Ilin timigis precipe la ideo, ke ambaŭ specojn de l' plasmo oni devis ekstrakti el personoj vivantaj, aplikante por tio suĉpumpilon, jam studitan de la geedzoj, similantan al tiuj uzataj en kirurgio por eltiri la sinovion el la malsanaj artikoj.

La progresoj, kiuj permesis operacii per ĝi en la koroj de la pacientoj, eĉ ne dolorante ilin, laŭ tio kion diris Mob (kio ne estis religia dogmo por la geedzoj), ne sufiĉis malgrandigi ilian teruron kontraŭ la operacio; tiu teruro estis tiel granda, ke ili estis firme decidintaj rifuzi ĝian praktikadon, se oni ordonus ĝin al ili; trankviligis ilin nur la scio, ke pro-



vizore tio ne estos necesa, ĉar ĝi estos nur bezonata, kiam oni fabrikos aparatojn, da kiuj ekzistis sufiĉa kvanto por la momentaj bezonoj, laŭ tio, kion Marcial estis dirinta al ili.

Kvankam, pro ordono de l' devo, niaj Vizkajanoj estis decidintaj preni sur sin la konsekvencojn de malobeo al Mob, ilin tamen okupis la penso, ĝis kia grado povus etendiĝi tiuj konsekvencoj; pensante pri tio Juan kredis konvene informiĝi, kia estas la situacio de lia edzino kaj de li mem en la socio, en kiun ili estis eniĝintaj, kiaj estas iliaj individuaj rajtoj, kia la leĝa aŭtoritateco de Mob super ili (se entute li havas tian), kaj ĉu li efektive povas ilin ŝeti en la katakombojn, se li havus tian deziron, laŭ tio kiel li diris al ili ĉe la unua renkonto.

Do li decidis provexplori Marcial'on, al kiu tre rapide ekfidis la geedzoj kaj al kiu ili sentis jam veran inklinon laŭŝajne respondatan. Krom liaj personaj afablaĵoj al ili, ili rimarkis de tago al tago ne nur malpli grandan kormalmolecon kaj malŝaton, kiam li parolis pri la kompatindaj parioj, sed li jam ne sentis skandalaj, kiel antaŭe, iliajn kritikojn kaj eĉ mallaŭdojn kontraŭ socio kaj konduto de la superĝuantoj.

En la sama vespero de la tago, kiam Juan decidis tion, li povis jam efektivigi ĝin, ĉar Marcial, kiun li jam ne nomis sinjoro Rucandio, sed nur „Marcial“, sen „Don“, kiun titolon tiu jam estis rifuzinta, iris por momento babili kun siaj amikoj; tiel li kutimis fari tiam kaj tiam, ĉar kompatigis lin la izoleco de la senhejma paro en tiu mondo, kaj krome, ĉar li malkovris kelk-

foje en la vizaĝo de Inés kaj en certaj frazoj de ŝi kaj de ŝia edzo gravan timon pri tio, kion la estonteco povus destini al ili.

— Vi venas ĝustatempe, kara mentoro; ni devas demandi vin pri io, kio nin interesas.

— Kio estas tio, Juan?

— Ni deziras sciigi, kio estas la diferenco de la leĝaj kondiĉoj, laŭ kiuj oni destinas en ĉi tiu socio, ĉu homo estas akceptata en la kategorion de superĝuanto aŭ ekzilata inter la pariojn.

— La havo aŭ malhavo de posedo.

— Tio estas nek proksimuma nek filantropia, sed laŭ la moralo de l' jarcento C ĝi ne mirigas min, — ekkriis Inés, kiu ĉiufoje permesis al si pli grandajn aŭdacaĵojn kun sia „senpera ĉefo“, kiel Mob nomis Marcial'on.

— Ni lasu komentojn kaj turnu nin nun al tio kio gravas. Laŭ tio, ke ni posedas nenion, nur pro la grandanimeco de l' plejmoŝta Don Roberto ni evitis translokigon en la katakombojn. Ĉu ne estas tiel?

— Ne ĝuste tiel, Juan, — diris Rucandio, kiu ne volis alarmi siajn geamikojn, iomete hezitante en la respondo. — Krom tio, ne ĉiuj parioj troviĝas en la katakomboj.

— Jes, jam ni scias: ĉi tie supre estas la domservistoj de la superĝuantoj. Estas vere: por vivi kiel kuiristino ne valoris la penon atendi okmil jarojn antaŭ la pordo de l' jaro 10 000.

— Kion vi jen diras, Inés! Vi ne estas servistoj ĉi tie; vi havas en la laboratorio sciencan pozicion.

— Jes, por manĝo kaj loĝo. Ne estas tre malavara kontraŭ ni la plejmoŝtulo.

— Sendube li ne rimarkis tion; sed mi diros al li, ke viaj servoj estas utilaj, kaj tuj oni asignos al vi salajron.

— Tio kompreneble estus grava; sed nin okupas pli sciigi, ĉu antaŭ la leĝoj de ĉi tiu socio ni estas personoj disponantaj pri si mem.

— Vi komprenos, amiko García, ke via eksterordinara kazo ne povis esti antaŭvidita en la leĝoj.

— Jes, tion ni ja komprenas; sed ĝuste tial nin interesas pli precizigi kion . . .

— Lasu jam ĉirkaŭdirojn, Juan. Aŭskultu, Marcial! Ni opinias vin bona amiko, ni konfidas vian inklinon al ni, kaj vi estas la sola persono, de kiu ni, en kazo de danĝero, esperas ricevi helpon.

— Vi prave kredas; vi ne trompos vin.

— Do diru al ni lojale: ĉu ni estas aŭ ne sklavoj de Mob?

— Sklavoj! Kia sensencaĵo!

— Miri ne estas respondo, Marcial. Ĝis kie etendiĝas la aŭtoritateco de via majstro super ni?

— Amikoj miaj, se mi volas esti sincera, ne estas facile al mi respondi en unu momento, sed mi senprokraste konsultos iun, kiu povos informi min. Sed, kion konkretan celas tiu ĉi hodiaŭa demando? Ne ekzistas kaŭzo por la alarmo, en kiu mi vidas vin. Ĉu vi eble timas senperan danĝeron?

— Tiun, ke ni devos rifuzi obeon al ordonoj de Mob aŭ de vi en lia nomo, — respondis la edzo.

— Sed kial?

— Ĉar ni — diris la edzino — havas ion, kion eble ne havas vi superpensantoj, kaj kio eble nin devigos rifuzi nian kunlaboradon en la verko de ĉi tiu homo.

— Kaj kio estas tio, Inés? Kio estas tio, kion ni ne havas?

— Konscienco, ideo pri devo, respekto kaj amo al niaj proksimuloj, konvinko ke la parioj estas kaj valoras same kiel ni.

— Eble vi ne estas la solaj kiuj . . .

— Vi, vi! . . . Ni ja supozis tion.

— Vi ne estas kiel la aliaj; ni ja scias tion.

— Ne, amikoj miaj, ne juĝu tiel rapide!

— Jes, jes, Marcial, vi estas bona.

— Mi mem ne scias, kio mi estas, kaj tial estas tre malfacile, ke vi tion scias. Nunmomente mi povas nur diri al vi, ke vi ne estas solaj nek forlasitaj en la mondo.

— Dankon, dankon!

— Marcial, Marcial, ne estas verŝajne, ke ni iam povos rekompenci la protekton, kiun vi donas al ni, sed certe pagos vin Dio.

— Sed ĉu en ĉiu horo mi devas aŭdi pri tio?

— Pri kio?

— Nenio, nenio . . . Sed, diru al mi, mi estas sci-volema, kiel tiu Dio, pri kiu vi parolas, povos rekompenci ion, kion vi ne povas? Kiel li rekompencos?

— Li povos, ĉar li povas ĉion, — diris Juan.

— Li redonos al vi — diris Inés — la bonon kiun

vi faras al ni, per paco de la konscienco, per interna feliĉo, kiun la ceteraj superĝantoj ne konas kaj kiun vi meritas ĝui; per profunda kontenteco pri vi mem, tre diferenca de la vanta fiereco de via majstro; per la plezuro kiun vi sentos, kiun vi jam estas sentanta pro via bonfarado al viaj proksimuloj.

— Jes, jes, estas vere. Pri tio vi estas pravaj; efektive, efektive. Sed estas strange, vere strange.

— Kio, Marcial?

— La koincido inter ĉi tiuj vortoj kaj aliaj. Diru al mi, sed ne trompu min: Ĉu vi parolis kun Cartoya dum ĉi tiuj tagoj? La veron, mi petas.

— Cartoya estas la arkitekto, la paria pastro, ĉu ne estas tiel?

— Jes.

— Ne, ni ne vidis lin de tiam, kiam vi venigis lin.

— Nur tiutage ni parolis kun li.

— Vere; tio estas neebla. Oni ne estus lasinta lin eliri el la katakomboj. Kaj malgraŭ tio li, vi ambaŭ kaj eĉ lia filo parolas ĉiam pri la sama afero: animo, amo al la ceteraj homoj, vivo eterna, alia mondo, Dio . . . Kiel estas eble ke homoj, naskitaj en tempoj distancantaj okmil jarojn, parolas, por maltrankviligi min, pri samaj aferoj, ne estante en interkonsento?

— Ĉar por tiu Dio, pri kiu parolas Cartoya kaj ni, tiuj miloj da jaroj estas momento; ĉar liaj veroj ne ŝanĝiĝas kun la tempoj; ĉar ĉe nia vekigo post 80 jarcentoj ni trovis ĉion aliigita en la mondo: sciencoj, moroj, leĝoj, sed la sola afero restanta neŝanĝebla estas la Leĝo de Dio, kiu estas identa sur la lipoj de

Cartoya kaj sur la lipoj de niaj patrimoj, kiuj nin instruis pri ĝi.

— Ĉu vere? Ĉu vere? Sed ĉu efektive povas ekzisti io nevariebla tra la paso de 80 jarcentoj?

— La konformeco inter nia sentado kaj tiu de Cartoya, kiu vin surprizas, estas bona pruvo por ĝi.

— Certe, certe. Sed via Dio . . . kiel vi pruvas lian ekzistadon? Ĉar mi povas kredi nur al estaĵoj, kiujn mi vidas, al veraĵoj demonstreblaj, al aferoj kies esencon mi konas.

— Ĉu vi estas certa pri tio?

— Certega.

— Do, vi, matematikisto, povos demonstri, ke du aĵoj egalaj al tria estas egalaj inter si; ke du paraleloj ne povas trafi sin aŭ ke ili tuŝiĝas nur en la infinito.

— Tio estas aksiomoj kaj kiel tiaj ne demonstreblaj.

— Sed ĉu vi kredas pri ilia vereco?

— Kompreneble; se mi ne kredus, mi ne povus fidi pri la scienco.

— Nu, estas fakto, amiko Marcial, — interrompis Inés, — ke vi kredas pri ĉi tiuj kaj multaj aliaj veroj, kiuj ne estas demonstreblaj materiale.

— La sama ideo kiel Cartoya; tute la sama.

— Same kiel vi kredas — aldonis García — pri ĉiuj fortoj de la naturo, kies esencon absolute ne konas ĉiuj saĝuloj kune, kaj pri tiom da aliaj aferoj, kiujn ili transformas ne konante ilin. Ĉar la homoj kreas neniun; ili estas nur kapablaj util-

igi tion, kion, jam kreitan, metas en iliajn manojn la Kreinto.

\*

Ĉe la fino de la konversacio, kies komenco estas transskribita kaj kiu daŭris longan tempon, Marcial provis trankviligi siajn amikojn; li diris al ili ke, kiam alvenos por ili la timata momento, por kredi sin devigitaj rifuzi obeon al la ordonoj de Mob, estos esperable ke li, Marcial, mem komunikos tion al ili. Sed se, kontraŭverŝajne, la ordonoj venus de Don Roberto persone, ili neniel montru al li la plej malgrandan obe-rifuzon. Ĉar ja li, Marcial, poste klopodos postuli nenion kontraŭ ilia konscienco. Tiel li lasis ilin trankviligitaj por la momento kaj tre dankemaj, kiam li adiaŭis ilin.

La sekvintan matenon li havis longan konsulton kun famkonata advokato. De tie li iris al la oficejoj de la civilregistrejo de Mondopolo, kie li certigis ke nek Juan nek Inés estis enskribigitaj de Mob en la komunuman liston de la loĝantoj; el tio rezultis, ke ili nek havis ekzistadon nek oficialan personecon.

Reveninte al la muzeo li elektis horon en kiu, laŭ lia scio, Mob estis profundiginta en tre interesa problemo, por iri al lia laborĉambro kaj rimarkigi al li la urĝecon enlistigi la reviviĝintojn; ĉar la muzeo, kaŝante personojn, troviĝas en kontraŭleĝa stato. Informante lin pri la oficejaj traktadoj necesaj por la instancoj en tiu ĉi afero, li detaligis laŭ intence enuiga

maniero la formalajojn kaj malfacilaĵojn. Ĉion li multe trograndigis, kaj li insistis pri la necesego ke Don Roberto ne plu prokrastu tiujn oficialaĵojn.

La rezulto estis, kia antaŭvidis ĝin Marcial: malbonhumora protesto de la saĝulo, ke li devu malsupreniri al tiaj bagateloj, havante sub pritraktado aferojn multe pli gravajn, kaj ordono al Marcial, ne plu ĝeni lin, sed fari ĉion necesan. Antaŭ ties deklaro pri la oficiala neebleco, ke tiaj paŝoj estas fareblaj de aliaj ol tiuj personoj, kiuj surprenas la karakteron de patrono aŭ mastro de Juan kaj Inés, kiuj kiel senhavuloj devus esti dom-parioj, Don Roberto respondis furioziĝinte, ke Marcial lasu lin en paco kaj ke li ne plu volas perdi pli da tempo pro tiuj sovaĝuloj; Marcial faru ĉion laŭ sia bontrovo, ne enuigante lin per konsultoj kaj ĝenaĵoj.

— Sed tio — insistis ruze Marcial — estas neebla, se ne mi anstataŭ vi prezentas min kiel mastron de la barbaroj.

— Kaj kion gravas tio? Ne estas honoro tiel granda, ke mi ĉagreniĝus ĝin perdi.

— Do, tiam ĉio povas esti aranĝata sen ĝeno al vi.

— Tion mi volas. Kaj nun, kun via permeso, mi volas daŭrigi mian laboron.

\*

La sekvintan tagon Marcial diris al siaj amikoj:

— Jam vi havas oficialan ekzistadon en la loĝantara registro. Ĵus mi finordigis ĉion. Ne estas tre



brila la pozicio, kiun vi ricevis ĉe la enskribado, sed mi opinias ke la rezulto estas sufiĉe bona.

— Dankon, Marcial, dankon.

— Bone. Kaj laŭ kiu koncepto?

— La interpretado de la komunumaj leĝoj, farita de la oficialaj advokatoj, ne permesis, konsiderante vian strangan kazon, vin enregistri alimaniere ol kiel dom-pariojn.

— Nu, jen vi vidas, kiel prava mi estis dirante, ke ni estas sklavo.

— Kaj tion vi nomas „rezulto sufiĉe bona“? Vere vi ne estas malfacile kontentigebla.

— Anstataŭ tio mi preferas ke vi superpensantoj jetu nin tuj en la katakombojn.

— Ines estas prava. Se finfine tio estas nia sorto, estus pli bone forigi unu fojon por ĉiam enigmo-demandojn el nia kapo.

— Tie ni estus almenaŭ kune kun homoj, kiujn ni povus nomi niaj gefratoj, kaj ni ne hāvus kiel mastron la malamindan Mob.

— Ne Mob estas la mastro, pardonu, mi volis diri via patrono. Mi ne povis atingi, ke oni klasigu vin alimaniere, kaj tial mi aranĝis la aferon tiel, ke ne Mob sed mi estas via patrono; pro tio mi diris, ke la rezulto estas sufiĉe bona.

— Ha! Vi!

— Antaŭ la leĝo mi estas la patrono, sed por vi mi estos ĉiam tiu, kiu mi estis ĝis nun: la amiko.

— Marcial, Marcial, pardonu niajn malafablaĵojn!

— Dankon, dankon. Vi faris por ni tion, kion ni

plej multe deziregis: vi eligis nin el la ungegoj de tiu homo malaminda, de tiu sovaĝbesto.

— Kia troigado! Bedaŭrinda Mob!, — respondis Rucandio al Inés, ankoraŭ opiniante sia devo defendi sian majstron kvankam, laŭvere, jam ne kun troa fervoro.

— Sed bonvolu konsideri, ke pri tio mi ankoraŭ ne devas paroli al Don Roberto, kaj ankaŭ en viaj maloftaj interrilatoj kun li ne montru diferencon. Tial ne konvenas ke vi vidigu vian scion, esti ekster lia dependeco. Kaj provizore timu nenion rilate vian situacion, ĉar en niaj senperaj taskoj vi bezonos fari nenion, kio povus naŭzi vin.

— Kiaj estas tiuj taskoj?

— Prepari am-akumulatoron por la praktikado de demonstradoj en prelego, kiun Mob deziras fari pri sia invento al la reprezentantoj de ĉiuj nacioj. Li volas profiti ilian venon en januaro al la Konsistorio. Sed, atentu: Preparu vin firmiteni viajn nervojn! Ĉar jam estas necese, ke en iu el ĉi tiuj tagoj vi mal-supreniru kun mi, por vidi la funkciadon de la interrompilo.

— Tio signifas: vidi la torturadon de la malfeliĉuloj kiuj . . .

— Vidu, jen tio kion mi timis: anstataŭ prepari vin por regi tiujn malicajn nervojn, vi mem komencas jam nun ilin eksciti. Necesas esti forta, amikino Inés. Krome, tio pri la turmentado estas troigo. Se mi povus, mi evitigus al vi la spektaklon, sed . . .

— Ne, ne. Mi mem volas vidi la ekstremon, al kiu

venas la perverseco de la superĝantoj. Mi estos forta, estu certa pri tio. Mi ne plu ektimos pri kio ajn. Via majstro kuracis mian timegon en kinematografa prezentado, en kiu mi lernis, ke la doloro de niaj kunhomoj estas afero treege utila al iliaj ekzekutistoj.

## XX

### Malfidelaĵo nebligita de Rucandio

La timita tago, kiam Inés kaj Juan malsupreniris por vidi labori am-kunulaĵon en la psiko-interrompilo, okazigis duafojan renkontiĝon kun la pastro, kiu estis beninta ilian geedziĝon; ĉar Cartoya estis espriminta al Marcial la deziron koni la aparaton kaj ĝian funkciadon. Sed antaŭ ol vidigi ai ĝi kaj al la leganto la impresan spektaklon, konvenas scii la kaŭzon de tiu deziro.

Marcial daŭrigadis malsupreniri preskaŭ ĉiujn posttagmezojn, por babili kaj ludi kun sia amiko Pinín, persono, kies graveco kreskadis, laŭ la opinio de l' saĝulo. Ĉar li ne nur amis lin pro danko al la konsoloj, trovitaj de lia animo en tiu stranga kaj neordinara amikeco, sed li respektis lin jam pro lia inteligenteco. Tial ke temas pri saĝulo kaj knabeto, tiu aserto estas tro kuraĝa por resti sen la klarigo, ke tiu respekto estis io tute diferenca de la respekto, kiun al Rucandio kaŭzis la talentego de Don Roberto.

Diferenca, sed eble pli grava, ĉar al tiu respekto estis ŝuldate, ke en la konscienco de l' kunlaboranto de Mob fiksiĝis jena vero: La parioj ne estas mal-

superaj kreaĵoj, sed esence egalaj al la superpensantoj. Per tio li pravigis Cartoya'n, Inés'on kaj Juan'on kontraŭ si mem, ĉar li multfoje en diskutado kun ili estis neinta tian identecon, kaj lia fiero eĉ ofendiĝis, kiam li aŭdis tian aserton de aliaj.

Kiel okazis ke li forgesis sian antaŭan konvinkon? Certe ne pro sentimentaleco. Kvankam tio estis la origina kaŭzo de la morala kaj intelekta evoluo de Rucandio, homo de lia aĝo kaj kulturo ne povis kaptulaci sole antaŭ tio. Tiel ĉiuj liaj animaj krizoj finiĝis per reago de l' juĝpovo, kie la inteligento de l' superpensanto, helpata de la egoismo de l' superĝuanto, faris breĉojn en la impulsojn de l' koro kiu, laŭ lia frazo, arogis invadi la cerbon. Tial, kiam li post vizito al sia amiketo pasigis momenton sola, libera de la influo de l' etulo, la cerbo komencis moki pri la ridinda infaneco de amikeco inter saĝulo kaj knabeto kaj batalis kontraŭ la rememoro pri li; tiel alkroĉita ĝi estis al la koro, ke, silentigante la cerbon aŭ devigante Rucandio'n fariĝi surda kontraŭ ties protestoj, ĝi irigis lin la sekvintan tagon ree al la kutima vizito.

En unu el tiuj diskutoj diris al li la koro: Li ne nur estas belega kaj ĉarmega, sed eĉ tre inteligenta kreaĵeto, kvankam oni ne suĉnutris lin per lakto fosforata. Al tio respondis la juĝpovo, ke certe multe pli da talento ol Pinín havas la malgranduloj de la edukejoj, saĝe nutritaj. Inter du asertoj tiel radikale malaj la vojo ne povis esti duba por saĝulo: komparanta eksperimentado. Tiucele Rucandio iris al la Internacia Edukejo. Tie, sub la preteksto de la jam menciitaj

studoj pri la inteligenteco de la infanoj — kio jam unufoje eliris lin el dilemo en lia konversacio kun Clara Snow — li ricevis la permeson de l' direktoro, moviĝi laŭplaĉe inter la malgranduloj kvar- ĝis kvinjaraj.

Ses aŭ ok vizitojn li faris al la instituto kun la intenco ligi amikecon kun kelkaj etuloj, kiuj je la unua vido estus al li simpatiaj, amikecon laŭ tiu kun Pinin; sed tio estis sensukcesa. Malgraŭ sia volo esti malfidela al la filo de Cartoya, li ne sukcesis, ĉar kiam la maldankuletoj de l' edukejo estis manĝintaj la bombonojn el lia poŝo, ili forkuris, ne plu atentante lin.

Pri kisoj kaj ĉirkaŭprenoj, kiel ĉe lia amiketo, eĉ ne ekzistis penso. Tiuj infanoj, kiujn neniam iu kisis aŭ ĉirkaŭprenis, nek donis nek akceptis kisojn. En tio la plej malĝojiga afero estis por la bedaŭrinda saĝulo, perturbata de emocioj absurdaĵoj ĉe superĝuanto, ke ĉiufoje, kiam infano rifuzis al li kareson, atakis lin la tortura ideo, ke eble estis lia filo, kiu ne volis lin kisi.

Iun tagon, kiam li intence ne kunportis bombonojn, li ne sukcesis reteni ĉe si eĉ iun dum duona minuto, kaj li rememoris pri iu posttagmezo, kiam li estis forgesinta bombonojn por Pinin; sed tiu ne rifuzis al li la kutimajn karesojn: eĉ, kiam venis lia patro kaj eksciis, ke tiutage ne estis frandaĵoj, diris la etulo, kvazaŭ por senkulpiĝi sian amikon: „Bedaŭinda Masial ne povas doni ĉiutage.“

En siaj ekskursoj al la edukejo li faris provojn, por ekzameni la inteligentecon de diversaj edukatoj en aĝo analoga al tiu de lia amiketo, kaj eĉ kun kelkaj pli aĝaj, sed li trovis ĉiujn mallertaj, kompare kun li.

Tio estis granda ĝojo por la koro, kiu kantis moke al la cerbo, forpelante ĝin malmildege, kiam tiu ĉi rekomencis paroli pri fosforata nutraĵo.

Marcial, kiu estis informinta sin kaj eĉ ridinta pri la nutro-reĝimo de desertoj kaj antaŭmanĝoj, kiun Inés estis fiksinta en siaj manĝoj kaj en tiuj de Juan kun la ambicia celo superintelektigi sin, tiun posttagmezon jam demandis ambaŭ, kian rezulton ili akiris el tiu reĝimo. Ili respondis ke de 40 tagoj ili manĝis nur manĝojn facildigesteblajn kaj instigantajn; sed ili ree forlasis tiun reĝimon, ĉar iliaj intelektaj kapabloj neniel progresis. La energia Inés resumis jene sian opinion: „Amiko Marcial, la fama superfosforata nutrado estas kimerio.“ Kaj Juan, malpli mordema, sed ne malpli konkludema, diris ke, trosatiginte sin per marmeladoj matematikaj, li bezonis por solvi kalkulproblemon la duoblan tempon ol aliaj similaj problemoj necesigis en Bilbao.

Sed la definitiva kaŭzo por ĉesigi la vizitojn de Rucandio en la edukejo estis, ke li devis vidi la malbonajn sentojn de la malgranduloj. Neniu ilin mansubtenis, krom por punbati ilin, kiam ili fariĝis tro ĝenaj, aŭ kiam la gardistoj estis malbonhumoraj; ili interbatalis kiel sovaĝaj bestetoj pro la ludiloj, aŭ por altrudi sian volon en la ludo. El tiuj luktoj ili eliris kun manetoj plenaj de hartufoj de la interbatiĝintoj, kaj kun vizaĝoj sulkitaj per la postsignoj de la ungoj kontraŭulaj.

Kia diferenco kun Pinín, kiu donis la „lionon“ kaj la „kaplojn“ al Pakito kaj Maŭiso!

Tiutage Marcial eliris el la belega kolegio, por ne plu reiri, dirante:

— Li estas pli bela, pli lerta kaj multege pli bonkora — la boneco, neniam konsiderita de la superpensantoj, ekakiris jam valoron por Marcial — ol ĉiuj tiuj egoistaj tigretoj. Inés estis prava tiun posttagmezon, kiam mi venigis ŝin ĉi tien. Kaj mi timas, ke finfine mia jarcento kaj mi rezultos komplete erariĝintaj.

Klare estas, ke tion diris al li la koro, sed la cerbo ne kuraĝis kontraŭdiri.

\*

La infanoj ĉion malaranĝas: kiam ni estis dirontaj, kial Cartoya deziris ĉeesti la viziton de la reviviĝintoj en la elektro-ama centrejo, unue Pinin trastrekis nian intencon, kaj post li la knabetoj de l' edukejo, kaj tiu kaj tiuj ĉi nin forigis cent mejlojn for de la ĉeftemo.

En la momento kiam la filo (kiu estis la ĉefa afero) lasis lin trankvila, Rucandio konversaciis kun la patro, kiu plezure rezignaciis je la dua loko en la inklino de sia malnova amiko.

En tiuj oftaj babiloj Marcial sciigis pri detaloj el la senĝoja vivo de la parioj, pri rezignacio, pri la abnegacia amo, kiun ili havas inter si kaj pri tio, ke en iliaj koroj ne estas malamo al la superĝuantoj. Kaj la vorto 'frato' kiu, kiam li aŭdis ĝin iun tagon de Hobb-



son, sonis al li kvazaŭ ofendo al la superpensantoj, jam ŝajnis al li admirinda por ili flanke de la parioj. Li eĉ ekpensis, kvankam nur pase kaj kontraŭ sia juĝo malvolema ĝin konsenti, ke la pensado kaj la aspiroj de tiuj kompatindaj homoj flugas en pli altajn kaj pli noblajn regionojn ol tiuj de la superpensantoj. Ne, ne estis tiel absurda, kiel ĉe unurafoja aŭdo ŝajnis al li, la frazo de Cartoya, kiam li vidis la surprizegon de Marcial, trovanta lin inter la parioj kiel eks-superpensanton: „Ĉi tie mi estas pli superpensanta ol tie supre.“

La du hispanoj — nu jes: iberioloj — parolis ofte pri siaj samlandanoj, la eksfrostiĝintoj de l' jarcento XX, por kiuj Cartoya multe interesiĝis; ne nur pro simpatio al ili, sed ĉar li utiligis la inklinon, kiun sentis al ili Marcial, por vekti en ties konscienco kondamnon al la moralo kaj leĝoj de socio, kiu lokigis kreaĵojn tiel evidente egalajn al li en la maljustan kaj malsatindan kondiĉon de malsupereco. Dedukti el tio specialan konsekvencon ne favore al Juan kaj Inés, sed al la parioj, estis nur unu paŝo, precipe ĉar Cartoya, Hobbson, Alvar kaj aliaj estis inter ili, eble ne tiel saĝaj, sed same raciaj kiel tiuj de supre. Kaj, antaŭ ĉio kaj super ĉiuj, Pinín, kondamnita por ĉiam esti pario. Tiu kondamno ŝajnis al Marcial ne nur absurda, sed malhumana.

Sed Ramón volis, ke tiun paŝon lia amiko faru sola, ne sentante sin puŝita.

Tial, kiam la pastro ekkonis la inventon de Mob, pri kiu li ricevis nur tiam la unuan sciigon, li havis por

ĝi frazojn de indigno kaj kondamno, malbenante ĝin en la nomo de l' respekto al la homa personeco, aĉe piedpremita de la saĝulo-inventisto.

Tiam klariĝis, kial dum la du aŭ tri pasintaj jaroj estis okazintaj ĉe la parioj, apartenantaj al la Universalmuzeo, ripetitaj kazoj de stranga morto de junaj geedzoj kune aŭ de gefianĉoj proksimaj al geedziĝo. Ambaŭ malaperis antaŭe el siaj loĝejoj dum longa daŭro, kaj oni ne ekhavis scion pri ili krom tiu pri ilia morto. Tiam klariĝis ankaŭ la kaŭzo de tio, ke post same mistera forestado ne malmultaj malfeliĉaj frenezuloj vagadis tra la koridoroj de la katakomboj. Lia indigno, post kiam li konis la kaŭzon, igis lin ekkrii:

— Do tiuj malfeliĉuloj ne estas viktimoj de malbonŝancaj akcidentoj, sed de nova kaj antaŭpripensita hont-agado, de plia abomeninda krimo de tiu perversa socio? Kaj vi, vi kunlaboras en tiaj perversaĵoj!

— Mi . . . Ramón, mi ne vidas . . . Mi volas diri, konforme al la ideoj, kiujn mia mondo havas pri la parioj, mi ne vidas, mi ne vidis ion riproĉindan en . . . Nun, mi ne scias; ankoraŭ mi dubas, ĉu estas mallaŭdeinde utiligi profite al la socio la forton de l' amo. Ĉar ĉiuj nacioj oferis ĉiam la individuon al la kolektivo, kaj en la antikvaj militoj la homoj mortis milope kaj milionope, sen tio ke iu vidis en tio ion . . .

— Do, se morgaŭ ordonos al vi Mob, ke, por rabi la belan amon, kiun ili sentas unu por la alia, vi mortigu iom post iom aŭ forigu la inteligenton de tiuj kompatindaj gejunuloj, kiuj falis inter viajn ungegojn . . .

— Estas malsame: ili ne estas parioj.

— Ĵus vi diris al mi, ke ili estas dom-parioj, ke ili apartenas al vi.

— Jes; sed tio ne estas la sama. Ili ne naskiĝis kiel parioj.

— Tamen ili estas identaj kun ili. Sed ni ne plu diskutu pri tio, ĉar kvankam vi estas jam konvinkita, ke ni parioj estas ne nur egalaj al niaj samlandanoj, sed egalaj al vi ĉiuj, daŭrigu konsideri laŭleĝa la aplikadon de tia turmento al la naskitaj parioj. Sed certe vi ankaŭ opinios ke, kiam mia filo, pario laŭ naskiĝo, atingos la aĝon por ami, por li la amo estos ne fonto de feliĉo, sed juĝo al morto aŭ frenezeco.

— Ne, ne! Pinín ne!

— Kial la aliaj jes kaj Pinín ne, se ĉi tie ni ĉiuj estas fratoj?

Marcial, ne sciante kion diri, silentis konfuzite.

— Respondu al mi, respondu! Nun mi petas respondon ne de viaj sentoj, nek de via koro, sed de via inteligento, de via racio. Kia estas via justeco, via sento por egaleco ke vi, ĉar vi amas mian filon, volas lin mezuri per malsama ilo kiel liajn fratojn, filojn de Dio kiel li?

— Estas vere, estas vere . . . La homaro ne estas mia, mi ne havas rajton dividi laŭ mia gusto la doloron inter ĝiaj gefiloj. Jes, tio kion vi diras estas logika kaj justa. Mi ne konas leĝon, en kiu tio estas skribita, sed devas ekzisti tia.

— Ekzistas. Ĝi estas skribita en la koroj de la parioj kaj tekstas: „Amu la proksimulon kiel vin mem!“

— Sed kiu ĝin dekretis?

— Dio. La Kreinto de ĉio ekzistanta.

— Dio, ree Dio! Ree la povo supernatura, taŭga por malklerigi la nesciulojn.

— Aŭskultu, Marcial. Kion vi pensus pri iu, kiu dirus ke la pensado kaj la volo de tiu, kiu faris la unuan vaporkaldronon, estas aferoj nekredeblaj, ĉar supernaturaj?

— Tio ne estas la sama.

— Vi inventis maŝinojn, verkis librojn; mi starigis monumentojn. Tio estas faraĵoj niaj, ni estas la aŭtoroj, ĉu ne?

— Kompreneble.

— Kion vi opinius, se iu asertus, ke nek vi kiu inventis la maŝinojn nek mi kiu per argilo, cemento kaj fero starigis la Mondpalacon, ekzistas? Ke nek Rucandio nek Cartoya estas realaj estaĵoj, sed fantomoj por stultigi naŭvulojn? Se iu asertus ke pro tio, ĉar fero, kupro kaj cemento estas la solaj realaĵoj, ne, pliĝuste, la solaj materialaĵoj en niaj laboraĵoj, fero, kupro kaj cemento estas ĝiaj aŭtoroj?

— La supozo estas absurda. Ĉia laboraĵo kun plano, ordo kaj celo havas nepre farinton, kreinton.

— Kun la nura escepto de l' Universo kaj de la homaro. Ili estas por la vantaj nekapabluloj krei ilin la sola afero kiu ne havas kreinton.

— Tio estas laboraĵo de la naturaj fortoj.

— Vi ne neos ke Universo kaj Homaro vere havas alian taskon pli grandan ol fari lokomotivon aŭ la

Mondpalacon. Nu bone! Komisiu tiujn naturajn fort-  
ojn, ke ili el si mem, sen supera inteligenteco kaj volo  
ilin gvidantaj, faru la lokomotivon kaj la palacon.

— Kia sensencaĵo!

— Kaj ĉu vi opinias ke sen inteligenteco aŭ volo  
ilin direktantaj ili solaj farus sunon aŭ iun Pi-  
nín'on?

— Ne, tion ne. Via filo estas rezultajo de vi kaj de  
sia patrino.

— Same kiel statuo estas rezultajo de la modlilo,  
en kiu ĝi formiĝas, kaj de la bronzo. Sed, la skulpt-  
isto? Patro kaj patrino estas modlilo kaj bronzo, ne-  
sciaj, kia estos ilia filo, nepovaj lin krei laŭvole, ne-  
kapablaj lin modli: pasivaj instrumentoj de l' plej alta  
skulptisto.

— Tio estas vera.

— Krom vera, ĝi estas lumo, kiu lumigos al vi ali-  
ajn verojn. Fine vi konos ilin ĉiujn.

— El tio ke mi konsentas en iu konkreta punkto,  
vi ne rajtas dedukti, ke ĉiel vi konvinkas min.

— Marcial, ne subŝovu al mi la ambician pretend-  
on, konigi al vi Dion.

— Do, kiucele vi diras tion al mi?

— Por rimarkigi al vi, ke Li jam metis vin sur la  
ĝustan vojon, kiu kondukos vin al Lia kono.

— Ne, ne; vi iras tro rapide . . . Sed, kia estas  
tiu vojo?

— La vojo de l' amo, kiu vibrigis vian koron, ĝis  
nun iom sekan. Sed ni lasu tion. Li havas tempon,  
kaj mi bezonas scii detalojn pri tiu kontraŭhomeca in-

ventajo kaj pri la maniero, kiel per ĝi viktimiĝas miaj kompatindaj parioj.

Tujsekve, Rucandio klarigis sen sciencaj detaloj, kiuj estis la plej malinteresaj por la pastro, ke la paroj, kiujn oni devos senigi de ilia amo, estas disigitaj en apartajn ĉelojn, kie iliaj korpoj estas bone prizorgataj. La celo de tiu apartigo estas kaŭzi al ili dolorojn de malkunestado, por ke la deziro vidi unu la alian intensigu la forton de ilia amo, kiam ili estos kondukataj al la interrompilo. Post ĉiu kontraŭsidado, dum kiu estas permesate al ili rigardi sin reciproke nur el distanco, oni resendas ilin al iliaj ĉeloj, ĝis alia sidado.

Ĉiu persono kun mezaj sentimentoj povas imagi la teruron, kiun sentis Cartoya, kaj kiun li esprimis per tiel varma energio, ke li sukcesis ekskui la sekigintan koron de l' superĝuanto Marcial, al kiu en tiu momento ŝajnis, ke li aŭdas en la interno de sia konscienco la demandon, ĉu ne estas lia devo nei la daŭrigon de sia kunlaborado en tia terurega krimo; kaj surprizis lin ke, kiam li lasis videbliĝi tiujn dubojn al sia amiko, tiu juĝis trofrua ĉian radikalan decidon tiaspecan, kiu estus egala al rompo kun Mob.

Anstataŭe li konsilis atendi, ĝis kiam Cartoya estos vidinta per siaj propraj okuloj la kompatindajn kunulaĵojn en la aparato kaj forminta sian opinion pri tio, ĉu daŭrigo de Marcial kiel ĉefo de la elektropsikaj manipuladoj permesus elpensi rimedon, por iom faciligi la sorton de la malfeliĉuloj submetitaj al la procedaro. Ĉar se la interveno falus en aliajn manojn,

oni perdis ĉian esperon trovi rimedon por mildigi iliajn suferojn. Pri tio la pastro jam ekhavis ideon, kiun akceptis Marcial por ĝin studi.

Ĉe la disiro en tiu posttagmezo ambaŭ amikoj fiksis renkontiĝon je la sekvonta mateno, ĉe la mal-supra elirejo de l' lifto de la Universalmuzeo, kie kuniĝu Cartoya kun Marcial, Juan kaj Inés, por ke ĉiuj kune iru por vidi la funkciadon de l' psiko-interrompilo.

## XXI

### La elektro-ama interrompilo

Mob estis muntiginta kaj tenis en funkciado tri psiko-interrompilojn, ĉiun el ili en salono dek metrojn longa kaj sep larĝa. Ĉar ili estas egalaj inter si, sufiĉas priskribi unu, por koni ilin ĉiujn. Du fortikaj seĝegoj, kontraŭaj unu al alia, alŝraŭbitaj al la planko, formas la torturejon de la geamantoj, bestece nomataj de la inventisto „kunulaĵoj“ aŭ „jungbestoparoj“, aŭ, se ni parolu laŭ scienca maleksciteco: la polusoj vira kaj virina de duseksa duopo, formata de ĉiu paro da geamantoj.

Paralele al la direkto, difinita de la du seĝegoj, pendas de la plafono, super ili, bobenego laŭekstere egala al tiuj uzataj en la elektro-dinamiko, sed diferenca per tio, ke la survolvita metalfadeno ne estas iu vulgara elektro-drato, sed psiko-elektra, t. e. nervumita en tiu maniero, pri kiu oni eble memoras, ke ĝi indignigis niajn amikojn de l' jarcento XX. La du liberaj finaĵoj de ĉi tiu metalfadeno, speciale sentebigitaj per diafana kaj plaĉe-kvieta plasmio, eniĝas en la ekstremaĵojn de longa vitrotubo fermita, paralela al la bobenego kaj preskaŭ same longa (pli ol kvin metr-



ojn); unu el la finaĵoj restas enfermita en tiu tubo super la kapo de la virino, la alia super la kapo de l' viro, sidantaj en la interrompilo.

La tubo, en kies interno fariĝis vakuo, ne estas egala sed ja komparebla, escepte de dimensioj kaj detalaj tro teknikaj por ilin precizigi ĉi tie, al la tuboj de Crookes. Interne de ĝi, inter la pintoj de l' psiko-metalfadeno, eksplodas intermitantaj malŝargiĝoj de amo, kiel inter la polusoj de Crookes-tuboj saltas katodaj radioj generantaj la X-radiojn, por ne menciigi aliajn diversajn elradiaĵojn<sup>25</sup>.

Ĉirkaŭ ĉiu seĝego kaj en okul-alto de la geamantoj rotacias kelkaj ekranoj saturitaj per plasmato malklara pro moralaj doloroj, pri kio oni jam parolis. La ekranoj estas movataj de horloĝ-mekanismo, laŭ mezuro de po unu turno en minuto. Ĉiu turno fulmrapide kaŝas unu amanton al la alia sesdekfoje dum minuto. Ĉar la moviĝo de unu ekraneto okazas kun malfruigo de duonsekundo kompare kun la alia, la rezulto estas, ke la geamantoj sin vidas kaj malvidas 120 fojojn ĉiun minute. Tiom ofte ili, en la nomita tempo, sentas maskiĝi kaj morti la altiran forton, kiu ne sukcesas proksimiĝi ilin pro du kaŭzoj: la unua estas, ke iliaj lumoj kaj maleoloj estas katenitaj per rimenoj kaj ĉenpremiĝoj; la alia, laŭŝajne malpli forta, sed pli kruela en realeco, ke, kiam pasas la ekraneto impregnita per am-plasmato, je malmultaj centimetroj apud la koroj, ĉi tiuj eksentas paralizan depremon de l' amimpulso.

Sed en la tujposta momento la ekranetoj denove

lasas libera la vojon al la rigardoj; la vido de l' amata estaĵo igas energie reagi ambaŭ korojn per novnaskiĝantaj afekciaj impulsoj. Denove ili mortas kaj denove ili renaskiĝas, denove ili estingiĝas kaj denove ekscitiĝas, pro la efiko de l' horloĝaparato, laŭ la mezuro de la nomitaj 120 fojoj ĉiuminute.

En siaj elektraj analogaĵoj ĉio ĉi estas tre vulgara, ĉar la psiko-interrompilo estas esence refiguraĵo de elektro-magnetoj, uzitaj en la mondo multege pli antaŭ la frostiĝo de Juan kaj Inés. Sed la mireginda afero ĉe la invento de Mob estas ĝia parto animeca, ebla nur dank' al la malkovro de l' psika koro. Ĉar samkiel en la tuta spaco aŭ medio ĉirkaŭ metalfadena kondukilo, tra kiu cirkulas elektra kurento, ĉi tiu kurento kreas tion, kion la elektristoj de l' jarcento XX nomis elektro-magneta kampo, kaj samkiel ĉiu interrompo aŭ ĉiu ŝanĝo de intenseco de l' kurento determinas la respektivan variadon de l' nomita kampo, — variado tiel reala kaj efektiva kiel nevidebla kaj mistera — sammaniere ŝvebas ankaŭ ĉirkaŭ la geamantoj fortoj kaŝitaj, subtilegaj kaj eteraj, sed kolosaj en kampo elektro-ameca. La flugo de la am-altiro inter unu kaj alia de la geamantoj kreas tiun kampon, kiu estingiĝas tuj kiam ĉesas ĉi tiu altiro<sup>26</sup>.

Oni scias, ke la rapidaj interrompoj de elektra kurento estas la kaŭzo ke, kiam kreiĝas la elektra kampo, kun la komenco de l' kurento aŭ ĉe la malapero de tiu kampo, kiam la kurento estas interrompita, la fortoj en ĝi mem ekzistantaj efikas siavice je ĉiu me-

talfadeno, kiu formas fermitan cirkuiton interne de la atingeblo de tiaj fortoj. Ili igas naskiĝi en la nomitaj metalfadenoj momentajn indukci-kurentojn, kies malkovro de Faraday estas la bazo por la industria elektro-dinamiko kaj por la plej fruktodonaj, utilaj kaj mirigaj aplikoj de la elektro<sup>27</sup>.

Analoga fenomeno, sed elektro-animeca, estas tiu utiligata en la psiko-interrompilo.

Kiam ni sidigas paron en la seĝegojn, la unuaj rigardoj, kiujn la geamantoj direktas unu al alia, kreas ĉirkaŭ ili amecan kampon; la fortoj, en ĝi oscilantaj, komence nur amecaj, agas je la bobeno de l' plafono, en kies metalfadeno, kapabla transporti amon kaj elektron kune, ekfluas kurentojn miksitaj, t.e. elektro-psika, kiu en la kristala vitro-tubo eksplodas en kaskado da violkoloraj fajreroj for de unu pinto de l' kondukilo, sentebbligita per amplasmo, ĝis la alia pinto, en kreskado tre analoga al tiu de la elektronoj en la Crookes-tuboj.

Kiam la ekranoj ŝoviĝas inter la geamantojn, ili ĉesigas la am-kurenton. Samtempe malaperas la samnoma kampo. Ĉe la ekĉeso ĝi generas en la bobeno alian indukci-kurenton en kontraŭa direkto al la unua, same momentan kiel tiu. Ĉi-lastaj saltas en kontraŭa direkto kiel malŝarĝo inter la pintoj enfermitaj en la tubo, kaj tiel plu en daŭra sinsekvo.

Tion ni tuj vidos, kiam ekfunkcios la aparato. Sed tio estas nur la unua parto de l' invento.

\*

Kiam Rucandio kaj liaj helpantoj aŭ disĉiploj eliris el la lifto al la katakomboj, ili trovis Cartoya'n, kiu havis multan plezuron renkonti la geedzojn, kiuj siavice estis treege ĝojigitaj revidi la pastron.

Post alveno al la centrejo psiko-elektra, Rucandio diris al siaj akompanantoj klarigon proksimume saman, kia estis la ĉi-antaŭa, sed multe malpli koncizan kaj pli sciencan. Li finis ĝin per la sekvantaj vortoj:

— Same kiel el la ameca kampo ekestas la deŝarĝoj de la vakua tubo, kiuj jam estas elektro-amo, la elektra parto de la nomitaj deŝarĝoj kreas siavice alian kampon, sed jam ekskluzive elektromagneta n, kiun ni utiligas en la kutima formo, por eksciti ordinarajn kurentojn en tiu alia granda tubo laŭ la konata tipo Ruhmkorff.

La tutaĵo konsistanta el kronometra interrompilo, radia tubo kaj la du bobenoj formas efektivan elektro-amecan transformatoron.

La amo, jam transformita en elektron cirkulantan en la Ruhmkorff-tubo, trakuras poste cirkuiton similan al tiu de la senfadena telegrafio; per anteno alte sur la turo de l' Universalmuzeo elektra oscilado estas disĵetata en la spacon, kie ĝi estas ricevata de aliaj ricev-antenoj: de aparatoj de telefonio, varmigaj fornoj, de pumpilmotoroj, aeroplanoj aŭ vagonaroj, funkciigitaj de tiu ondaro.

Dum kiam daŭris la teknika klarigo farata pri la nefunkcianta aparato, la mirakleco de l' invento tenis streĉitaj kaj mirigitaj la aŭskultantojn. Sed kiam Marcial ordonis al la maŝinisto prepari ĉion por la ek-

funkciigo ĉe alveno de la impulsanta paro, la ideo ke proksimiĝas la momento de la praktika demonstracio, paligis Inés'on, Juan'on kaj Cartoya'n. Kaj kiam Inés aŭdis la streĉiĝon de la risorto en la horloĝa mekanismo, tiel funebre sonis al ŝi tiu bruo, kaj tiel reeĥis en ŝia koro la grincado de la feraĵoj destinitaj por torturi du korojn, kiuj en certaj tempinterspacoj estas mezurotaj malvarme kaj matematike, ke ŝi ne povis reteni sin kaj ekkriis:

— Marcial, mi kredas ke Juan kaj mi estas jam perfekte instruitaj pri la aparato; por kompreni ĝian funkciadon ne estas absolute necese vidi ĝin funkcianta. Ĉu ne ŝajnas tiel al vi, Juan?

— Al mi ŝajnas same, — respondis ĉi tiu per voĉo vualita de la sentata emocio ĉe la penso pri la spektaklo, kiu ilin minacis.

— Malgraŭ tio, amikoj miaj, por la studado de la forto-profito ne estas egale vidi la transformatoron haltantan aŭ funkciantan.

— Marcial, kiam mi vidos tie alligitaj du malfeliĉulojn, mi nek povos ion studi nek eĉ legi voltmetrojn aŭ ampermetrojn; estos al mi neeble reteni la larmojn.

— Mia edzino estas prava, kaj rilate min . . . mi pensas ke mi preferas resti ĉi tie por ĉiam inter la parioj, ol ĉeesti kaj rigardi, kiel oni rabas de du miaj proksimuloj la sanktan amon flamigitan de Dio en iliaj koroj.

— Bone vi parolas, García, — diris la pastro. — Tio estas malpia, malhumana, sakrilegia. Malfeliĉaj, malfeliĉaj gefratoj miaj!

Marcial estis infektita de la emocio de siaj amikoj. Li, kiun ni vidis en la komenco de ĉi tiu historio anstataŭiganta kun plena malvarmsango kunulaĵojn akcidentintajn en la interrompilo, li, kiu sentime estis gard-observinta dum sennombraj fojoj la laboron de la paroj en la aparato, kiam li en la paroj vidis nur bestojn aŭ aĵojn, li timis ke la sceno, kies komenco estis prokrastita pro la petego de Inés kaj la komentoj de ŝia edzo kaj de Cartoya, al li efikos tute alie ol tiam, kiam ankoraŭ ne ŝanceliĝis liaj antaŭaj ideoj de superpensanto kiel nun, kiam li estis jam renegato je ili. Li ŝanceliĝis inter la deziro evitigi al siaj amikoj la timatan spektaklon kaj la kutimo obei sian majstron, kiu estis ordoninta al li perfekte instrui liajn disĉiplojn pri la funkciado de l' aparato. Tial, ankoraŭ luktante kun si mem, li diris:

— Volonte mi volus, amikoj miaj, evitigi al vi la penplenan spektaklon, kiu tiom naŭzas vin, sed . . .

— Aŭskultu, Marcial, — lin interrompis Cartoya. — Se la aparato ne ekfunkcios nun, antaŭ ni, tamen ne ĉesos ĝia hodiaŭa funkciado, ĉu ne?

— Kompreneble, se ĝi ne funkcius, tion avizus la centrejoj de la deĵorservoj, kiuj ne povus labori, ĉar ne venus forto al la antenoj. Don Roberto elserĉus la kialon kaj donus ordonon funkciigi la interrompilon.

— Sinjorino, vi do vidas, — diris Cartoya, turnante sin al Inés, — eĉ se ni metus Marcial'on en la dilemon malobei al sia ĉefo, ni hodiaŭ ne sukcesus liberigi de la doloroj tiujn kompatindajn kreitaĵojn, kaj eble ni provokus malkonkordon inter li kaj lia majstro.

Tio estus pli malutila, fine, por niaj gefratoj ol la ne-  
daŭra malbono nur prokrastita, sed ne evitita. Krome,  
mi ne venis hodiaŭ ĉi tien por la plezuro vidi ĉi tiun  
teruran spektaklon, sed kun la espero, ke mi iamani-  
ere povos trovi ion por helpi ĉi tiujn malfeliĉulojn,  
kiam mi vidos kaj scios, kiel kaj kiom ili suferas. Por  
kontraŭbatali malbonon estas necese koni ĝin. Rilate  
vin,oble vi, kiel helpantoj de Marcial kaj Mob, povos  
subteni min por trovi vojon al tiu bona ago. Tial mi  
pensas ke la intenco, mildigi malbonon de morgaŭ  
devas doni al ni la fortojn rigardi la malbonon de ho-  
diaŭ.

— Kiel vi ordonas, patro, — diris Inés.

— Se vi ne sentas vin sufiĉe forta, restu nur via  
edzo.

— Mi restos. Mi estos forta; mi volas vidi per  
miaj okuloj, kiun gradon atingas la malhumana per-  
verseco de ĉi tiu jarcento malbeninda.

— Jes, — ekkriis Juan. — Por malbeni ĝiajn mal-  
nobleĝajn iniciatintojn; por peti de Dio punon laŭ la  
mezuro de iliaj malbonegajoj.

Ĉar Marcial vidis personan ofendon en tiuj ĉi  
frazoj, li kolere leviĝis ekkriante:

— Sinjoro García, antaŭ ol nomi malnobleĝaj . . .

— Silentu, Marcial! Atendu nur unu momenton,  
ne pli. Juan, ne petu Dion pri aferoj kontraŭaj al lia  
boneco, al lia amo, el kiu li ne esceptas siajn malamik-  
ojn, opoziciajn al lia volo. Petu lin pri lumo, kiu lum-  
igu la blindajn konsciencojn de niaj ekzekutistoj. Petu  
lin, ke li pardonu al vi tiun malbonan senton, tiujn

malbenojn. Kaj pro tio pardonu, kiel mi de nun pardonas ĉiujn malbonojn, kiujn faris kaj faros al ni la superpensantoj.

— Do pardonu min, patro, — diris García al Cartoya, — ĉar mi jam pardonis. Pardonu min, Marcial, pro la ofendo, kiun vi vidis en miaj vortoj.

Ne kredante siajn orelojn, Marcial turnis sin al Ramón, demandante lin surprizite:

— Kian povon vi havas super ĉi tiu homo, al kiu vi hodiaŭ parolas la duan fojon?

— Mi? Neniun. Demandu lin, kaj li diros al vi, ke li ne obeas min, sed la aŭtoritatecon, kiun al miaj paroloj donas Dio, je kiu vi ne kredas.

— Pardonu min, Marcial, — insistis Juan.

— Pardonita, pardonita.

Cartoya ĉirkaŭprenis unue Juan'on, poste Marcial'on kaj diris al ĉi-lastaj samtempe:

— Ankoraŭ vi ne kredas, sed vi obeas jam la ordonon pardonu al viaj ŝuldantoj. Vi ja petos ke viaj ŝuldoj estu pardonataj; vi petos tion, mi estas certa. Kaj memoru ke hodiaŭ mi promesas al vi pardonon por vi, kompanse al la pardonu kiun vi malrifuzis.

— Mi ne komprenas vin.

— Vi komprenos. Nun ni atentu tion, kio nin kondukis ĉi tien, por ke ni fine plejeble rapide pasigu la malbonan momenton.

— Do . . . oni alportu la laŭvicajn kunulaĵojn! — ordonis Marcial al la maŝinisto, per voĉo ne tre firma.

Ordoninte tion, li reviziis unu post alia trafasigilojn, kunigilojn kaj konektilojn de la tuta aparato, ne



nepre pensante pri tio, kion li estas faranta, sed pri la volvaĵo de ideoj amasigitaj en lia kapo: sekvo de la neordinaraj impresoj ĵus ricevitaĵ.

Kondukate de la unua maŝinisto, eniris viro kun bendokovritaĵoj okuloj; la maŝinisto sidigis lin en unu el la seĝegoj kaj surmetis al li la ĉenfiksilojn kaj la sekurecan zonan. Samtempe, el alia pordo, la dua maŝinisto alkondukis junan virinon, ankaŭ kun bendokovraĵo sur la okuloj, kaj sidigis ŝin en la alian seĝegon, same kiel ŝian edzon, ĉar estis geedzoj: du pasiaj gejunuloj kiuj, unuope enfermite en po unu ĉelo malmultajn tagojn post la geedziĝo, de tiam vidis sin ĉiutage, sed nur en la aparato, ne povante doni al si kison aŭ ĉirkaŭprenon, eĉ ne premi la manojn.

La reviviĝintoj kaj la pastro penegis por regi sian emociion. Marcial pensis pri tio, kion li estus sentinta, se Clara'n Snow kaj lin oni estus sidiginta en tiujn seĝojn, kiam ŝi ankoraŭ ne estis mortiginta la amon, kiun li havis por ŝi.

Kiam la du viktimoj estis sidigitaj, Marcial donis la ordonon ekfunkciigi la horloĝ-mekanismon. Tuj kiam oni aŭdis la tiktakon de ĝia pendolo, ektorniĝis la du ekranoj ĉirkaŭ viro kaj virino, de kiuj la maŝinistoj estis forprenintaj la bendokovraĵojn, kiuj malhelpis ke ili vidu sin reciproke.

## XXII

### Malbeninda jarcento! Malbeninda kasto!

En la momento, kiam la malfeliĉaj geedzoj, alforĝitaj en la seĝegoj, ekvidis unu la alian, en iliaj okuloj eklumis per blindiga brilo la inklinego rigardadi sin reciproke, kaj ekkriis per pasia akcento: „Animo de mia vi . . .“ li, kaj „Eduardo, Eduar . . .“ ŝi, sed ili ambaŭ ne povis fini siajn frazojn; krom tio, ke la ekranoj baris iliajn rigardojn, ili ĵetis sur la korojn siajn dolorajn elradiaĵojn, subite paralizante iliajn impulsojn.

La rapida kaj abrupta esprimŝanĝo, manifestanta sur la vizaĝoj la transiron de l' amo fortega al amo kruele sufokata, produktis ĉe la rigardantoj de la terura sceno impreson malmulte malpli doloran ol ĉe ĝiaj viktimoj.

— Juan, Juan, mia animo, tio estas terurega, terurega, — ĝemis Inés, premante la manon de sia edzo, kiu respondis:

— Ne rigardu ilin, ne rigardu ilin!

Neniu volis ilin rigardi, kaj, malgraŭ tio, neniu povis forturni de ili la okulojn.

Ĉe normala funkcio de l' aparato la fortaj paroj kaj

tiuj, kiuj nur mallongan tempon estis submetitaj al la malinda traktado, kutimis insisti je siaj amemaj frazoj kaj lamentaj plendoj ĉiufoje, kiam la ekranoj malfermis liberan pason al iliaj rigardoj, sed en tono des pli mallauĝta kaj per energio des pli malkreskanta, ju pli longe daŭris la sidado. La plej malfortaj kaj la turmentitaj jam de longa tempo en la interrompilo ekmutiĝis baldaŭ post komencita funkcio; laŭ la mezuro, kiel en tiu kaj tiu kazo la afekcia aktiveco rifuĝis sole al la rigardoj, la amo kaj per ĝi la elektro produktata rapide malpliigiĝis.

Ĉi tiu nereguleco en la industria profit-produktado estis grava zorgo de Mob.

Sed la dirita rilatas al normala funkciado, ne atingita en la sido, pri kiu ni parolas. La pripensa stato de Marcial, kiam li reviziis la interrompilon, estis la kaŭzo ke, anstataŭ duonturni la komutilon de l' Ruhmkorff-bobeno pure elektra, li tute turnis ĝin, lasante per tio malfermita ĝian cirkuiton same kiel antaŭe. Do, ĉar ne povis naskiĝi en ĝi kurento, ne okazis transformado.

En la tubo fulmis la deŝarĝoj de l' amo, kiun la alterna turnmoviĝo de l' ekranoj estigis el la mekanismo kaj la ĉesado de l' pasia kampo. Sed ĉar la forto de tiuj pasiaj elfluoj ne povis ŝanĝiĝi en elektron, ĝi reagis je la geamantoj, altigante pli kaj pli iliajn tensiojn kaj plimultigante iliajn afekciajn impulsojn: tial eĉ ne unu momenton ĉesis la karesaj frazoj nek la plendoj, kiujn la neebleco de alproksimiĝo elŝiris el la malfeliĉuloj<sup>28</sup>.

Sole tio jam trois por fari netolerebla al iuj homoj la spektaklon de l' suferado de tiuj kompatindeguloj, kies martiradon ili ĉeestis. Sed al tiu natura kaŭzo de kunsufero aldoniĝis alia, kiun oni povas nomi nur supernatura, rezultinta el la neatento de Rucandio: la kampo ameca, kiu ne transformiĝis en kampon elektran nek povis esti tute reabsorbata de la geamantoj, kreskis kaj kreskadis laŭ psika voltaĵo<sup>29</sup>, superekscitante per sia afekcia influo ĉiujn, kiuj troviĝis sub ĝi. Pro tio, amo, doloroj, kunsento kaj kompato estis sentataj de la homoj submetitaj al tiu mistera influo laŭ forto kreskanta ĉe ĉiu nova malŝargo de l' vakua tubo, ĝis tiu ekstremo, ke la kompato kun la malfeliĉuloj katenitaj en la interrompilo doloris ĉiujn, kiuj ilin rigardis, per doloro de propra turmentiĝo neeltenebla.

La unua, kiu kolere ribelis kontraŭ tio, estis Garcia; kriante: „Ne plu, ne plu, ne plu; tio estas terurega, mi ne toleras plu!“ li ĵetis sin sur unu kaj alian ekranon, kiujn li funde elŝiris el la ĉarniroj, kie ili estis muntitaj. Nun povis daŭri la malbenita horloĝa aparato, sen tio ke la malfeliĉa paro devis ĉesigi sian reciprokan rigardadon.

Sed tiu ago antaŭiris nur malmultajn sekundojn al alia de Marcial: li ĵetis sin al la komutilo de l' ameca cirkuito kaj malfermis ĝin, por haltigi la funkciadon; samtempe Cartoya, la maŝinisto kaj ties helpanto kriis: „Kompatindeguloj, malfeliĉuloj“, rapidege malfermis la ĉenfiksilojn kaj malligis la zontenilojn de la sortbatitaj geamantoj; ili, sentante sin liberaj, ĵetis sin

unu en la brakojn de l' alia, ebriaj pro feliĉo, sole komparebla kun la pasinta afliktego.

Inés faris nenion, ĉar kiam Juan ĵetegis sin antaŭen por rompi la ekranojn, ŝi falis svena.

— Foriru, foriru! — kriis Marcial al la kompatindaj liberigitoj, — iru al via domo! Forkuru, estu feliĉaj, amu!

Ili ne ripetigis tion al si. La maŝinistoj rapidegis montri al ili la vojon por forlasi la centrejon, dum García, Cartoya kaj Marcial klopodis malsvenigi Inés'on, kiu iom post iom rekonsciigis kaj trankviligis, vidante malplena la interrompilon kaj eksciante, ke la „kunulaĵo“ jam ne estas tia, sed feliĉa paro en libereco por ami unu la alian en sia hejmo, kie ili intertempe certe jam alvenis.

Post tempeto, kiam jam malpliigis la troeksciteco de l' sentaro de la aktoroj en la pasinta okazaĵo, Marcial memoris pri Mob kaj pri la neceso informi lin pri la akcidento. Tiam li ekpripensis, ke ĝi supozeble devenis de kaŭzo diferenca al natura kompato, ĉar se la agoj de Juan kaj de Cartoya estis atribueblaj al ilia delikata kutima sentemeco, ne estis eble klarigi sammaniere la impeton de Marcial kaj la agmanieron de la maŝinistoj, kutimintaj vidi ĉiutage kun indiferento la suferojn de la viktimoj de l' interrompilo.

Pensante pri tio, li rememoris ke la kompato, sentita de li, estis pliiginta laŭ ritmaj skuoj, kvazaŭ ili estus en akordo kun la batoj de horloĝo, ke, koincide kun ĉi tiu observo, li estis ĵetinta hazardan rigardon al la sum-indikilo de l' elektro produktata

ĉiutage, kaj vidinta ke la montrilo estis sur nul; kaj tiam tuj klarigis al li, ke iu difekto de l' aparato estis barinta la transformiĝon de la kupidoj produktitaj de la paro en kulombojn elektrajn. Kaj li krome komprenis, ke la respondeculo pri tiu ĝenerala troekscitiĝo de l' sentaro estis li mem, ĉar ĉe la revizio de l' aparato por serĉi la difekton li ne trovis tian, sed li vidis malfermita la komutilon de l' bobeno ekskluzive elektra.

Tio trankviligis lin, ĉar kiam li raportos al Mob, la fakto jam ne aperos kiel intencita kaj puninda, sed kiel unu el tiom da akcidentoj okazadantaj en ĉiuj centrejoj. Tio estis bonŝanco por García, kiu alie devus pagi kare la malbonagon rompi la interrompilon de l' eminentega Don Roberto.

\*

Dum en la centrejo okazis la sceno ĵus priskribita, alia, havonta ankoraŭ gravajn konsekvencojn, fariĝis en la domo de la vidvino, sub kies prizorgado restis Pinín dum la forestado de sia patro.

Malmultajn minutojn, post kiam Cartoya foriris por renkonti siajn amikojn, lian pardonon frapis du kuracistoj de l' Internacia Edukejo, komisiitaj vizitadi la pariajn infanojn kiuj, laŭ antaŭa rekono ĉiujara, estis registritaj kiel taŭgaj, laŭ fizika konstitucio kaj inteligenteco, por kompletigi la minimuman nombron da pensionanoj de tiu instituto; tie de jaro al jaro kreskis la neokupataj lokoj, pro malabundo de infanoj de l'

superpensantoj, pli kaj pli maldiligentaj rilate naskadon. Pro timo de venonta estingiĝo de la altega kasto superpensula estis necese, ke tiuj vakaj lokoj estu okupataj, suprenigante por tio pariidojn.

La leĝo antaŭvidis, ke tiuj suprenigitoj estu elektataj inter la plej bela kaj spirite vigla infanaro en la aĝo de kvar ĝis kvin jaroj. En junio fariĝis la elserĉado, baze de la kandidata registro; inter junio kaj decembro la medicinista personaro de l' edukejo studadis la informojn de la registro-slipoj, destinante laŭ ili la infanojn, kiuj la unuan de decembro devis eniri en la instituton, se ili inter la du templimoj ne estis maltaŭgigintaj.

Por vidi, ĉu al Pinin okazis tia maltaŭgiĝo, prezentis sin en la domo la du kuracistoj, ĉar la filon de Cartoya estis trafinta la alta honoro esti elektita kiel bona semo superpensula.

Ĉe la frapoj sur la pordo eliris la maljunulino el la domo apuda, kaj kiam la kuracistoj informiĝis, ke la etulo estas sub ŝia prizorgado, tute ne ĝenis ilin la ne-ĉeesto de l' patro, kiun ili ne bezonis por rapide esplori la filon. Post tio ili skribis lin en la listojn, kiuj havis la literojn DA (definitive akceptitaj), kaj donis al la vidvino, por ke ŝi transdonu ĝin al Cartoya, bileton kum jena enhavo:

„Oni transdonu al la eduk-oficistoj de l' Internacia Edukejo la infanon Juan Cartoya. — La 1-an de decembro de l' jaro 10 000. — P. O. de l' Plejalta Afergvidanto. — La Direktoro de l' Internacia Edukejo de Mondopolo: R. Ademar.“

— Oni venos por preni lin antaŭ paso de kvar horoj, — diris la kuracistoj ĉe la foriro. — Ĝis tiam la infano devas esti preta.

Jam pasis tri kiam, veninte hejmen, Ramón eksciis, ke la samaj, kiuj rabas la amon de la geedzoj, estas rabontaj lian filon, sen ebla apelacio. Kaj post la konsterniĝo de l' unua momento, kiam li ricevis la baton, li ekribelis, pensante ne submeti sin al la ordono . . .

Sed kiel? Kion povos fari li kontraŭ la ĉiopova socio, en kiu li estas nur mizera sklavo?

Subite li ekkriis:

— Marcial, Marcial! — Kaj ekkurante li returnis sin al la elektro-psika centrejo. Tie, profitante ke oni lin vidis antaŭ unu horo en akompano de lia amiko kaj dirante ke li devas paroli pri afero kiu tre interesos sinjoron Rucandio, li sukcesis ke oni metis lin en telefonan interkomunikon kun li.

— Kio okazas? — demandis de supre Marcial, alirinte al la aparato. — Kiu estas tie?

— Estas mi, Ramón. Terurega malfeliĉo: oni forprenas Pinín'on.

— Ne povas esti! Kiu?

— Jes, forportas lin tiuj de l' edukejo.

— Neeble, neeble!

— Post malpli ol duonhoro venos preni lin la eduk-oficistoj. Eĉ se mi rezistos, oni forprenos lin perforte . . . Ĉu vi ne aŭdas min? . . . Ne respondas . . . Marcial, Marcial! . . . Nenio . . . Ne aŭdas min . . . aŭ ne volas aŭdi.



Li forlasis la telefonon kaj konsternite reiris al sia domo.

Alveninte tie li kaptis sian filon, sidigis lin sur siajn genuojn, premis lin kaj kisis lin avide kaj ripete, kun dezirego nesatigebla, naskiĝinta el la terura ideo, ke tiuj ĉi kisoj estos la kisoj de eterna adiaŭo. Kaj li ploris, ploris sen konsolo pri la malfeliĉo kiu lin trafis, malfeliĉo multe pli malbona ol la morto de l' filo, ĉar tio signifis la perversigon de lia senkulpa kaj anĝela koro, la ruinigon de la boneco de lia Pinín, pri kiu li ĝojadis, ĉar tio estis la plej bela en la bela kreitaĵo, kiu estis eĉ multe pli bela laŭanime ol laŭkorpe.

Kaj lian puran anĝelan koron ili estas farontaj koro malpura de superĝuanto! . . . Kaj tiu filo neniam plu revenus por dormi en la brakoj de sia patro!

„Kie, kie mi povus kaŝi lin? Kien forkuri kun li? . . . Kia stulta ideo! El niaj subterejoj ne eliras iu ajn pario sen la permesbileto de la aŭtoritato aŭ sub la garantio de superĝuanto.“

Kiam Cartoya atingis tiun punkton en siaj amaraj sentoj, kaj la infano konfuzite kaj timigite rigardis lin dirante: „Kio doloas vin, paĉo? Ne plou, mi estos te bona“, Rucandio prezentis sin en la pordo kaj kriis:

— Kio okazas?

Kiam lin aŭdis la malfeliĉa patro, espero eniris lian animon; li rektigis sin kaj starigis Pinín'on sur la teron, kuris al sia amiko, kaj samtempe diris patro kaj filo la jenajn vortojn:

— Venu, venu, Masial. Paĉo ploas multe, kaj mi ne estis malbona. Diu al li ke li ne plou,

- Ha! Fine vi venis. Dankon, dankon!
- Ĉu vi dubis?
- Ne, ne, — rediris Cartoya, volante kaŝi al sia amiko sian ĵusan malkonfidon.
- Mi ne volas ke plou paĉo.
- Ne, filo mia, li ne plu ploros.
- . . . sed ĉar vi ne aŭskultis miajn antaŭajn vortojn ĉe la telefono . . .
- Mi forlasis vin ankoraŭ parolantan, por ne perdi tempon ĉe la malsuprenveno.
- Mi ne estis malbona, mi ne estis malbona.
- Ne, anĝelo mia, ne; vi ne estis malbona. Sed ili volas ke vi estu.
- Sed kiel estis tio? Vi diris ke ili tuj revenos? Kiu diris tion al vi? Kiel vi eksciis?
- Jes, supozeble ili venos ĉiumomente. Rigardu, rigardu la avizon! Ili rabas lin de mi, ili lin rabas. Plua malnoblaĵo, plua malnoblaĵo kiel tiu de hodiaŭ matene.
- Ha! — diris Marcial legante la avizon. — La ordono venas en la nomo de l' Afergvidanto.
- Kaj vi povos fari nenion . . . Ĉu ne estas tiel? Ili rabos lin, ili rabos lin.
- Por lasi ke ili lin rabas, mi ne estus veninta malsupren.
- Dio rekompencu vin. Sed, ĉu vi povos? Ĉu vi kredas tion evitebla? Kiel?
- Kiel mi sciu! Sed mi imagas ke, kiam venos tiuj kanaĵoj por la infano kaj trovos ĉi tie anstataŭ pario la subdirektoron de l' Universalmuzeo . . . Sed

kion mi diros al ili? Kiel pravigi la neon? . . . Ni bezonus artifikaĵon de fijuristo, al kiu ni povus kroĉi nin . . . kaj nenio venas en mian kapon. Mi scias tiel malmulte pri tio . . . Je la vivo de . . . ! Ho, ke ne estas tempo konsulti advokaton!

— Ne estas, Marcial. Post mallonge . . . Ne, jam ili estas ĉi tie. Aŭdu, aŭdu! Malfeliĉe, mi bone konas tiun voĉaron. Ĝi estas tiu de ĉiuj jaroj en ĉi tiu sezono.

Cartoya rilatis al la petegoj de la patroj kaj la lamentoj de la patrinoj, kies filon forportis la eduk-oficistoj, kiuj jam havis preskaŭ kompleta la aron. Pinin estis unu el la lastaj, kiujn ili devis forkonduki.

Granda homamaso antaŭeniĝis, kunvolviĝante en la mallarĝa koridoro subtera. Kaploke la du eduk-oficistoj, polica ĉefo kaj kvar gardistoj; post ili, tri-dek-kelkaj kreitaĵoj ambaŭseksaj; malantaŭ tiuj venis forta polica taĉmento kun preparitaj armiloj por bridi tiujn, kiuj eble kontraŭstarus la rekvizicion, kaj por teni en vico kaj distanco la kompatindajn gepatrojn, kiuj, grupope kaj akompanate de aliaj multaj parioj, sekvis poste. Ĉi tiuj lastaj superŝutis per malbondiraĵoj la plenumantojn de l' malhumana amas-sekvestro. Sed ili ne povis decidiĝi kontraŭstari la perforton, ĉar ankoraŭ estis freŝa en ilia memoro la hekatombo, en kiu centope pereis la senarmilaj parioj kaj ne malmultaj infanoj, liberigitaj en la unua puŝo de mal-espero, kiu igis ilin forgesi, ke manoj sen armiloj povas fari tre malmulte kontraŭ bonaj paŭloj.

La plej oftaj insultoj estis „malbenitoj, renegatoj“.

Ĉar efektive parioj-renegatoj estis la eduk-oficistoj kaj la gardistoj, kiuj tiam kaj tiam respondis al la insultoj, nomante stultuloj tiujn, kiuj ilin eldiris, kaj krome maldankemuloj rilate al la favoro farata al iliaj gefiloj per tio, ke ili ŝanĝiĝos de sklavoj al mastroj.

— Tio kion vi aŭdas, Marcial, estas la lamentoj de la malfeliĉaj homoj en la sama kazo kiel mi, de kiuj oni forrabas iliajn filojn.

Rucandio, en kiu la matena sceno estis produktinta doloregan kaj persistan impreson; kiu de la fino de la sceno ĝis la telefona voko de Cartoya troviĝis en profunda meditado, el kiu lin ŝiris la sciigo pri la danĝero minacanta al Pinín, spertis novan atakon al sia amarigita sentemeco, kiam li aŭdis la dolorajn lamentojn patrinajn kiuj, kunfandite en unu solan krion de doloro, alvenis tra la mallargha galerio, laŭirata de la malĝojiga marŝantaro. Tio estis decida puŝo, kiu en unu momento ŝanĝis en certecon ĉiujn liajn dubojn kaj ŝanceliĝojn de du monatoj; en novan certecon, antaŭ kiu subite disfalegis ĉiuj antaŭaj certecoj en disfalo, kies intensecon sintezis la juĝo de l' koro kaj la penso, kiu el ambaŭ manifestiĝis en ĉi tiu ekkkrio:

— Malbeninda jarcento, malbeninda socio, malbeninda kasto de malnoblegaj ekzekutistoj!

## XXIII

### Marcjal, ribelulo kaj diplomato

— Ramón Cartoya? — diris unu el la eduk-oficistoj, kiam ambaŭ eniris en la kavon.

— Estas mi.

— Ĉu ĉi tiu malgrandulo estas via filo?

— Jes; sed . . .

— Supozeble vi ricevis ordonon por transdoni lin al mi.

— Jes; sed mi estis ekster la domo, kiam oni alportis ĝin, — respondis la kompatinda patro, pensante ke, se li sukcesas prokrasti la transdonon, li faciligos al Marcjal trovi rimedon por ĝin evitigi, — kaj ĉar mi ne havis la kvar horojn, kiujn la avizo donas al mi, mi ne povis lin prepari nek povis ilin utiligi por adiaŭi lin; do mi havas la rajton, ke oni ne forprenu lin de mi antaŭ la kvar horoj.

— Jen, kiel trafaj konsideroj! Ĉu ni eble faru duan vojaĝon pro via bela vizaĝo?

— Ne ekzistas io preparinda por doni al ni la malgrandulon, ĉar en la edukejo oni devos forĵeti ĉion, kion li surhavas. Kaj por adiaŭi lin sufiĉas al vi du minutoj: do, rapidu, ĉar estas jam malfrue, kaj ni devos lin forporti tuj.

— Mi ne volas ii kun tiu omo malbona, mi ne volas, ne volas, — kriis la infano, ĉirkaŭprenante femuron de sia patro kaj premante kontraŭ ĝi la kapeton. — Mi timas, mi timas.

— Ne estu malsaĝa, — diris tiu eduk-oficisto, kiu ŝajnis esti la malpli bruta el ambaŭ. — Ni surmetos aŭ vi tre belan veston.

— Mi ne ios, ne ios, mi ne volas veston, volas paĉon.

— Rigardu la nazmukulon, — diris la eduk-oficisto ĵus parolinta, dum ĝa alia antaŭeniĝis por ekpreni la manon de Pinin, dirante:

— Nu finon! Fariĝas malfrue; venu la etulo!

Vidante la intencon, la infano kaŝis sin malantaŭ sia patro. Marcial ĵetis sin kontraŭ tiu brutulo, donis al li krudan puŝon, kiu igis lin returniri ŝanceliĝante du aŭ tri paŝojn, kaj ekkriis:

— Haltu, kaj atentu ne tuŝi la infanon!

— Mi timas, Masial, mi timas.

— Kiu metis vin ĉi tien? — demandis la eduk-oficisto, ne kun multa energio, ĉar li pensis ke fajrero de malkaŝa rezistado povus eksciti en danĝera maniero la murmurantan homamason, kiu anoncis ribelon; kvankam poste punota, ĉi tia povus nun multe kosti al li. Tuj, komprenante la neceson ne perdi minuton por fini la aferon, li turnis sin al la pordo kriante:

— Helpon, sinjoro inspektisto!

Kiam Marcial aŭdis lin, li puŝis Ramón'on kaj la infanon en la fonon de la loĝejo kaj direktis sin al la pordo kie, sekvate de du armitaj gardistoj, eniris la

inspektisto, treege surprizate vidi, ke tiu malobeo al la aŭtoritato devenas de superpensanto; ĉar en la sinteno, vestaro kaj fiera konduto de Rucandio li kaj la eduk-oficistoj ekkonis, ke li estas superpensanto. Kaj ili sciis ke, se li estas tia, oni ne povas trakti lin kiel parion, kaj tial li diris ĝentile:

— Sinjora moŝto, mi supozas ke vi, kontraŭstarante al la forporto de ĉi tiu infano, ne scias ke ni faras tion laŭ difinita ordono kiu, en lasta instanco, devenas de la Plejalta Afergvidanto.

Pensante per granda intenco pri la maniero, kiel malhelpi la sekvestron de Pinin, sen tio ke li faru en malobeon, kiu eĉ pli malbonigus la aferon, sed ne trovante tiel urĝe taŭgan manieron malkaŝe kontraŭstari ĝin, Rucandio, por eliri el la dilemo, gajnante tempon kaj por ne ŝajni ribelulo, respondis:

— Mi ne kontraŭstaris la plenumon de la aŭtoritata ordono, sed mi malhelpis brutan perfortaĵon kontraŭ ĉi tiu homo.

— Kaj vi, kiu estas vi? Kian rajton . . . ?

— La subdirektoro de l' Internacia Universalmuzeo.

— Mi ne sciis. Pardonu via moŝto.

— Jetu lin estelen, Masial! Jetu fo la malbonan omon.

— Mi esperas, sinjoro direktoro, — diris la ĉefo de la policanoj, — ke nun, kiam estas rekonita la nescio de l' edukoficisto, via moŝto ĝin pardonos kaj ne plu malhelpos, ke li kaj ni plenumu nian devon.

— Neniel. Vi povas daŭrigi la deĵoron, ĉar la

aferon koncerne ĉi tiun infanon mi aranĝos persone kun viaj superuloj.

— Via moŝto ne komprenis min, sinjoro direktoro. Via moŝto povos reguligi la aferon en la edukejo, post kiam la infano estos tie. Sed ĉar niaj ordonoj estas nepraj, mi devas alporti ĉiujn en la listoj enskribitojn, kiujn oni donis al mi.

— Kaj ĉi tiu, speciale, estas la unua, kiun signis la elektinta komisiono.

— Kaj kial speciale lin?

— Ĉar laŭdire li estas la plej forta kaj la plej inteligenta.

Ĉi tiu respondo estis por Marcial lumo, kiu montris al li pretekston, kiun li povos antaŭenŝovi, kaj li rediris:

— Nu, pro la sama kaŭzo mi ne povas interrompi la mense-biologiajn eksperimentojn, kiujn mi estas faranta kun li kaj kiuj estas la bazo de tre interesaj laboroj de l' Universalmuzeo.

— Mi estas certa ke, tuj kiam la administranto de l' edukejo scios tion, li donos al sinjoro direktoro ĉiajn faciligojn. Kun granda plezuro mi proponas min por lin informi pri tio ankoraŭ hodiaŭ vespere ĉe la transdono de l' infano. Via moŝto mem povos iri hodiaŭ vespere, kaj certe . . .

— Tion kion mi devas fari mi ja scias, sinjoro inspektisto. Mi malsuprenvenis por forkonduki la infanon, ĉar mi jam preparis eksperimentojn, kiujn mi ne intencas prokrasti pro sencela kaprico. Ĉar tial ke la infano ne definitive devos resti en la edukejo, estas



stulte transporti lin tien hodiaŭ (kaj forpreni lin ree morgaŭ; kaj krome, tio malaranĝas la reĝimon de la laboroj preparitaj en la muzeo por hodiaŭ kaj morgaŭ.

— Mi tre bedaŭras, sinjoro direktoro, sed la ordono kiun ni havas kaj devas plenumi, estas forporti ĉi tiun kreitaĵon.

— Nu, por forporti lin, vi devos lin forpreni ne de pario, sed de mi persone.

— Mi postulas de vi en la nomo de la leĝo . . .

— Kaj mi de vi, ke vi ne estu impertinenta kontraŭ iu, kiu estas pli alta ol vi.

— Ne estas impertinenteco; mi respektas vian moŝton, sed mi plenumas mian devon. Lastfoje mi postulas ĝin.

— Mi diris ke mi ne transdonos la infanon. Sufiĉas!

— Mi tre bedaŭras, sed via moŝto min devigas. — Junuloj, eniru! — diris la inspektisto. — Mi esperas ke via moŝto ne devigos min uzi perforton.

Vidante ke la du gardistoj, kiuj ankoraŭ staris ekstere, aperis en la pordo, malantaŭ de siaj kamaradoj, Marcial eltiris pistolon kaj diris:

— Tiun, kiu faros unu paŝon plu, kiu intencos meti manon sur la infanon, tiun mi mortigos. Mi havas ok pafojn en la pistolo; do, troas al mi eĉ kelkaj.

La aroganta kaj decidema sinteno de Marcial montris klare al la inspektisto ke, por preni Pinin'on, li devos unue mortigi la alian: afero kiu ŝajnis, prave, tro danĝera aventuro al li kaj liaj gardistoj, parioj-renegatoj, al kutimigintaj ĉiuhore rampi antaŭ la superpensantoj. Li eĉ ne kalkulis kun la risko ke, se ekso-

nus en la kavaĉo unu pafo, tio povus esti signalo de ĝenerala atako de el malantaŭe. Tial, anstataŭ iri antaŭen, ĉefo kaj gardistoj returniris du aŭ tri paŝojn. La eduk-oficistoj ne bezonis returncedi, ĉar jam antaŭe ili estis forkurintaj rapidege al la strateto, flanken puŝinte la gardistojn, kiuj staris ĉe la pordo.

Kiam Marcial vidis la impreson produktitan de lia konduto, li volis ĝin elprofiti kaj aldonis:

— Krom mia oficiala rango mi estas eksterlanda regnanto. Vi pripensos ĉu konvenas al vi perforte agi kontraŭ iberiolo, protektata per la potenco de la Mediteranea Federacio. Mi avizas vin, ke ĝis la infano oni venos nur mortiginte min . . . Supoze ke oni povos.

— Sinjoro direktoro, mi malinsistas; sed sur vin mi deŝarĝas la respondecon pri la neplenumo de ordono de la Plejmoŝta Afergvidanto. Mi raportos al miaj superuloj, kaj miaj subuloj atestos . . .

— Mi akceptas ĉiujn respondecojn; vi atestu kion ajn, sed ne plu ĝenu min kaj retiru vin tuj.

Ne ripetigante al si la indikon nek eĉ restante por preni la ceterajn du infanojn, kiuj ankoraŭ mankis al ili, pro timo je ribelo de l' popolo, kiu jam prempuŝis ilin antaŭe kaj malantaŭe, oficistoj, inspektistoj kaj gardistoj iris rekte al la liftoj, por eliri kiel eble plej baldaŭ el la subterejoj.

Kiam Pinin vidis ilin formarŝi, li manklakis kriante:

— Masial ĵetis estelen omon malbonan, Masial ĵetis estelen omon malbonan!

La dankemo de Cartoya superfluis per korsinceraj frazoj kaj ripetataj ĉirkaŭprenoj.

— Benita vi estu, benita vi estu! Dio rekompencu vin! Venu, Pinín, venu! Donu multajn kisojn al li kaj neniam forgesu, ke vi ŝuldas al Marcial pli ol la vivon. Kaj amu lin multe, multe!

— Jes; mi amas multe Masial kulaĝa. Li avas pistolon. Omo malbela avis timon al Masial. Mi volas vian pistolon, motigi malbelajn omojn, se eventos.

La etulo diris ĉi ĉion inter ĉirkaŭprenoj kaj kisoj, per kiuj kovri lin ne laciĝis lia patro kaj Rucandio. Ilin interrompis subite la lastaj vortoj de l' knabeto, kiuj rememorigis ilin pri la realeco, kaj pensigis ilin pri tio ke, kvankam pasis la senpera danĝero, ĉi tiu tamen ankoraŭ ekzistas. Ĉar, verŝajne, la aŭtoritatoj faros disponojn taŭgajn por la plenumo de la ordono, ĵus malatentita de Marcial.

— Se ili revenos . . . jes, vere, — diris Cartoya konsternite.

— Ili revenos; certe! Per mia faro mi nur sukcesis gajni tempon, havi ekspiron; sed se mi ne scias ĝin utiligi, ni estos atingintaj nenion.

— Kaj vi, Marcial, vi kompromitis vin, vi metis vin en situacion malfacilan pro ni . . .

— Tio ne okupu vin; mi ja zorgos eliri el ĝi. La afero urĝa estas la infano. Kiam ili revenos, ili venos sub kondiĉoj kiuj, malgraŭ mia ĉeesto, faros neeble savi ĝin.

— Kaj eble ili prezentos sin en ĉi tiu nokto mem,

kiam ĉiuj dormos, por surprizi nin. Kion fari tiam, Marcial? Kion mi faru?

— Ankaŭ mi kredas, ke ili revenos tre baldaŭ, kaj por la momento mi ne vidas alian eliron ol preni Pinín'on al mia domo, por ke ili ne trovu lin ĉi tie, kiam ili revenos. Vi diros al ili, ke ili repostulu lin ĉe mi en la Universalmuzeo. Ni vidu, ĉu ili kuraĝos. Kaj se ili kuraĝos, mi estas certa, ke tie ili ne forprenos lin de mi.

— Sed Marcial, ĉu vi ne metas vin en malkaŝan ribelecon pro mi?

— Ne zorgu pri tio! Tie li restos kun mi, ĝis mi sukcesos definitive aranĝi la aferon. Dum mia forestado atentus kaj zorgos pri li Inés.

— Jes, jes, vi estas prava.

— Pinín, ĉu vi volas veni kun mi supren?

— Jes, kun vi jes. Sed . . . kaj paĉo? Paĉo venu ankaŭ.

— Mi montros al vi la sunon, kiu estas tiel bela, kaj kiun vi tiel volonte vidus.

— Jes, jes; la sunon, jes. Sed paĉo venu ankaŭ po vidi ĝin.

— Filo mia, mi nun ne povas iri. Ja mi iros foje. Marcial multe amas vin.

— Mi ankaŭ amas lin. Sed li venu ĉiujn posttagmezojn, kiel nun.

— Ramón, ni ne povas perdi tempon. Mi devas fari urĝajn aferojn, por definitive kontraŭagi la baton. Kaj ĉar Pinín estas malfacile konvinkebla, venu supren vi ambaŭ. Tie vi provos, trankvile, konvinki lin,

ke li kontentiĝu kun paĉjo Marcial, ĝis kiam pasos la nubaro.

— Ĉu ĝi pasos?

— Por atingi tion mi streĉos la fortojn senprokraste, kaj mi esperas ke estos facile anstataŭigi Pinin'on per iu ajn alia infano.

— Kiel?! Jeti mian malfeliĉon sur alian? Ne, tion ne! Ĉu de alia patro forpreni lian filon? Neniel!

— Sed ĉu vi estas freneza? Ĉu tio estas la amo, kiun vi sentas por via filo?

— Mi donus por li eĉ la vivon. Sed mi neniam faros malbonon kulpe de li.

— Sed kiaj homoj estas vi parioj? Mi ne scias, ĉu mi nomu vin herooj aŭ frenezuloj!

— Nek unu nek alia: nur kristanoj, veraj kristanoj, ne laŭnome, sed anime.

— Kristanoj? . . . Kristanoj? . . . Ĉi tiu nomo . . . Ha jes! Romo, cirkoj, sovaĝbestoj, martiroj . . . Kaj vi estas tiaj?

— La samaj. Nur ke nun la martireco daŭras dum la tuta vivo, kaj la tigroj estas la superpensantoj, kiuj rabas niajn infanojn.

— Nu, ni lasu tion nun. La tempo urĝas. Ni iru supren.

\*

La plano de Marcial estis rakonti al Mob la fabelon pri la mens-eksperimentoj kun Pinin, por meti lin liaflanke en defendan staton por la rajtoj de la sciencaj laboroj de l' Universalmuzeo. Li intencis diri ke li,

kiel ĝia subdirektoro, skribos la memuaron, kiu estus publikigata kiel laboraĵo de l' instituto. Sed, eĉ konfidante ke la fiereco de l' majstro estos bona asociito por la defendado de ĉi tiuj rajtoj, ne estis por li malklare, ke tiu defendo fariĝus pli facila kaj lia sinteno en tiu posttagmezo pli pravigita, se Ramón kaj lia filo estus propraĵo de l' Universalmuzeo aŭ almenaŭ de tiu, kiu kontraŭstaris, ke oni lin transportu al la eduk-ejo.

Tial li demandis Cartoya'n en la lifto pri la nomo de lia mastro kaj eksciis, ke li estas servisto de la oficiala presejo de l' Konsistorio, kie li oficas kiel preskorektisto, laŭ nomigo de l' sekretario de tiu alta korporacio; krome li deĵoras kiel pastro de ĝia multnombra personaro paria, laŭ destino de Hobbson. Sed ĉar la superpensantoj ne rekonis la religion de siaj sklavoj, estis nekonataj al ili la pastroj kiel tiaj; ili devis deĵori kiel laboristoj en iu ofico aŭ taglaboro.

Alveninte supre, Marcial iris tuj al la loĝejo de siaj geamikoj el la jarcento XX. Dum li eliros por la aferoj, pri kiuj li antaŭe parolis, restu tie Cartoya kaj lia filo en la societo de Juan, sed ne de Inés; ŝi post tiu mateno kuŝis en la lito pro la impresoj ricevitaj en la psiko-elektra centrejo.

Elirante Rucandio diris al Juan kaj Cartoya, unu post alia:

— Mi ne kredas, ke la edukejanoj ree iros mal-supren antaŭ mia reveno; sed, eĉ se ili reirus, ili ne kuraĝos suprenveni por la infano en mian domon kaj eĉ malpli ekhavos la penson serĉi lin ĉi tie, ne trov-

inte lin tie. Sed, por eventuala kazo, se iu frapos ĉi tiun pardonon, kaŝu Cartoya'n kaj lian filon en la starejeto de la aŭtomoj, aŭ pli bone, en la banejo, kaj tuj ree enigu ĝin en ĝian murkavon. Mi esperas reveni baldaŭ. Sed se ne, atendu min ĉi tie, kiom ajn longe tio daŭrus.

Post kiam li faris ĉi tiun lastan komision al Cartoya, Marcial rapidege eliris, eniris sian domon, kie li restis nur la nepre bezonatan tempon por meti en sian poŝon ĉeklibron de l' „Konga Banko“ kaj venigi sian aŭtomobilon al la remizo de l' Muzeo.

Kvin minutojn post la enpaŝo en la veturilon li eliris en unu el la monumentecaj kortoj de l' Tutmonda Palaco, pluajn kvin minutojn poste li estis akceptata de la sekretario de l' Konsistorio, kun kiu ligis lin bonaj rilatoj, kaj, informinte lin pri la sukcesaj studoj pri la infan-inteligentoj, li raportis al li sian interpuŝigon kun la eduk-oficistoj kaj la inspektisto, sufiĉe misfigurante ĉion, por ke elstaru ne lia malobeo, sed „la skandalo ke kelkaj fiaj dom-parioj, kiaj tiuj subalternaj oficistoj, kuraĝis interdiskuti kun superpensanto kaj pekis kontraŭ la respekto al alta funkciulo“; se tia malrespektaĵo estus tolerata, ĝi formus tre malbonaŭguran ekzemplon.

Rucandio aldonis, ke lia vizito, unuavice, ne havis alian celon ol plendi al sia bona amiko kaj informi lin pri ĉio, por ke li raportu al la Plejalta Afergvidanto pri la vero de la okazintaĵo kaj por ke li ne estu malagrabla surprizata, se la edukejo, aŭskultante nur tiujn kanajlojn, prezentus la aferon en tro pasia maniero.

Tuj poste li diris, kiel aferon certegan, ke la Universalmuzeo oficiale plendos, ĉar ĝi ne povas toleri, ke oni starigu malhelpaĵojn al ĝiaj sciencaj taskoj. Kaj li finis per la indiko, ke iu ajn malfacilaĵo aŭ intertuŝiĝo kun la edukejo aranĝiĝus pli bone, se infano kaj patro estus propraĵo de l' muzeo, aŭ eĉ de Marcial mem, kiu jam de kelka tempo intencis ilin aĉeti, sed malzorgis fari tion. Tial, kaj krom la favoro antaŭinformi la Afergvidanton kontraŭ tendenca sciigo, li esperis de la bona amikeco de l' sekretario, ke li konsentos tuj vendi al li la menciitajn servistojn.

Ĉar inter personoj el la privilegia kasto de la interparolantoj ne povis ekzisti malkonsentoj pro malnoblaj parioj, ĉu tiuj estu Ramón kaj lia filo, ĉu la agentoj, sufiĉis al la funkciulo scii, ke ekzistis konflikto inter tiuj kaj superpensanto, por pravigi ĉi tiun lastan — kaj li ne volis scii pli — kaj por fari ĉion, kio estus al li agrabla. Pri la Afergvidanto li zorgos, kaj la servistojn li plezurege vendos al li en ĉi tiu momento.

Tia afableco kuraĝigis Rucandio'n diskrete tuŝi la delikatan punkton pri la dato de l' aĉeto de Ramón kaj Pinín. Li priplendis, ke li pro distreco ne petis ĝin jam antaŭ ok tagoj de la afabla sekretario, kiel li intencis. Tiamaniere ne estas eble al li fortikigi sian pozicion de tiu posttagmezo kontraŭ la sekvestro de l' etulo per tio, ke li alvokas antaŭajn posedrajtojn je li. Ĉi tiu plendo estis respondata de la afabla amiko (malmulte skrupula kiel bona superĝuanto) per la diro, ke li ne volas lin igi mensogi kaj ke li povas antaŭ-



dati, se li bezonas tion por dece rebati tiujn impertinentajn pariojn. Ĉar la ĉefafero estas, ke la privilegia kasto restu en sia pozicio. Sekve, kiam ili per la nomo de Cartoya kaj de lia filo kaj per la aĉetprezo plenigis la presitajn formularojn de l' kontrakto uzatajn en tiaj komerc-agoj, ili metis en ilin daton je ok tagoj pli fruan.

La prezo ne povis esti marĉandon inter personoj de tia bonstato.

Reveninte en la Universalmuzeon, Marcial iris rekte viziti Don Roberton, kaj ŝajnigante sin indignita li petis lin, ke li faru fortan oficialan plendon kontraŭ la provo forpreni etulon, kiun li uzadis en la ripete menciitaj laboroj. Ĝuste por eviti komplikajojn, se li mortus en iu eksperimento, li estis aĉetinta lin antaŭ kelkaj tagoj. La fideleco en ĉi tiu parto de lia raporto donas mezuron pri la vereco de la rakonto, kiun li faris pri sia kverelo kun la homoj de l' edukejo. Sed la celo pravigas la rimedojn, kaj ĉar la celo estis eviti ke de Cartoya oni forprenu lian filon, kaj ĉar la rezulto estis ke Mob indigniĝis, kiel indigniĝis la sekretario de l' Afergvidanto pro la neaŭdita impertinenteco de tiu paria kanajlaro, bone povas esti pardonataj la trompoj de Rucandio. Li ricevis de Mob la ordonon redakti kaj submeti al lia subskribo je la venonta tago energian dokumenton al la gvidanto de l' edukejo, postulantan ke la etulo estu forstrekata el la listo de la edukotoj, ĉar li estas destinita kiel „anima-vili“ en interesaj laboroj de l' Universalmuzeo, kaj krome, ke estu punataj edukistoj kaj inspektisto.

„Sed ili ne havis kulpon“, diros la legantoj, „ĉar ili ja plenumis nur ordonojn de siaj ĉefoj, kaj krome povis rakonti la aferon tute alimaniere ol Marcial“.

Ĉi tiu refuto respondiĝas en du partoj: Unue, en la tribunaloj de l' jarcento cent, kontraŭ atesto de unu superpensanto, neniom pezas la atestoj de mil parioj, eĉ se ili estas renegatoj; kaj tio ne estas miriga, ĉar io aŭ multo simila okazis jam en la XX-a, en kiu kvankam ne superpensantoj, jam estis superĝuantoj kun nekontraŭstarebla influo, kiuj rajtis fari ĉian eksceson, sen tio ke kontraŭ ili validis diroj aŭ raciaj pruvoj de la humiluloj; due, ankoraŭ en la tempo de la leganto estas ofte ke, se iu aŭtoritato kunpuŝiĝas kun potenculo, la sekvojn devas porti tiuj, kiuj ne havas kulpon, sed kiuj nur plenumis ordonon de la aŭtoritato.

Tial ke Rucandio konis sian mondon, li restis trankvilega rilate al Pinín post la du menciitaj konferencoj. La lastan li finis dirante al Mob, ke li devas lin informi ankaŭ pri malgranda akcidento negrava, okazinta tiumatene ĉe unu el la interrompiloj.

— Vi diras ke ĝi ne havas gravecon?

— Neniun. Sed ĉar ĝi alprenis tre kuriozajn detalojn, pri kiuj konvenos eksperimenti, mi kredas ke ili taŭgos por intereseĝaj deduktoj, pri kiuj mi deziras paroli kun vi.

— Do, ĉar tio ŝajnas longa afero kaj jam estas preskaŭ noktmezo, ni lasu ĝin ĝis morgaŭ. Venu frue, ĉar krome ni devos paroli pri psiko-elektra akumulatoro, kiun mi bezonos kaj kiun vi pretigu por la venonta monato.

## XXIV

### La forto de la senkulpeco

Post la fino de la konversacio kun Mob, Marcial eniris en la domon de siaj geamikoj de l' jarcento XX, kie li trovis Pinín'on dormanta sur la genuoj de sia patro. Enirante li diris:

— Bona sciigo, Ramón! Post kelkaj tagoj ĉio estos aranĝita. Sed ĝis miaj hodiaŭaj agoj donos fruktojn, ĝis la nuligo de la sekvestro de l' infano, ne konvenas ke vi aŭ li reiru malsupren.

— Dankon, Marcial, dankon! Kiel mi povos vin pagi?

— Eble estas mi, ne vi, kiu ankoraŭ estas ŝuldanto de vi kaj de via filo.

— Vi? Vi nia ŝuldanto?

— Jes. Mi estas alia homo, alia pli bona homo, de du monatoj.

— Marcial, Marcial, kian ĝojon mi sentas aŭdante vin! Se vi kredas ion ŝuldi al mi, sufiĉe pagita mi estas per tio.

— Bone, bone! Nun ni iru al miaj ĉambroj, ni devas enlitigi Pinín'on.

Post kiam ili diris adiaŭ al García, kiu ĝojis pro la bonaj impresoj, kiujn Rucandio alportis de sia agado, ĉi tiu lasta kaj Cartoya iris en ties ĉambrojn, kie ili

metis la etulon en la liron de Marcial; li nur duonvekiĝis, dum ili senvestigis lin; tuj poste li denove firme dormis.

— Morgaŭ — diris Marcial, — ni trankvile aranĝos ĉambron, por ke vi kaj Pinín pasigu ĉi tiujn tagojn . . . Kio, ĉi tiujn tagojn? . . . Ho, mi ja forgesis diri al vi la plej bonan: nek nun nek iam plu vi devos reiri al tiuj malĝojigaj subterejoj.

— Kiel?

— Ĉar vi jam ne estas servistoj de l' Konsistorio; ĉar mi estas via mastro. Pardonu, mi volis diri ke vi estas viaj propraj mastroj de vi mem. Restu definitive ĉi tie!

— Kiel bona vi estas, Marcial! Ĉu vi aĉetis nin? Ĉu por tio vi eliris?

— Jes. Jam ni ne bezonos klarigi al Pinín, kia estas la suno, ĉar li ĝuos ĝin ĉiutage.

— Kiel bona vi estas!

— Kia sensencaĵo! Ĉio klariĝas per tio, ke mi multe amas ĉi tiun pupeton kaj, iom, vin, kaj ke mi ne konsentas, ke vi ree enterigu vin.

Kiam Cartoya vidis la ĝojon de Marcial pri tio, ke Pinín ne plu reiros al la kavoj, li prokrastis diri al li ke, ĉar la infano estas pario, lia patro neniam faros el li renegaton, kiu forlasos siajn fratojn. Kaj tial, silentante pri tio, li nur respondis, ke li pro sia ofico ne povas disiĝi de siaj ceteraj religiaj fratoj; li lasos la infanon al la zorgado de Marcial kaj reiros malsupren. La tieuloj povus bezoni lian helpon en ĉi tiu nokto mem.

— Sed poste . . . Ĉar vi ja ne plu estas ies sklavvo . . .

— Poste, benante vian nomon, dezirante iun okazon por doni por vi la vivon, mi daŭrigos vivi ĉe miaj fratoj, helpante ilin porti siajn dolorojn, sian krucon.

— Sed restante ĉi tie vi povos iri malsupren por viziti ilin.

— Tiam ili ne plu vidus min porti la krucon kiel ili mem; mi ne povus prediki al ili rezignacion de doloroj, kiujn mi mem evitis, kiel ili ja vidus.

— Sed . . .

— Kara Marcial, vi forgesas ke propravole mi farigis pario, ke propradezire mi partoprenas la sklavecon de tiuj malfeliĉuloj, kaj vi ne scias, ke mia lego min ordonas ne voli por mi tion, kion mi ne volas por miaj fratoj. Do, ankoraŭ ĉirkaŭprenon, Marcial; al via zorgado mi lasas mian filon, ĉar miajn aliajn infanojn tie malsupre mi ne povas konfidi al iu alia, kaj mi iras al ili.

— Sed . . .

— Ĝis morgaŭ; mi suprenvenos frue, por vidi vin ambaŭ.

Sentante profundegan respekton al tiu abnegacia amo kiu, kvankam li ne komprenis ĝin, per sia grandeco lin imponis, Marcial rediris:

— Faru tion kion vi volas.

Kaj vidante, kiel Cartoya malfermis la pordon kaj ekmemorante, ke en la venonta tago ne lasos lin supreniri la oficistoj de la lifto, se li ne havos legitimilon, li retenis lin ankoraŭ dum la tempo, kiam li skribis kaj

enmanigis al li permesilon por supreniri al la Universalmuzeo tiom ofte kiom konvenos al li.

\*

Kiam Marcial estis sola kun la dormanta infano, li sentis unue kontentiĝon pro la bona faro realigita per tio, ke li konservis ĝin al ĝia patro kaj savis ĝian animon de la perversigo, al kiu ĝi estus kondamnata en la edukejo — en siaj solparoloj Marcial jam ne surpriziĝis, kiam li eldiris la vorton „animo“, neniam uzatan inter la superpensantoj —; poste li sentis plezuron ne malhavi la vidon al kaj la komunikadon kun la etulo, kiu tiel eniĝis en lian animon; kaj fine: vidi lin en ne-ĉeesto de l' patro konfidatan al lia gardado kaj zorgado, produktis al li la naivan, sed noblan iluzion, kvazaŭ li estas lia propra filo. kune kun la amdelikateco kaj fiero de patro.

Cedante la potencon altiron kiun li sentis, li alproksimiĝis al la lito kaj donis kison al Pinín, delikatan por ne vekti lin, sed longan, tre longan. Kaj kiam li rektiĝis kaj foriĝis de la lito, li murmuris mal-laŭte:

— Kia kolosa forto en la malforteco de ĉi tiu infano dormanta! De kie, de kie venis al li tiu povo, kiu ŝanĝas la pensojn de mia tuta vivo, renversas mian konsciencon superpensulan, anstataŭas mian rasfieron per malinklino kaj antipatio kontraŭ la miaj, kiu igas min senti kaj igas min pensi preskaŭĝe kiel la kompatindaj parioj?

De kie, de kie venas al ĉi tiu senkulpulo-anĝeleto tiu forto, kiu teren ĵetas la egoismon superpensulan, miajn konvinkojn sciencistajn, mian koncepton materialecان kaj malaltan pri la vivo?

Ĉu Pinín estas pli forta, pli inteligenta, pli klera ol mi? Kia absurdo! Ĉi tiu infano triumfis super mi ne sciante, ne proponinte tion al si, uzante senkonscie sian povon kaj ne konante ĝian ekzistadon.

Do, estas necese, ke lia forto estas pruntita, ekstera, supera al li kaj movata de iu alia: entute, supernatura.

Iu alia? . . .

Ĉu eble estas tiu, kiun Cartoya nomis Dio kaj kiu, kiel li diris al mi, mi renkontos ĉiupaŝe, de kiam mi malsupreniris al li?

Kaj tiu leĝo, pri kiu parolis Ramón: malfacilega, terure plenumebła, malhumana? Ne, malhumana ne! Male, ĉar ĝi faras la homojn fratoj kaj surmetaŝ al ili heroajn oferojn por la bono de aliaj; malhumana ne; terura jes, sed nobla, bela, granda . . . kaj justa. Spite al mia fiero kaj kvankam min doloras la konfeso, jam estas por mi sendube, ke laŭmorale mi estas egala al iu ajn pario.

Pli ol du horojn Marcial daŭrigis monologi mallaŭtvoĉe kaj spirite. Li estis ekscitita de la okazintaĵoj kaj emocioj, kiuj unu post alia en tiu tago estis sin sekvintaj; ili impresis lian sentemecon kaj ekskuis lian konsciencan. Unue, en la centrejo; poste, en la kaverno de Cartoya, kaj laste, en tiuj horoj, kiam li apud la dormanta Pinín rememoris pri la tuta procedo

de la spirita evoluo, kiu de du monatoj efektiviĝis en li.

Jam estis pasinta la tria horo nokte. Superite de la fizika laciĝo kaj la morala sekvinta al la escepta aktiveco, kiun korpo, koro kaj cerbo estis disvolvintaj tiutage, li sentis la ordonan neceson ripozi, kaj li pretiĝis fari tion en seĝego; sed kiam li jam apogis sin en ĝi, atakis lin subita deziro, knabeca, sed pro tio ne malpli viva kaj sugesta, dormi kune kun Pinín. Lin dolĉe impresis la ideo pri la plezuro senti ĉe si la etulon, kaj li pensis ke la medio de senkulpa pureco elradianta de la infano donos agrablan ripozon al lia perturbita menso. Tiom superpezis tiu dezirego ĉiun pripenson ke, kvankam li riproĉis al si la cedon kiel nesenkulpigeblan malfortecon ĉe homo de lia forta spirito, li ekkruŝis flanke de l' etulo, kun granda atento por ne vekti lin. Li ĉirkaŭprenis per la brakoj lian molan korpeton, metinte sur unu la blondan kapeton. Li surfruntigis siajn lipojn, kaj farante tion li sentis ke la deziro ne trompis lin per vanaj promesoj: lian tutan estaĵon plenigis tia delikata dolĉeco kaj bonsento tiel agrabla, ke tio ekkriigis lin:

— Kia dolĉeco, kiel bela kaj pura ĝojo! Kia feliĉo nekonata al superĝuantoj!

Nesciante, Marcial daŭrigis alproksimiĝi al tiu, kiu diris: „Lasu la infanojn veni al mi!“

En ĉi tiu momento lin atakis la dolora rememoro pri alia infano, kiu en la edukejo dormas sola, sen brakoj kiuj ĉirkaŭas ĝian korpon, sen amo kiu ĝin protektas, kiel la lia protektas Pinín'on. Ĉu estis pro la



fikcio de la menso, jam duone dormiĝinta kaŭze de la laciĝo, ĉu estis rekompenco por la „patra amo“, kiun li sentis se ne por sia propra, sed por la filo de alia . . lin ne doloris la rememoro pri la forlasiteco de lia filo tiom, kiom aliafoje ĝi doloris. La pikoj de la konscienciproĉoj malakriĝis en la firma espero ke, kiel li nun ĉirkaŭprenas Pinin'on, iutage li premos al sia koro ankaŭ sian perditan filon.

Ĉi tiu dolĉa espero fine endormiĝis lin. Kiam li jam tute dormis, el la espero naskiĝis sonĝo, kvazaŭ tia realeco jam ĝuigas lin. Ĉar li sonĝis, ke estas lia filo, kiu dormas ĉe lia flanko, protektate de li. Sed estis li, Marcial, la homo forta, kiu feliĉe ripozis sub la protekto de anĝelo kvarjara.

Kaj strange! Kiam li matene vekigis kaj vidis, ke tiu feliĉo estis nur sonĝo, li sentis neniun amarecon de trompiĝo pro tio, ke li ne trovis apud si sian perditan filon. Li vekigis kun la konvinko neverŝajna, sed tiel plena kaj absoluta kiel mistera, ke la sonĝo egalvaloras al solenpromeso, kiun iu — li ne sciis kiu, sed iu kun potenco por realigi tion, iu kies promesoj ne povas ne plenumiĝi — faris al li, ke tiu iluzio estis la anonco de venonta realeco.

Tiel profunda estis ĉi tiu konvinko, per tia sereneco ĝi kvietigis lian spiriton, kaj tiel ĝi mildigis liajn konscienciproĉojn pro la forlaso de lia filo, ke li mem miris, ke nura nepripensita antaŭsento havas tian forton. Kaj denove li pensis, kiel en la antaŭa nokto, kiam li volis klarigi al si la fortecon de Pinin, pri forto kaj potenco superaj. Kaj li memoris pri la skulpt-

isto kiu, laŭ frazo de Cartoya, kreis kreitaĵojn, kies patro estis nur argilo aŭ bronzo, la patrino muldilo tiel nekonscia kaj senpova kiel la argilo, kaj en kiuj vivo kaj animo estis faro de Tiu.

— Ĉu eble estas vero? . . . Eble? — li diris.

\*

La logika sekvo en la prezento de l' interplektiĝo de la ideoj kaj sentoj de Marcial igis nin rompi la kronologian ordon de la faktoj; ĉar nek liaj pensoj post lia vekigi okazis senpere post ĝi nek ili venis al li tuj poste. Tial ke Pinin vekigis pli frue ol li, la bablado kaj demandado de l' infano nur permesis al li pensi pri respondoj, kio ne estis tre facila.

Ĉe la malfermo de l' okuloj la etulon ne mirigis, ke li ne trovis sian patron apud si, ĉar ĉiumatene tiu eliris frue el la domo, por plenumi la devojn de sia ofico, multe pli frue ol lia filo leviĝadis. Kaj eĉ se devis lin surprizi, vidi Marcial'on en la lito kun si, tio ne mirigis lin, ĉar ekstazigis lin multe pli alia afero: la sunlumo, kiun li unuafoje vidis, la oro de la kornicoj kaj skulptaĵoj, kaj la vivaj koloroj de la tapetoj.

Li promenis la surprizitan rigardon tra la ĉambro; li eksidis en la lito kaj frotis per la pugnoj siajn palpebrojn, ĉar li ne fidis la lumon, kiun anstataŭ la malhela duonombreco de sia kaverno li vidis eniĝi tra la ampleksaj fenestroj, kiujn pro malatento Marcial lasis senkurtenaj ĉe la enlitiĝo. Kaj kiam li konvinkigis, ke la lumo estas veraĵo, li ekkriis kun admiro:

— Kiel bele! Kiel bele! . . . Paĉo, paĉo . . . O,

estas Masial! . . . Li domas . . . Masial, Masial . . . maŝdomu! . . . Kio estas tio tiel bela?

Samtempe kiam Pinín diris tion, li skuis sian amikon, kiu ne respondis tiel rapide kiel li deziris.

— Kio estas tio, Masial? Kio estas tiu lumo tiel bela?

— La suno, Pinín, — respondis Rucandio leviĝante, samtempe kiam la malpacienco igis la etulon elsalti en ĉemizo kaj nudpiede ĉe la alia flanko de la lito.

— Ĉu tio estas la suno? — li demandis, signante al belega spegulo kum ora kadro.

— Ne, Pinín. Venu!

Ekpreninte li portis lin perbrake al la fenestro kaj malferminte ĝin li diris:

— Rigardu, la suno estas tio.

Pinín konfuziĝis kaj opiniis la ĉielan volbajon la suno. Surprizite kaj pripense li ekkriis:

— Kiel bela! kiel blua!

— Ne, Pinín, ne! Tio ne estas la suno, sed la ĉielo.

— La ĉelo, la ĉelo! . . . Tie estas paĉo Dio, kaj la Di-patino, kaj mia panjo Maia, kiu estis te bona. Kiel bela estas, Masial! Kiel bela! . . . Sed, kio do estas la suno?

— Tio ronda kaj ora.

— Kiel ganda! . . . Mi ne povas igadi ĝin. . . . Kiel alte ĝi stalas! Ĉu vi metis ĝin tiel alten?

— Ne, filo mia.

— Vi ne atingus, ĉu ve! Ĉa ĝi stalas tiel alte, vi ne povas supleniĝi.

— Ne, mi ne povas.

— Do, kiu metis ĝin suplen? . . . Kiu fais la sunon? Ĉu estis vi, Masial?

— Ne, Pinín, ankaŭ tion mi ne faris.

— Klac, ĝi estas te ganda; vi ne povas. . . . Do, kiu fais ĝin?

— Mi ne scias, filo mia. Vi estas prava, mi ne povas. . . .

En ĉi tiu momento eniris Cartoya, al kiu diris lia amiko:

— Ramón, via filo estas faranta al mi demandojn malfacilegajn.

— Kiu fais ĝin? . . . Paĉo, paĉo! Masial ne sias, kiu fais la sunon, kaj kiu metis ĝin suplen. Kiu estis?

— Kiel, Pinín! Vi ne scias, kiu faris la sunon?

— Mi ne sias.

— Ĉu vi ne scias, „kiu kreis“?

— Jes, tion mi sias bone: kleis Dio . . . Dio kleis ĉion, — respondis la infano en tono de certeco, kiu impresis Marcial'on, ĉar surprizis lin trovi ĝin tiel enprofundiĝinta en la menso de kreitaĵeto kvarjara, kiel montris la akcento de absoluta kaj firma konvinko de tiu „Dio kleis ĉion“. Tuj daŭrigis Pinín:

— Paĉo, paĉo, Masial kondukis min al la ĉelo; igadu kiel bela ĝi estas.

— Ne, — pensis la patro. — Estas vi kiu metis Marcial'on sur la vojon al la ĉielo. — Kaj laŭtvoĉe li diris:

— Pinín, vi verŝajne ankoraŭ ne preĝis?

— Ne, ankaŭ ne.

— Do venu! Permesu, Marcial.

Kun granda viveco la infano eligis sin el la brakoj de sia amiko, en kiuj ĝi troviĝis ankoraŭ. Ĝi ekgenuis sur la planko kaj krucesignante sin, samtempe kiam faris tion lia patro, kaj rimarkante ke Marcial ne imitis ilin, ĝi demandis lin vive:

— Ĉu vi fogesis kucesigni vin, kiel mi instuis vin?

— Ne, filo mia. Marcial jam antaŭe krucesignis sin, — respondis Cartoya.

Marcial eksentis ion similan al honto, ke Pinín eksciis ke li, efektive, forgesis lian instruon.

La etulo, kiu nur poere sciis la Patro-Nia'n, komencis dirante: „Pato nia“, kaj poste patro kaj filo preĝis la unuajn frazojn de la preĝo, interrompe, malrapide; jen la filo antaŭeniĝis per la vortoj, kiujn li memoris, jen la patro, kiam al la filo mankis la vortoj. Sed subite ekhaltis la etulo, por turni sin al Rucandio kaj demandi lin:

— Kial vi ne peĝas, Masial? . . . Genuu!

— Lasu Marcial'on, filo mia; li jam preĝis.

— Ne, li ne peĝis; ne povas esti: li vekigiĝis pos mi. — Kaj per tono despota li ordonis:

— Genuu, Masial!

Marcial hezitis eĉ ne momenton kaj ekgenuis. Tiam daŭrigis Pinín:

— Nian ĉiutagan panon . . . Kio setvas, paĉo?

Ramón ne povis respondi, ĉar vidi Marcial'on genuanta apud si kaj Pinín tiel profunde emociis lin, ke io kvazaŭ bulo en la gorĝo nepre malebligis al li paroli; kiam vidis tion Pinín, lia viveco igis lin diri:

— Mi ne memoas, kiel estas. Masial, kiel oni dias pos nian ĉiutagan panon?

— Mi ne scias, filo mia, — respondis ĉi tiu streĉante sin.

— Ĉi tiu Masial sias nenion, — ekkriis la knabo, hontigante la saĝulon. — Instuu lin, paĉo! Igadu: vi diu kun mi la samon kiel paĉo.

— Nian ĉiutagan panon, — diris Cartoya, venkante sian emocion.

— . . . ĉiutagan panon, Masial, — diris Pinín.

— . . . ĉiutagan panon, — ripetis Rucandio.

Kaj tiamaniere ili venis al la fino de la preĝo.

\*

Tial ke Rucandio devis redakti la skribojn al la edukejo kaj porti ilin por subskribo al Mob, kaj tial ke li promesis frue prezenti sin ĉe sia majstro, li tuj, post kiam li matenmanĝis kun Ramón kaj la infano, ekokupis sin pri tiuj taskoj. La infanon ili kondukis al la loĝejo de la geamikoj el la jarcento XX, kie ili lasis ĝin sub la zorgo de Inés, kiu jam estis resaniĝinta de sia malbonfarto.

Ankaŭ Cartoya iris al siaj ĉiutagaj laboroj.

La unua kion Rucandio vidis tra la fenestrovitrogoj, enirante en la laboratorion por tie redakti la skribaĵojn, estis la suno, kaj ekvidante ĝin li diris:

— Pinín estas prava. Ĝi estas tre granda, tre granda, mi ne povas fari ĝin. Ni saĝuloj ne povas fari ĝin, same kiel ni ne povas fari muŝon kiu, ŝajnante tiel

malgranda, ne estas malpli granda ol la suno. Same kiel ni ne kapablas fari ion el nenio. Same kiel eĉ ne Moŝ mem, tiu koloso de scienco, scias fari la amon; li devas rabi la amon, kiun alia Pli Granda, Pli Saĝa, Pli Potenca ol li igas naskiĝi en la koroj de la homoj.

„Venu al ni via regno.“ Kiu regno estas tiu, kiun petas tiuj homoj, kiuj aspiras nek riĉaĵojn nek honorojn?

Ĉi-nokte, kiam suprenvenos Ramón, por preĝi kun la infano, mi devos demandi lin pri tio.

## XXV

### Neligitaj ŝnurfinoj

La psiko-elektra akumulatoro estis baldaŭ pretiĝonta. Por ĝi laboradis kun fervoro la hispanoj de i' jarcento XX, ne ĉar ilin entuziasmigis la projektitaj eksperimentoj de Don Roberto, sed ĉar post longa interparolado de Cartoya kaj Rucandio tiuj diris al ili, ke ili kunlaboras en bona ago; sed pliajn klarigojn ili ne donis.

Certe, se Marcial sin decidigis direkti tian laboron, tio estis kaŭze de la menciita interparolo kaj dank' al la aŭtoritateco de lia amiko super li. Ĉar la ŝargado de l' akumulatoro kompreneble devis efektiviĝi per amo rabita en la interrompilo, kiun la duonkonvertita superpensanto jam abomenis ne malpli ol la Vizkajanoj, li sentis grandegan mallogon partopreni tiun ŝargadon kaj daŭrigi la kunlaboradon en la malnobla faro de sia majstro. Tiun repuŝan senton kontraŭbatalis Cartoya per la vortoj:

— Por atingi, ke ĉi tiuj malnoblaj agoj malutilu malpli al siaj nunaj viktimoj, estas necese ke vi daŭrigu en ĉia direktado. Kio okazis hieraŭ matene en la centrejo al la maŝinistoj, sugestis al mi ideon, kiel vi kaj niaj du samlandanoj eble povos mildigi tiujn mal-



bonojn. Sed por tio vi devas vin mem venki, kaj ekprovi.

Poste argumentis Ramón per argumentoj tro teknikaj pri la ebleco atingi gravegajn rezultojn, sed ankoraŭ tiel problemecajn, ke estus tro frue kaj nekonvene, nun paroli pri ili, dum oni ne vidis, ĉu la projekto, al kiu ili rilatis, finiĝos sukcese aŭ malsukcese.

Sed kio plej multe influis, ke Marcial kaj la geedzoj malsupreniris ĉiutage kaj sen kontraŭdiro al la interrompilo, estis la ŝanĝo enkondukita en la ekspluat-sistemo de l' amo laŭ ordono de Mob, sed laŭ propono de Rucandio kaj kiel sekvo de ideo de Ramón, sugestita al lia amiko, por ke tiu maturigu ĝin.

Sufiĉe pripensinte ĝin, Marcial rakontis al sia majstro la akcidenton okazintan en la centrejo, lerte atribuant ĝin al la kaduka stato, en kiun la senĉesa laboro en la interrompilo metis la parojn. Tio estas la kaŭzo, ke iliaj am-impulsoj, kune kaj unuope, sen sufiĉa energio por venki la inertecon de l' elektra kampo aŭ por produkti per tio tiaspecan kurenton, amasiĝis en la am-kampo, kiu pro netransiĝo en elektron kreskis kaj kreskadis je potenco, ĝis ĝi atingis la danĝeran proporcion, kiun la okazintaĵo evidentigis.

Dirinte tion Marcial insistis pri tio, ke la elektroprofito de ĉiu ĉaro, maksimuma por ĉiuj en la unua labortago, malpliĝis jam tre rimarkeble en la dua, kaj en la sekvantaj daŭris malaltiĝi ĉiufoje pli rapide kun rezultoj jam baldaŭ malekonomiaj. Tio estonte estos serioza malhel'pajo, por doni al la invento la disvastigon por tutmonda aplikado industria, kiun deziris

Mob. Malgraŭ ĉiuj ĝiaj sciencaj superecoj malhelpus ĝin la vere ruiniga karaktero de ekspluatado bazita sur la nuna sistemo de seninterrompa laboro de la gemantoj.

Tiel bone Rucandio prezentis la demandon kaj tiel enhavriĉaj ŝajnis al Mob liaj observoj laŭ la duobla aspekto fabrikada kaj financa, ke li rajtigis lin fari provojn, subpremante la antaŭan enfermon kaj neinterkomunikeblecon de viro kaj virino, kaj laborigante ilin nur en unu sidado de tempo al tempo, por permesi ke iliaj fortoj revenu inter unu kaj alia sidado. Supozeble, tiu sistemo rezultigus krome ĉeson de la troa morteco kaj de la frenezigo kaj tiel evitus la monperdon, reprezentatan per la granda nombro da sklavoj pereantaj en la tro prema procedado.

Unue anstataŭiĝus la servistoj de l' Universalmuzeo, de Mob kaj de Rucandio. Poste, kiam la ekspluatado etendiĝus tra la tuta mondo, la Konsistorio povus starigi leĝon (laŭ la maniero de tiuj, kiuj en pasintaj epokoj nomiĝis „Generala devigo al militservo“), kiu ordonus al ĉiuj gefianĉoj kaj geedzoj patriaj personan servadon en la interrompilo. Eble sufiĉus laborvicoj de po unu tago por jarkvarono kaj paro, eble eĉ ne estus necese tiom.

— Do, al la laboro, amiko Marcial! — diris la saĝulo, jam decidiĝinta. — Provu! Kaj kiam estos pasinta unu semajno de l' nova reĝimo, alportu al mi la labortabelojn, por ke mi komparu ilin kun la malnovaj kaj juĝu pri la rezulto. Kaj ne forgesu la akumulaton!

— Ne, sinjoro. Ĝi estos preta je la kvina de januaro. Do ni havos je nia dispono por provoj kaj aranĝetoj unu semajnon ĝis la 12-a, en kiu tago kunvenos la Konsistorio.

Jen kiel Cartoya, patro de la idea iniciato, kaj Marcial, kiu donis al ĝi formon ekonomian kaj sciencan, sukcesis ke la daŭra kaj mortiga turmentado de kelkaj malmultaj fariĝis malbono pli disvastigita, sed elportebla por ĉiuj. Estas tre notinde ke, kiam la antaŭviditaj viktimoj estis informataj de Cartoya, ke per suferado forta sed mallonga, unutaga, ili savos vivon aŭ spiriton de siaj gefratoj, ili volonte akceptis ĝin.

La abnegacia interfratiĝo, por kiu la kristanoj de la katakomboj de Romo donis altan ekzemplon en la malproksimaj kaj gloraj tempoj de la persekutado kaj martirado, estis reviviĝinta inter la katakombanoj de la centa jarcento. Tiel, dum civilizacio kaj progreso materialaj, bonstato kaj korpaj ĝuoj atingis la plej ekstreman rafiniĝon sur la tera supraĵo, kie apenaŭ du milionoj da superĝuantoj senmoralaj kaj senkredaj, nur laŭ la forto de sia egoismo, plenŝtopis sin per plezuroj, tri mil milionoj da parioj de la katakomboj suferadis korpe, sed ĝuadis spiritan pacon, fariĝadis pli bonaj, progresadis en siaj animoj, trovante en la amo plej altajn ĝuojn.

La superĝuantoj, ne sendiskuteblaj, sed nediskutitaj reĝoj de la tera reĝlando, estis ruinigintaj religion kaj templojn per detruaj pioĉoj nomataj avareco, volupto, vanta fiero, oravido, pasiemo al sensaj plezuroj. En la videbla mondo ne restis postsigno de kristana spi-

rito; en ĝi regis la oro kaj estris la malvirto. Sed mal-supre en la kavoj oni improvizis templojn, en ĉiu koro stariĝis altaro, la amo al la proksimulo estis mildiĝilo de ĉiuj doloroj de la sennombraj pariaj amasoj, kresk-antaj de tago al tago, kiuj marŝis per firma piedo di- rekte al alia reĝlando, kiu „ne estis de ĉi tiu mondo“. La kristanismo paŝis al sia fina triumfo, nek vidata nek eĉ supozata de la superĝuantoj, kiuj kredis mort-inta jam de jarcentoj la kristanisman; sed ĝi estis vid-ata de Tiu, kiu rigardas de supre kaj scias, ke tiu triumfo ne estas konkero tera, sed venko ĉiela. La kristanoj fine ĝin komprenis, sed tiu ĉi kompreno estis kostinta al ili multajn jarcentojn!

Dank' al tio trois volontulaj paroj kiuj, por helpi siajn gefratojn, sin prezentis por suferi la turmentojn de unu tago en la interrompilo. Estis la triumfo de la hom-amo movata de la kredo kaj subtenata de la espero.

Dank' al tio Cartoya evitis rompiĝon de la rilatoj inter Marcial kaj Mob; malebligante la mildiĝon jam atingitan de la pariaj suferadoj, ĝi estus malebliginta ankaŭ la atingon de aliaj bonoj en estonteco. Dank' al tio oni sukcesis ke, sen kontraŭdiro, kvankam per- forte memregante sin, Inés kaj Juan daŭrigis sian sci-encan kunlaboradon. T. e., speciale Juan, ĉar Inés tre malzorgis la tiuspecajn taskojn pro la taskoj de patrino de Pinín, kiujn ŝi entuziasme plenumis dum la tuta tempo, kiam Marcial, kun subteno de Juan, pri- zorgis la fabrikadon unuavice, kaj due la ŝargadon de l' psiko-elektra akumulatoro, aŭ pli ĝuste, de la aku-

mulatoroj, ĉar krom tiu mendita de Don Roberto estis fabrikataj, kaŝe, kvar aliaj, laŭ interkonsento inter Marcial kaj Ramón en la sekreta interparolado, antaŭe jam aludita.

Post la prov-semajno laŭ la nova sistemo, la labor-tabeloj konvinkis Mob'on, ke en la ĉiutaga anstataŭigado de la paroj kuŝas la trafa ekonomia starigado de l' negoco kaj la efika profito de l' amo industria. Unufoje konvinkite pri tio li havis interesan interparolon kun la Plejalta Afergvidanto por atingi de li, ke en la proklamo, legota en la venonta kunveno de l' Internacia Konsistorio, estu enmetata projekto de leĝo deviganta ĉiujn pariojn tutmondajn al ĝenerala am-servado. La sukceso kronis la deziron de Don Roberto, kiu uzis, por konvinki la magnaton, procedon tre uzitan jam ĉe ne malmultaj plej respektataj ĉefpersonoj politikaj de l' jarcento XX: malavara vualita ofero de liberaj akcioj de la estonta entreprenego.

La projekto estu prezentota post prelego, kiun Mob faros antaŭ reĝoj kaj respublikestroj de ĉiuj popoloj de la tero, por klarigi al ili eksperimente sian inventon kaj la egajn profitojn, kiujn la industrioj de la superĝuntoj povus akiri el la paria amo. Tio ne estas kaprica nomo, ĉar de la tempo de siaj unuaj esploroj la direktoro de l' Universalmuzeo sciis ke tio, kion la superĝuntoj nomas amo, praktikante sed ne sentante ĝin, ne superas nuran nervotiklon, nekapblan movi la korojn laŭ eĉ la psiko-elektrajn aparatojn.

Kaj tio estis veraĵo eksperimentita: Neniu el la di-

versaj paroĵ amikumitaj, laŭŝajne pasiegaj, kiuj por-  
sporte sin sidigis laŭvice en la interrompilon, sukcesis  
per kiom ajn turniĝoj de la ekranoj bruligi eĉ unu  
mikroskopan ampolon de unu mizera kandelforto. Kaj  
ĉiu ajn paria paro lumigis voltan arkon de 16 000!

Kvankam ni jam diris, ke dumtage Inés zorgis pri  
Pinín, nokte Marcial ne konsentis ke li restu sen sia  
malgranduleto, por kiu li preparis nek ĉambron nek  
liton apartan, kiel li komence pensis, sed kiel en la  
unua nokto, kiam li gastigis lin, ili daŭrigis kune dormi  
en la sekvantaj kaj „telule“ ludi post vekigo en la  
matenoj; la etulo grimpis sur la saĝulon, faris akrobat-  
aĵojn sur liaj altaj levitaj kruroj, suferis terurajn fal-  
ojn . . . sur la kusenojn; entute, saĝulo kaj etulo bru-  
ege distris sin.

Por eviti riproĉojn de Pinín, Marcial ne havis alian  
eliron ol lerni la Patro-Nia'n kaj diri ĝin ĉiutage kun  
sia profesoreto, kaj per la ripetado li komencis ĝin  
kompreni, kaj lia granda inteligento, impulsata de  
bela koro, jam ekvidis brili lumon, kie la saĝulo ĉiam  
estis irinta en malhelaĵoj. Kaj lia koro ĝuis en aferoj,  
en kiuj, kiel pensis la superĝuanto, neniam oni povus  
trovi iun ajn ĝuon.

## XXVI

### La konspiro de l' amo

En la lastaj tagoj de decembro de l' jaro 10 000 la kvin akumulatoroj estis pretaj. Pro tio ke ili baziĝis sur la samaj esencaj principoj kiel la interrompilo, oni ne bezonas sciigi pri ili teknikajn detalojn, eble ĝenajn en la finparto de la rakonto. Por nia intereso homa, ne scienca, sufiĉas scii, ke ilin ŝargis la Mob-aparato en analoga formo, kiel dinamom ŝargas ordinara elektra akumulatoro; ĝi kondensis la amon je gigantaj kvantoj en plategoj de spongeca platino, kun strukturo esence analoga al mielĉelaro, saturitaj per am-plasmo.

Tio estis la komuna karakterizaĵo de la kvin aparatoj. Sed ekzistis ia diferenco inter tiu destinita al la eksperimento de Don Roberto kaj la kvar, kies ekziston li ne konis. La unua senŝargiĝis tra psiko-elektra tubo kaj malgranda elektro-magneta bobeno; ambaŭ, kvankam multe pli malgrandaj, similis al tiuj de l' interrompilo. Sed la aliaj estis provizitaj per antenoj similaj al tiuj de la senfadena telegrafio, escepte de iliaj malgrandaj dimensioj. Tra tiuj antenoj la nomitaj akumulatoroj sendis amon en la spacon; sed ne amon transformitan en elektrajn ondojn, sed en ĝia origina formo de am-vibrado.

Tuj oni efektiviĝis en la subterejoj plurajn provojn per ili, je kompleta kontenteco de Rucandio, Cartoya kaj la reviviĝintaj barbaroj, kiel Mob ĉiam nomis la geedzojn el Bilbao.

Kelkajn tagojn poste Marcial prezentis al Mob la solan modelon, ne dirante al li eĉ unu vorton pri la kvar ceteraj. Post kiam ĝi estis submetita al provoj (komplete diferencaj de tiuj faritaj per la aliaj aparatoj), li estis plene kontentigita kaj gratulis al Marcial kaj eĉ al Inés kaj Juan. Al ili li diris ke, ĉe daŭrigo sur ĉi tiu vojo, ili atingus la eniron en la privilegiitan klason de la superpensantoj.

En tiuj tagoj estis definitive kaj favore decidita la afero Pinín per nuligo de la enir-ordono en la eduk-ejon.

Kiam lia patro eksciis tion, li ekpensis malsuprenpreni lin en sian domon, sed li diris nenion pro kompato al Marcial kaj prokrastis fari tion, ĝis estos pasinta la jam proksima prelego de Mob, sekve de kiu oni esperis grandajn novaĵojn, pri kiuj konfidis la pastro, por ke al lia amiko estu malpli pena kaj dolora la foriĝo de la infano.

Ke la kompato estis vere rajtigita, tion montris la ŝanĝo en la vizaĝo de Marcial, de kiam li komunikis al Cartoya la sciigon pri la feliĉa disvolviĝo de la afero, ĝis kiam li vidis lin foriri sola, kiel ĉiunokte. Sed la vizaĝo de Marcial, tre streĉita, kiam li komunikis la bonan informon, kvazaŭ temus pri mal-feliĉo (ĉar li pensis ke li restos sen sia etuleto) iom post iom resereniĝis, kiam li ne aŭdis, ke la patro diris



ion pri la forprenado de la filo. Kaj kiam li jam konvinkigis, ke ankoraŭ ne ekzistas danĝero, ke oni forprenos lian pupeton, el lia mieno radiis ĝojo, kies kaŭzo estis tiel travidebla por lia bona amiko, ke tiu pensis por si:

— Ĉi tiu saĝulo, kiu ludas pupe kun mia filo, ŝajnas estaĵo eksterordinara. Sed la afero estas eĉ pli miriga ol ĝi ŝajnas, ĉar se oni rigardas profunden, vidos tiu kiu scios vidi ke, kvankam Pinin ne estas saĝulo, la pupo estas Marcial: feliĉe por Marcial, kiu nur infaniga sukceso purigi sin de sia malpura lepro morala de superĝuanto. Nur tiel . . .

— Kiel silenta vi fariĝis! — diris Marcial, surprizite per la muteco de sia amiko kaj rompante tiel liajn pripensojn.

— Jen mi! Kian kapon mi havas! Kun la sciigo pri Pinin mi preterlasis diri al vi, ke Mob ordonis al mi morgaŭ esplori la kunsidan salonegon de l' Mondpalaco kaj tie antaŭvidi la instaladon de l' aparato por lia prelego. Por kaŝi la instaladon de la kondukdratoj de l' anten-akumulatoroj tiel, ke ili ne perfidus ekzistadon, konvenus al mi scii detalojn pri la konstruo de l' palaco, kiam vi certe konas perfekte. Tial estas necese, ke vi akompanu min dum mia vizito, por surloke mem aranĝi la detalojn por realigo de niaj planoj.

La postan tagon la du amikoj efektive iris al la Mondpalaco, akompanate de Garcia, kaj Cartoya prezentis la rolon de laboristo sub ordonoj de Marcial.

Oni devas atentigi pri tio, ke Garcia, influata ankoraŭ de la ideoj propraj al lia malproksima jarcento,

nek estis atinginta la egoistan anim-egalecon de la superpensantoj, kiujn li abomenis, nek la abnegacian amon de la kristanaj parioj, kiujn li rigardis siaj veraj samklasanoj kaj por kiuj li havis ĉiujn simpatiojn. Pro ĉi tiu kaŭzo lia impulsema karaktero kaj lia decida malemo kontraŭ Mob estis akriĝintaj lian indignon kontraŭ tiu kaj la socio de la superĝuantoj, tiom ke, se Cartoya ne sukcesus lin trankviligi, li preskaŭ estus malhelpo, kelkfoje eĉ grava, pli ol subteno al la planoj de Cartoya. Ĉar lia furioza ribelemo jam minacis influi Marcial'on.

Tiel ekzemple, kiam ili tri debatis iun posttagmezon, García, rilatante al la projektoj ankoraŭ malklaraj por li, plenumotaj per la akumulatoroj, diris:

— Mi kredas, patro, kun la plej granda respekto por vi, ke tiuj vojoj estas longaj kaj eraraj. Por mi estas klare ke du milionoj da parioj kontraŭ dudek miloj da superpensantoj en Mondopolo, kaj tri mil milionoj kontraŭ du milionoj en la tuta mondo ne bezonas ion alian ol volon por forbaŭi, por nenigi ilin, por surtroni la justecon en la mondo.

— Vi estas miloble prava.

— Jen, vi mem vidas.

— Atendu, mi diris malĝuste; vi estus miloble prava, se ni parioj estus popolo, nacio aŭ klaso aspiranta la regadon, aŭ se mi estus iu reĝo aŭ militestro soifa je konkeroj. Sed mi estas pastro kaj ni parioj antaŭ ĉio estas kristanoj; feliĉe ni progresis multe laŭ sincereco de la sentoj kaj laŭ morala konduto kompare kun la tempoj, el kiuj vi venis.

Vi ĝuste diris: se okazus tia ribelado kaj tiuj ne atendataj alsaltoj, pri kiuj vi revas, mi kredas ke nenion helpus al la superpensantoj la potenco kaj la armiloj, kies monopolon ili havas, ĉar ili estus teren premataj de la superforta amaso, kiu faligus super ĉiun el ili pli ol unu kaj duonan milionon da parioj. Sed por kio? La kristanismo ne aspiras konkeri la mondon perforte, sed celas ke en ĝi triumfu la amo . .

Kaj ĝi sukcesos, eĉ tre baldaŭ, ĉar la amo kristana jam konkeris tiujn tri mil milionojn da estaĵoj pariaj en mondo, kies tuta loĝantaro estas 3 002 000 000.

Tio estas nia triumfo. Kvankam laŭŝajne nur ĉe sklavoj, la kristanismo regas en la animoj de la grandega plimulto de l' homaro. Vi forgesis, filo mia, ke en la bataloj de l' kristanismo ni kristanoj ne venkas mortigante, sed suferante kaj mortante, same kiel la martiroj de la paganaj cirkoj, same kiel la misiistoj turmentitaj de sovaĝuloj.

Ĉe aliaj heroismoj, honorataj en la mondo kaj kreataj de homoj kapablaj por ideo, ĝiaj herooj mortas por mortigi. Sed la kristanaj herooj mortas por atingi la savon de siaj ekzekutistoj, montrante al ili ke la morto estas matenruĝo de vivo pli bona ol ĉi tiu.

Jesuo instruis nin ke tiamaniere oni triumfas. Li ne ribeligis la popolon de Jerusalemo, je la Palm-dimanco, kiel li farus, se li volus instigi ĝin por konkeri regnon ĉi tie malsupre. Sed per sia morto sur la kruco li konkeris por siaj anoj regnon eternan. Sur la kruco, kiu estis fi-fama pendigilo!

Ĉu oni kredus hodiaŭ eble, ke homoj atingus la

punkton adori objekton tiel malamindan kiel pendigilo, gilotino, ekzekuta bloko kaj ekzekutista hakilo? Nu, io sama estis la kruco, kium Jesuo faris adorata standardo, emblemo de l' amo!

Per amo oni devas triumfi, amiko Juan!

Marcial aŭskultis kaj silentis, pensante pri tiu mirakla transformiĝo — fakto nepre historia — de signo malhonoriga en signon de amo, pri tiuj neverŝajnaj, sed pozitivaj triumfoj de rezignacio kaj morto.

— Do, Don Ramón, vi esperas ke per tio, kion ni estas preparantaj, ni alvenos al la fina kaj definitiva triumfo, kiu permesos al niaj gefratoj supreniri al la surfaco de la tero por partopreni kun la superĝuantoj en la donadoj de la naturo, kiujn tiuj ĉi nuntempe uzurpadas?

— Tio estos donata al niaj gefratoj kiel kromdono. Sed vi ja scias, filo mia, ke la plej granda bono tio ne estas. Koncerne vian demandon, ĉu ni nun atingos tiun fintriumfon, mi ne povas respondi al vi . . . Kaj mi eĉ timas, ke ankoraŭ ne venis la tempo por ĝin atingi. Mi nur scias ke por ĝi ni laboras, ke al ĝi ni alproksimiĝas, ke se ni ne vidos, ĝin vidos niaj gefiloj.

\*

Post kiam estis kvietigitaj per la antaŭaj aŭ similaj klarigaj interparoloj la batalemaj instinktoj de García, la projektita entrepreno ankoraŭ puŝis kontraŭ iu konscienc-skrupulo de Marcial. Ĝi naskiĝis kiam venis al li la ideo, ke tia faro estas komploto aŭ perfido kontraŭ Mob.

Li kontraŭbatalis ĝin dirante al si, ke esti tia viktimo estas fatala sorto de ĉiuj despotoj, kiuj misuzas sian forton kontraŭ homoj, ne havantaj necesajn rimedojn por defendi sin kaj tial nepre devas anstataŭigi lin per ruzo. Li diris al si ke, ne volante fari personan malutilon al Don Roberto nek rilate al lia korpo nek al liaj intereso, oni celas nur komunajn bonojn per tio, ke oni finigos liajn malnoblaĵojn kontraŭ la malfeliĉuloj en la katakomboj. Kaj por ĉesigi iliajn dolorojn ne estas alia vojo ol la perforto, komence pledita de García, aŭ la milda sed taŭga plano elpensita de Cartoya, kiu ne serĉis punadon, sed la savon de l' ekzekutistoj de la parioj.

Sed ĉu Marcial jam estis kristano? Ekstere kaj oficiale ne. Sed, kiel oni vidas, li sentis jam preskaŭ kiel tia.

Kaj eble ĝuste tial li ne sukcesis silentigi siajn skrupulojn, kiujn kiel superpensanto li ne estus sentinta: trompi la „plejmoŝtulon“. Sed ili ĉesis tuj, kiam Mob venigis lin por komuniki al li la ricevon de dokumento el la Internacia Edukejo, per kiu ĝi sciigis ke „la malgrandulo de la eksperimentoj“ estas forstrekita el la listoj de ĝiaj edukotoj; Mob aldonis ke, kiam ili estos finintaj la aferon, kiu lin nun tenas tute streĉita: lia baldaŭa prelego antaŭ la Konsistorio, — Marcial devos venigi al li la malgrandulon; ĉar ankaŭ li mem devos eksperimenti en li pri ideoj, kiujn de kelka tempo li havas pri la maniero eksciti aŭ nuligi la rememoron en la cerboj.

— Pinín en la manoj de tiu ĥieno, por ke li mortigu

lin aŭ redonu lin al mi kiel idioton per siaj eksperimentoj! — diris Rucandio, elirante el la laborĉambro de sia majstro. — Ĉion antaŭ tio!

Kaj ĉesis hezitoj, kiuj same estus lin forlasintaj, eĉ se, por savi la infanon el la ungegoj de Mob, estus necese al li mortigi tium.

\*

La akumulatoro destinita por la demonstraj klarigoj pri la Mob-amo je la antaŭvespero de l' malfermo de la kunsidoj konsistoriaj estis instalata iom pli alte ol la apog-rando de la balustrado sur la estrado de l' prezidanta tablo, kaj malantaŭ tiu balustrado.

El ĝi eliris metalfadenoj, kies celo estis komunikigi kun diversaj elektraĵoj apartoj dismetitaj tra la salonego. La celon Mob mem baldaŭ sciigos al ni. Laŭ lia ordono oni estis zorge kaŝinta ilin ĉe kolonfostoj, kapiteloj, ornamatoj kaj skulptaĵoj. Ĉar estis grave por la eleganteco de liaj eksperimentoj kaŝi al la publiko ĉiun eksteran interkomunikilon inter tiuj aparatoj kaj la am-akumulatoro, kiu igos ilin funkcii.

Sed al tiuj metalfadenoj estis alligitaj aliaj, same lerte kaŝitaj kiel tiuj, etenditaj inter la nomita akumulatoro kaj la kvar ceteraj akumulatoroj kun „disradiantaj antenoj“, kiuj estis instalitaj sur la alta monumenteca kornico de l' salonego kaj malantaŭe lokigitaj en la kavaĵoj de l' muro respondantaj al la fenestregoj, tra kiuj eniĝas la lumo, kiu el la alto heligas la grandiozan duonrondan halon.

Ni eniru ĝin.

La luksaj tabloj kaj pompaj tronoj, lokigitaj post ili, de la monarkoj kaj prezidantoj reprezentantaj ĉiujn naciojn, okupas duoncirklojn koncentrajn, aranĝitajn ŝtupforme.

Tronoj kaj tabloj estas el kverkligno kaj pompe montras sur si en multkoloraj skulptaĵoj la blazonojn de la nacioj respektivaj.

Tiuj monarkoj estas submetitaj al la Komitato de Bank-Institutoj, kiujn prezidas la Plejalta Afergvidanto. Tio estas logika kaj natura dependeco, ĉar en la senmoraliginta socio de l' centa jarcento la mono devas esti la definitiva estro. Tio estas sendisputa vero, pri kiu jam de kelka tempo la pruvoj fariĝas videblaj en la dudeka jarcento.

Malantaŭ la giganta tablo prezidanta, el kompakta oro, staras naŭ seĝegoj, ankaŭ el oro: ok por la anoj de l' Bank-Komitato kaj unu centra, pli pompa kaj pli altigita, por la Plejmoŝta Afergvidanto.

Fine, ĉirkaŭ la priskribitaj lokoj troviĝas la tribunoj, dividitaj en ses etaĝojn, kaj plej luksaj, kio estas memkomprenebla, ĉar ili estas destinitaj nur al superpensantoj kaj superĝantoj. Ili estas tiel ampleksaj, ke en ili povas oportune sidi ĝis 15 000 personoj. Ĉar la kunsidoj de l' Tutmonda Konsistorio vekas ĉiam eksterordinaran intereson en la inteligenta loĝantaro de Mondopolo. Kaj tiu, kiu kiel inaŭgura de la leĝdona periodo estis okazonta la 12-an de januaro 10 001, ekscitis eĉ pli grandan scivolon. Oni eksciis, ke la prezentadon de interesegea leĝprojekto, kiu legos la Plejalta Afergvidanto, antaŭiros informo

kaj klarigo pri mirakla invento de l' saĝega direktoro de l' Universalmuzeo: malplikostigante la ĝuojn de la superĝuantoj, ĝi pliiĝus la profitojn.

Je la antaŭvespero de la nomita tago Mob komunikis al Marcial la paragrafojn de l' menciita leĝprojekto, kiun la Afergvidanto kaj li estis redaktintaj.

Jen ĝi, simpla, mallonga kaj racia:

„Konsiderante ke la paria amo, kiel vi vidis, estas la plej granda naturforto, ĝis nun ne ekspluatita;

ke, dum ni superpensantoj portadas malindan imposton generan, kiun ne pagas la parioj, la paria amo estas nejusta kaj indigna privilegio, kiu plu ne rajtas daŭri;

ke ili ne havas rimedojn por pagi mon-tributon, ĉar ili posedas nenion, estas necese ke ili pagu iamaniere;

Tial la Konsistorio dekretis: Ĉiuj parioj estas submetataj al deviga disponigo de sia amo al la socio, plenumenda en la templimoj kaj epokoj, kiujn la regularoj kaj bezonoj de la industrioj difinos. Tiu disponigo realiĝos laŭvice: unue inter la gefianĉoj kiel antaŭpostulaĵo por leĝigo de ilia kuniĝo; due, inter la jam-amikumitoj.“ (Jam oni scias ke la superĝuantoj neniam diras »geedzoj«.)

Kiam Marcial komunikis al siaj amikoj la tekston de l' dekreto, Cartoya diris:

— Eĉ se ni atingos nur tion, jam estas multo, kompare kun la sistemo de daŭra turmentado, primitive aplikita de Mob. Se ne estus pro vi, tiu unua reĝimo estus nun dekrete disvastigata tra la tuta mondo. Sed mi fidas ke ni atingos multe pli.



## XXVII

### La amo ribelas

Estas la 14.30 de l' 12-a de januaro, kiam komencas alveni en la monumenteca Mondopolo la unuaj monarkoj, magnatoj, plutokratoj kaj sciencaj korifeoj, kiuj alrapidis per aermobiloj kaj aerekspresoj multformaj kaj vari-aspektaj el ĉiuj nacioj de la Tero al la unua kunsido de l' Konsistorio, kunvokita por la 15-a horo akurate de la nomita tago.

La ardanta suno de la varmega terzono lumas per blindiga brilo kaj bruligaj radioj. La varmego en la ĉirkaŭaĵoj de la tutmonda ĉefurbo estas vere sufoka. Sed vasta nubo, arteformita per „aŭtomataj disvaporigiloj“ de la urbestro, kaj pendigita per la funkciado de potencegaj suĉmaŝinoj („aspiratoroj“) kiel giganta markezo super la tuta belega urbo protektas ĝin kontraŭ la bril-reflektoj de la tropika lumo meridiana kiu, trafiltrata per la nubo, ŝanĝiĝas en mildan kvankam intensan helecon de subtile-malakraj nuancoj. Fluoj da malvarma aero, injektataj de „elektro-enbloviloj“ en la internon de la bonfara nubo, kaŭzas en ĝi iometan kondensiĝon de la vaporo kiu, malsuprenfalante en formo de malkompakta roso kaj revaporiĝante antaŭ ol atingi la teron, moderigas la ardecon de la aero per malsekeco, kiu agrabligas la atmosferon. Tiel la ter-

mometra koloneto en avenuoj kaj envolvantoj markas temperaturon de nur 21°.

Je la 14.45, kiam jam estas plenaj la tribunoj de l' kunsida salonego de l' Mondpalaco, ĝiaj pordoj estas fermataj. Je la 14.50 parade eniras en la duonrondon, kun plej solena ceremonieco, la reprezentantoj de la nacioj kaj starigas sin malantaŭ siajn seĝegojn. Je la 15-a horo la Bank-Komitato, antaŭiranta la Plejaltan Afergvidanton, prezentiĝas sur la prezidanta estrado.

De dek minutoj antaŭe Mob, akompanate de Marcial, dekstre antaŭe de la prezidanta tablo, okupas sian lokon apud la akumulato. En plejble granda distanco de ĝi, sed proksime al la du ĵus-nomitoj kaj malantaŭ granda kolono, por esti nerimarkeblaj al la kunsidantaro, ekprenas lokon Cartoya kaj Garcia, enlasitaj tien kiel elektro-laboristoj, supoze ke iliaj servoj povus esti necesaj.

Post malfermo de la oficiala kunsido fare de la Afergvidanto, ĉiuj membroj de l' Konsistorio eksidas, kaj la sekretario tuj-sekve legas la programon de la kunsido. En aliaj jaroj la inaŭgura kunsido kutime limiĝis al tio, ke post la legado de l' programo estis disdonataj la proponoj prezentitaj al la kunveno por esti diskutataj kaj voĉdonataj en la sekvaj kunsidoj. Sed por la nun-solenata la tagordo fiksis ke, post fino de la disdonado, la plejmoŝta Mob faros sian prelegon.

Ties komenca frazo, per kiu li direktis sin al la aŭskultantaro, sufiĉos al tiu, kiu bone atentos ĝin, por prijuĝi, kiel gradiĝas la respekto en la socio de l' jarcento C. Jen la frazo, kiel esprimova specimeno:

„Eminentaj milionuloj, gloraj monarkoj, potencaj kavaliroj, famaj saĝuloj, belaj sinjorinoj!“

Poste li klarigis antaŭsciindaĵojn pri sia genia invento. Li priskribis la aspekton kaj la funkciadon de l' psiko-interrompilo kaj laŭrevue pasigis la potencon kaj utilecon de ĉiuj energi-fontoj, prezentataj de la naturo, kies fortojn la homo eluzas: mizeraj kompare kun la kolosaj kaj neelĉerpeblaj energioj de l' Mob-amo.

Stilo kaj parolturnoj, per kiuj li disvolvis la temon, estis, kun escepto de pli granda vortornamado kaj bombasto, la samaj kiujn la leganto jam konas, ĉar Mob uzis ilin en siaj klarigoj por la reviviĝintaj gedzroj de l' jarcento XX. Tial ni preterlasu ĉion jam konatan, kaj transskribu nur la lastan parton de la prelego, kiam diris la oratoro, alveninte jam ĉe amuzaj eksperimentoj:

— Kvankam ĉio ĉi estas nova, ekzistas io pli grava, pli miriga kaj pli utila. La agantaĵo revoluciigonta la mondon, kiu ankoraŭ estas nur amo ĉe la eksplodado inter la pintoj de la nerv-provizitaj metal-fadenoj, jam estas io alia, kiam ĝi movas la indikilon de galvanometro intermetita en iun ajn cirkuiton ordinaran de metalfadeno, submetita al la induktado elektro-ama. Amo do transformiĝis en elektron. Se anstataŭ al galvanometro mi fluigas la amon al maldika metalfadeno, ĉi tiu ruĝe ekardas. Nun la amo estas fajro. Se en la cirkuiton mi intermetas voltmetron, produktiĝas en ĝi kemiaj kombinoj kaj malkombinoj, ĉar tiu agantaĵo ŝanĝiĝis en kemian forton.

Se oni muntas motoron, ĝia rado turniĝas per impulso de la mekanika forto, kiu tiras aŭtomobilon, ŝipon aŭ aviadilon. Kaj se, laste, mi intermetas en la cirkuiton voltan arkon, la lumo kiu en ĝi brilas estas amo transformita, amo kiu nin blindigas.

Kaj ĉiuj metamorfozoj de la afekcia energio estas atingataj facile, malabrupte, dank' al mirakla instinkto kiun, kiel esenca eco de sia mistera ĉiopovo, la amo havas por sin klini, kiel dirus poeto, al ĉiu ofero, kiun oni postulas de ĝi.

Por fini ĉi tiun prelegon, mi volas videbligi al via vidpovo, en maniero de esprimplena kaj kurioza demonstro, la mirindaĵojn de tiuj industriaj transformiĝoj per tio, ke mi prezentos al vi diversajn eksperimentojn varmigajn, mekanikajn, lumigajn, en kiuj mi malŝparos la milionojn da kupidoj amasigitaj en la psiko-akumulatoro, kiun vi vidas ĉi tie. Mi rimarkigas ke la *kupido* estas la mezuro de l' amo, same kiel la metro estas tiu de l' distancoj, la litro — de la volumenoj, kaj la grado — de la temperaturoj. Mi atentigas krome, ke mia akumulatoro estas kapabla kondensi amon en grandegaj kvantoj je altegaj tensioj kiuj, dank' al la eksterordinara rezisteco kaj perfekteco de l' aparato, ne fariĝas alarme danĝeraj.

El ĝi la amo pasos sinsekve al la aparatoj, kiujn vi vidas en diversaj lokoj de l' salono, kaj al elektro-arklampo pendantsanta de la plafonvolbaĵo; kaj en ĝi kaj en ili vi vidas, kiel ĝi realigos diversajn specialajn laborojn.

Mi komencos per la varmecka eksperimento, pli alt-

ĝonta la temperaturon en ĉi tiu ejo, per tio ke mi sendos amon, kiun mi havas ĉi tie, en kondensita formo, al tiu metala globego, el kiu elradios la varmo, kiu baldaŭ igos brulantaj ĝiajn molekulojn. Vi vidos ĝin unue en koloro malhel-ruĝa, poste hel-ruĝa, poste tuj blank-ruĝa, sinsekve ĉielblua kaj ora laŭ la mezuro, kiel altiĝos ĝia temperaturo; fine, kun ties plej granda kreskado, ĝi fariĝos komplete diafana. Baldaŭ vi sentos rimarkindan altiĝon de la temperaturo, kaj se oni ne interrompus ĝustatempe la kurenton, la elradiado fine bruligus vin.

Ne ektimu, sinjorinoj. Ne ekzistas iu ajn risko. Mi tenas la amon katenita per ĉenoj tre fortikaj. En miaj manoj ŝanĝiĝas en ludilon ĝia terura potenco.

Do, Rucandio, — li ordonis, turnante sin al Marcial. La plejmoŝta Mob kompreneble ne malaltiĝis tiom ke li ektuŝis prembutonon aŭ komutilon.

Kiam estis liberigita la vojo al la fluido amasigita en la akumulatoro, subite ekflamis la globego en ŝanĝiĝantaj briloj, de la malhel-ruĝa al la malhel-ora, traŝkurante la unuan parton de la ŝkalo de nuancoj supre menciitaj. Sed atinginte tiun staton ĝia brilo restis senŝanĝa dum kelkaj sekundoj, je la surprizo de Mob, kiu certigis al siaj aŭskultantoj, ke baldaŭ diafanen ŝanĝiĝos la globego.

Sed tempo pasis, kaj la eksperimento ne venis al la anoncita fazo.

La okazantaĵo — neklarigebla por la preleganto, kiu vidis regule ekbruli la psilko-deŝargiĝojn en la vakuo-tubo de sia akumulatoro, sed ne povis kom-

preni, kial ili ne fortigis la elektro-kurenton kiu varmigis la globegon — tiu ĉi okazantaĵo estis tre simpla. Jen ĝia klarigo: Kiam Marcial premis la funkciigilon de la akumulatoro vidata de ĉiuj kaj ĉi tiu komencis sensargiĝi pere de la globego, li malfermis samtempe la interkomunikadon ekscitantan la aktivecon de la aliaj akumulatoroj kaŝitaj, kiuj per siaj antenoj komencis sensargiĝi en la Konsistoriejo. Sed la amo enhavata en ili ne transformiĝis en elektron kiel tiu de l' aparato ĉe la prezidanta platformo; ĝi disiĝis el tiuj antenoj en formo de ondumado aŭ afekciaj impulsoj.

El tio rezultis, ke la intens-diferencoj de la abruptaj ŝanĝoj de l' am-kampo, produktitaj per la malŝarĝoj kontraŭ-direktaj de l' psika vakuo-tubo, estis malplifortigitaj per ia elradiaĵoj de la antenoj, kio malhelpis ke la elektraj kurentoj en la globego atingis la energion antaŭviditan kaj kontrolitan dum la provoj faritaj de Mob en antaŭaj tagoj, kiam lia akumulatoro funkciis sola, ne estante perturbata per kunagado de aliaj, kun kiuj ĝi nun interkomunikiĝis.

Sed krom ĉi tiu elektra fenomeno komenciĝis alia, el tre diversa origino, kiu estis tiu, kiun Cartoya kaj Rucandio celis kaj pri kies ebleco estis atentiginta ilin la elfluo okazinta en la interrompilo, kiam la maŝinistoj liberigis la parian paron. Do, en la vasta salono de l' Konsistorio komencis ŝvebi io eksterordinara: tiu etera influo kiu, ekondante en la atmosfero per la subtile-dolĉa blovado de ventetoj, ĉirkaŭaerumis la fruntojn de la saĝaj superpensantoj kaj sekiĝintaj su-

perĝuantoj, kaj ŝajnis enfiltriĝi eĉ en iliajn malmolajn korojn.

— Rucandio, devas esti iu malregulaĵo en la cirkuito, iu eraro de izoliĝo, iu alter-konduko. Rigardu, rigardu! — diris Mob, alproksimiĝante al la akumulatoro kaj mem kontrolante konektilojn kaj kontaktojn, sed jam iom embarasite de la mistera influo, kiu trafis ĉiujn. Turnante sin al la prezidantaro, li daŭrigis: — Povas esti nur iu sensignifa malhelpeto en la elektra parto de l' cirkuito. Ĝi tuj ĉesos. La aparato perfekte funkciadis dum la provoj.

Sed dum li parolis, la kvar akumulatoroj de la plafonvolbajoj daŭre jetis impulsojn kaj impulsojn, inundante la salonegon per amo je kreskantaj tensioj en ĉiu centono da sekundo. El tio naskiĝis du samtempaj rezultoj: unu elektra, alia anima.

La unua estis: La akumulatoroj komuniĝantaj kun la antenoj senŝargiĝis plirapide ol la akumulatoro komuniĝanta kun la globego. Tial alvenis la momento, en kiu la am-premo (aŭ voltaĵo) en ĉi-lasta akumulatoro venkis la am-premon en tiuj aliaj. Anstataŭ daŭrigi la malŝargiĝon tra la elektra kurento, kiu varmigis la globegon, ĝi deŝargiĝis tra la akumulatoroj de la antenoj, plifortigante tiel la elfluon de l' amo tra tiuj antenoj, kie ĝi luktis kontraŭ malpli granda rezisto. Kiam ĉi tio okazis, la globego, kies fajriĝo estis jam malkreskinta kvazaŭ estingiĝanta karbo, tute mallumiĝis.

— Elfluo, elfluo! — kriis la saĝulo, alkurante por ĉesigi ĝin. — Tuj ĝi estos riparita, mi respondas pri

tio. — Kaj kun neordinara eksciteco, brulantaj okuloj kaj vibranta voĉo, ĉar ankaŭ li ne esceptiĝis el la potenca influo de l' amo, kiu triumfis super iu, kiu en sia fiero estis aroginta enkatenigi kaj prostitui ĝin, li daŭrigis:

— Ne dubu, mi ĵuras al vi je la amata memoro pri mia patrino, ke vi ĉeestos la miraklojn de l' Amo Ĉiopova.

\*

Jam ne ondumis la aero milde per karesoj de dolĉa flirtado, sed, rompinte sian karceron kaj disvastiĝante ĉien senbare, la amo invadis ĉiujn korojn, skuante ilin per potenca vibrado.

Kaj ĝia influo iluminis per animataj ridetoj la malvarmajn mienojn de la plenblovitaj akademianoj, sensulkigis la fruntojn de la solen-aspektaj monarkoj, donis vivecon kaj mildecon al la malmolaj vizaĝoj de la multimilionuloj kaj lumis en la okuloj de la sinjorinoj, levante en ĉiuj superĝuantoj ne la am-sensacion, — la sola kiun ili ĝis tiam konis —, sed la am-senton; ne la seks-amon, sed la anim-amon. La paria amo, farante ilin sklavoj, skuis ilin per fortega inklino al plej noblaj afekcioj. La fajro destinita por bruligi la globegon ardis en la koroj.

— Jes, jes, — laŭtvoĉe kriis la inventisto ekster si. — Estas la amo ĉiopova, la amo eterna, la tirano de l' mondo, la reĝo de l' universo, la forto nekontraŭ-



starebla, kiu teren rulas ĉiun remparon kaj detruas ĉiun malhelpaĵon: amo, ĝermo de l' homo, lulilo kie lin lulas patrinaj karesoj, ŝildo kiun havigas al li la sendormeco de l' patro, vivovarmo kiu flamigas la geamantojn, altaro kie komunias la geedzoj, bastono de l' maljunularo, kiu apogas sin sur la gefiloj.

En ĉi tiu momento Marcial antaŭeniĝis ĝis antaŭ la prezidanto, kaj trovante vortojn, kiuj en unu sento batigis ĉiujn korojn, ii kriis:

— Plejalta Afervidanto, en la nomo de la plej sankta el ĉiuj amoj, en la nomo de l' gepatra amo, mi petas la parolon.

Ne havis tempon la Afervidanto doni sian permeson, ĉar kiam li estis ĝin dononta, el ĉiuj lokoj de l' salonego levigis la volkoj de tiuj kiuj, aŭdante lin alvoki la gepatran amon, ekkriis:

— Li parolu, li parolu!

— Gefratoj, — diris Rucandio, — niaj gefiloj vi ras sen nia prizorgado en la edukejoj. En niaj hejmoj mankas la varmo de iliaj karesoj.

— Jes jes, li estas prava; estas vere, — respondis la amaso.

— Lasu min daŭrigi. La amo estas sankta. Fie entiri ĝin en industriajn aplikojn, estas malinda sakrilegio.

— Jes, jes.

— En la nomo de l' amo, kiu en ĉi tiu momento plenigas per noblaj sentoj viajn animojn, mi denuncas al vi la krimon, pri kiu estas kulpa via socio per tio, ke ĝi tenadas en subterejoj milionojn da kreitoj, en

kies animoj naskiĝis tiu bela amo, kiujn viaj koroj  
ĝuas hodiaŭ la unuan fojon.

— Malfeliĉuloj, malfeliĉuloj! — fiore kriis la  
amaso.

— Do, sekve de tio mi proponas la tujan voĉdon-  
adon de la sekvanta leĝo:

„Unue. Edukejoj estas ĉesigataj. Patroj kaj patr-  
inoj povas elpreni el ili siajn infanojn.

Due. Oni malpermesas la destinon de l' amo al  
aliaj aplikoj ol al ĝiaj naturaj noblaj celoj, kaj oni de-  
klaras sakrilegia ĉiun eksperimentadon per ĝi.

Trie. Kiel al gefratoj de la superpensantoj, oni  
donas al la parioj ĉiujn rajtojn kaj profitojn ĝuatajn  
de tiuj, kaj de hodiaŭ estas forigita ĉia sklaveco en la  
mondo.“

Ne okazis voĉdono, ĉar ne nur la reprezentantoj de  
la nacioj, sed la tribunanoj amase aprobis per unu-  
anima akklamo ĉiun el la tri proponoj, tuj kiam ili estis  
legitaj de Marcial.

Apenaŭ kiam oni estis ilin aprobintaj, oni aŭdis  
voĉon kiu kriis: „Al la edukejo por liberigi viajn ge-  
filojn!“

Estis la voĉo de Cartoya; pensante ke de la flanko  
koncernanta la leĝon pri la infanoj oni povus esperi  
la plej profundajn kaj plej daŭrajn efikojn, li volis pro-  
fiti la ekscititan sentemecon de la superpensantoj por  
ke, kiam pasus ilia artefarita eksciteco, iliaj koroj estu  
jam ligitaj de la afekcioj vekitaj en ili per la regajnitaj  
infanoj.

\*

Patroj kaj patrinoj, kun Marcial kaploke, kuris al la edukejo, kaj alveninte tie ili perforte prenis la registrolibrojn (sekretajn, kiel oni jam diris), por konstati en ili la nomojn kaj numerojn, per kiuj en la instituto estis signitaj la infanoj, kiujn ĉiu ajn serĉis.

Kvar horojn poste tie restis eĉ ne unu kreitaĵo.

Kiuj ne havis gefilojn serĉotajn en la edukejo, sekvis Juan'on, teren ĵetis la pordojn de la katakomboj, tranĉis la kurentojn ordinare preparitajn por elektre bati tiujn, kiuj intencis forkuri el sia subtera malliberejo. Antaŭ kiam la suno de tiu tago subiris, ĝi vidis la envolvantojn kaj avenuojn de Mondopolo svarmantaj de parioj, promenantaj sur ili en bela frateco kun la superĝuantoj.

Kiam, freneza pro ĝojego, Marcial eliris el la edukejo kun sia filo inter la brakoj, li troviĝis subite vidalvide kun Clara Snow, kiu kondukis knabineton ĉe la mano; ekvidante lin ŝi ekkriis kun granda ĝojo:

— Marcial, Marcial!

— Clara!

— Ĉi tiu infano?

— Estas la nia.

— Lasu min kisi ĝin.

— Kisu!

— Marcial, mi adoras ĝin, kaj vin mi adoras pli ol iam. Venu ambaŭ, venu, ni estos feliĉaj!

Ne rapidante akcepti la inviton Marcial demandis:

— Kaj ĉi tiu knabineto?

— Si estas la sola, kiun mi povis forporti, ĉar ŝia patro mortis. La patroj de miaj aliaj infanoj antaŭvenis min, kiel vi, forportante la siajn.

— Do, neniu povos fordiskuti ŝin de vi . . . kaj ŝi sufiĉos por plenigi vian koron. La mia estas tiel plena per amo al ĉi tiu infano, ke en ĝi ne estas eĉ anguleto por iu ajn alia amo. Ĉiu el ni forportu sian infanon.

— Sed tiu estas ankaŭ la mia!

— Tial vi povos viziti ĝin ĉiam, kiam tio plaĉos al vi. Sed min ne; mi timus renkonti la patrojn de viaj aliaj infanoj.

Dirinte tion li eniris kun sia filo en sian aŭtomobilon kaj malproksimiĝis, lasante Clara'n en afliktego, ĉar en ŝia koro, pli granda ol tiu de Marcial, restis ankoraŭ loko por multego da amoj.

\*

Kiam Marcial alvenis en la Universalmuzeo, kun sia filo sur la brakoj, lin atendis en liaj ĉambroj Inés, Juan, Cartoya kaj Pinín. La unua kion li faris post sia alveno, estis starigi la infanon sur la plankon, tiri al si Pinín'on (treege surprizitan, ĉar li vidis sian amikon kun alia infano), kaj diri:

— Pinín, jen mi kondukas al vi ĉi tiun infanon, kiu estis sola kaj ne havis patron.

— Malfeliĉuleto!

— Ĉu vi volas esti lia frateto?

— Jes; bone.

— Kaj ĉu vi amos lin multe?

— Jes, kiel Maŭison.

Tuj, turnante sin al sia filo, Marcial diris:

— Kaj vi, filo mia, amu Pinín'on multe, multe!  
Ĉirkaŭprenu lin, ĉirkaŭprenu lin! Estas li kiu portis  
vin al la brakoj de via patro.

La infano estis iom mirigita; vidante tion Pinín  
iniciatis la ĉirkaŭprenadon, kiu estis triobla, ĉar vid-  
ante unu inter la brakoj de l' alia, Marcial premis la  
du infanojn inter la siajn. Kiam li ree malfermis ilin,  
diris Pinín, tirante la manon de la ĵus-veninto:

— Venu, fateto, venu! Ni ilu ludi. Mi avas pajason  
te belan, kiu movas la bakojn kaj malfemas la okulojn.  
Venu, amiko, venu!

Tiam venis la vico esti ĉirkaŭprenataj al la aliaj  
amikoj de Marcial. La etuloj jam estis amikoj kaj  
ludis kaj babilis en angulo, dum la aliaj rigardis ilin  
kun la palpebroj malsekaj de ĝojo.

---

Kiam alvenis aŭ, pli ĝuste, jam estis pasinta la horo  
por enlitiĝo, Cartoya diris ke li forportos Pinín'on,  
ĉar Marcial jam havas sian filon. Sed lia amiko res-  
pondis al li:

— Ne, Ramón, mi bezonas ke vi dediĉu al mi ĉi-  
tiun nokton; anstataŭ ke Pinín dormos kun mi, kiel en  
la lastaj tagoj, en mia lito kune dormos niaj filoj, kaj  
dum ili dormos, ni interparolos.

— Laŭ via plaĉo.

\*

Duonhoron poste la infanoj dormis kune en la lito de Marcial. Iliaj patroj, emociitaj ĝis la punkto ke nek unu nek alia povis eldiri unu vorton, sin refreŝigis en sia trankvila revado.

Kiam Marcial sukcesis regi sian emocion, li diris:

— Ramón, la unuan nokton, kiam dormis ĉi tie via filo, iu, mi ne scias kiu, sed mi kredas ke iu promesis al mi redonon de mia filo, kiun mi mem estis forlasinta. Ĉi tiu promeso plenumiĝis. Ĉu vi scias, kiu estis tiu iu, kiun mi antaŭsentas kaj serĉas, sed ne trafas renkonti?

— Vi eraras, Marcial. Kvankam via inteligenteco ankoraŭ ne vidas lin, via koro lin jam renkontis. Estas la sama, kiu en la tago, kiam vi vidis mian filon dormanta kaj ploris pro la via forlasita, diris al vi, ke li garde atentos lin, kiel li gardis la mian. Rigardu ilin kune! Ili ambaŭ estas protektataj, pli ol de vi aŭ de mi, de la ĉiopova patro de ĉio kreita.

— Ramón, mi deziras scii, mi volas scii tion, kion vi petis de Hobbson, ke li instruu al vi, kiam vi fariĝis pario. Mi deziras koni tiun forton, kiu vin kristanojn faras pli fortaj ol la doloro, mi deziras fariĝi kiel vi aliaj.

— Venu, venu! Nun vi jam povas kompreni min, ĉar vi amas. Nun vi jam komprenos min. Venu!

FINO

## NOTOJ DE L' AŬTORO.

1. — **Paĝo 10.** — Tiun ĉi informon ni donas laŭ la kronologio, kiun uzas Cesare Cantù en sia konata „Historio Universalala“.

2. — **Paĝo 11.** — Jam mi diris en pli fruaj verkoj de ĉi tiu Biblioteko, ke, kiam estas rakontataj okazoj ne pasintaj, sed venontaj, necese estas ke la gramatikistoj havu iom da indulgemo juĝante mian manieron uzi la verbotempojn; la konstanta apliko de futuroj (os-formoj) kaj kondicionaloj (us-formoj) krom tio, ke ĝi prezentus pezan unutonecon, forprenas intereson de la realeco en la rakontado.

3. — **Paĝo 16.** — La neĝo de la montoj fandiĝas printempe kaj somere je kostoj de l' varmo, kiun ĝi, en la kvanto necesa por likviĝi, elprenas el la tero, sur kiu ĝi kuŝas, kaj el la ĉirkaŭa aero. Ĉe vaporiĝo akvo en poto ankaŭ absorbas, por vaporiĝi, la varmon de l' fajrujo; la akvo vaporiĝanta sur la surfacoj de maroj, riveroj kaj lagoj, sen apliko de fajro, rabas la varmon nepre bezonatan por la statoŝanĝo el la aero, troviĝanta sur tiuj surfacoj. Tiuj statoŝanĝoj (solida al likva, likva al gasa) produktas malvarmon ĉirkaŭ si; se la medio estas varma, ili ĝin freŝigas; se ĝi estas malvarma, ili ĝin plimalvarmigas.

Se oni malpligrandigas la premon, sub kiu troviĝas ia likvaĵo, oni atingas ĝian boladon aŭ vaporiĝon je pli malalta temperaturo, ol respondas al tiu statoŝanĝo ĉe normala premo de l' atmosfero marnivela — sciate estas ke la akvo bolas jam sub 100 gradoj en la montaroj; des pli malalta estas la temperaturo, ju pli granda estas la alteco de la montoj —; kaj konsekvence, ĉar la varmo, kiun por ŝanĝo de l' stato absorbas la likvaĵo, malaltigas la temperaturon, kiu estas jam pli malalta ol la normala sub normalaj kondiĉoj, la produktita malvarmiĝo estas eĉ pli granda.

La spontanea vaporiĝo sen bolado, favorata ankaŭ de la malpliigo de premo, povas esti akcelata, sen neceso de tiu malpliigo, se oni blovas sur la likvaĵon vaporiĝantan. Vulgaran pruvon prezentas por tio ŝvitanta persono, kiu sin ventumas kaj tial sentas malvarmeton aŭ malvarmon, produktitan de la varmo, kiun perdas ĝia haŭto; je kostoj de l' varmo vaporiĝas la ŝvito.

Jen estas tri manieroj por produkti malvarmon: sed ekzistas aliaj:

Miksante neĝon aŭ glacien ĉe nul gradoj kun salo (aŭ amoniako), kuiristoj kaj sukeraĵistoj scias produkti temperaturon malsuperan je nul por glaciigaj dolĉtrinkaĵoj; sed kion ili ne scias, se ne diras ĝin al ili fizikistoj aŭ kemistoj estas, ke la atingita temperaturo estas proksimume 18° sub nul. La klarigo de ĉi tiu fenomeno estas jena: Sammaniere, kiel la malpliigo de premo produktas en la korpoj adaptecon por ŝanĝi ilian staton je temperaturo tiom pli malalta kiom pli mal-kreskas la premoj, kiujn ili devas suferi, same produktas egalan rezulton difinitaj miksoj, ekz. de neĝo kun salo. Vidu kial: La natura stato, je nul gradoj, de l' akvo en kiu troviĝas salo dissolvita, ne estas la solida, sed la likva, ĉar estas sciate ke la marakvo rezistas sen glaciigo temperaturajn malsuperajn al la glaciigo de la ordnara akvo. Se oni kun-

metas neĝon kaj salon, la dua konvinkas la unuan, ke ĝi likviĝu, por ke ambaŭ restu en la kondiĉoj por ili naturaj je difinita temperaturo, aŭ, por tiel diri, kiuj al ili estas la plej agrablaj. Kiam la neĝo estas konvinkita, ĝi prenas la varmon necesan por likviĝo, eltirante ĝin el ĉio ĉirkaŭa, kaj ĝi mem perdas ĝin ĉe la malaltigiĝo de la temperaturo, kaj samtempe malaltigas la temperaturo de la ĉirkaŭaj aero, vazo kaj materialo en kontakto kun la neĝo. De tio devenas komenco de temperaturo malaltigiĝo.

Kiam la neĝo estas likviĝinta, dissolviĝas la salo en ĝin, kaj ĉar la dissolviĝo estas kemia fenomeno, kiu ankaŭ konsumas varmon, la miksaĵo prenas la bezonatan varmon, por transformiĝi en salan solvaĵon, de la salo, de l' akvo, de la vazo ktp. Se oni sumas tiujn du sinsekvajn kaŭzojn de la malvarmiĝo, ili malaltigas la temperaturon ĝis 17 kaj iom da gradoj sub nul, pri kiuj antaŭe oni parolis.

Vero estas, ke por fari glaciaĵojn ne necesas tiom scii; tial mi ne deĉiĉas ĉi tiun noton al la glaciaĵistoj.

Sed 18° sub nul ne estas gravaĵo. Ni iru pluan paŝon!

Kiel la pli malpli videbla apliko de varmo kaj la malpliigo de premo produktas fandiĝon de solidaĵoj kaj vaporigon de likvaĵoj, tiel la inversaj metodoj — malvarmigo, premo aŭ ambaŭ kune — estigas likviĝon de gasoj aŭ solidiĝon de likvaĵoj. Uzante tiujn procedojn, oni produktas industrie amoniakon kaj karbonacidon likvajn por la ĉefa ĉelo, utiligi poste en la malvarmigaj industrioj la intensan malvarmon produktitan de ilia retransformado al la gasa stato.

Se oni ekzemple malŝtopas botelojn kun likva karbonacido, la alta premo ekzistanta en la interno de la botelo elirigas tra ĝia buŝo kun granda puŝpotenco likvan ŝprucon. Ĉe la kontakto kun la atmosfero kaj pro la kombinita efiko de la pli alta temperaturo kaj ĝia pli malalta premo kompare kun tiuj, ekzistantaj en la botelinterno, ĝi tuj vaporigas. Ĉe tio fariĝas fenomeno surpriza por la ne-icitoj: ŝpruco, en kiu troviĝas la tri statoj de la naturo, nome la likva en la botela buŝo, la gasa ekstere kaj la solida sub la botelbuŝo, en la interno de la botelo; ĉar la malvarmiĝo produktita de la vaporigo estas tiom intensa kaj rabas tiom grandan kvanton da varmo de la interna karbonacido, ke ĝi malsuprenigas ties temperaturon ĝis solidiĝo, kaj post kelkaj momentoj restas en la botelo nur malmulte da ia blanka pulvoro nomata neĝo de karbonacido. Neĝo el la sama gaso, kiun ni spirante eligas tra la buŝo. La atingita temperaturo estas 80° sub nul, kio ja estas iom pli ol la temperaturo en la karafo por glaciaĵoj.

Sed la granda faro de la lastaj tempoj estas la likvigo de la aero, de l' hidrogeno kaj eĉ de l' heliumo, kiu estas la plej ribelema el ĉiuj gasoj por transiri en likvan staton.

Por bone ekkompreni la intiman kaŭzon agantan ĉe la havigo de tiuj sukcesoj, konvenas doni kelkajn fizikajn antaŭklarigojn.

Lau la kinematika teorio (t. e. teorio de l' movo) pri la gasoj, ili estas korpoj, kies molekuloj troviĝas je grandega interdistanco unuj de aliaj kaj estas en senĉesa rapidega moviĝado, per kies efiko la rapideco ebligas ilin malsubiĝi, en certa maniero kaj ĝis certaj limoj, al la reciproka altiro, kiun ĉiu el ili efikas je ĉiuj aliaj kaj ĉi tiuj je ĝi. Sed se oni kunpremas la gason, — per kio ĝi okupas malpli da spaco, — ĝiaj molekuloj pli alproksimiĝas unu al alia; pliiĝas kun la pli granda proksimeco la intenseco de iliaj reciprokaj altiroj, kaj ili tial pli rezistas kontraŭ disiĝo ol antaŭe.

Sciante tion, ni malplifortigu nun la premon, sub kiu troviĝas ĉi tiu gaso; tio efikas ĝian ekspansion kiu, por efektiviĝi, devas venki la altirajn fortojn de la molekuloj, kaj tiom pli, kiom pli granda estas la ekspansio, kiu kreskas kun la malpliigo de la premo.

Sed venki unu aŭ multajn fortojn supozigas laboron, kiu postulas konsumon de energio, kio egalvaloras al konsumo de varmo; t. e. la malproksimiĝo de la molekuloj efektiviĝas nur per konsumoj de varmo



eltirita el la vazo kaj, antaŭ ĉio, el la ekspansiiginta gaso mem. Sekve produktiĝas en ĝi temperaturaj malaltiĝoj kiuj povas fariĝi grandegaj.

Tiamaniere oni kreas, hejpe de sinsekvaj ekspansioj, malmalvarmigadon de la gasoj.

Aero kunpremita per pumppremilo malvarmiĝas per iu ajn malvarmiga procedo, ekz. la vaporigo de likva amoniako aŭ de karbonacido. Farinte tion, oni lasas al la kunpremita aero ekspansi-liberecon, malfermante la ujon ĝin entenantan interne de alia ujo, kiu ĉirkaŭas ĝin. Per tio produktiĝas malvarmiĝo kiu, ekzemple en la Linde-aparatoj, kie la premo malpliĝas pro efiko de la maldensigo de 200 ĝis 20 atmosferoj, atingas komence malpliĝon de 50° laŭ Celsius.

La ujo, kie ankoraŭ restas kunpremita aero aŭ kien oni daŭre ĝin injektas, estas malvarmigata per la efiko de la cilita temperatura malpliĝo; tial malvarmiĝas en ĝi la aero ankoraŭ ne maldensigita, kaj pro la nova nun akirita temperatur-malpliĝo, multe sub tiu, kiun ĝi havis komence de la procedo, produktiĝas sekve nova malvarmiĝo, kiun ni povus nomi dua ekspansio.

Tria, kvara efektiviĝas, ĉiu pli malalta je temperaturo ol la antaŭa, kaj pro tia akumuliĝo de la efektoj kombinitaj el sinsekvaj malvarmiĝoj kaj ekspansioj, ekklikiĝas la aero. Tio okazas, kiam la temperaturo falas ĝis 191 subnulaĵ gradoj. Kaj ĝi ne nur likviĝas; se bezone, oni eĉ povas atingi ĝian solidiĝon. En tiu stato ĝi alprenas la aspekton de densa gelateno.

Ankaŭ hidrogeno kaj heliumo estas jam likvigitaj, la unua ĉe 250° sub nul, la dua ĉe 270, t. e. tri gradoj, ne pli, antaŭ ol atingi la nulon absolutan — 273° laŭ Celsius sub la nulo ordinara —, kio signifas la kompletan mankon de varmo.

La likva aero, jam fabrikata de la industrio kaj prezentanta komerc-artiklon, estas nuntempe en la malvarmigaj industrioj la elstara agantaĵo por la nutraĵkonservado, multe uzata sur la ŝipoj. En la kirurgio oni uzas ĝin kiel anesteziilon.

Ĝia koloro estas blueta, kiel la oksigeno, kiun oni ekhavas likva ĉi ĝi, vaporigante ankaŭ la nitrogenon.

En kombino kun oleo kaj karbo ĝi formas eksplozilon: la oksiliton, kies potenco estas duoble tiel granda kiel tiu de la nitroglicerino, sed kies danĝerojn ĝi ne prezentas.

En la tago, kiam ĝi produktiĝas malpli altkoste, ĝi estos en la industrio konkurencaĵo de vaporo kaj elektro.

4. — Paĝo 19. — Sen dubo, ĉi tiu opinio estis subtenita en la sekvanta alineo, kiun ni kopias aŭ, pli ĝuste, tradukas el angla aŭtoro:

... ĝi havas la avantaĝon antaŭ aliaj malvarmigaj agantaĵoj, ke, dum la malrapida frostigo detruas agas ĉe la organaj ĉelajoj al ĝi submetitaj, la momenta ago de l' likva aero lasas nedifektaj la nomitajn ĉelajn, kio evidentiĝas ĉe denova degelo."

Aliaflanke, konataj estas al ĉiuj kirurgiistoj la potencaj anesteziaj efikoj de likva aero.

5. — Paĝo 20. — La partianoj de ĉi riu dua hipotezo konkludis ke, se la malvarmo estis la sola kaŭzo de la viscera kristaliĝo, ĉi tiu estus ĉesinta tuj kiam la paro estis eligita el la glaciega temperaturo, kiun ĉirkaŭ ĝi kaŭzis la vaporigo de la likva aero, igante la temperaturon malaltiĝi ĝis 211 subnulaĵ gradoj. Kaj ĉar en la sama stato la paro restis ĉe tridek-kelkaj gradoj super nul de la Biŝnaa somero, estis evidente, ke la malvarmiĝo estis ne kaŭzo sola, sed kunaganta kun la tertario; direktoro kaj ingenierino ŝutuis al ta lasta kaŭzo, ke la unua ne mortigis ilin.

6. — Paĝo 25. — La likva aero igas rompebla ĉiun korpon, kiu enhavas akvon, kaj ĉar la homa korpo ĝin enhavas, ne estas miriga la

krurrompiĝo de García. La samo okazas al fero: post enmeto en likvan aeron oni povas ĝin polvigi per la mano. Kontraŭe, kupro kaj bronzo fariĝas flekseblaj per tia traktado.

7. — **Paĝo 27.** — Frazo de Juan García kiu, kiel homo de l' 20-a jarcento, nomas 'homoj de morgaŭ' la centjarcentanojn. Revekiĝinte poste en la 100-a jarcento, li uzas 'heredis', en la pasinta tempo, por montri ke ili jam ekposedis la heredaĵon.

8. — **Paĝo 34.** — **Energio estas la kapablo produkti laboron.** Unu el la manieroj mezuri la laboron, vulgare la plej konata, ĉar ĝi rilatas la mekanikan laboron, estas kombini pezon kun la alteco, al kiu ĝi povas esti levata. Tiel, kilogrammetro estas la laboro farita, kiam oni levis kilogramon ĝis alteco de unu metro. Vaporĉevalpovo (ĉevalpovo vapora) egala al 75 kilogrammetroj, estas la laboro efektivigita de forto levinta kilogramon ĝis unu metro en unu sekundo aŭ unu kilogramon ĝis 75 metroj.

Sed oni scias, ke ĉe levado de grandaj pezoj per ŝnuroj la ŝnuroj varmigiĝas; se oni pistas malvarman feron, ĝin varmigas la forto, kiu ne povas ĝin malplidikiĝi nek malrektigi; se oni kurbigas per la mano rezisteman draton, ĝia temperaturo plialtiĝas; se oni frota la manojn, la tiucele uzita forto varmigas ilin, kaj la varmo estigata de funkciaj maŝinoj povas atingi la staton, en kiu povas okazi kaj ofte okazas brul-egoj.

En ĉiuj ĉi kazoj la mekanika laboro, farita de iu nombro (x) da kilogrammetroj, transformiĝas parte aŭ tute, laŭ la kazo, en varmon aŭ, alivorte, en **varmigan laboron.**

Inverse, la sunvarmo, diferencaspekta energio kompare kun la mekanika forto, vaporigas ĉiutage grandegajn kvantojn da akvo en maroj, lagoj, riveroj. Post la gut-post-guta vaporigo ĝi levas ilin ĝis la nuboj. Sumite, ĉi tiuj gutoj en la tutmondo kaj en unu tago faras nekalkuleblan nombron da toneloj da akvo. La rezulto el ilia leviĝo al la altaĵoj, en kiuj ili ŝvebas, reprezentas mekanikan laboron efektivigitan de la sunvarmo, kiu egalvaloras al giganta nombro da kilogrammetroj aŭ vaporĉevalpovoj. Kvankam ĝia forto estas nekonata, ĝi tamen ne estas malpli reala kaj efektiva: jen varmo transformita en mekanikan forton. Sammaniere, la karbo en la kaldronego de lokomotivo aŭ de oceanŝipo, kaj la benzino de aŭtomobilo aŭ de aviadilo produktas varmon, kiu transformiĝas en la videblajn fortojn, kiuj efektivas la tiron aŭ puŝon de tiuj artefaritaj lokomoviloj. Estas notinde, ke tiu varmo, naskita el la bruligo, estas produkto de kemia forto: la kombino de l' oksigeno de la aero kun la karbono de la karbo, kiu siaflanke ne estas definitiva, sed kemia parenceco, rezultanta el elektraj sin-altiroj.

Laboro mekanika kaj laboro varmiga estas ekvivalentaĵoj laŭ la transformebleco de unu al alia: la unua estas mezurata laŭ kilogrammetroj, la dua estas esprimita per kalorioj. Ĉiu kalorio estas la varmiglaboro uzata por levi je unu grado la temperaturo de unu litro da akvo.

Konataj fizikaj eksperimentoj montris, ke ĉe transformo de kalorioj en mekanikan laboron el ĉiu kalorio oni ricevas la ekvivalenton de 425 kilogrammetroj. Ĉi tiu nombro, nomata **mekanika ekvivalento de l' varmo**, vidiĝas la grandegan amason da laboro enfermita en la varmiga energio. Pri ĝi oni povas formi al si eĉ pli frapantan impreson sciante, ke unu kilogramo da minerala karbo ardante produktas energion, kiu, se ĝi povus transformiĝi sen ia perdo en mekanikan laboron, egalvalorus la laborkvanton realigitan en unu horo de nombro da vaporĉevalpovoj varianta inter 10—12, laŭ la kvalito kaj natureco de la uzata karbo; aŭ se oni parolas en pli vulgaraĵ esprimoj: ĝi sufiĉus por levi vertikalen 2500—3000 kilogramojn ĝis alteco de 100 metroj. Unu tonelo da bruligita karbo donas do energion por levi ĝis la sama 100 metroj 2500—3000 tonelojn da pezo.

Per unu kilogramo da petrolo, pli energihava ol la karbo, povas produkti tiom da forto ke, kun la antaŭa escepto, ĝi estas kapabla levi 4000 kilogramojn ĝis alteco de 1000 metroj. Sed ĉi ĉio okazas ĉiam nur sub la supozo de transformiĝo kompleta kaj sen perdo de varmiĝo-energio en energion mekanikan; ideala transformiĝo neniel atingebla, malfeliĉe, de la homaro. Ĉar ekzemple en la vapormaŝino oni kreas maksimume forton ekvivalentan al dekono de tiu forto, kiun enhavas la karbo.

Vapormaŝino aŭ eksplodmotoro produktas, movigante dinamon, alian transformon: ĝi naskas **energion elektran** t. e. varmon, kiu fariĝas rotacia movado kaj poste elektro.

Sed ĉi tiu naskiĝas ankaŭ rekte el la varmo de pila termo-elektra per tio, ke oni varmigas, ekzemple, per alkohola flamo la lutajon de du metaloj.

La mekanika forto de akvofalo (finfine, sunvarmo likviziginta la neĝon, kiu de la montoj malsuprenjetiĝas per akvofalo) transformiĝas same en elektron.

Varmo kaj sunlumo produktas en la enterigitaj semoj kaj en la spirantaj plantfolioj kemiajn reagojn: jen **varmo kaj lumo transformiĝas en kemiajn fortojn**.

Ĝiaspecaj reagoj en la elektra pila naskas elektron, kaj inverse, per elektro estas kaŝataj kombinoj kaj malkombinoj de diversaj korpoj. Kaj en la elektra forno fabrikiĝas la artefarita diamanto kaj helpe de disradiado **pariĝas la kupro en litron kaj sodlon**.

Elekto tiel estigita per iu procedo transformiĝas en varmon en elektra forno, en lumon en elektra lampo, en mekanikan forton en tramvojo, vagonaro, aŭtomobilo, en kompostmaŝino, pumpilo ktp. ktp.; en kemiajn forton en voltmetro kaj en orumado kaj arĝentumado de objektoj en la galvanoplastiko; ĝi ĉizas sur la kupra aŭ zinka plako la matricon de la fotografavuroj; ĝi estas elektromagneta ondo en la sendadna telegrafio, sono en telefono kaj fonografo kaj kreas mirindajn elradiaĵojn, nomatajn katodaj radioj kaj radioj X.

La lum-energio fariĝas kemia energio sur la fotografa plako, kaj energio elektra en la **piloj fotoelektraj**, ankoraŭ en eksperimenta stato, sed pozitivaj, prezentitaj al la New York Electrical Society, en kiuj paroj da plakoj el oksidita kupro, aŭ unu kupra kaj alia arĝenta, trempitaj en salakvon, produktas elektron, kiu ŝanĝas la sunlumon en elektron je la kontakto de tiu lumo kun la kupro; ĝi fariĝas sono en la telefono eligante tonon, aŭ igas lumi inkandeskajn lampojn. Per tio ni havas la ŝanĝon de natura lumo en lumon elektran.

La sono ŝanĝiĝas en elektron kaj ree en sonon en la telefono; en mekanikan forton kiu gravuras en la gramofondiskojn la voĉon aŭ la muzikon, kaj en la **parlografo**, moderna aparato, pri kiu ĉi tie estu farata nur apuda mencio.

La elektro fariĝas sono en la volt-arko kaj en la kantantaj lampoj de De Forest: **odonoj**. La kemia energio kaj la lumo produktas lumon en la korpoj fosforeskantaj.

Tiel, ĉia energio, kiujn ajn originojn ĝi havas, povas transformiĝi en alian klason de energio ekstere diferenca, kaj povas esti transportata de unu loko al alia. Por tio precipe taŭgas la elektra energio.

Tio estas la metamorfozoj de la energio kiuj, aperantaj jen en tiu, jen en alia aspekto, por laŭvole reveni en sian primitivan aperformon, pravas, ke la energio estas unu, kaj ke povoj varmiga, mekanika, lumiga, kemia ktp. estas nur aperformoj de unusola energio, kies esenco ni ne scias, kiel ni ne scias la esencon de ĉiuj aferoj.

Se vi bezonas pluajn pruvojn, ke ĉiuj energioj estas transformeblaj, ni venu al tiu, kiu ŝajne troviĝas plejmulte ekster la sfero de niaj manipuladoj: la gravitado de l' universo aŭ altirforto inter la astroj, kaj la energio de l' fiziologia organismo, kiu troviĝas en ni mem.

Pro eliko de realigitaj altiroj de suno kaj lumo leviĝas la maroj ĉe la tajdoj. Enirinte, pro la nivelleviĝo responda al la tajdo, en turbinon

starigitan en haveno, aŭ movante iun alian aparaton, la marakvo povas produkti mekanikan forton taŭgan por esti transformata en elektron.

Se mi uzas ĉi tiun elektran forton por lumigi lampojn, la gravitado naskis lumon; se mi sendas ĝin al voltmetro, la gravitado, ŝanĝita en kemian forton, malkombinas akvon aŭ metos kupron, arĝenton, oron sur la korpon, kiun oni volas metalizadi; per ĝi mi povas hejti elektran fornon ktp. ktp.

Niaj organoj laboras kaj produktas fortojn, ĉar la nutraĵoj havigas al ili elementojn, kiuj helpe de kemiaj reagoj nutras la muskolojn kiuj, ekfunkciinte, produktas forton mekanikan, kies varmkrea ekvalento estas mezurata laŭ fiziologiaj kalorimetroj. La muskoloj, kiuj portas grandan pezon, uzante por tio konsiderindan fortostreĉon, vibras per sonanta vibrado; por aŭdi ĝin oni bezonas apliki je ili nur adekvatajn ricevilojn por sonoj. Se mi uzas mian brakoforton por movi la manturnilon de iu laboratoria dinamo, mi transformas la energion de mia brako en elektron, kaj ĉi tiun poste laŭ mia plaĉo en iun alian el la indikitaj energioj.

Kiel patrino de la energio, ne en la universo kie verŝajne tiun rolon ludas la gravitado, sed ja en nia mondo (kaj ne kiel solan), oni povas deklari la sun-energion, da kiu ni kapablas eluzi apenaŭ infinitiziman parton, ĉar ĉiu kvadrata metro ricevas ĉe tagmezo en unu horo energion ekvivalentan al tiu de du vaporĉevalpovo.

9. — Paĝo 36. — Modeloj de tia aparato ekzistas de Tesia, Torres Quevedo kaj Branly, por movigi kaj direkii el distanco la marŝon le boato, surtera veturilo, aerostato; oni uzas por tio la forton de centra stacio transsenditan al tiuj moviloj per ĝia transformo en elektran ondon, analogan al la impulsado en la senfadena telegrafio. — Ĉar la notoj de ĉi tiu apenaŭ komencita libro fariĝas jam multaj kaj eble tro longaj, ni detenas nin doni pli detalan informon pri la telekineo.

10. — Paĝo 39. — La unua ideo de tiuj, kiuj unue okupis sin pri la elektra televidado, estis utiligi metalon, kiun oni volas uzi jam por tro multaj aferoj pro ĝiaj kvazaŭaj sorĉaj ecoj: la selenio, evidente taiga por tiu kazo pro sia impresleco tiel por lamo kiel por elektro. Sed pro aferoj, tro ampleksaj por detaliĝi ilin ĉi tie, oni ŝajne ne povas atingi per ĝi kontentigajn rezultojn; tial naskiĝis el la unuaj provoj, baziĝantaj sur la ideo utiligi tiun metalon, nova genega ideo: kombini ĝin kun la procedoj de la fotogravurado; kaj tio estas kondukonta al definitive fruktodona rezultoj; oni ne repensas jam pri la silenio, almenaŭ se ne multe ŝanĝiĝos la aferoj. El seriozaj studaĵoj, publikigitaj en Anglujo, rezultas ke, por solvi la problemon de televidado helpe de l' nomita metalo kaj por ekhavi bildon aŭ vidaĵon kun dimensioj ne pli grandaj ol 25 cm kvadrataj kaj kun pli malpli granda delikateco dezirata, estas necese etendi inter senda kaj riceva stacioj ne unu aŭ du kondukantajn metalfadenojn, sed nombron variantan inter minimume 15 000 kaj maksimume 150 000; oni devus ligooni pri egala nombro ja sileniaj ĉeletoj kaj pri sama nombro da etaj elektraj lampetoj. Ĉio ĉi estus bezonata por vidi la aferojn ne koloraj, sed nur blankaj-nigraj, kiel en la ordinariaj gravuraĵoj. La kosto de tia instalaĵo por distanco de 150 km estus multaj, multaj milionoj. La entrepreno, kiu por tio ia ne estus la plej malkara, ankaŭ pro aliaj kaŭzoj ne estus realigebla.

Post tiu diro mi aldonu ke, se mi tamen citis la sileniojn, tio ne okazis pro plezuro perdi la tempon, sed pro la honopinia intenco doni la antaŭan klarigon, por ke ne perdu sian tempon multaj aspirantoj-inventantoj (ne saĝuloj, cetere) kiuj, sorĉitaj de la taŭgeco de tiu metalo, nuntempe cerbumadas senutile kaj eĉ formas al si trompajn iluziojn solvi la problemon per maniero, kiu ne povas konduki al bona celo tiujn obstinajn kafejajn inventistojn de aferoj ne solveblaj.

Do, mi ne parolu plu pri silenio, sed pri alia afero. La leganto, kiu

nenion scias pri tiu temo -- la ekspertoj transsaltu la noton! --, prenu ian ilustritan gazeton, kaj per plej granda lento disponebla li ekzamenu pecon de iu gravuraĵo (se ĝi ne estas tre subtila, ĝi estas eĉ pli taŭga por nia celo). Farinte tion li observos, ke en ĝi ne ekzistas linioj kiel en la antikvaj lignaj aŭ kupraj gravuraĵoj, nek difinitaj ombroj, kiel en desegnoj manfaritaj per karbokraĵono aŭ akvarele, sed amaso da punktetoj, kiuj en la tre blankaj lokoj de la bildo aŭ tute mankas aŭ apenaŭ estas rimarkeblaj kaj tre distancaj unu de alia; sed tiuj punktoj estas des pli dikaj, pli malhelaj kaj pli proksimaj unu al alia, ju pli oni ekzamenas partojn duoblankajn, grizajn kaj malhelajn, ĝis oni alvenas ĉe la nigraj zonoj de la desegno, kie ili ŝajnas kuniĝi, aspektante kiel unu nigra amaso.

Ĉar la teorio de la fotografurado plenumas tutan fibron, oni jam supozos, ke mi ne klarigos ĝin ĉi tie; por la intencita celo sufiĉas la maldetala sciigo, ke tiun klason de punktita desegno faras la lumo; oni nur aldonas al la fotograf-aparato kristalan plakon kun subtilegaj interkrucaj strietoj, formantaj kvadratojn, kiujn la lumo trairas nur ĉe la interfaco, ne ĉe la strioj. Ĉi tia parte travidebla folio nomiĝas retajo, kaj oni metas ĝin senpere antaŭ la fotografian plakon, laŭ kiu oni volas fabrikii la klišon. Tiamaniere ne venas al la plako pli da lumo ol tiu traŝita de la tiel nomebla optika kribriilo. Ĉiuj partoj de la desegno aŭ alia fotografata objekto, kiujn kovras la strioj de la kvadrataro, ne estas vidataj sur la klišo, t. e. ili ne impresiĝas.

Tra ĉin el tiuj etaj lumfacoj de la retkvadrataro, la fotografa plako vidas unu punkton de l' originalo. Se en ĉi-lasto estas multe da lumo, ĝi aperos blanka en la preta fotografuraĵo (ni transsaltu, ofere al la koncizeco, la tutan interprocedon de la manipulado); tra aliaj truoj ĝi vidas punktojn malpli lumajn, sed ankoraŭ klarajn; tiuj produktoj en la gravuraĵo malgrandajn punktetojn sufiĉe apartigitajn inter si; kaj laŭ la mezuro, laŭ kiu oni konsideras interfacojn de la reto proksimajn al pli malhelaj zonoj de la desegno, laŭ tiu mezuro ĉiu interfaco produktas sur la folio pli dikajn punktojn kaj pli proksimajn inter si, kiuj manĝas preskaŭ ĉiun aŭ fakte ĉiun blankan fundon de la papero, sur kiu presiĝas la gravuraĵo.

Sciante ke la rubidio estas metalo kiu, ŝargite de negativa elektro, ĝin perdas tre malrapide en la malbela kaj tre rapide, se la lumo ĝin surbrilas; sciante ke alia metalo, la sodio, havas la proprecon esti en vapora kaj ankoraŭ en lumigita stato bonega elektra kondukilo, ni scias iam sufiĉe por intenci ne komplete priskribi, sed ja doni malprofundan kaj popularan ideon pri la genia kaj eleganteza solvo, kiun Mr. Campbell-Swinton, prezidanto de la Societo de Radioj X en Londono, proponis por la problemo de la elektra televido, kun la aplaŭdo de la instruistoj. Ni provu instali lian projektitan aparaton en Hispanujo.

En la telefono, kiun havas amiko, ekzemple en Sevilla, kun kiu mi konversacias de el Madrid, troviĝas, proksime al la parolluneleto, iu lenso uzata kiel objektivo de malgranda kaj „sui generis“ fotografa aparato, muntita en la telefoninstalajo. Anstataŭ la malbrila vitro de la komunaj fotografiloj, ĉi tiu havos en sia fokuso konstante muntitan plakon el la antaŭe citita rubidio; sed la plako ne estas fabrikita el unu sola folio, sed el etaj kuboj tiumetataj, luitaj unu al la alia en maniero, ke ili troviĝu elektre izolitaj inter si de substanco ne elektrokonduka.

Sur la antaŭa faco de tiu plako rubidia aperas la bildo de tiu amiko el Sevilla, projekciata sur ĝin per la fotografa objektivo, en la momento, kiam li starigas sin antaŭ la telefonon; sed same kiel oni metas en la ordinarajn aparatojn por fotografurado inter lenson kaj klišon la supre praparohitan retajo, same troviĝas ĉiam muntita inter objektivo kaj rubidia plako iu metalmaŝaro el tre delikataj fadenoj, kies optika efekto, aparte de la elektra, klarigota poste, estas la sama, kiel la klarigita por ekhavi punktitajn desegnojn.

Sur la polurita surfaco de rubidio vidus mia amiko en Sevilla, se estus entute eble al li rigardi tien internen (kio ne estas ebla), sian portreton konsistantan, dank' al la intermeto de la maŝaro, el senombro da punktoj tiaj, kiaj ekzistas ĉe la menciitaj fotografuraĵoj.

Ĉiu el tiuj punktoj falas sur unu el la kubetoj rubidiaj, inter si izolitaj.

Aldomante ankoraŭ, ke la spaco inter lenso kaj rubidia plako en tiu originala grafia maŝino estas plena ne de aero, sed de sodiovaporo, mi diris la plej esencan pri la optika parto de la telefoto transsendilo. Ni nun aliru la elektran flankon, ĉar ĝis nun ni havas nur portreton en Sevilla; tio estas malgranda atingo, ĉar estas klare, ke mi ne vidas ĝin el ĉi tie kaj, eĉ irante tien, mi ne povus ĝin vidi tial, ke la antaŭa flanko de la plako, kie ĝi estas surdesegnita tiom longe, kiom la kaŭzanto ne foriras, restas en la interno de la ĉiam hermetike fermita aparato, por ke ne elflu la sodia vaporo — oni poste vidos, por kio servos tiu vaporo; — tial, pro la maldiafanece de tiu plako, mi same ne povus ĝin vidi sur ĝia eksteraĵo, kiu ja ne estas malbrila vitro kiel ĉe la ordinaraĵ fotografiloj. Tiu portreto estas do nepenetrebla kaj neatingebla sekreto por homaj rigardoj.

Sed kion ne vidas tiuj, tion vidos fasko da katodaj radioj, aŭ pli ĝuste, ili videbligos ĝin al mi, sen tio ke mi bezonu formovi min el Madrid. Kaj ĉi tie estu permesata al mi mallonga klarigo; ne, ĝi eĉ ne estos klarigo, sed nur mallonga noteto.

La katodaj radioj estas ŝprucoj aŭ uraganoj de elektronoj — t. e. de infinitezime malgrandaj ŝarĝoj de negativa elektro — kiuj kun rapideco de kelkcentmiloj da kilometroj flugas en la interno de la tuboj de Crookes. Tiuj radioj faras tre eksterordinarajn aferojn en la laboratorioj kaj ekster ili; unu el tiuj aferoj, kaj la plej signifaj, por ke nescienculoj konsciu ilian gravecon, estas ke ili naskas la konatajn radiojn X aŭ de Roentgen en la kunpuŝigo de la elektronoj kontraŭ la vitro de la nomitaj tuboj. La katodaj radioj aŭ ĝiaj elektronoj estas do la patroj de la Roentgen-radioj.

Post la fino de la parentezo — ĝi ja ne estis longa, ĉu ne? — mi diru, ke kiel pilongigo de la ĵus priskribita fotografilo estas muntita tubo produktanta katodajn radiojn, kiuj ĵetiĝas sur la dorsflankon de la rubidia plako, sur kies kontraŭa flanko troviĝas la menciita portreto de l' Sevillano. Sed kun la propeco ke, dum tiu portreto kovras la tutan plakon tiom longe, kiom la originalo ne foriras de la aparato, la katodaj radioj ne falas je unu fojo sur ĝiajn malgrandegajn kubojn, kiuj sur la alia flanko surhavas la punktojn desegnantajn tiun bildon, sed ke ili sinsekve tuŝas jen unu, jen alian kaj alian, apartigante sin de la antaŭe tuŝitaj, ĝis ili tuŝis ĉiujn. Tion ili realigas dank' al rapidega movo de la radiofasko; la rapideco rezultas el altiroj kaj repuŝoj farataj je ili de elektro-magnetoj, kiuj efikas la sinsekvadon je mil ŝanĝoj de direkto aŭ celo en sekundo, dank' al kiuj alvenas la elektronoj al ĉiuj plakaj kubetoj multajn fojojn en tiu mallonga tempospaco.

Tiu ĉi efiko estas atingata dank' al la konata propeco de tiuj radioj, nome esti altirataj kaj repuŝataj de la malsamaj polusoj de magneto: tre interesa fenomeno, ĉar per ĝia utiligo oni sukcesis en radiologiejoj mezuri tiujn rapidecojn de centmiloj da kilometroj, je kiuj vojaĝas la elektronoj konsistigantaj la nomitajn radiojn.

Ĉiu el la rubidiaj kuboj, kiu sur sia antaŭa surfaco portas unu el la punktoj, kies tutaj desegnoj sur la plako la vizaĝon de mia amiko, elektrigiĝas negative en la momento, kiam ĝia malantaŭa surfaco estas tuŝata de la katoda ŝpruco; kaj jen venas tio kio estas genia, mi estis dironta mirakla, en la ideo de Campbell-Swinton; ĉar laŭ tio, ĉu tiuj ĉi kuboj korespondas al punktoj nigraj, grizaj aŭ partoj blankaj de l' portreto, okazas en la instrumento de Sevilla kaj en mia aparato de Madrid komplete malsamaj aferoj. Jen kial:

Partoj blankaj signifas rubidiajn kubojn tre lumigitajn per la lenso-

objektivo. Ili pro sia propreco malŝargiĝi rapidege, kiam la dirita metalo estas tre lumigata, cedas senprokraste la negativan elektron, kiun transdonas al ili la elektronoj de la katodaj radioj ĉe la puŝo kontraŭ ili; efekto kiun forprenas de ili la sodio-vaporo, kun kiu ili troviĝas en kontakto je la lumigita faco. Sed tiu vaporo envolvvas la metalan maŝaron, kiu tial estas bona kondukilo kaj, konsekvence, rapide kaj intense elektrigiĝas.

Kiam denove falas la katoda fasko sur lumigitajn kubojn, ili rec elektrigas rapide kaj transigas tiun elektron al la sodio kaj al la maŝaro.

Sed pro la senĉesa oscilado, al kiu devigas la katodan faskon la elektromagnetoj, la fasko pasas de tiuj blankaj kuboj al aliaj, antaŭflanke provizitaj de nigraj punktoj de l' portreto, kiuj kovras komplete la facojn, t. e. kiuj lasas ĉiun mallumaj; tial ili ne malŝargiĝas de la elektro, kiun la radioj havigas al ili. La elektro do ne pasas al la sodia vaporo nek venas al la metalmaŝaro, kiu pro tio ne ŝargiĝas. En la pli malpli grizaj punktoj de la bildo, kovrantaj parte pli grandan aŭ pli malgrandan surfacon de la kuboj, kien ili falas, la malŝargiĝo de la lastaj efektiviĝas kun rapideco des pli malgranda, ju pli granda parto de la kubsurfaco restas malluma; pro tio la maŝaro ricevas ŝarĝojn des pli grandajn, ju pli malgrandaj estas la nigraj punktoj desegnantaj la portretojn sur la rubidian plakon.

Interesa konsekvenco: La elektra ŝarĝo de la maŝaro varias konstante kaŭzo de la alveno de l' elektronoj al la malantaŭa parto de la kuboj, diverse lumigitaj de la optika bildo.

Tio estas ĉiuj fenomenoj okazantaj en Sevilla. Nun ni venu al Madrid, kaj al la ricevaparato de l' telefoto, pri kies transsendo mi donis neprofundan ideon. Anstataŭ la lenso-objektivo de la andaluzia ĉefurbo, mi havas antaŭ mi rondan ekranon el substanco kapabla ekfosoreski je la punktoj, kie ĝi estas tuŝata de katodaj radioj, produktitaj en alia Crookes-tubo analoga al la transsenda; la fosforeskado estas intensa, donanta multan lumon, kiam sur la ekranon falas ĉiuj radioj produktitaj en la tubo de Madrid; ĝi estas de mezforta aŭ malforta intenso, laŭ la mezuro ke la tuŝantaj radioj estas malplimultnombraj; ĝi restas estingita, t. e. nigra, kiam aŭ kie neniu radio ĝin tuŝas. Sur tiu ekranon mi ekvidas la menciitan amikino.

— Vi ja diris, ke estas amiko. — diras leganto.

— Ĉu vere? Bone, sed nun estas amikino, ĉar hieraŭ mi priskribis la transsendilon, kaj hodiaŭ mi priskribas la ricevilon. Do, malaperis la amiko kaj venis amikino; ĉe tio mi eĉ profitas, ĉar ĝi estas beta.

La fosforeska ekranon troviĝas je unu ekstremo de la katoda tubo, pri kiu mi ĵus parolis. Kiam nenio estas vidota, t. e. kiam la amikino ne staras antaŭ la objektivo de la fotografilo de Sevilla, ne alvenas la nomitaj, en Madrid produktitaj, katodaj radioj al la fosforeska ekranon, kiam mi en Madrid observas; sed kiam tiu fraŭlino starigas sin antaŭ la sendilon de Sevilla kaj en ĝi okazas la fenomenoj antaŭe klarigitaj, la katodaj radioj de mia Madrid'a ricevilo moviĝas sammaniere kaj samdirekte rilate al la ekranon, kiel la tial faras rilate al la bildo prolektita sur la rubidia plako, kie formiĝas la portreto de la nomita fraŭlino, ĉar en Madrid ekzistas elektromagnetoj identaj kaj samcirkuitaj kiel tiuj de Sevilla, kaj ambaŭ devojiĝas en la samaj momentoj kaj egalanmaniere la du radiofaskojn de ambaŭ urboj.

Sed tio ankoraŭ ne sufiĉas. De la metala maŝaro en Sevilla eliras unu el la metafadenoj de la linio — la aliaj du (ĉar entute tri estas necesaj) estas bezonataj por la cirkuito de la elektromagnetoj —, kiu interkontaktigas elektrone tiun maŝaron kun same metala disko, truita en la mezo, situanta en la Madrid'a katoda tubo; tiu disko elektrigiĝas per la samaj variantaj intensoj de tiu plako: tre forte, kiam ĝiaj katodaj radioj tuŝas lumigitajn partojn de l' portreto; malpli ĉiŭfoje, kiam ili venas al malpli lumigitaj portreteroj, kaj neniel ĉe trafo al la nigraj. Ĉi

tiu elektro, simila kiel negativa al tiu de la katodaj radioj, repuŝas la jetitajn radiojn de la Madrid'a ricevilo per pli-malpli granda repuŝo, laŭ la ŝargo de l' disko: tiamaniere ke, kiam ĝi estas tre forta, la tuta radiofasko pasas tra la diska truo kaj venas al la fosforeska ekrano, lumigante ĝin forte en tiu parto, kiu sur ĝi korespondas al tiu de l' portreto sur la rubidia plako, kaj tiel ĝi reproduktas la nomitan parton de l' portreto lumigitan; ŝarĝoj malpligrandaj de l' disko, respondaj al la grizetaj zonoj de la tiea bildo, lasas pasi tra la truo nur parton de la fasko da katodaj radioj, des malpli, ju malpli lumigitaj estas tiuj zonoj; la nigraj, kiuj ne ŝargas la metalmaŝaron de l' sendilo en Sevilla kaj, tiukaŭze, ankaŭ ne la diskon de l' ricevilo en Madrid, ne repuŝas la radiojn ekscitantajn la fosforeskadon; ili restas kaptitaj antaŭ ol veni al la ekrano fosforeskanta; ĝi do restas malluma en la zono respondanta al sia homologa nigra zono sur la portreto.

Oni devas atentigi — kaj tio estas la kaŭzo ke ĉi tiu sistemo ne bezonas la dekmilonojn da seleniaj ĉeloj, da metalfadenoj kaj elektraj lampetoj, kiuj nuntempe ŝajnas formi nesupereblan baron al la solvo, pri kiu ni parolis komence de ĉi tiu noto —; oni devas atentigi, mi ripetas, ke la partoj blankaj, grizaj kaj nigraj kune deseknantaj la bildon vidatan sur la fosforeska ekrano, ne aperas samtempe sur ĝi, sed sinsekve unu post alia. Se la rapideco, per kiu ili sinsekve aperas kaj malaperas, ne estas granda, tio povus kaŭzi ke ni vidus nur opajn ekfairetojn de la lumo, jen en tiu, jen en tiu parto de l' ekrano.

Sed la homa okulo havas proprecon nomitan „persisto de la bildimpresoj“, dank' al kiu la suretina impresado de iu objekto, tiel momente malaperinta kiel momente montriĝanta, ne malaperas kun la sama momenteco el la okulo, sed daŭras sur la retino sekunderon multe pli longan ol la tempo necesa, kiun bezonas la katodradia fasko de Sevilla por trakuri la tutan portreton pentritan de la lumo sur la rubidia lameno, samlonge kiel malfruas aperi en Madrid ĉiuj punktoj de l' nomita portreto: la efekto de ilia tuteco, kontinua, produktita en nia vidanto, estas la sama, kvazaŭ samtempe aperus ĉiuj sur la ekrano, kie la tuta portreto videbliĝas.

La samo okazas en kinematografejo. Sur la ekrano projekciĝas nur 16 ĝis 20 bildoj ĉiusekunde, sed tio produktas ĉe la rigardanto la saman efekton kvazaŭ ili estus sennombraj; ĉar li ne vidas ilin kiel vidaĵojn izolitajn, sed kiel seninterrompan sekvon, kion estigas la ŝajno de ilia kontinua moviĝado. Pro la sama kaŭzo, tio kion mi vidas en Madrid, ne estas malvarma portreto de mia konversaci-kunulino en Sevilla, sed ŝia vizaĝo mem en natura moviĝo.

Mi rimarkigas, ke mi diris „mi vidas“, en estanteco, sed mi diris malbone, ĉar la aparato ankoraŭ ne estas konstruita por ĝenerala aplikado. Mi devus diri „mi vidas, kiam la aparato atingas la maturecon de praktika aplikado“; ĉar la aktuala stato de l' problemo de elektra televidado estas tiu de la senfadena telegrafio tiam, kiam Hertz eltrovis la elektro-magnetajn ondojn, kaj kiam ankoraŭ ne estis aperintaj Branly, Marconi ktp. por eltrovi la senfadenan telegrafion, laŭleĝan idon de la nomita ondo.

Estas certe ke al la teknikistoj tiu ĉi noto ŝajnos nekontentiga, kaj ili estos scivolemaj pri detaloj ĉi tie ne doneblaj; sed la noto ankaŭ ne estas plimpleksigebla, ĉar verŝajne ĝi estas opiniata tro de la nespartuloj. Tial, kiu deziras scii pli multe, demandu sciĝojn de la Societo de Radioj X en London aŭ de Campbell-Swinton mem.\*

11. — Paĝo 45. — Unu el la mezuroj fotometraj por la intenseco de la lum-fokusoj, provataj en la laboratorio.

\*) Intertempe la tekniko jam plu progresis, tiel ke la supra klarigo fariĝis jam iom malaktuala. La originala (hispana) eldono de l' romano aperis jam en 1922. — Noto de la tradukinto.



12. — Paĝo 68. — La Lago Alberto, nomata de la indiĝenoj **Muotan Nzhé**, kies surfaco troviĝas je ĉirkaŭ 700 metroj super la marnivelo, kio rimarkeble mildiĝas ĉe ĝiaj bordoj la teruran afrikan varmecon ekvatoran, ricevis sian nomon de Henry Stanley, kiam en sia lasta ekspedicio al la Ekvatora Airiko helpe al Emin Paŝa li trovis ĉi tiun apud la bordoj de l' nomita lago en aprilo 1888, post kiam li de kvin jaroj estis perdinta ĉian interkomunikadon kun la civilizita mondo, kaŭze de la terura ribelado de l' Maŝdio.

En la Lago Alberto falas, post kiam ili trapasis la famkonatajn akvofalegajn de Murchinson, la akvoj, kiujn branĉo de l' Nilo alportas de la Lago Viktorio-Njaso, giganta akvo-ebeno, kiu nutras la grandan (6270 kilometrojn longan) kaj dum multekaj jarcentoj misteran rivereton: elirinte el la Lago Alberto, ĝi fluas norden formante riverbranĉon, la tiel nomatan Blankan Nilon.

Giganta oni nomis la Viktorio-lagon, kies bordojn esploris Stanley kaj sur kies akvoj li ŝipveturis dum kelka tempo; ĉar ĝi havas surfacon, kiun oni taksis je tri kvaronoj de Hispanujo.

Krom la ekspedicioj, kiujn li efektivigis, post kiam li estis nomita ĝenerala guberniestro de l' nova Kongo-ŝtato, tri estis la ĉefaj kaj grandaj esplor-vojaĝoj de Henry Stanley:

La vojaĝo entreprenita en 1871 por serĉi la famkonatan kaj perdiĝintan esploriston Livingstone, kiun li trovis apud la bordoj de l' Lago Tanganjiko, finiĝis je la fino de 1872. En ĉi tiu vojaĝo estis perfekte pruvite ke eraris tiuj, kiuj supozis ke ĉi tiu lago estas la fonto de l' Nilo.

La granda vojaĝo transafrika, de oriento al okcidento, kiu daŭris de 1874 ĝis 1877: dum ĝi li laŭiris preskaŭ la tutan flulongon de l' rivero ĝo Kongo. Tio estis la origino de la kreo de l' ŝtato sannoma.

La ekspedicio por serĉi Emin'on Paŝa'n (februaro 1887 ĝis 1890).

Du nombroj povas doni ideon pri la penoj eltenitaj en tiuj ekspedicioj: Jam komence de la unua, Stanley perdis 54 funtojn de sia pezo; en la lasta li komencis kun karavano de 707 homoj, el kiuj restis ĉe ĝia fino nur 284.

Emin Paŝa estis germana kuracisto, laŭnome Eduardo Schnitzer, kiu, enirinte kiel tia en la egiptan armeon, rang-altiĝis tiel ke li fariĝis eĉ guberniestro de l' Sudano.

Pri liaj malkonsentoj kun Stanley, kiu lin Jevigis foriri el la regiono de la grandaj lagoj, oni parolis multe kaj skribis ne malmulte sen tio ke, fine, oni povis sufiĉe klarigi, kiu havis pli da motivoj por pendi. Probable estas, ke neniu estis prava laŭ unu aspekto kaj ambaŭ laŭ alia. Estas verŝajne ke la malkonsentoj havis kiel originon, ke ĉiu provis aljuĝi la plej bonan parton al la angla fando kaj al la germana, respektive.

13. — Paĝo 76, 9-a linio de supre: la cifereito mankas. — Elektrogeneratoro, ĉu pilo, dinamo aŭ ĝenerale iu ajn, ne kreas kurenton, dum kiam oni ne kuniĝas, helpe de metalfadenoj, de korpoj aŭ aparatoj kondukantaj elektron, la negativan poluson de la nomita generatoro kun ĝia pozitiva. Sed tuj kiam oni faras tion — ago kiun oni nomas **fermi la cirkuiton** aŭ estigi ĝin — ekforiĝas de la negativa poluso **elektronoj**, tio estas negativa elektro, kiu kun rapido de pli ol 300 000 kilometroj ĉusekunde (tiu de la lumo) jetegas sin al la poluso pozitiva. Ĝianke ni diru, ke tio estas la malo de tio, kion oni en antaŭaj tempoj pensis pri la okazo; ĉar ĝis la malkovro de la elektronoj la elektristoj atribuis kontraŭan direkton al la kurento, supozante ke ĝi fluas de la poluso pozitiva al la negativa.

Sed la plej interesaj aferoj farataj de la elektro ne estas rezultajo de la fenomenoj, kiujn ĝi ĉe sia trapaso produktas en la metalfadeno nek, pli ĝenerale, en la cirkuitoj trairataj de ĝi en formo de kurento, sed sekvo de tiuj, kiujn ĝi kaŭzas **ekster tiuj cirkuitoj**.

Mi tenas en la mano la ekstremajojn de la flekseblaj kondukiloj fiksitaj ĉe la malsamaj polusoj de elektra pilo, de akumulatoro, dinamo, aŭ la metalforketon de l' portebla metafadeno-kondukilo de elektra lampo, antaŭ ol enigi ĝin en la kontaktojn de la elektra lumkondukilaro en mia domo; tien mi devas enmeti ĝin, kiam mi volas lumigi la lampojn. Dum mi ne kunigas la ekstremajojn de l' metafadeno de la pilo, aŭ dum mi ne enigas en la kontaktojn la finaĵoj de l' forketo de la fleksebla lampo kondukilo, ne ekzistas kurento en la metafadeno nek en la lampo. Sed en la sama momento, kiam mi efektivas tion aŭ tion ĉi, tiam ekkuras elektronoj tra la metafadeno de la konduk-linio, kaj ekster la metafadeno fariĝas okazoj tiel interesaj kiel misteraj.

Tiuj fariĝoj estas ŝuldataj al la fakto ke, kiam la kurento fluas laŭlonge de l' metafadeno, el ĝi eliĝas subtilaj impulsoj, perturbantaj la ĉirkaŭan aeron. Tio nomiĝas **forto-linioj** aŭ **forto-tuboj de Faraday**. Kompreneble, ili estas nevideblaj kaj nemateriaj.

En realeco ne estas la aero, mi volas diri: la gaso nomata aero, kiu estas perturbata, sed alia aĵo: la etero. Sed ĉar estus tro amplekse nun paroli pri ĝi, mi nur diras, por daŭrigi kaj ne eniĝi en profundajojn, ke la modifitaĵo estas la **stato de l' spaco** — tre helpa esprimo, ĉar ĝia nedefiniteco koncizigas tre malmulte —, kie ĉe naskiĝo de ĉiu kurento kreiĝas **kampo elektro-magneta**. En ĉiuj metafadenoj, kiuj troviĝas interne de ĝia trafpovo kaj formas fermitajn cirkuitojn, ĝi naskas kurentojn en direkto kontraŭa al tiu de la pilo aŭ dinamo, kiu kreas la unuan kurenton. Ĉi tiun kurenton mi ĵus estigis, kuniginte la metafadenojn aŭ uzinte kontaktilojn.

Ĉi tiuj kurentoj nomiĝas **induktaj kurentoj**, kaj al ilia efikado oni ŝuldas ĉiujn grandajn farojn, kiujn la elektrodinamiko realigis en la mondo. Sed ili havas la proprecon ke, kiel momentaj, ili mortas apenaŭ naskite; nur kiam ili ĉesigas sian fulmegan fluan, la ĉefa kurento, kiu ilin estigas, akiras sian normalan intensecon, sub kiu normo ĝi restas en la unuaj momentoj de l' ekfluo.

La kaŭzo de tio estas, ke la forto-linioj de l' elektro-magneta kampo reagas je la metafadeno de la origina kurento, samkiel ili agas je iu ajn el la pasivaj cirkuitoj, pri kiuj mi ĵus parolis, per tio ke ili igas kuri tra la sama metafadeno **allan kurenton en kontraŭa direkto al la komenca**. Kun ĉi tiu luktas la kurento naskita el la reago de l' kampo, nomata **ekstra ferm-kurento**, kaj reduktas ties intensecon dum kelkaj momentoj.

La ekstrakurento estas la rezultato de la inertecon, kiun kontraŭmetas al la ĉefa kurento la magneta kampo, por esti kreata de ĉi tiu.

Dum la origina kurento daŭras flui sen ŝanĝo de la intenseco aŭ iu alia rimarkebla okazo en la kampo, ne cirkulas kurento tra la kondukiloj inertaj, lokitaj en ĝi. Sed se mi disigas la pintojn de l' metafadeno de la pilo aŭ eltiras la kontaktilon de la elektra lumo — tio estas, se mi rompas tiun originan kurenton —, la elektro-magneta kampo redonas al ĉiuj fermitaj kondukiloj, kiuj troviĝas en ĝi, ĉian energion, kiu antaŭe en la notita kampo estis amasigita je kosto de la malpliigo pruvita per la intenseco de la genera kurento dum la unuaj momentoj de ĝia estiĝo. Tiun energi-redonon realigas la kampo subite, tuj, en formo de kurentoj kreitaj en la menciitaj kondukiloj, tra kiuj ili cirkulas nur unu momenton kaj en direkto kontraŭa al tiu de la kurentoj naskitaj ĉe la kreiĝo de l' kampo, kiam ni fermis la ĉirkuilon, kiun ni nun malfermas kaj je kiu agas la influo de tiu malŝarĝo de l' kampo en formo de kurento, kies intenseco kaj direkto aldoniĝas al la ĉefa. La aliĝo de la intensecoj manifestiĝas videble en sparko, kiu saltas inter la pintoj de la metafadeno, kiam ili apartiĝas en la kontaktojn; kun des pli granda forto, ju pli rapide ili disiĝas.

Tio nomiĝas **rompa ekstrakurento**. La ĉefa kurento, kiu ĉe la estiĝo fluis kun malpli da intenseco ol ĝi efektive havas, kuras en la momento de l' interrompo kun multe pli da intenseco; ĝi povas atingi tian eks-

tremon, ke en certaj kazoj ĝi akiras fortegon kapablan fandi la metal-fadenon kaj produkti gravajn akcidentojn en la aparatoj, en la konduk-linioj kaj eĉ ĉe homoj.

Kiu volas, provu ĉi tiujn diferencojn en la intenseco de la kurentoj, kiam ili estas kreataj aŭ desigataj; li observos ke, antaŭ ol metal-fadenon aŭ kontaktingo kontaktiĝas (unua kazo) aŭ interrompiĝas (dua kazo), **sparkoj multe pli malfortaj saltas ĉe fermo ol ĉe interrompo de la kurento.**

Tiamaniere, kurento nedanĝera en normala funkciado povas produkti kvakegajn difektojn, se oni ne aplikas antaŭgardon en la momento de l' interrompo. La ĉefaj estas starigi tuj apud la ĉeflinio inertajn cirkuitojn, kiuj helpu al ĝi absorbi la senŝarĝigon de l' kampo. Alia antaŭgardo: Oni malfermu la cirkuiton laŭeble malrapide, por mildigi la rapidecon de tiu reago; plua, tre efika antaŭgardo: Oni malfortigu iom post iom la intensecon de la kurento, kiu estu interrompata antaŭ ol venis la momento de la tuta malfermo de l' cirkuito.

La ekstrakurentoj de fermo kaj malfermo estas la plej frapantaj fenomenoj inter la produktitaj de tio, kio nomiĝas **elektro-magneta mem-induktado.**

**14. -- Paĝo 109. --** Tio ne estis denova historia sensencaĵo de Mob, kvankam Garcia tiel opiniis, ĉar efektive en la mondo oni fine mezuris per „elefantpovo“ la forton de la grandaj maŝinoj post la frostiĝo de Garcia en Bilbao; la „ĉevalpovo“ estis tro malgranda.

**15. -- Paĝo 110. --** La kilo-kalorio samvaloris laŭ mekanika forto la signifiĝan nombron de 425 000 kilogram-metroj.

**16. -- Paĝo 110. --** Laboro necesa por levi milionon da toneloj ĝis unumetra alteco, aŭ mil tonelojn ĝis unukilometra alteco. Laborunuo uzata en la jarcento C.

**17. -- Paĝo 110. --** Por ĉi tiu libro ĝi estas temo jam tro ampleksa.

**18. -- Paĝo 114. --** Ni lasu al Mob la tutan respondecon pri la aserto (kiu ja devas esti vera, se li diras ĝin), ke en la centa jarcento aperis sur Neptuno kaj Jupitero jam homaj rasoj pli malpli similaj al la nia. Laŭ opinio de niaj saĝaj astrofizikistoj, la nomitaj planedoj ankoraŭ ne estas maturaj por tio.

**19. -- Paĝo 114. --** „La grado de l' progreso atingita en la utiligado de la elektra ondumado igas al mi tre kredebla la entreprenon, pri kiu Mob parolis al ni: redukti la rapidecon de la rotacio (sinturnado) de nia planedo, ĉar estas antaŭ miaj okuloj ke, por atingi tion, sufiĉas...“

Tio ĉi supra estas kopiita el noto farita de Inés Ramirez. El Coronel Ignatus ne opinias oportune ĝin kopii ĝisfine, ĉar povus okazi ke li havus iutage la ideon rakonti tiun ĉi inventon en alia volumo, kaj li ne volas, en tute neafendita momento, esti surprizata vidi ĝin en ia alia libro, kiu ne estas lia, sed presita intence en tia formo, ke oni povus ĝin intermiksi kun unu el lia Biblioteko.

Tio ne estas supozo, sed spert-akiro. Ĉar uzurpante la flagon de „Biblioteko Roman-Scienco“, kreita de Ignatus, aperis jam libroj, kiujn li ne skribis, kiuj ne apartenas al lia Biblioteko kaj kiuj tial ne rajtas kaŝi sin, kiel ili faras, sub ĝia titolo, eĉ se ne okazas pli, ĉar la afero povas erarigi la publikon.

**20. -- Paĝo 142. --** La monto Ruvenzoro, kolosa montego afrika, estis trovita de Stanley dum lia esplorado de la ĉirkaŭejoj de Lago Alberto Eduardo; ĝi situas en SSOk (sud-sud-okcidento) de Lago Alberto.

Inter ambaŭ leviĝas la Ruvenzoro, kiu ne estas nur unu monto, sed

vasta montara kompaktaĵo, kies plej altaj, neĝokovritaj pintoj leviĝas ĝis 5060 metroj super la marnivelo.

21. — Paĝo 208. — La mikrotomo estas mirinda aparato de la moderna mekaniko, per kiu la histologiistoj tranĉas la bestajn korp-tekstojn, kiujn ili, post antaŭa tinkturado, deziras studi mikroskope, reduktinte ilin al la neverŝajna dikeco de malgrandegaj eroj de milimetroj (milonoj da milimetroj); tiamaniere ili povas esti studataj pro sia diafaneco. Ankaŭ la botanikistoj uzas same tiun aparaton por la studado de la plantoj.

22. — Paĝo 210. — Estas supozeble ke la procedo uzata por kinematografe fotografi la korojn — kion vidis la reviviĝintaj barbaroj de l' jarcento XX — estis simila kvankam, kompreneble, perfektigita, ĉar 80 jarcentoj estas sufiĉe longa tempo por perfektigi iun ajn inventon; estis simila, ni ripetas, al tiu invento pli nova (pli nova en 1921) de D-ro Jules H. Stein, kiu nomiĝas **Fluido X**. En angla lingvo li nomas ĝin „X-ray-fluid“, sed ni mallongigis la tradukon.

Oni scias ke la radioj X, kies nomon aplikas la nomita doktoro al sia invento, trapasas la karnon traĝeblan por ili, same kiel estas trapasebla ankaŭ la karbo; sed, male, vitro ne estas diafana por ili; kiel ankaŭ ostoj kaj plumbo ĝi haltigas la radiojn.

Kiel ankaŭ scias preskaŭ ĉiu, tio estas la kaŭzo, ke la ĉefa utileco de ĉi tiuj eksterordinaraj radioj en medicina diagnozado montriĝas ĉe formulado de konstatoj pri ost-suferoj. Ĝi estas tre limigita ĉe la esploro de visceroj, ekz. hepato, koro ktp., kiuj per ĉi tiuj radioj videbligas nur tre malclare.

La fluido de D-ro Stein ne estas la fino de l' vojo, sed ĝi bone povas esti la komenco de vojo irota ĝis oni alvenos tie, kie oni vidos tutege klare la organojn de l' homa korpo. Tiu invento celas — kaj en ĉi tiu rilato ĝi ŝajne jam atingis tre konsiderindajn rezultojn — igi diafanaj, en grado konvena por ĉiu aparta kazo, la partojn de l' organismo, kiujn oni ne volas esplori kaj kiuj malhelpas vidi aliajn, kiujn oni deziras esplori, lasante ilin malpli diafanaj kaj pli kompaktspektaj.

En nordamerika revuo de 1921 la nomita doktoro publikigis fotografitajn vidaĵojn de la mano de feto, de tuta feto kaj de vesperto. La fotografajoj estis faritaj post apliko de lia invento, kaj tiuj bildoj montris kun sufiĉe da detaloj ne nur la ostojn, sed ankaŭ la internajn tekstojn troviĝantajn post aliaj, kiuj neniel malhelpas vidi la unuajn, ĉar la travidebleco de la duaj absolute restas.

La fiziko-kemia problemo, kiun la inventinto celis solvi, por veni al la atingita rezulto, estas resumita per jenaj liaj vortoj, kiujn mi fidele tradukas:

„La agado de l' fluido X baziĝas sur la leĝo de refrakto. La fluido estas kunmetita el certa nombro da kemiaj likvaĵoj — kiaj, pri tio li kompreneble silentas —, kiuj ĉirkaŭas kaj tranpenetras objektojn aŭ tekstojn, farante ilin laŭvole diafanaj aŭ duondiafanaj. Oni povas aserti, ke la diversaj tekstoj havas diversajn refrakt-indicojn; ke la bone konata leĝo reganta por la refrakt-indicio de la neorganecaj korpoj ĝis certa punkto povas esti aplikata al korpoj organecaj laŭ ĉi tiuj terminoj; se vegetaĵoj aŭ bestaj korpoj oni trapasas ĝis satureĝo en likvaĵojn, kies refrakt-indico estas proksimume la meza de tiu de l' koncerna korpo, la rezultajo estas malpli granda reflektiĝo de la lumo kaj proksimuma diafaneco.“

Krom la rezultajoj, kiujn D-ro Stein, laŭ noto pri sia eltrovo, atingis en la observado de bestaj organismoj, inter kiuj li parolas pri ekzameno de l' vazaj sistemoj, estas ege interesa kaj ege esprimpova la sekvanta, kiu rilatas al studo de vegetaĵoj:

„Ligna tabulo, duonan colon dika, submetita al traktado per la fluido

X. lasas vidi ne nur ĉiujn detalojn de sia interna fibra strukturo, sed, tra ĝi, permesas legi presajon metitan sur la alian flankon."

Tio estas la formo, en kiu la inventisto sio esprimis en Novjorka revuo.

23. -- Paĝo 215. -- En postaj tagoj Marcial klarigis al la geedzoj, kio estas ozo-voltio kaj eteridlo, pri kies malkovro ili havis nenium scion, ĉar ambaŭ estis studitaj kaj utiligitaj, dum ili dormis. -- La ozo-voltio estas tiu gaso, kiu en la atmosfero donas vojon al la homa parolo, sendata per la senfadena telegrafio; la eteridlo en la stelaraĵ spacoj donas pason al la ideoj, kiujn de unu al alia mondo transsendas la interplaneda telegrafio de 1<sup>a</sup> centa jarcento. -- Noto de Juan García.

24. -- Paĝo 220. -- Eble povas ŝajni troigita la priskribo de tiel terura situacio kiel tiu de la parioj. Kaj malgraŭ tio, la historio de la homaj maljustegaj pruvos, ke ne ekzistas krimo, kiom ajn terura ĝi estas, kiun ne faris la homa socio, kiam ĝi ne havas moralon, ĝin brid-aŭta.

Kio estis la sklaveco kiel socia institucio kaj ĝiaj teruraĵoj, estas priskribita jam en multegaj libroj. Kion kun la kristanoj faris Romanoj kaj aliaj popoloj, nur pro la fakto, ke ili estis kristanoj, tio estas sufiĉe konata. Sed rilate al la vivo de la parioj en la centa jarcento, mal-humane enfermitaj en katakomboj, estas konvene transskribi kelkajn alineojn el historia dokumento: Pri la laboro en la karbominejoj de Granda Britanio. Ĝin eldonis inspekta komisiono nomita por tiu speciala celo, post jaroj kaj jaroj da batalado. Ĝi denuncas senombrajn krimojn faritajn en la malnoblega ekspluatado de 1<sup>a</sup> homo fare de 1<sup>a</sup> homo: krimojn de la superĝuantoj de 1<sup>a</sup> jarcento XIX, ne kontraŭ raso konsiderata malsupera, sed kontraŭ kreitaĵoj de la propra, en laŭdoj nomataj kristanaj kaj eĉ liberalaj kaj demokrataj.

La inspektado estis deklareta en Londono je 1842, kaj el ĝia informaro devenas la sekvantaj alineoj:

„La Komisiono trovis virinojn laborantajn subtere kiel ŝarĝbestoj (beasts of burden), ĉirkaŭatajn de naŭza medio de fizika degenero, merala malaltigo kaj korupteco, pri kiu povas doni ideon eĉ ne la vivo inter sovaĝuloj. Infanoj ses-, kvin- kaj eĉ kvarjaraj, stultiĝintaj, mal-grasegaj, duon-mangintaj, duon-malsataj, estas devigataj tiri, irante sur piedoj kaj manoj en malaltplafonaj galerioj de la karboŝaktoj, la ŝarĝitajn vagonetojn. Oni ligas ilin al ĉi tiuj vagonetoj per ĉenoj metitaj ĉirkaŭ iliaj zonoj kaj kiuj pasas inter la kruroj... En multaj min-ejoj el la galerioj gutadas akvo. Oni neniel zorgas pri ventumado aŭ pri drenado... Tiel la kompatindaj virinoj vivas ŝvitante kaj duon-sufokite pro manko de aero.

Ofte oni vidas knabojn laborantajn per la vagonetoj en galerioj ne pli altaj ol 22 coloj (55 centimetroj), kun la korpoj horojn kaj horojn kurbigitaj en teniĝo, kiu ĉe kreskado kaŭzis definitivan misformiĝon ĉe multaj el tiuj malfeliĉuloj. La virinoj devas trakti, tirante stajn ŝarĝojn, 15 kilometrojn ĉiutage. Unufoje ĵunulino laboris 24 horojn senĉese, ripozis du kaj denove komencis taglaboron de 12."

Sufiĉas. Tion vidis komisiono publike nomita. Pro tio estas verŝajne, ke ĝi ne vidis ĉion, kio okazas en la minejoj, ĉar la posedantoj certe prenis antaŭgardojn por kaŝi antaŭ ĝi ion kaj alian.

25. -- Paĝo 225. -- En tubo, el kiu oni eligis la aeron tiom, ke ĝi estas en stato tre maldensa, tre proksima al absoluta vakuo, kaj ĉe kies ekstremajoj de du metaladenoj, kiuj interkomunikiĝas kun la polusoj de elektro-generatoro, saltas de unu al la alia metalpinto la kurento (kiu ne trapasas kiam la tubo estas plena de aero) en formo de lumo diverskolora kaj diverskaraktara, laŭ tio ĉu estas granda aŭ malgranda la manko de aero. Ĉi tiu malsargiĝo portas de la metaladeno negativa

al la pozitiva elektronojn, t. e. elektrajn ŝarĝojn, ne kunigitajn kun iu materia substanco; ili konsistigas la katodajn radiojn kiuj estas kapablaj trapasi maldikajn platojn el aluminio, kaj estas similaj, se ne egalaj, al la elradiaĵoj „beta“, eligitaj de la radiumo.

Samtempe fluas en inversa direkto, de la pinto pozitiva al la negativa, aliaj radioj nomataj anodaj, formitaj de pozitivaj ideoj, t. e. eretoj infinitezimaj de materio ŝarĝita per pozitiva elektro, analogaj al la elradiaĵoj „alfa“ de la radiumo.

Fine, la katodaj radioj kreas, puŝante al la vitro de la Crookes-tuboj, la radiojn X aŭ Roentgen-radiojn, asimileblajn al la elradiaĵoj „gama“ de la radiumo. — Sed pri ĉi ĉio oni jam parolis en aliaj libroj. Tial ni metas finon al ĉi tiu noto.

26. — Paĝo 256. — Oni povas vidi la diritan en la noto n-ro 13, rilate al la elektro-magnetaj kampoj.

27. — Paĝo 257. — La interrompiloj uzataj en multnombraj aplikoj de la elektro-dinamiko estas, kiel indikas ilia nomo, aparatoj destinitaj aŭtomate tranĉi elektran kurenton, por lasi ĝin flui denove en la sekva momento kaj ree ĝin tranĉi, kaj tiel sinsekve; ĉe mezurado, la rapideco de ĉi tiuj interrompoj estas de kelkaj ĝis kelkmiloj da fojoj ĉiusekunde.

Inter aliaj aplikoj de la interrompiloj estas tre interesaj la terapĕtikaj kiuj, dank' al la momenteco de la sinsekvaj kurentoj, kiujn ili lasas trapasi, fariĝas bonfaraj por la homa organismo. Se tiuj kurentoj de alta tensio estus pli daŭraj, ili mortigus la pacientojn.

La komuna kaj ĝenerala celo de la interrompiloj estas agigi la fortojn de la magnetaj kampoj, kaŝ-estantaj kaj ne-aktivaj en ili, dum kiam la kurentoj, el kiuj ili naskiĝas, cirkulas sen ŝanĝo de intenceco; sed ili liberiĝas kaj estas utiligeblaj en diversaj laboroj. Ĉiŭfoje kiam interrompiĝas la kurento. Se ĉi tiu interrompiĝo okazas centfoje en sekundo, cent fojojn laboras la kampo; se dumilfoje, dumil fojojn en sekundo oni povas utiligi tiujn fortojn, kio, en la praktiko, egalvaloras al konstanta utiligado, kiel oni jam diris en alia noto de ĉi tiu libro, rilatanta al la ekstrakurentoj ĉe interrompo aŭ fermo de l' cirkuito.

28. — Paĝo 265. — Ili estis viktimoj de io, kio ne povas havi alian nomon ol ameca aŭtoindukto, ĉiel simila al la elektra kiu, laŭscie, levas eksterordinare kaj eĉ danĝere la ekstrakurenton de interrompiĝo, kiu ĉe interrompo de cirkuito fortigas la jam en ĝi cirkulantan kurenton, pligrandigante la intensecon de l' sparko. Tion ĉiu ajn povas vidi ĉe kontaktujo de la domlumaj konduktiloj. La sparko estas pli forta ĉe eligo de l' kontaktilo ol ĉe enigo.

29. — Paĝo 266. — Eĉ se la kampoj elektra kaj ameca estas similaj, ĉi tiu lasta ne havas la rapidecon aŭtoinduktan kiam havas la unua kaj tial ne malŝarĝiĝas tiel abrupte kiel tiu. — Observo prenita el unu el la multoblaj memornotoj de Mob pri lia invento.

Fino de la notoj.

## KLARIGOJ, RIMARKIGOJ, ĜUSTIGOJ

Estas notitaj nur vortoj kaj esprimoj ne troviĝantaj en Plena Vortaro de SAT (mallongigo: PV). La ciferoj inter parentezoj post la vortoj indikas la paĝon, kie la koncerna esprimo aperas unuafoje; antaŭmetita N (ekz.: N8) signifas, ke la vorto troviĝas sub „Notoj de l' aŭtoro“ (sama cifero). La donita elparol-maniĝo estas, kompreneble, nur proksimuma. — La klarigoj nek pretendas esti kompletaj nek anstataŭi eventualan konsulton de enciklopedio.

### I. Vortoj hispanaj; alilingvaj; propraj nomoj.

- Ave Maria Purísima** (66) — latin-hispana = ekkrio de mirego.
- Berceo** (61) = la plej malnova hispana poeto konata.
- Biblioteca Novesco-Científica** (5) — elparolu: biblioteka novelesko-sientifika = biblioteko de sciencaj romanoj, fondita de El Coronel Ignotus.
- Bilbao** (9) = grava industri-urbo de norda Hispanujo.
- Burgos** (44) = grava historia urbo de la hispana provinco Malnova Kastilio.
- Cartoya, Ramón** (80) — elp. Kartoja.
- Don** (5), **Doña** (57) — elp. donja = hispana titolo „sinjor(in)o“ antaŭ la plena nomo aŭ la nura baptonomo.
- El Coronel Ignotus** (1) — elp. Koronél = pseŭdonimo de José de Elola (elp. Ĥosé).
- flamboyanes, húcares** (141) — elp. flambojanes, húkares = plantoj de nekonata speco.
- Guernica** (44) — elp. Gernika = loko en la hispana provinco Viskajo.
- Indibil kaj Mendonio** (62) — elp. Mendonjo — legendaj figuroj el la romana epoko en Hispanujo.
- Inés** (9) — hispanlingve = virina nomo Agneso.
- Juan** (9) — hispanlingve, elp. Ĥuan = vira nomo Johano.
- Marcial Rucandío** (29) — elp. Marsjál Rukandjo.
- Mauricio** (223) — elp. Maŭrisjo = Maŭrico, Morico.
- Paquito** (223) — elp. Pakito = Francisketo, Franĉjo.
- Pereda y Alarcón** (61) — anstataŭ „y“ metu „kaj“, elp. Alarkón = du hispanaj verkistoj novtempaj.
- Pinín** (218) = infan-karesnomo por Juan.
- Santander** (29) — elp. Santandér = nordhispana urbo.

**Sevilla** (22) — elp. Seviliĵa = la ĉefurbo de Andaluzio.  
**Torres Quevedo** (38) — elp. Kevedo = fama sciencisto hispana, Esperanto-amiko.

\*

**Barbaroj** (11) = ĉi tie signifas: epoko de popolmigrado.  
**Branly** (N 9) — elp. Branliĵ = franca fizikisto.  
**Cantù, Cesare** (N 1) — elp. Kantù Césare = itala verkisto.  
**Clara Snow** (187) — elp. Klara Snoŭ.  
**Crookes** (255) — elp. Kruks = angla fizikisto kaj kemiisto;  
Crookes-tubo = preskaŭ vakua tubo por elektraj eksplodoj.  
**Euskalduna Rondo** (17) = klubo en Bilbao.  
**Faraday** (257) — elp. Féredi = konata angla fizikisto-kemiisto.  
**Féid(al)ismo** (11) = mezepoka kavaliĵ-biena tempo.  
**gourmand** (96) — franclingve, elp. gurmang = manĝfrandulo.  
**Hertz, Henriko** (117) — elp. Herc = germana fizikisto, eltrovis la elektrajn ondojn.  
**Iberio** (61) = (fantazia) nomo de la Ibera duoninsulo en la jaro 10 000; iberio = loĝanto de Iberio.  
**Kantabra** (29) = (fantazia) nomo de urbo nordhispana en 10 000.  
**Linde-aparato** (N 3) = maŝino por produkti malvarmon, nomita laŭ la inventinto ing. C. v. Linde.  
**Luko** (96) = Lucius Licinius Lucullus, romana militestro kaj mondkonata „gourmand“.  
**Mahdio** (N 12) = Mohamed Ahmed, ribelestro en Sudano, deklaris sin „mahdio“ (mahometana Mesio).  
**Marconi** (N 9) — elp. Markoni = tutmonde konata itala fizikisto.  
**Mondopolo** (10) = (fantazia) nomo de la tutmonda ĉefurbo en 10 000.  
**nominor leo** (14) — latinlingve = mi estas nomata leono, t. e. mi estas la plej forta.  
**Oktaviana** (99) = de: Oktaviano, origina nomo de l' unua romana imperiestro Aŭgusto; epoko Oktaviana = epoko de prospero.  
**Pantagruela** (96) = de: Pantagruelo, ĉefpersono en la romano de Rabelais „Gargantua et Pantagruel“.  
**Plutona** (110) = de: Plutono (Hadeso), greka dio de l' interna terfajro.  
**Protea** (111) = de: Proteo, mitologia persono kapabla ŝanĝi laŭvole sian figuron.



- Rekonkero** (12) = ĉi tie: epoko de la rekonkerado de Hispanujo el la maŭra (araba) regado.
- see-catching-power** (110) — anglalingve, elp. si-keĉing-paŭr = maŝino por eltiri forton el la maraj tajdoj.
- Tesla** (38) = amerika fizikisto, eksperimentis per tre alte tensiita elektra kurento.
- vanitas vanitatum** (12) — latinlingve = vantaĵo de vantaĵoj (Pred. 1,2).
- Viskajanoj** (44) = loĝantoj de la vaska provinco Viskajo en norda Hispanujo.
- Vaskoj** (44) = parenca gento de nekonata origino kun tute speciala lingvo.

## II. Vortoj kaj esprimoj nur Esperantaj.

- am-ĉevalpovo** (31) = (fantazia) nomo de mezur-unuo por tensio de elektro-amo.
- amikumi** (89) = kunigi en specon de libera geedzeco.
- anestezij** (20) = anestezi laŭ PV.
- aŭtomo** (35) = (fantazia) nomo de maŝinhomo.
- ĉirkuito** (45) = ĉirkvito laŭ PV.
- ekstraktoro** (42) = maŝino por eltiri ion.
- epistolo de S-ta Paŭlo** (86) = I. Kor. 7, instruanta pri geedzeco.
- erupcio**, rozoj de (25) = ruĝaj makul(et)oj, simptomaj por kelkaj malsanoj.
- fotometro** (45) = (fantazia) nomo de instrumento por mezuri lum-unuojn.
- geo-termo-atraktoro** (110) = maŝino por eltiri varmon el la ter-interno.
- helikoptero** (53) = flugmaŝino kun suprenpela ŝraŭbo.
- helio-transformatoro** (110) = transformilo de la sunvarmo.
- hiperestezio** (43) = tronutriteco.
- histologio** (184) = scienco pri la histoj (ĉelaj teksaĵoj); histologo = sciencisto de histologio.
- indukcio** (257) = indukto laŭ PV.
- infanparolado** (diverspage). Oni notu ke la infano ne povas elparoli la sonon r, kiun ĝi aŭ tute forlasas (i'j = iri) aŭ anstataŭigas per d (supre = supre, telule = terure). Anstataŭ e ofte estas uzata s; h, kaj i post ĉ estas forlasataj. Ekzemplo de infana parolo (224, 6-a bimo de maŝsupre): To fue kep. = Tro frue, ni ne volas, ni ne iras, ioriru, foriru!

- kanario** = interjekcio de miro, malpli forta ol „fulmotondro!“ k. s.
- kimero** (245) = fimero.
- koncedi** (15) = bonvole cedi.
- kriptono** (20) = (fantazia) nomo por ĝis nun nekonata gaso.
- kupido** (34) = (fantazia) nomo por elektro-amo kaj samtempe ĝia mezur-unuo; kupido-terapio = kuracado per elektro-amo.
- limfo** (19) = suko de l' korpa ĉelaro.
- li ne havas avinon, ĉar li mem sin laŭdas** (101) = hispana proverbo.
- marasmo** (19) = korpa kadukeco.
- navo** (16) = parto de halo, eble limigita per kolonoj, kiel en preĝejo.
- rekviemo** (82) = meso aŭ solenaĵo por mortinto.
- rekvizicio** (273) = perforta (milita) forpreno de vivnecesaĵoj sen pago.
- sekvestro** (273) = konfisko, forprenado.
- sibaritismo** (95) = diboĉado, kian laŭfame faradis la loĝantoj de la antikva urbo Sybaris.
- sinovio** (230) = interna artik-ŝmiraĵo.
- tajdvatio** (110) = maŝino por elbiri forton el la maraj tajdoj.
- tele-** (36) = teknika prefikso por indiki, ke io estas farata el malproksime.
- telefoto** (36) = televid-aparato.
- telekineo** (36) = aparato por teledirekti boaton, veturilon, aerostaton, figuron.
- televicinografo** (37) = viscino = telefoto.
- termikismo** (107) = (fantazia) nomo de scienco okupiganta pri varmoorto.
- tokologo** (148) = akuŝisto, akuŝhelpanto.
- viscero** (20) = intesto, ankaŭ en brusto kaj kranio.

### III. Ĝustigoj.

**Kataraktoj** de Stanley (63) — pli ĝuste: **Akvoŝaloj**.  
**kreskado** (257, linio 11 de malsupre), devas esti: **kaskado**.  
**palpebron-kuntira** (187, meze) devas esti: **brovon-kuntira**.  
**Pentagruela** (96, linio 5 de malsupre) devas esti: **Pantagruela**.

## ENHAVTABELO.

Antaŭparolo . . . . .	5
Mallonga prologo . . . . .	9
1. Malsano? . . . . . Akcidento? . . . . . Morto?	16
2. Sinjoro García kaj fraŭlino Ramírez komencas varmetiĝi . . . . .	27
3. La dormanta paro difektas du fosilajn ungekuntulojn . . . . .	41
4. La vekigo . . . . .	48
5. Inés kaj Juan klarigas al si sian okson amvibradon . . . . .	60
6. Ĉapitro tiel mallonga kiel stranga . . . . .	72
7. Sekreta geedziĝo kaj nova persono . . . . .	80
8. D-ro Mob nomas du subhelpantojn al Rucandio . . . . .	95
9. La Mob-Amo . . . . .	107
10. Mondopolo el la birda perspektivo . . . . .	124
11. La urbaj stratoj kaj la modoj mondopolataj . . . . .	137
12. Edukado »fin de siècle« . . . . . de l' jarcentoj . . . . .	146
13. Marcial malsupreniras al la mondo de la parioj . . . . .	157
14. La historio de Cartoya . . . . .	166
15. Koroj mortintaj kaj koro vivanta . . . . .	183
16. Orfa je filo . . . . .	195
17. La reviviĝintoj vidas feliĉon kaj doloron en la fundo de la koroj . . . . .	206
18. Infanaĵoj . . . . .	218
19. La subhelpantoj kaj ilia senpera ĉefo . . . . .	229
20. Malfidelaĵo nebligita de Rucandio . . . . .	242
21. La elektro-ama interrompilo . . . . .	254
22. Malbeninda jarcento! Malbeninda kasto! . . . . .	264
23. Marcial, ribelulo kaj diplomato . . . . .	275
24. La forto de la senkulpeco . . . . .	289
25. Negigitaj ŝnurfinoj . . . . .	302
26. La konspiro de l' amo . . . . .	309
27. La amo ribelas . . . . .	319
Notoj de l' aŭtoro . . . . .	333
Klarigoj, rimarkigoj, ĝustigoj . . . . .	349

9



FEDERACION  
ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO  
HISPANA ESPERANTO UNIO